

Esperanto U S

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ★ 2006/1
Dumonata bulteno eldonata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ★ 2006/1

En la Numero

- ★ Prezidanta Saluto 3
- ★ Raporto de ELNA al UEA . . 3
- ★ The Heartbeat of ELNA –
its Central Office 4
- ★ Nova Paĝaro de ELNA. . . 5-6
- ★ Libroforma PMEG!. 6
- ★ Loke: Georgio. 7
- ★ Kiel Organizi Kongreson . . 8
- ★ Bonvenon al NASK 9
- ★ Tradukoj por
la Nova Epoko 10
- ★ Lost in Translation 10
- ★ Novaj Libroj de ELNA . . . 11
- ★ Vojaĝu Esperante! 12



“Estas nenio kion niaj superhomoj ne povas fari!”

Nova, moda, alloga retpaĝaro verŝajne nuntempe estas la plej grava vizaĝo kiun organizaĵo montras al la mondo, diras Steven Brewer, la vic-prezidanto de ELNA

Steven Brewer

Antaŭ jaro, oni petis ke mi proponu min kiel vic-prezidanton de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) kaj mi akceptis. Kiam mi rigardis la bezonojn de ELNA, mi decidis ke la plej granda bezono verŝajne estas la retpaĝaro. Oni konstruis ĝin

antaŭ preskaŭ dek jaroj. Tiam ĝi aspektis sufiĉe moda kaj dum kelkaj jaroj, oni sufiĉe zorge pligrandigis kaj plibonigis ĝin. Poste ĝi komencis putri.

Dum la pasintaj kelkaj jaroj neniue vere subtenis ĝin. Oni povis sendadi petojn al la komisiito pri la retpaĝaro kaj

ricevi nenan respondon. Mi volontulis respondeci pri la konstruado de nova paĝaro, kaj dum la Landa Kongreso 2005 oni elektis min kiel vic-prezidanton kaj oficialigis min kiel komisiiton pri la retpaĝaro. Mi dissendis peton ke oni helpu min novigi kaj redesegni la paĝaron.

(Daŭrigo sur p. 5)

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

☎ 510/653-0998; 2510/653-1468

✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Philip G. Dorcas
Vice President/Vicprezidanto: Steven D. Brewer

Secretary/Sekretario: Anna Bennett
Treasurer/Kasisto: William B. Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Joel Amis, D. Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi Harmon, Jerry Johnson, Orlando E. Raola, Robert L. Read, Julie Spickler

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Don Harlow

Esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 42, No. 1

ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Joel Amis

Assisting editor, layout/Vicredaktoro, kompostado: Ĵenja Amis

✉ yevgeniya_amis@yahoo.com

Materials for **Esperanto USA** should be sent to/Materialojn por **Esperanto USA** oni sendu al:

Esperanto USA (Joel Amis)
2025 Peachtree Rd. NE, #927,
Atlanta, GA 30309, USA/USONO
or by e-mail/aŭ retpoŝte al:
joelamis@yahoo.com

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprimataj en tiu ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la publikigita materialo al ELNA.

Saluton karaj gesamideanoj!

Unue, mi povas kun ĝojo anonci al vi ke la (jam de longe neoficiale anoncitaj) datoj kaj ejo por la ĉi-jara ELNA-kongreso en Novjorko estas jam oficialaj: ĝi okazos la 21-an ĝis la 23-a de julio en Fashion Institute of Technology en Manhattan. Mi esperas ke, eĉ malgraŭ la malfrua anonco, mi vidos vin ĉiujn tie!

Alia granda novaĵo estas io kion vi eble jam rimarkis se vi de tempo al tempo vizitas la retpaĝaron de ELNA – jes, ELNA havas tute novan retpaĝaron! Legu ene pri la disvolviĝo de tiu ĉi lastatempa faro de niaj “superhomoj”.

Sed tio ne estas ĉiuj grandaj lastatempaj novaĵoj. Ankaŭ nia eldona fako tre aktivas – ELNA ĵus eldonis la unuan libroforman eldonon de Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, ofte nomata simple “PoMEG”. Sed ĝuste kiom mejloŝtona estas la eldono de PMEG? Ĉu ĝi anstataŭos Plenan Analizan Gramatikon (PAG) kiel la plej aŭtoritata gramatika konsultlibro? Nu, aĉetu ĝin kaj juĝu mem!

Kiel vi certe rimarkis, tiu ĉi numero estas pli maldika ol la antaŭaj du – tio estas pro tio ke la antaŭaj du numeroj estis triobla aŭ duobla. Ni nun reiras al la kutima numergrando kaj aperritmo: ses 12-paĝaj numeroj jare. Ni ĉiam strebas al altkvalita revuo kiu ĝuste spegulas la agadon de ELNA-anoj. Sed por tion plenumi, ni bezonas vian ĉiaman subtenon kaj kunlaboron! Ni bone kunlaboru ankaŭ en 2006!

Agrablan legadon!

Joel

Hello dear samideanoj (fellow Esperantists)!

First of all, I can happily inform you that the dates and place for this year's ELNA convention in New York have already been made official: it will take place 21-23 of July at the Fashion Institute of Technology in Manhattan. I hope that, even in spite of the late announcement, I'll see you all there!

Another big news item is something that you've possibly already noticed if you visit ELNA's website from time to time – yes, ELNA has a brand new website! Read inside about the development of this recent accomplishment of our “super-people”.

But that's not all the recent big news. Our publishing committee has been active as well – ELNA has just published the first edition of Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (Complete Handbook of Esperanto Grammar), often called simply “PoMEG”, in book form. But just how much of a milestone will the publication of PMEG be? Will it supersede Plena Analiza Gramatiko (Complete Analytical Grammar) as the most authoritative grammar reference work? Well, buy it and judge for yourself!

As you've surely already noticed, this issue is thinner than the previous two – that is due to the fact that the last two issues were triple or double. We are now returning to the regular issue size and publication schedule: six 12-page issues per year. We always strive to produce a high-quality publication which properly reflects the activities of ELNA members. But to be able to do that, we need your constant support and cooperation! Let's work well together in 2006 as well!

Pleasant reading!

Joel



Prezidanta Saluto

Karaj gekolegoj,

Salutas vin Filipino.

Je la komenco de nova jaro, ni kutime en nia kulturo faras personajn promesojn, la “nov-jarajn rezoluciojn”. Ĉu vi faris tion? Ĉu vi elpensis la viajn? Mi havas por vi sugestojn, oficialajn petojn, se vi bonvole akceptus la jenajn:

1. Partoprenu en loka grupo. Se vi ne havas lokan grupon en via urbo, vilaĝo, lernejo aŭ universitato, kreu ĝin! Ni petas ke vi informu nin se vi kreas novan grupon.

2. Informu la publikon pri Esperanto. Vi povas fari tion per diversaj projektoj, anoncoj, klasoj ktp. Vidu la bultenon kaj retpaĝaron de ELNA por ideoj kaj planoj.

3. Prizorgu vizitantojn kaj membrojn en via

loka grupo.

4. Partoprenu en lokaj, regionaj, landaj kaj internaciaj eventoj, kiel eble plej ofte.

5. Restu feliĉa, afabla, pozitiva, kunlaborema kaj helpema en agadoj.

6. Pagu la membrokotizon al ELNA, se vi ankoraŭ ne faris tion por 2006. (malmultekosta!)

7. Rigardu kaj partoprenu nian novan retpaĝaron, www.esperanto-usa.org.


8. Uzu kaj ĝuu nian belegan internacian lingvon kiel eble plej ofte!

Mi elkore deziras al vi ĉiuj kaj viaj familianoj tre feliĉajn vivojn kaj bonan esperantumadon!

Phil “Filipo” Dorcas

Prezidanto de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

FOTO: JENJA AMIS



Filipo Dorcas

Jarraporto de ELNA al UEA, 2005

Anna Bennett

Jen la raporto sendita al UEA pri la agado de ELNA kaj aliaj grupoj kaj esperantistoj en Usono. Se tie ne troviĝas informoj pri via agado, kaj vi volas inkluzivi tion, bonvolu sendi informojn estontece al annambennett@yahoo.com. Tiu ĉi raporto estos sendita dufoje jare, do se vi havas ion por raporti pri 2006, bonvolu sendi ĝin tuj post la okazo/farado.

La jaro 2005 prezentis malgrandan ŝanĝon en la stato de la Movado en Usono, sed estas kreskanta espero.

La membraro de ELNA falis en 2004 ĝis proksimume 630, post la membrokvanto de pli ol 700 en 2003. En 2005 ĝi rekreskis ĝis pli-malpli 687. La financa sano de ELNA pliboniĝas poimete.

La stato de la usona Movado daŭre malfortas. Usonanoj plejparte scias malmulton pri Esperanto aŭ pensas ke ĝi jam mortis. La anglalingva ŝovinismo estas forta en granda, plejparte angleparolanta lando, pli pro nescio ol pro malbonkoreco.

Kontraŭ la malhela fono, oni tamen povas vidi fajrerojn. La filmo “Klingo 3: Triunuo”, (angle: “*Blade 3: Trinity*”) estis eldonita kun la indiko “Lingvo: Angla/Esperanto”; la fina frazo de Kris Kristofferson enhavas la vortojn: “Ni esperu ke ne” (tute klare aŭdebla), estas du scenoj en kiuj oni povas aŭdi la Esperanton de “Incubus” en la fono, kaj videblas pluraj ŝildoj en Esperanto sur konstruaĵoj, grandparte dank’ al la laboro de Joel

Brozovsky. Kelkaj film-amantoj rimarkis tion, kaj multaj artikoloj pri tio aperis en la anglalingva gazetaro.

ELNA kreis novan, pli bonan kaj pli dinamikan retpaĝaron kiu espereble kreas pli aktivan komunumon kaj prezentos Esperanton pli bone al la usona publiko. Nun multaj homoj povas partopreni en la ĝisdatigo de la retpaĝaro, kio tre faciligas la laboron.

ELNA mem vigliĝis pro diversaj agoj. La jara kongreso en Aŭstino, Teksaso, havis 95 partoprenantojn el sep landoj, iom pli ol en la antaŭaj jaroj, kaj estis sukcesplena. Kvindek neesperantistoj partoprenis senpagajn prelegojn kiujn la kongreso gastigis. Iom pri la novaĵo estis menciita en la urbaj gazetetoj.

Diversaj regionaj kongresetoj okazis, kun inter 15 kaj 60 partoprenintoj. Post 11 jaroj en Vermonto, la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto okazis en Silver Bay, Novjorkio, kaj allogis 64 partoprenantojn (duono el eksterlando, plejparte Kanado). Ĝi estis granda sukceso kiel renkontiĝo okazinta unufoje en nova loko. Dum la Tut-Teksasa Kongreso okazis la unua (laŭ nia scio) “slam-stila” poezi-konkurso en la Internacia Lingvo.

Usonanoj de “Team Esperanto” en PGDP (Distribuitaj Prolegistoj por la Projekto Gutenberg – *Distributed Proofreaders for Project Gutenberg*, <http://www.pgdp.net/c/stats/teams/tdetail.php?tid=74>) enretigis per la kreema komunumo de *Project Gutenberg* du klasikajn rakontojn, tradukitajn el la angla lingvo: “La Falo de Uŝero-

Domo” kaj “Alico en Mirlando”, <http://www.gutenberg.org/browse/languages/eo>, plimultigante la nombron de Esperantaj e-libroj en la paĝaro de *Project Gutenberg* al la kvanto de ok. Aldone ili komencis projektojn de kvin aliaj altnivelaj tradukoj.

La profesia, multlingva, farita en Usono videokurso *Pasporto al la Tuta Mondo* (<http://esperantousa.hypermart.net/?q=node/58>) progresas kaj estas havebla en DVD-formato, pli malmultekoste ol antaŭe.

24 studentoj partoprenis en la trisemajna Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) en la Altlernejo por Internacia Trejnado (*School for International Training*) en Brattleboro, Vermonto, sub la aŭspicio de ELNA kaj ESF (*Esperantic Studies Foundation*) kaj sub la gvido de Ellen Eddy.

Esperanto estas instruata en du aŭ tri universitatoj kiel unusemestra kurso. Estas instruataj ankaŭ neformalaj kursoj. Ekzemple, Beth Magallon instruas Esperanton en publika submez-lernejo en Tahlequah, Oklahomo, Usono. Ŝi uzas Esperanton ankaŭ kiel bazon por instrui aliajn lingvojn. Ŝi jam instruis tiom da lernantoj ke oni povas aŭdi “saluton” en butikoj kaj surstrate en la urbo.

Kvardek usonanoj partoprenis la 90-an UK-on en Vilno.

Resume, la Movado en Usono ne viglas sed pliboniĝas. ELNA ekpretas pensi pli grande.

The Heartbeat of ELNA – its Central Office

This is the second article in a series of excerpts from the book A History of the Esperanto League for North America, Inc., written and adapted for publishing in Esperanto USA by William R. Harmon

William R. Harmon

Immediately after ELNA came into being in 1952, the combined efforts of a number of persons, the “founding parents” of ELNA (a list of whom may be found in the book *A History of the Esperanto League for North America, Inc.*), made it possible to reach and solicit members of the former organization EANA, whose president had consistently refused to let anyone see the membership records. ELNA’s membership grew one by one as former members of EANA joined ELNA. In those early days ELNA’s membership records were usually kept by the elected treasurer, but there was no central archive for correspondence, which was usually kept in the files of the individual elected officers.

In the late 1950s Cathy and Bill Schulze set up a separate organization, the “Esperanto Information Center” (“EIC”) which gave ELNA a lot of help in mailing and correspondence. A group in New York City under the direction of Mark Starr and Margot Gerson also later provided additional assistance in publicity and secretarial matters.

In 1973, the Schulzes announced that they had decided to retire from the operation of the Esperanto Information Center at the end of that year. ELNA’s Board decided to establish a central office to take over the functions vacated by the Schulzes, as well as handle the administration of the League’s affairs. A small office over a bank was rented in Burlingame, and Charles R. L. Power (“Karlo Pov”) was hired to be the first full-time director, working initially under the guidance of Bill and Cathy Schulze. Special donations were sought successfully from ELNA members to establish the new office. An Esperanto book service, which had been operated by the Schulzes, was sold by them to ELNA at a deep discount and transferred to the Central Office.

Charles Power left the directorship in February, 1977 to accept the post of Permanent Congress Secretary of the international organization UEA in Rotterdam, and Harold Dryer was selected as the new director of ELNA’s central office effective March 1, 1977. Dryer and newly-elected ELNA president William R. Harmon, with the Board’s approval, shortly found a new location in larger and more centralized quarters in Emeryville, California, where it remains to this day. The move of all office files and equipment and thousands of books was accomplished with volunteer help, mainly from Charles Power, Hal Dryer, and Bill Harmon, during May of 1977. All the costs of the move and a number of new bookshelves and furniture were enabled by several generous anonymous donations from ELNA members.

The year 1978 was a difficult one for the CO. Harold Dryer resigned effective May 8, 1978, and was replaced May 30th by Marta Evans for two weeks; on June 7, 1978, Jonathan Cole became director for a period of 2.5 months. In July of 1978 ELNA assisted Mikulas Nevan, former *Konstanta Kongresa Sekretario* of UEA, to immigrate with his family into the USA for the stated purpose of becoming the new director of ELNA’s Central Office. Unfortunately, shortly thereafter Nevan’s plans changed and he moved to Oregon without ever serving in the ELNA Central Office.

During the difficult period that ensued Bill Harmon kept the Central Office functioning by working nights and weekends, helped by Grant Goodall from August 16 to September 15, 1978, until October 1st when Dr. Jack Lesh agreed to become the new director. Dr. Lesh remained in charge of the Central Office until April 16, 1979, when Donald Harlow became the newly appointed director. Harlow remained director until February 28, 1983 and did much to modernize and improve the operation of the Central Office.

Harlow was succeeded by Gregory Wasson, who served through November 30, 1985. On December 1, 1985 Brian McCullough became director and served until January 31, 1987, at which time Mark Stephens took over and remained through November 1, 1990. On December 1, 1990, Michael Donohoo became director and remained until September 30, 1993.

From August 1, 1993 to August 15, 2000 Miko Sloper was director of the Central Office, assisted by Ionel Onet, who had been hired as Vice Director on February 1, 1989. Stability appeared to have finally been achieved with the team of Miko and Ionel, ELNA’s longest-serving employees.

Following Miko’s departure, Joel Brozovsky was hired to take over the directorship (Ionel Onet having declined the honor) and came on board July 1, 2000. Joel, a long-time Esperantist, worked for a number of years for Oomoto in Kameoka, Japan in various capacities. Joel has made extensive tours promoting Esperanto and was active among Esperanto groups while in Japan.

Ionel Onet, after 13 years of service to ELNA in its Central Office, was tapped by UEA to head its Book Service starting in March of 2002, replacing the retiring former head, Simo Milojević. Donald Harlow was named Vice Director of the ELNA Central Office beginning February 1, 2002.

Joel Brozovsky left the CO in July, 2005 to return to his native Washington, and Don Harlow was promoted by the Board to be the new director. The CO had over the years gained a lot of efficiency through the use of comput-

ers, and with some occasional volunteer help, Don Harlow is currently handling all of the varied functions of the CO alone.

What does the CO do? It is the central clearing house for information in and about Esperanto for the USA; it administers a large book service with 1000-1500 titles in stock; it serves as the U.S. financial representative of the international organization UEA, collecting dues and congress fees for them; it administers an 800-number information request service, and deals with hundreds of e-mailed requests for information each week. It provides advertising materials for use by local clubs and classes; it provides a correspondence course; it makes and sells copies of audio cassettes including pronunciation aids and recorded speeches of many outstanding Esperantists. It also receives ELNA dues and contributions, prepares an annual membership list, and prepares a book list for the book service. This list of the CO’s tasks is by no means complete.

The central office of ELNA is indeed the organization’s heartbeat. It is supported by your membership dues and contributions, and by income from the Capital Investment Fund and the H. E. Reed Trust Fund. It merits your approval and continued support.

The book *A History of the Esperanto League for North America, Inc.*, 2002, ELNA, El Cerrito CA, ISBN 0-939785-05-06 is available from ELNA’s book service.

Anonce

Literary Issue

We are currently seeking submissions for the literary issue of Esperanto USA. We welcome all original and/or translated literature. Works should be in Esperanto (about any topic and in any style) or, if in English, about Esperanto (any aspect). The deadline is June 1, 2006.

The editors

Korespondi deziras

Varma saluto al vi el Pollando! Mia nomo estas Georgo Tomaszewski. Mi loĝas en urbo Slnok, Pollando, kaj havas 40 jarojn. Mi lernas Esperanton unu jaron. Mi interesiĝas pri turismo, ŝatas aŭskulti muzikon kaj kolekti monerojn el diversaj landoj. Mi volas korespondi pri ĉiuj temoj kaj tre volas havi geamikojn en via lando. Skribu: Georgo Tomaszewski, 38-500 Sanok, ul. Sadowa 18B/39, Podkarpackie, Poland.

“Estas nenio kion niaj superhomoj ne povas fari!”

(daŭrigo. Komenco sur p. 1)

Steven Brewer

Teamo de aliaj homoj respondis al mia voko – mi pensas pri ili kiel aro de superhomoj: Philip “Bradipo” Brewer (mia frato, verkisto kaj iama redaktoro de *Esperanto USA*); Phil Dorcas (prezidanto de ELNA kaj giganto); Tracy Huber (lignolaboristo kaj komputila novulo); d-ro Fred Meyers (fama fizikisto kaj longtempa esperantisto); Anderson “Nehundo” Mills (doktora studento, dancisto kaj stelulo de la Aŭstina E-movado); William “Ailanto” Patterson (retmastro, kontrolisto kaj esperantisto eksterordinara); d-ro Robert Read (genia sciencisto kaj bona patro); Chuck “Amuzulo” Smith (juna sperta komputilisto kiu forgesis ke li estas en Germanio); Jacob “Kvarko” Schwartz (genia komputilisto kaj organizanto); David Wolff (antaŭa prezidanto de ELNA kaj luphomo); kaj multaj aliaj.

Ni unue diskutis la aferojn retroste. Ni komence faris decidojn pri la organizado de la novaj paĝoj. Ni decidis pri la roloj de bazaj paĝoj kaj planis ligilojn al ili je la maldekstra flanko. Ĉe la supro, ni planis ligilojn por diversaj aroj de homoj: lernantoj, membroj, junuloj, aktivuloj ktp. Kaj ni komencis la laboron redakti la paĝojn per vikio (komputila sistemo kiu ebligas al pluraj kunlaborantoj libere redakti tekstojn, same kiel en Vikipedio.)

Multaj el la paĝoj estis originale verkitaj por presitaj materialoj. Tiaj aferoj ofte devas esti memstaraj: ili devas havi enkondukojn al Esperanto, kiel kontakti la organizaĵon ktp. Por la reto, oni uzas unu paĝon por ĉiu rolo, kaj simple ligas la informojn al tiu paĝo kiam necesas indiki certan informon.

Ni konsentis ankaŭ ke finfine ni elektu uzi iun pretan enhav-administran sistemon. Tiaj sistemoj proponas multajn servojn, simpligas la aldonadon kaj redaktadon de paĝoj kaj faciligas ke multaj homoj partoprenu la subtenon de la retpaĝaro. D-ro Read proponis *Drupal*, tre popularan kaj fortan sistemon. Mi timis ke la ŝanĝo al enhav-administra sistemo bezonus tiom longan tempon ke ni devus atingi ĝin en du paŝoj. Tial mi proponis ke mi rapide konstruu pli belan retpaĝaron el simplaj html-paĝoj por anstataŭigi la malnovan ĝis kiam ni estos pretaj fari la grandan laboron por



“En la subetaĝo de sia domo, d-ro Read konstruis komputilreton, kaj oni ligis la komputilojn al tiu reto. Mi kunportis makintoŝan kaj linuksan komputilojn. Kelkaj havis porteblajn komputilojn, aliaj alportis siajn grandajn skatolojn kaj ekranojn. Kaj mi kaj Anderson “Nehundo” Mills alportis sendratajn bazstaciojn. Kaj ni komencis labori”

komplete ŝanĝi la sistemon.

Pro diversaj kialoj tio ne okazis – plejparte pro tio ke estis pli da laboro ol unu homo povus fari sole, do ĉi-aŭtune d-ro Read proponis ke ni aranĝu lok-retan feston en lia domo en januaro por kune fari la transprenon de la malnovaj paĝoj. Kaj mi konsentis ke, se ni havas tiun unu momenton por fari la laboron, ni tiam ekuzu enhav-administran sistemon – kaj ni elektis *Drupal*.

En la monatoj antaŭ la retfesto, ni faris la teknikan laboron necesan por starigi la sistemon. Mi instalas la programaron, agordis la servilon kaj refasonis la “temon” (la paĝ-aranĝon, kolorojn, bildetojn ktp.) por ke ĝi taŭgu por niaj celoj. Mi ankaŭ faris kelkajn ŝanĝojn al la *Drupal*-a sistemo mem, por ke ĝi pli bone taŭgu por niaj celoj. Kiam la sistemo ekfunkciis, d-ro Read kaj mi komencis la transprenon de paĝoj kaj komencis reklami la paĝojn kaj la feston al pli kaj pli granda grupo da homoj.

La retfesto komenciĝis la 6-an de januaro

2006. Kelkaj flugis al Aŭstino, Teksaso, aliaj veturis per aŭto. En la subetaĝo de sia domo, d-ro Read konstruis komputilreton, kaj oni ligis la komputilojn al tiu reto. Mi kunportis makintoŝan kaj linuksan komputilojn. Kelkaj havis porteblajn komputilojn, aliaj alportis siajn grandajn skatolojn kaj ekranojn. Kaj mi kaj Anderson “Nehundo” Mills alportis sendratajn bazstaciojn. Kaj ni komencis labori.

Dum la tuta semajnfino ni prenis malnovajn paĝojn de la retpaĝaro, redaktis kaj enmetis ilin en la novan sistemon. Ni havis kelkajn longajn diskutojn pri solvendaj problemoj kaj estontecaj demandoj. Ni faris ankaŭ diversajn aliajn taskojn: ekzemple, ni preparis videoregistraĵojn por reklamoj pri Esperanto per videokamerao kaj parolis pri aliaj diversaj projektoj por antaŭenigi Esperanton en Usono kaj tra la mondo. Ni ankaŭ trinkis bieron, manĝis italan pasteĉon kaj spektis la filmon “*Blade 3: Trinity*” (“Klingo 3: Triunuo”), kiu uzas Esperanton diversmaniere.

Ni aldonis kelkajn dinamikajn aspektojn al la paĝaro: en la unua paĝo estas diversaj bildoj el kiuj unu estas hazarde elektita por aperi. Ankaŭ je la dekstra flanko estas kvin plej novaj bildoj ĉe la retloko *Flickr* en la grupo Esperantujo.

Flickr estas nova, provizora servo kiun *Yahoo* aĉetis antaŭ kelkaj monatoj. *Flickr* funkcias kiel foto-arkivejo kiu samtempe provas helpi ke oni trovu homojn kun similaj intereso. Ĝi estas teknike profesia servo, krome, ĝi estas senpaga (por ĝis 20MB de bildoj ĉiumonate), kaj estas multaj diversaj manieroj interagi kun la servo de teknika flanko (kaj por aldoni kaj por

serĉi kaj vidi bildojn).

En *Flickr* oni povas indiki bildotemojn kaj facile trovi similtajn bildojn de aliaj uzantoj. Eblas ankaŭ starigi grupojn de bildoj kun simila temo (ekzemple “Esperantujo”). Estas 19 homoj kiuj apartenas al la grupo nun, kaj espereble pliaj aliĝos.

Dum *Flickr* restos provizora, oni ne tradukos la interfacon en aliajn lingvojn, sed post kiam ĝi atingos la unuan finitan version, oni promesas ke aliaj lingvoj eblos. Ĝis tiam, al mi ja plaĉas ke esperantlingvaj kaj esperant-temaj bildoj videblas kune kun la miloj da aliaj bildoj.

Dum la fina posttagmezo de la retfesto, ni finis nian laboron pri la retpaĝaro. Ni kontrolis la paĝojn por trovi eventualajn erarojn kaj verkis artikolojn kiuj aperos en la unua paĝo dum kelkaj semajnoj (se nenio alia aperos). Estos, kompreneble, multege da aferoj ankoraŭ farindaj – multaj teknikaj problemoj por mi, pri la aspekto kaj funkciado. Por la Estraro restas ankaŭ diversaj demandoj pri politiko: kiu rajtas uzi la retpaĝaron kaj por

kio? Kiu ricevu kiajn privilegiojn? Kiam membroj ricevu privilegiojn kaj kiam perdu ilin, se oni ne plu membras? Kaj tiel plu. Sed ekde nun ELNA havas pli bonan, profesion kaj modernan aspekton por la mondo.

Nova, moda, alloga retpaĝaro estas nuntempe verŝajne la plej grava vizaĝo kiun organizaĵo montras al la mondo. Nun ni povos publikigi nian adreson sen timi ke ĝi forpuŝos vizitantojn. Plue, ni antaŭnelonge bone instruis al 7-8 homoj kiel bone regi la sistemon, tiel ke la tuta afero ne devu resti sur la ŝultroj de nur unu aŭ du homoj. Kaj ni komencas plani por la estonteco: unu projekto finiĝas kaj ni rigardas al la estonteco.



Niaj superhomoj!

Kiu nun estas la plej grava problemoj? Ne problemoj! Estas nenio kion niaj superhomoj ne povas fari!

Unue aperis en Libera Folio – <http://www.liberafolio.org/>, sub la titolo “Usonaj esperantistoj liberigis sian retejon”, kun etaj modifoj

PMEG: Nun havebla ankaŭ libroforme

Tim Westover

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko de Bertilo Wennergren finfine haveblas ankaŭ surpapere: tio estas la plej freŝa eldonaĵo de ELNA. De pluraj jaroj la verko estas konata de retmaj esperantistoj kiuj uzas la verkon ĉe <http://bertilow.com/pmeg/>. La plena teksto de PMEG daŭre aperas, en HTML kaj elŝutebla pdf-formato, en tiu retejo.

PMEG estas heredanto de la impona *Plena Analiza Gramatiko* de Kalocsay kaj Waringhien, ampleksa kaj faka verko jam ne plu havebla krom kiel brokantaĵo. La *Plena Analiza Gramatiko* estas verko precipe por lingvistoj. Ĝi uzas lingvistikajn terminojn kaj tre detale analizas la lingvistikajn trajtojn de Esperanto. Tiuj esploroj estas valoregaj – tamen la verko ne tiel bone helpas al nelingvisto serĉanta, ekz., ĝustan verboformon aŭ korektan uzadon de “po.”

PMEG estas libro ĉefe por nelingvisto. Ĝi evitas lingvistikajn terminojn, eĉ uzante “rolvortero” anstataŭ “prepozicio”, “avorto” anstataŭ “adjektivo”. Tamen ĝi ne estas simpla verko – oni ene trovas tre detalajn klarigojn pri korekta uzado de tabelvortoj (“tiuj”, “ĉies” ktp), “ig” kaj


“iĝ”, vortfarado kaj kunmetado, kaj centoj da aliaj temoj. La fina rezulto estas verko kiu funkcias kiel pacienca kaj klera instruisto. Ĝi estas fonto de ĝustaj respondoj, helpaj sugestoj kaj trafaj ekzemploj. Dank’ al detala indekso, tiuj respondoj kaj sugestoj rapide troveblas.

PMEG alfrontas multajn proponitajn ŝanĝojn kaj reformojn en la lingvo – tamen ĝi malofte aprobas ilin, uzante logikajn argumentojn montri kial la plejmulto de reformoj malhelpas al la lingvo. La plejmulto de ekzemploj en PMEG venas de la verkaro de Zamenhof. Sume ĝi prezentas fundamentan Esperanton komprenitan de ĉiuj esperantistoj kaj ne permesas tiujn reformojn kiuj detruus la komunan bazon kiun kreis la centjara uzado de Esperanto tutmonde.

Do kial ELNA elektas aperigi libron kies tuta enhavo estas senpage kaj facile havebla en la interreto? Ĉar la libroformo pli utilas al studado kaj lernado. Surpapera teksto povas esti substrekita; paĝ-anguloj povas esti falditaj. PMEG kiel libro multe pli facile veturas al klubvesperoj, klasĉambroj kaj kongresoj. Ĝi povas deĵori kiel lernolibro en progresiga aŭ perfektiga kurso. Fine PMEG libroforme povas preni la merititan lokon apud la *Fundamenta*

Krestomatio, *Esperanta Antologio* kaj *Plena Analiza Gramatiko* sur la librobreto de ĉiu serioza esperantisto.

Se vi interesiĝas pri PMEG, bonvolu trarigardi la enhavon kaj ekuzi ĝin rete ĉe <http://bertilow.com/pmeg/>. Kaj poste aĉetu propran ekzempleron pere de ELNA!



PoMEGo!

Prezento de Esperanto en Rozkruca Loĝio

Joel Amis

Sabaton, la 17-an de decembro, 2005, en la Atlanta Loĝio de la Rozkruca Ordeno, AMORC, Ĵenja kaj Joel Amis – membroj kaj de la Esperanto-Societo de Metropola Atlanto (ESMA) kaj la Atlanta Rozkruca Loĝio – faris prezenton al lokaj rozkrucaj pri Esperanto kaj ĝiaj idealoj.

Post nia (Joel kaj Ĵenja) geedziĝceremonio, kiu okazis en la Atlanta Loĝio per rozkruca ceremonio, ekestis ĝenerala scivolemo kaj interesiĝo pri Esperanto inter la loĝianoj. Pro tio oni invitis nin fari prezenton pri Esperanto kaj ĝiaj idealoj dum la decembra “Mistika Salono” (malferma kunveno en kiu oni invitas homojn prezenti ideojn/movadojn/disciplinojn parencajn aŭ simpatiajn al Rozkruco). Ni faris skizan prezenton pri ĉiuj aspektoj de la Lingvo kaj Movado, sed donis apartan atenton al la vivo kaj idealoj de Zamenhof (Joel laŭtleĝis *Preĝon sub la Verda Standardo* kaj emfazis la similecojn inter la idealoj de Zamenhof kaj rozkrucaj). Ankaŭ, estis aparta sekcio en nia prezento pri la konkretaj ligoj inter Esperanto kaj Rozkruco. Ekzemple, lastatempe AMORC faris multlingvan eldonon de la *Rozkruca Vivkodo* – kaj Esperanto estas unu el la lingvoj! Krome, jam de pluraj jaroj haveblas la enkoduka broŝuro pri Rozkruco, *Regado de la Vivo*, en Esperanto (aĉetebla de UEA), kaj, kiel ni ĵus lastatempe eksciis, ekzistas aliaj rozkrucaj

verkoj en Esperanto (espreble ili baldaŭ haveblos de ELNA kaj UEA).

La reago de la loĝianoj pri Esperanto estis tre pozitiva kaj favora – kaj ili eĉ proponis, je tre favoraj kondiĉoj, la Loĝion kiel kursejon por nia planata E-kurso.

Esperanto-Societo de Metropola Atlanto:
www.esperanto-atlanta.org
Rozkruca Ordeno, AMORC: (Usono)
www.rosicrucian.org (internacie)
www.amorc.org

Esperanto Presentation in Rosicrucian Lodge

Joel Amis

On Saturday, December 17, 2005, in the Atlanta Lodge of the Rosicrucian Order, AMORC, Zhenya and Joel Amis – members both of the Esperanto Society of Metro Atlanta (ESMA) and the Atlanta Rosicrucian Lodge – made a presentation for local Rosicrucians on Esperanto and its ideals.

After our (Joel and Zhenya’s) wedding, which took place in the Atlanta Lodge in a Rosicrucian ceremony, there arose among Lodge members a general curiosity and interest in Esperanto. And as a result of this in-

terest, we were invited to make a presentation about Esperanto and its ideals during the December “Mystical Salon” (an open meeting in which people are invited to present ideas/movements/disciplines related to or compatible with Rosicrucianism). We concisely presented all aspects of the Language and Movement, but gave special attention to the life and ideals of Zamenhof (Joel read aloud the *Prayer under the Green Standard* and emphasized the similarities between the ideals of Zamenhof and Rosicrucians). Also, there was a separate section in our presentation about the specific links between Esperanto and Rosicrucianism. For example, recently AMORC released a multilingual edition of the *Rosicrucian Code of Life* – and Esperanto was one of the languages! In addition, for several years now the introductory booklet to Rosicrucianism, *Mastery of Life*, has been available in Esperanto, and, as we just found out, there are other Rosicrucian books in Esperanto (which hopefully will become available through ELNA and UEA in the near future).

The Lodge members’ reaction to Esperanto was very positive and favorable – and they even offered, under very favorable conditions, the Lodge as a place to hold our planned Esperanto course.

Esperanto Society of Metro Atlanta:
www.esperanto-atlanta.org
Rosicrucian Order, AMORC: (U.S.)
www.rosicrucian.org (internationaly)
www.amorc.org

Article on Esperanto in *The American Scholar*

Yevgeniya “Zhenya” Amis

The winter 2006 issue of *The American Scholar*, a Phi Beta Kappa Society publication, published a big (16 pages long, the longest in the issue!) article about Esperanto.

In contrast to the majority of other articles about Esperanto, this one is written by an author who is really familiar with Esperanto. Arika Okrent has actually learned Esperanto (on her home page she writes that she has even become proficient in Esperanto) and it is clear that she consulted many books on Esperanto. How did it come about that the author is so familiar with Esperanto? Arika Okrent, Ph.D., a professional linguist and psychologist, is writing a book on invented languages, and, in addition to becoming an Esperantist, she also earned the first level certification in Klingon.

The article quite realistically presents the state of the Esperanto Movement in the U.S., gives an introduction to the history of Esperanto, the international Esperanto

Movement and institutions, mentions George Soros, whose father was an active Esperantist... Actually, it is the most informative article written by a non-Esperantist that I have ever read. It has many quotes and is well written. But it doesn’t paint everything rosy: a good part of it is dedicated to the “Ido schism”, it criticizes some parts of the Esperanto Movement and also mentions some examples of “dismissing humor or sheering disgust” towards Esperanto. But the bad examples are usually balanced with good ones.

The American Scholar, the literary and intellectual quarterly of the Phi Beta Kappa Society, has a circulation of just under 100,000 copies and is available to both members and nonmembers of the society. Phi Beta Kappa was founded in 1776 and has evolved to become the nation’s leading advocate for the liberal arts and sciences at the undergraduate level.



Kiel organizi kongreson

Parto III

Tio ĉi estas la tria parto de serio da artikoloj pri organizado de Esperanto-kongresoj, specife de landaj kongresoj de ELNA, sed ankaŭ de regionaj kongresoj. Ĝi baziĝas sur la kongresa manlibro de ELNA (la originalan gvidilon verkis Frank Helmuth, Cathy Schulze kaj Bill Harmon; Ellen Eddy reviziis ĝin. Jim Henry plu reviziis kaj multon aldonis), kiu troviĝas ĉe www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm.

Austin Texas welcomes you to the 2005 ELNA Congress!
This year's US Esperanto Congress will take place in Austin, June 10-13, 2005.

Congress Activities:

Literary theme. The congress will feature various lectures and presentations about Esperanto literature and poetry, with special guests internationally acclaimed poets Edwin de Kock and Peter Browne.

Welcome newcomers! There will be more activities for Esperanto beginners and first-time congress attendees, so that everyone interested in Esperanto will have an enjoyable time. There will be many different activities to appeal to Esperantists of all levels, including:

- Presentations by special Brazilian guests Ursula & Giuseppe Grantapaglia about *Bona Espero*
- Friday night icebreaker - social games to help people meet and practice conversation
- Esperanto classes
- Various board games and word games in Esperanto
- Films (both foreign and English) with Esperanto subtitles
- Poetry readings
- Book service - opportunity to browse a room full of Esperanto books for sale
- Saturday night banquet
- Skits performed by attendees
- Lectures and demonstrations on a wide variety of topics: Esperanto on the Internet, web2, ps, balks, and more! If you would like to present something, please let us know!

Austin Texas! This will be the first congress in Texas since 1971. Austin is a culturally vibrant university town famous for its live music scene. (If there is sufficient interest, we'll take Esperanto downtown with a *Latinas under the stars!*) There are many live theaters, and many natural parks suitable for day trips (and picnics). Austin has an impressively huge but colony under

Aligilo por la LK en Aŭstino, 2005

Aligilo

Laŭ la originala gvidilo, la aligilon faru la CO, sed lastatempe ĝin fakte faras la Lokaj Kongresaj Komitatoj (LKK)*. Tiukaze la farinto de la aligilo sendu fotopretan version de ĝi (eble pdf-dosiero, retpoŝte) al la CO, por ke oni presigu kaj dissendu ĝin al la membraro kun la unua anonco pri la kongreso. Eble estus pli bone se la CO ĉiujare farus aligilon laŭ la sama ŝablono, kun revizio de la kotizoj kaj limdatoj, kontaktinformoj ktp. kaj aldone de apartaj demandoj laŭ la petoj de la LKK.

En la aligilo estu facile komprenebla tabelo kun la kongresaj kotizoj laŭ la kategorio kaj limdato. Kategorioj kun malsamaj kotizoj povas inkluzivi: ELNA-membrojn; ne ELNA-membrajn usonanojn; alilandanojn; gejunulojn; homojn kun limigita enspezo; untagajn partoprenantojn; familian partoprenon; moralajn subtenantojn (ne alvenas al la kongreso sed ricevas poŝte la dokumentojn, fotojn ktp.). Kutime la kotizo malpli altas se oni registriĝas tre frue ol se oni registriĝas nur nelonge antaŭ la kongreso: la limdato por la malalta kosto povas esti, ekz., unu monaton antaŭ la kongreso. Se la aligilo estas dissendita tre frue (en la antaŭa jaro, ideale, sed tio malofte okazas), povas esti tria malalta kotizo por instigi homojn registriĝi ankoraŭ pli frue. Eble tiu limdato estu monaton** aŭ du post la versaĵna

dato, kiam la aliĝiloj estos dissenditaj. La aliĝilo klarigu ankaŭ la limdatojn kaj aliajn kondiĉojn de nuligoj.

La aliĝilo eventuale enhavu, krom bazajn demandojn pri nomo kaj kontaktinformoj, la najn demandojn kaj indikojn:

- Ĉu vi permesas ke ni diskonigu vian nomon / poŝtadreson / telefonnumeron / retadreson al aliaj kongresanoj? (Kvar apartaj jes/ne datumoj en la datumbazo)

- Ĉu vi intencas ĉeesti la aferkunsidon de AAIE (Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto)?

- Ĉu vi volas ekzameniĝi en AAIE-ekzameno dumkongrese? (Postulas du horojn.) La respondeca homo informu la prezidanton de AAIE pri la nomoj de homoj kiuj volas ekzameniĝi.

- Ĉu vi volas ricevi turisman informon pri la kongres-urbo? (Iu devas sciigi nomojn kaj adresojn de tiuj homoj al la urba turista instanco.)

- Mi ne havas ret-aliron. Bonvolu sendi lastminutajn anoncojn al mi paperpoŝte.

- Mi ne bone parolas la anglan. Bonvolu kontakti min pri renkontiĝo ĉe la flughaveno. (Estus bone proponi tiun servon al alilandaj gastoj, sed se la LKK ne certas pri sia povo realigi tiun servon, oni ne menciu tiun ĉi eblon en la aliĝilo.)

- Mi volontulas helpi dum la kongreso (pri la registra tablo / teknikaj aranĝoj / akuratigo – t.e. sciigo al la prelegantoj pri la restanta tempo ktp.)

- Mi volontulas kunuli al komencanto. / I need a buddy. (Iu devas zorgi pri tiuj, ligi komencantojn al volontulaj kunuloj kaj informi tiujn dum la registriĝo.)

- Mi volas helpon trovi samĉambran(in)on.

- Mi pretas prelegi pri ___ dum la kongreso. (Demandi pri tempodaŭro, ekipaj bezonoj ktp.)

- Mi volontulas gvidi parolrondon pri ___ dum la kongreso.

- Mi havas alian ideon por programero. Jen: ___

- Mi volas vegetaran / vegetalan manĝon ĉe la bankedo. (Vi devas informi la hotelon pri la nombro de vegetaranoj kaj/aŭ vegetalanoj [kaj la tuta nombro de manĝantoj] sufiĉe frue antaŭ la bankedo; kutime 72 horoj antaŭe. La aliĝilo informu ankaŭ ke la bankedo eble ne haveblas por tiuj kiuj registras sin post certa limdato.)

- Mi havas jenajn manĝo-alergiojn: ___ (Ankaŭ pri tiuj respondoj vi devas informi al la kuiristoj sufiĉe frue antaŭ la bankedo.)

- Mi bezonas rulseĝon dum la kongreso. (Iu devas respondeci pri luo de rulseĝoj, se iuj indikas sian bezonon.)

Ni nepre ankaŭ havu en la retpaĝo retan aliĝilon kiel HTML-formularon kiu registros ĉiujn informojn en teksta datumbazo. Al tiu datumbazo havu la aliron ne nur la retejestro, sed ankaŭ la direktoro de la CO kaj almenaŭ unu alia homo el la LKK. La aliĝilo prefere uzu nur servilan skripton (ekz., *Perl*), ne krozilajn skripton (Javascript, VBScript) por esti alirebla por kiel eble plej multaj homoj.

La aliĝilo devas plektiĝi kun la *Hypermart*-butiko de ELNA. Tie ni povas sekure ricevi kreditkart-pagojn. La aliĝila paĝo indiku klare ke se iu ne havas kreditkarton kaj volas pagi ĉeke, tiu tamen povas registri sin per la reta aliĝilo, indikante ke li/ŝi sendos ĉekon al la CO. Estu indikilo en la datumbazo pri tio ĉu kongresano jam pagis kaj se jes, kiom; ĝi aŭtomate pleniĝu kiam homo pagas kreditkarte, kaj permane kiam la CO registras en la datumbazo la ricevon de ĉekoj. Ankaŭ estu indikilo por tio ĉu kongresano bezonas invit-leteron*, kaj kio estas la progreso pri tio (letero petita/sendita; vizo petita/akirita/neita).

Aliĝintoj povu vidi sian propran informon en la datumbazo (aŭ eble povu klaki butonon por peti retpoŝton kun sia informo) por certigi ke ĝi estas ĝusta. Eventuale certaj raportoj estu publike haveblaj: ekz., nombro de aliĝintoj ĝis nun, sume kaj laŭ kategorioj; kaj listo de partoprenantoj kiuj permesas al ni diskonigi iliajn nomojn, kun urbo, ŝtato/provinco kaj lando por ĉiuj. La raportoj (privataj kaj publikaj) povu listigi homojn laŭ alfabeto ordo de familia nomo, laŭ ordo de aliĝo, kaj eventuale alimaniere.

Kiam la CO ricevas paperpoŝtajn aliĝilojn, la stabanoj enigu la datumojn el ili ankaŭ en la retan aliĝilon, por ke informoj pri ĉiuj kongresanoj estu en la sama datumbazo alirebla por iuj en la LKK. Lastminutajn aliĝilojn la direktoro povas porti kun si al la kongreso kaj doni al la LKK-ano ĉe la registrejo. Listo de aliĝintoj, kun indiko pri tio, kiom ili jam pagis, ĉu ili ŝuldas ion (kaj se jes, kiom) oni nepre havu ĉe la registra tablo.

* Ligiloj al ĉiuj paĝoj, ekzemplaj leteroj ktp. indikitaj per steleto (*) troviĝas ĉe la originala paĝo <http://www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm>

** prefere pli ol monato, ĉar la dissendado de Esperanto USA foje daŭras pli ol monaton – Red.

37th North American Summer Esperanto Institute

*July 3-21, 2006, Center for Intercultural Studies,
School for International Training, Brattleboro, Vermont*
*Sponsored by: Esperanto League for North America (ELNA)
and the Esperantic Studies Foundation (ESF)*

The North American Summer Esperanto Institute 2006 will again be held at the School for International Training (SIT), a world famous venue for language and teacher training in Brattleboro, Vermont. The instructors have prepared a three level program of study that emphasizes the active use of Esperanto in intercultural communication, understanding, and cooperation.

Instructors: Katalin Kovats (Hungary/Netherlands), Sylvain Lelarge (France/Netherlands), and Lee Miller (USA)

Tuition: \$1015 per course

Housing: shared room with three meals a day, \$700; single room \$820

More details can be found at: <http://esperanto.org/nask/>

Register on line at: <http://www.sit.edu/esperanto/index.html> or contact Ellen M. Eddy at address below

Enrichment Opportunities

Various evening and weekend activities afford opportunities to informally explore many aspects of Esperanto language and culture. These may include study groups, games, group singing, cultural presentations, slide shows, poetry readings, public speaking, intercultural discussions, picnics, and field trips. If you would like to propose a special-interest program, contact Ellen Eddy.

ELNA/ESF Scholarships

Students and instructors can receive partial financial support for fees and housing. Clubs and individuals are invited to recommend students for advanced studies. Interested students and teachers should

write in Esperanto, giving their Esperanto histories (study, teaching, and club activity) to: Ellen M. Eddy at eddyellen@aol.com or 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 USA, 360-754-4563. For more about SIT and what it offers, visit this web site: <http://www.sit.edu>

Program

Esperanto 1500: Next Steps in Esperanto, instructor: Lee Miller <lamiller@centurytel.net>

This course is designed for students who have already started the study of Esperanto and are at the "high beginner" level. The class sessions emphasize basic conversational ability, knowledge of basic language structure and vocabulary, and the usage of Esperanto in typical interpersonal encounters. The focus is on the ability to speak and to understand spoken language. In addition, participants study the language's history and culture. The course is typically conducted in Esperanto, with the use of explanations in other languages if needed.

3 undergraduate credits, pass/fail

Esperanto 2000: Gaining Confidence in Esperanto, instructor: Sylvain Lelarge <sylvain.lelarge@wanadoo.nl>

This course, designed for students who have made an initial study of Esperanto, emphasizes conversational ability, knowledge of sentence structure and vocabulary, and the usage of Esperanto in typical intercultural encounters in Esperanto. In addition, participants study the language's history and culture. The course will typically be conducted in Esperanto,

inspiros vian animon kaj iĝos neforge-sebla evento de la jaro. La programo inkluzivas seminariojn por Esperanto-instruantoj, diversgradajn lingvajn kursojn, universitaton, ekskursojn, piedmarŝojn, koncertojn, ludojn ktp.

La ĉeforganizanto: Volodimir Hordienko, volodimir_h@yahoo.com; www.aromajalta.by.ru. UA-01133, Kijiv-133, p.k. 35; tel/fakso (+380-44) 285-1701



with the use of explanations in other languages if needed.

3 undergraduate credits, pass/fail.

Esperanto 3000: Esperanto Language, Literature and Community, instructor: Katalin Kovats <katalin.kovats@wanadoo.nl>

This course addresses the needs of advanced students in a variety of areas, including the linguistics of Esperanto; advanced language skills (translating, interpreting, composition, oratory); Esperanto literature; and social, cultural, and political aspects of the Esperanto community. This varied focus is especially useful for those preparing to teach or to take advanced examinations in Esperanto.

3 undergraduate credits, pass/fail.

New this year

Katalin Kovats will provide a unique language experience based on the life and art of the painter Vincent van Gogh. While studying the fine points of grammar and improving both understanding and speaking abilities in Esperanto, the students will increase their vocabulary related to art, nature, philosophy and even illness, geography, and astronomy (besides everyday subjects). Sylvain Lelarge will bring his talents using suggestopedia and other brain-friendly speaking activities which have made him a popular instructor around the world.

La 18-a lingva Esperanto-festivalo "Aroma Jalto"

29 aprilo-09 majo 2006, Krimeo, Jalto (Ukrainio)

Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej prestiĝan kuraĉlokon de Ukrainio, krimean urbon – Jalton. Tie okazos la tradicia lingva E-festivalo Aroma Jalto-2006. Belega ekzotika naturo, altaj montoj, senlima Nigra Maro, florantaj kreskaĵoj, historiaj kaj naturaj vidindaĵoj

12-a Internacia festivalo de Ekanto Velura Sezono

18-25 junio, Krimeo, Jalto (Ukrainio)

Postfestivalo (26-30 junio): turista marŝo tra pitoreska okcidenta marbordo de Krimeo.

La ĉeforganizanto: Jefim Zajdman, tero@jalta.us, www.jaltaespero.narod.ru. UA-98612, Jalto-12, p.k. 74 (Esperanto), Ukrainio; tel: (+380-654) 231651.

Tradukoj por la nova epoko:

“WWW” kaj “snail mail”

“Lingva Angulo” estas nova rubriko de Esperanto USA, kie ni diskutos malfacilaĵojn de tradukado, plej oftajn erarojn en Esperanto kaj tiel plu – unuvorte, ĉion por ke nia uzado de Esperanto ĉiam fariĝu pli kaj pli bona! – Red.

Joel Brozovsky

Traduki specialan esprimon en nacia lingvo al alia lingvo postulas apartan pensadon. Malofte taŭgas rekta laŭvorta traduko.


La esprimo “snail mail” estas relative nova esprimo nuntempe multuzata en la angla lingvo. Tial ankaŭ en Esperanto oni ne malofte sentas bezonon je ĝi aŭ je taŭga traduko. Senpripense eblas laŭvorte traduki ĝin kiel “helikpoŝto”, sed ĉu tio adekvate transdonas la signifon kaj etoson de la originalo? La simpla respondo al tiu demando estas “ne”. Se oni ne konas la originan esprimon en la angla lingvo, kaj do retradukas ĝin de *helikpoŝto* al *snail mail*, ĝi estas tute nekomprenebla, unue, kaj due, al ĝi mankas ĉia sprito trovebla en la origina esprimo.

Kial “snail mail” tiom populariĝis? Mi opinias ke la ĉefa kialo estas ĝia sprito, kiu devenas ĉefe el ĝia sono. Krom la grandskala troigo, ĝia signifo, la mensa bildo kiun ĝi donas, ne estas aparte sprita. Sed rekta traduko donas nur tiun mensan bildon, ellasante la tutan spriton.

Por imiti la sonan spriton de “snail mail”, pli taŭgus esprimo kia “posta poŝto”. La sona sprito similas, sed mankas la granda troigo. Do mi taksas ke ĝi kaptas 90 procentojn de la sprito de la origina esprimo. Same kiel “snail mail”, oni neniel povas kompreni la esprimon “posta poŝto” sen ia klarigo. Ĉu vi komprenis je la unua aŭdo la esprimon “snail mail”? Mi vetus ke vi, same kiel mi, bezonis klarigeton je

la unua fojo aŭdi ĝin. Povas esti ke sufiĉa klarigo venis el la kunteksto, sed ankaŭ tio estas ia klarigo.

Pro tiu manko de memklareco, mi ne preferas tiun esprimon “posta poŝto”, kvankam ĝi plaĉas al mi. Mia opinio pri Esperanto estas ke ĝi ekzistas por peri klaran komunikadon tra la tuta mondo, kaj ke por fari tion, necesas ke ĝi restu laŭeble facila kaj klara al ĉiu, sen ia rilato al kono de alia lingvo. La plej bonaj novaj esprimoj estas tiuj kiuj ne bezonas klarigon, kiuj memstare estas kompreneblaj. Tial, mia preferata traduko por



“snail mail” estas “paperpoŝto”. Ĝi havas plaĉan sonoripetadon kiu donas spritan etoson, eĉ se ne tiom frapan

kiel en la origina es-

primo. Sed plej grave, ĝi havas la grandan avantaĝon esti tuj komprenebla sen aparta klarigo. Ĝi perfekte transdonas la signifon de la origina esprimo, komprenebla al ĉiu Esperantoparolanto. Laŭ mi, tio ĝenerale valoras pli ol klopodo transdoni spriton alilingvan je la kosto de kompreno.

Lingvan spriton la tradukanto povas krei ene de Esperanto se oni ne sklave sin katenas al la vortoj de la origina teksto. Bona ekzemplo de tio estas la traduko “TTT” de la angla “WWW”. “World Wide Web” estas esprimo kreita por tiutempe nova parto de la interreto. Por la sprito, oni uzis la sinonimon “web” de “net”. Oni do serĉis vorton iom similan kaj decidis nomi ĝin sinonimo. Same oni faris en Esperanto. La kutima traduko por “net” estas sama kiel tiu por “web”: *reto*. Sed oni trovis alian vorton kun simila signifo, teksaĵo, kaj el ĝi kreis la novan esprimon “Tut-Tera Teksajo”, aŭ mallongige, “TTT”.

Lost in Translation

On the exams

- What do you know about Boston Tea Party?
- I believe many citizens of Boston were the active members of this political party!

The 3 branches of government are: the executive, the legislative and the jewish.

To be elected to Parliament you don't have to be a criminal.

In our hard time I was between the choice to become a lawyer or a criminal...

Last year I had my personal teacher.

I study English because I need intercouse with other people.

- Who is your father?
- My father is Andrey.
- Is it his main occupation?
- No, I think he works somewhere.

Miss Understanding

Misspelin'

miss understanding

United Stations of America

the court fried the murderer (*tried*)

Translations

(translated literally from the original Russian into Esperanto)

an eye for an eye – orelo por la orelo

the conception of police – koncipiĝo de la policano

Native Americans – parencaj usonanoj

neighborhood – kapuĉo de la najbaro

Prepared by Yevgeniya “Zhenya” Amis, based on Russian Esperanto Forum e-novosti

New from the Book Service

To order books from ELNA: (1) Send order by regular mail, with check or credit-card number and expiration date, to: ELNA Book Service, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; (2) Order on-line with credit card at <http://www.esperanto-usa.org/retbutiko.html>

card and the book you want is not in stock, we will back-order it for you and charge your card only when and if it comes back into stock. This service is not available for payments made by check. Prices given are basic, before discounts for ELNA members.

CAN ANYTHING BE DONE ABOUT THE “GLOTTOPHAGY” OF ENGLISH? *Andrea*

CHITI-BATELLI. A scholarly reprint from *Language Problems & Language Planning* about the danger posed by unbridled use of English to other European languages. Extensive bibliography. 2003. 19p. 230x150. Paper. The Netherlands. E-ISSN 15699889. NEW TO ELNA.

CAN001

\$4.30

Note: if you order with payment by credit

- CISKO KAJ VINJO: LA BRUSELA BUBO.** *Willy VANDERSTEEN*. Trans. Bert Boon, Mark Vanden Bempt k.a. Cartoon story of two Belgian children who visit Brussels and have adventures with famous statue Maneken Pis. Drawn in a style very reminiscent of Asterix, but set (mostly) in modern times. 2002. 58p. 260x200. Paper. Belgium. NEW TO ELNA. **CIS002** \$14.30
- ĈI TIE LOĜAS MIĈJO.** *Mihail POVORIN*. 24 songs by various Russian Esperantists, vocals and guitar accompaniment by Mihail Povorin. N.d. CD. Running time: 79'34". NEW TO ELNA. **CIT001** \$8.10
- DAMNEJOJ.** *Julius BALBIN*. 52 poems about World War II and life in the Nazi concentration camps by a well-known Polish-American Esperantist. Includes "Strangolitaj krioj". Poems are in both Esperanto and Polish versions, on facing pages. 1992. 156p. 200x130. Bound. Italy. ISBN 8870360563. NEW TO ELNA. **DAM001** \$13.40
- DUONOKULVITRO, LA.** *Augusto BAIS-SAC*. An amusing little drama about a man in love who struggles with his beloved's unusual demand. Awarded a prize in the Belartaj Konkursoj of UEA, 2005. 2005. DVD: 14 minutes. All regions. Great Britain. NEW TO ELNA. **DUO003** \$13.40
- FOTOALBUMO, LA (DUA VOLUMO).** *Trevor STEELE*. The second volume of the chronicles of the O'Shea family of Queensland, Australia, as shown in a collection of short pieces built around photographs from their family album, carries them through the turbulent sixties and into the Vietnam War. 2005. 165p. 230x150. Paper. Austria. IEM Series "Originala Literaturo" #39/2. ISBN 3-901752-26-9. NEW TO ELNA. **FOT002** \$23.20
- GERDA MALAPERIS!** *Claude PIRON et al.* A reading of Claude Piron's popular didactic novella *Gerda malaperis!* Parts read by Lucas Yassumura, Emilio Cid, Simone Schumacher Cid, Leandro Aristeu, Ana Mikami and Petola. If you are studying Esperanto using this novella, and have a CD player, you should consider getting this kit as accompaniment! N.d. 2 CDs. Running time: 71'36"+20'11". NEW TO ELNA. **GER006** \$15.10
- GLUMARKOJ FLORENCO.** Set of twelve (three rows of four each) stickers commemorating the 91st World Esperanto Congress, Florence, Italy, 2006. Sticker size is 50 mm by 40 mm (approximately 2 inches by 1-1/2 inches). 2005. Paper. The Netherlands. NEW TO ELNA. **GLU002** \$1.80
- IAM, KIAM...** *Mikaelo BRONŝTEJN*. A collection of more recent poetry by Russia's best-known Esperanto bard. Includes 60 of Bronstejn's poems primarily from the beginning of the 21st century, though a couple date back to the 1960s. 2005. 128p. 165x120. Paper. Russia. ISBN 5716101291. NEW TO ELNA. **IAM001** \$7.90
- JEN, DENOVE...** *Mikaelo BRONŝTEJN*. A collection of poetry by Russia's best-known Esperanto bard. 31 original poems, including "Verdaj Karavanoj", "Avinjo Jeanne" and "Esperantujo mia". Includes also several translations of Russian poets. 1997. 119p. 165x120. Paper. Russia. ISBN 5716100503. NEW TO ELNA. **JEN001** \$7.90
- KANTOJ EL URSO-KURSO.** Short songs from 18 lessons of the well-known Urso-Kurso. Includes song sheet. 2005. CD: 17'54". Great Britain. NEW TO ELNA. **URS006** \$4.80
- KLAUxSTRALIO.** *István BEJCZY*. Trans. István Ertl. A tale of the political and social problems of late 20th century Europe, and of an insular utopian society that has solved those problems. Series "Utopia" #2. 2005. 52p. 210x145. Paper. The Netherlands. NEW TO ELNA. **KLA001** \$5.90
- KOMUNE.** *Ralph GLOMP*. Five more four-minute songs primarily by Ralph Glomp, Jürgen Wulff and Marcus Pengel. Includes page with lyrics. 2005. CD. Running time: 19'29". NEW TO ELNA. **KOM007** \$11.10
- LINGVA DIVERSECO.** *Martin HAASE*. A lecture by Dr. Martin Haase, Herzberg, Germany, November 3, 2001, in which Dr. Haase analyzes various languages and raises the question of whether Esperanto may not be as easy as many people think. 2005. CD. Running time: 39'54". NEW TO ELNA. **LIN020** \$13.30
- LONDONO KANTAS.** *Londona Esperanto-Ĥoro*. Twenty songs, many of them popular in Esperanto clubs throughout the world, sung by members of the London Esperanto Club. 1983. CD. Running time: 51'14". NEW TO ELNA. **LON005** \$4.80
- LUPINO KAJ ALIAJ RAKONTOJ, LA.** *Saki (H. H. MUNRO)*. Trans. Edmund Grimley Evans. Twenty stories by this early 20th century master of the short story, characterized by witty humor, elegant style, acerbic satire and, not rarely, a touch of cruelty. 2005. 152p. 200x130. Paper. England. ISBN 0902756249. NEW TO ELNA. **LUP003** \$17.90
- PLENA MANLIBRO DE ESPERANTA GRAMATIKO.** *Bertilo WENNERGREN*. The long-awaited successor to the *Plena Gramatiko de Esperanto*, this book is aimed at ordinary Esperanto speakers who want to study the language's grammar, word-building system, writing and pronunciation in detail. It explains the language in an easy manner, from the most basic matters through the most specific of details. It uses an abundance of examples to help its explanations, among them many from the *Fundamento* and the other works of Zamenhof. 2005. 696p. 235x165. Bound. USA. ISBN 0939785072. NEW TO ELNA. **Code PMEG01** \$27.00
- VERDAJ VOĈOJ.** *Paul GUBBINS (comp.)*. A series of eight graded, short film clips in which well-known, as well as less-known, Esperanto speakers from various parts of the world speak on various topics. The film clips are short (maximum two minutes). Self-grading comprehension exercises in HTML format are included. To be used only in a computer with browser and MPEG-player software, no extra hard disk space required. 2004. CD-ROM. Great Britain. ISBN 0901757195. NEW TO ELNA. **VER013** \$14.30
- VOJAĜO ĜIS NOKTOFINO.** *Louis-Ferdinand CELINE*. Trans. Armela LeQuint & Jak Le Puil. The first novel of a French author known both for his anti-Semitism and his black humor. Set around the end of World War I, the book was a literary signal against wars and all human vanities, and broke with French literary traditions, using the speech of uneducated people, slang, even obscenities. 2005. 370p. 220x140. Paper. USA. ISBN 1595690220. NEW TO ELNA. **VOJ012** \$28.50
- ZAMENHOF-STRATO, LA.** *Roman DOBRZYNSKI*. A series of interviews with Dr. Ludovik Zaleski-Zamenhof in which the life of L. L. Zamenhof, the development of Esperanto, the evolution of the Esperanto movement, and life in Poland under German occupation are described. 2003. 288p. 200x140. Bound. Lithuania. ISBN 9955963514. NEW TO ELNA. **ZAM006** \$33.30

Vojaĝu Esperante en 2006

37-a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto
3-21 julio, Brattleboro, Vermonto
 La plej bonaj kursoj en la mondo!
 Eddyellen@aol.com

(tuj poste) **54-a ELNA-Kongreso**
21-23 julio, Fashion Institute of Technology
 Novjorko, Novjorkio

(tuj poste) **39-a konferenco de ILEI**
25-29 julio, Parmo, Italio, por E-instruistoj

Antaŭ la UK, UEA proponas antaŭkongresajn programojn:

25-28 julio, Toskanio

26-28 julio, Romo

25-28 julio, Venecio kaj Norda Sicilio

91-a Universala Kongreso de Esperanto

29 julio – 5 aŭgusto, Florenco, Italio

Florenco, ĉefurbo de Toskanio, konservas la etoson de la neripetbla granda epoko de kultura, arta kaj scienco evoluoj, nomata la Renesanco. Ĝuste ĉi tie naskiĝis la moderna itala lingvo. Nia kongresa temo estas: “Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj”.

(tuj poste) *UEA proponas postkongresajn ekskursojn, kaj Esperanto Vojaĝ-Servo proponas:*

Mirinda Malto

6-13 aŭgusto

Megaliths, medieval dungeons and Calypso's Cave – Malta is positively mythic! The narrow cobblestone streets are crowded with Norman cathedrals

and baroque palaces. The countryside is littered with the oldest known structures in the world – older than Stonehenge or the Egyptian pyramids. Strategically located between Sicily and North Africa, Malta was a prize whose importance far exceeded its size. It has been visited or invaded by every major civilization in the region. The Phoenicians, Carthaginians, Romans, Arabs, Normans, French and English have all left evidence of their stays. Brochures have been mailed to all who have expressed an interest. If you didn't get one and would like to, please write or call immediately.

22-a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo



Ni kongresos en 19-jarcenta Villa Vittoria

30 aŭgusto – 9 septembro

Krozado al Alasko (de Seatlo). “Vojage of the Glaciers” – de Vankuvero, Kanado al Anchorage, Alasko – speciala grup-prezo kaj la eblo vojaĝi kun eksterlandaj esperantistoj.

ESPERANTO VOJAĜ-SERVO
(E.V.S.)

Berkeley's Northside Travel

1824 Euclid Ave.

Berkeley, CA 94709

(510) 531-8393

LusiHarmon@aol.com

E.V.S. volonte provizos vin per aliĝilo, detaloj kaj helpo aranĝi viajn vojaĝojn.

Esperanto League for North America
 PO Box 1129
 El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
 US POSTAGE
PAID
 Leesburg FL
 Permit # 1040

Esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ★ 2006/2
Dumonata bulteno eldonata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ★ 2006/2

En la Numero

- ★ Esperantumado en Georgiaj... Alpoj... 3
- ★ First Congress Memories. . . 3
- ★ La Vizaĝo de Aŭtuno en Printempo 4
- ★ Remembering Some of Our Pioneers 5-6
- ★ Terglobaj Voĉoj. 7
- ★ Kiel Organizi Kongreson . 8-9
- ★ Slavic Folk-rock? Yes! 9
- ★ New from the Book Service 10-11
- ★ Esperanto Making News . 11
- ★ Lost in Translation 11
- ★ Vojaĝu Esperante 12

Esperantumado en Georgiaj... Alpoj



FOTO: F. DORCAS

Alpoj... en norda Georgio!

Jenja Amis

Imagu vin ie ĉe la piedoj de Alpoj. Vin ĉirkaŭas belegaj bavar-stilaj blankaj domoj kun ruĝaj tegolaj tegmentoj kaj ventoflagoj, kun ĉizelitaj ŝutroj, skribaĵoj en la germana lingvo. Kaj nun imagu ĉion ĉi... en sudorienta Usono! Ĝuste tie, en la montara norda Georgio, en la ŝtatparko Unicoi, apud alpeca vilaĝo Helen, la 31-an de marto – 2-an de aprilo, okazis la unua Sudorienta Regiona Esperanto-Kongreseto.

Je la grandega ĝojo de la organizantoj venis sufiĉe multaj partoprenantoj: ja sukcesecon de aranĝo oni povas kalkuli per kvanto de la venintaj homoj. Al nia kongreseto venis 26 homoj el ses usonaj ŝtatoj, ok devenlandoj kaj kun dek unu denaskaj lingvoj. Plejparto de la kongresanoj, kompreneble, venis el Georgio (15), sed multaj homoj venis el foraj lokoj: kvar homoj (plus du hundoj!) venis el Florido, du el Tenesio, tri el Virginio, unu el Kentukio kaj unu (ELNA-prezidanto Filipino Dorcas) eĉ flugis el Teksaso! Por nia regiono veno de 26 homoj estas tre bona: ja esperan-

tistoj en la sudorienta regiono plejofte loĝas tre dise (kun kelkaj esceptoj, kiel Atlanto), kaj en kelkaj ŝtatoj ankoraŭ, laŭ mia scio, ne estas lokaj grupoj. Ni komencis aktive reklami la kongreson kelkajn monatojn antaŭ la kongreso mem: aldone al anoncoj en Esperanto USA kaj en la ELNA-retpaĝo, ni dissendis (rete kaj poŝte) informojn al ĉiuj informpetintoj de ELNA en nia regiono.

La ĉefa emfazo de la kongreso estis instruado: ni havis du nivelojn de kursoj – por komencantoj kaj progresantoj/progresintoj. La komencantan kurson (10 lernantoj) gvidis Randy Dean kaj Jim Henry – ili uzis la unuajn epizodojn de *Pasporto al la Tuta Mondo*, instruis pri la skribo kaj elparolo de la lingvo, pri finaĵoj (kun emfazo pri la verboj) kaj pri la plej oftaj afiksoj (inkluzive *-ig* kaj *-iĝ*). Krome, ili faris ankaŭ multajn paroligajn ekzercojn. La “esperantisteco” de la komencantoj variis ekde ses semajnoj da studado ĝis unu jaro, kvankam unu homo neniam antaŭe studis Esperanton. La aĝoj variis ekde 20+ ĝis 70+.

La postkomencantan (ĝis supernivela) kurson instruis Joel kaj Jenja Amis: ĝin parto-

prenis 12 homoj, kaj la nivelo variis ekde postkomencanta ĝis fluparolanta. Ni uzis diversajn materialojn: skribajn gramatikajn ekzercojn de www.edukado.net, paroligajn taskojn (ekz., intervjuojn kaj prezentojn de aliaj kursanoj al la grupo), diskutojn (ekz., pri motivoj lerni Esperanton) kaj ankaŭ faris metiejon pri falsaj amikoj inter la angla kaj Esperanto kaj ĝenerale pri malfacilaĵoj de tradukado el la angla en E-on, kiun mi preparis speciale por tiu ĉi kongreseto. Ni ankaŭ parolis pri ĉiuj uzoj de akuzativo, transitiveco/netransitiveco, ĝusta uzo de “po”, malsama akordiĝo de verbotempoj en la angla kaj E-o ktp. La aĝoj de studentoj en la postkomencanta-supernivela grupo estis ekde 16 ĝis 80+.

Sed, kompreneble, ne ĉio dum la kongreseto estis nur instruado! Ni havis multajn intereseajn prelegojn kaj amuzojn. Dum la interkona vespero, ekzemple, ni lernis, ke inter la partoprenantoj troviĝas piloto, ŝip-inĝeniero, ke du homoj loĝas en boato, ke unu homo trifoje renkontis aktorinon Phyllicia Rashad, ke du hundoj (ĝuste tiuj kiuj venis el

(Daŭrigo sur p. 3)

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
☎ 510/653-0998; 2510/653-1468
✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Philip G. Dorcas
Vice President/Vicprezidanto: Steven D. Brewer
Secretary/Sekretario: Anna Bennett
Treasurer/Kasisto: William B. Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Joel Amis, D. Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi Harmon, Jerry Johnson, Orlando E. Raola, Robert L. Read, Julie Spickler

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Don Harlow

Esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 43, No. 2
ISSN 1056-0297
Editor/Redaktoro: Joel Amis
Assisting editor, layout/Vicredaktoro, kompostado: Ĵenja Amis
✉ yevgeniya_amis@yahoo.com

Materials for **Esperanto USA** should be sent to/Materialojn por **Esperanto USA** oni sendu al:

Esperanto USA (Joel Amis)
2025 Peachtree Rd. NE, #927,
Atlanta, GA 30309, USA/USONO
or by e-mail/aŭ retroŝte al:
joelamis@yahoo.com

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprimataj en tiu ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la publikigita materialo al ELNA.

Saluton karaj gesamideanoj!

Nu, legante tiujn ĉi vortojn vi aŭ 1) preparas vojaĝi al la ELNA-kongreso, 2) jam revenis de ĝi, aŭ 3) spirite aliĝas al la kongresanoj en Novjorko. Kompreneble en ideala mondo ni ĉiuj povus ĉiujare partopreni la ELNA-kongreson (kaj ankaŭ Universalan Kongreson, k.s.)—sed pro tio ke ni (ankoraŭ) ne vivas en ideala mondo, ni kiuj bonŝancas partopreni kongresojn devas plenumi nian respondecon helpi al niaj gesamideanoj kiuj ne povas ĉeesti ĉiujare sperti la kongresan etoson pere de ni . . . t.e. (se vi ankoraŭ ne komprenis) ni atendas amasajn kontribuojn por la kongresa numero!

Sed antaŭ ol okupiĝi pri la ELNA-kongreso en la “Granda Pomo”, ni en tiu ĉi numero unue retrorigardos al du regionajn E-kongresojn: la unua Sudorienta Regiona Esperanto-Kongreseto en Georgio kaj, aliflanke de la kontinento, la jam tradicia Tut-Kalifornia Esperanto-Kongreso.

Kaj, parolante pri retrorigardado—Vilĉjo Harmon prezentos al ni plurajn el niaj bravaj ELNA-pioniroj . . . kiujn la pli junaj el ni bedaŭrinde ne havis la honoron persone koni, sed kies idealismo kaj sindediĉo inspiras nin “Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante” iri obstine “Antaŭen, senfine!”

Agrablan legadon!
Joel

Hello dear samideanoj (fellow Esperantists)!

Well, if your reading these words you either 1) are preparing to travel to the ELNA Convention, 2) have already returned from it, or 3) are participating in spirit with the conventioners in New York. Of course in an ideal world we would all be able to attend the ELNA Convention every year (and also the World Convention and the like)—but because we don't (yet) live in an ideal world, we who are lucky enough to be able to attend conventions must fulfill our obligation to help our fellow Esperantists who can't attend every year to experience the convention ethos vicariously through us... i.e. (if you haven't yet understood what I'm getting at) we expect loads of articles from you for the convention issue!

But before worrying with the ELNA Convention en the “Big Apple”, in this issue we are going to take a look back at two recent regional Esperanto conventions: the first ever Southeastern Regional Esperanto Convention in Georgia and, on the other side of the continent, the traditional All-California Esperanto Convention.

And speaking of retrospective—Bill Harmon will introduce us to several of our gallant ELNA pioneers... whom the younger of us, unfortunately, never had the honor to know personally, but whose idealism and dedication inspire us “Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante” iri obstine “Antaŭen, senfine!”

Pleasant reading!
Joel



FOTO: F. DORCAS



Dum prelego pri rozkrucismo

Florida) “komprenas” nur Esperanton, ke iuj partoprenantoj havas iom da indiana sango, ke du homoj laboras por la ŝtato Georgio, ke unu homo havas ĝardenon, dediĉitan al Zamenhof. S-ro Stan Buchholz (li venis kun la edzino el Florida) prezentis marioneton de Zamenhof, kiun li faris antaŭ tiu ĉi kongreso. La pupo furoris kaj estis multfoje fotita.

Alia interesa ero estis “PIV-ludo” (en ukraina varianto, “Trompludo”), tre ŝatata de esperantistoj en eks-Sovetio. Ĝi iom similas al la ludo Balderdash: oni elektas malfacilajn, aŭ malmulte konatajn, vortojn el PIV, kaj la teamoj devas elpensi “sian” difinon por tiu ĉi vorto, kiu devas soni



Helen Buchholz kun siaj libroj

kredebla. La gvidanto voĉlegas la elpensitajn difinojn, inter kiuj troviĝas ankaŭ la ĝusta, kaj la grupoj voĉdonas por tiu signifo kiu sonas kiel ĝusta. Gajnas tiu kiu elpensis la plej kredeblajn difinojn.

Dum la kongreso Frans Jahger proponis premiojn per la *Nova Plena Ilustrita Vortaro* partoprenanton kun la plej klara kaj komprenebla elparolo: ĝin gajnis Randy Dean (gratulojn!).

Pro tre limigita tempo, multaj la

many people took the time to make a weekend for learning and friendship – around 25 of us.

We have new knowledge, thanks to the two levels of classes held. We have new memories, thanks to the visit to Helen, our get-to-know-you night, and our shared meals. And we have new friends, from all over our region, who share a common interest and who are “same idea people” with us – an idea about peace, friendship, and equality that we experienced for one great weekend.

We want to say thanks to the people who came to the congress as participants. We also want to thank the organizers for giving us a fun, entertaining, and inspiring event. We hope it happens on an annual basis!

Rememoroj Pri la Unua Kongreso

Ĝeremio kaj Linzeo Aldrich

Sonas kiel ŝerco – finno, mek-

prelegoj okazis dum la kafopaŭzoj (la prelegoj okazis kaj en Esperanto, kaj en la angla – aparte tiuj kiuj celis komencantojn): temis pri ELNA kaj aliaj E-organizaĵoj kaj la Esperanto-Movado ĝenerale, pri la manieroj disvastigi Esperanton, pri NASK, Esperanta literaturo, Rozkrucismo kaj Spiritismo. Okazis ankaŭ unu interesege (kaj tute spontana) prelego de Helen Buchholz pri ŝiaj spertoj kiel usona knabino, “kap-tita” en nazia Germanio - oni deportis ŝian familion pro kontraŭleĝa enmigrado de ŝia patro el Germanio. Helen estas aŭtorino de du libroj - *American Hamburger* kaj *Another Dance of Life*, - kiuj estas premiitaj de National League of American Pen Women, kaj ŝi ankaŭ ofte prelegas. Dum la kongreso eĉ eblis aĉeti tiujn librojn – kaj la aŭtorino afable donacis 10% de la vendenspezo al ELNA.

Kompreneble, okazis ankaŭ ekskurso al la nekutima, preskaŭ fabela, alpeca urbeto Helen, promeno al akvofalo kaj simple multe da babilado. La kongreso sukcesis, kaj tio estis plej bona rekompenco por ni organizantoj. Sed la tuta kongreso ne estus ebla sen granda helpo de la Schulze-

fonduso, kiu kovris la plej grandajn kostojn: la tutan instruan parton de la kurso, inkluzive luon de la ejo dum la instrua tempo, fotokopiadon kaj ĉiujn aliajn materialojn. Ni kore dankas la fonduson pro tiu ĉi helpo! Kaj ni ankaŭ ege esperas, ke la Sudorienta Regiona Esperanto-Kongreseto okazos ankaŭ venontjare kaj invitas esperantistojn el nia regiono pripensi la eblon organizi ĝin. Kaj ni helpos!



Marioneto de Zamenhof furoris!

ĉirkaŭ 25 entute.

Ni havas novajn sciojn, dank’ al du niveloj de kursoj dum la kongreseto. Ni havas novajn rememorojn, dank’ al vizito al Helen, nia interkona vespero, kaj niaj manĝoj kune. Kaj ni havas novajn amikojn, el la tuta regiono, kiuj kunhavas samajn interesojn kaj kiuj estas samideanoj kun ni – ideo pri paco, amikeco kaj egaleco, kiujn ni spertis dum tiu ĉi bonega semajnfino.

Ni dankas al ĉiuj kiuj kunvenis kiel partoprenantoj. Ni ankaŭ dankas la organizantojn de tiu ĉi amuza, distra kaj inspira evento. Ni esperas ke ĝi okazos ĉiujare!

sikano kaj usona paro eniras restoracion. Sed ĝi ne estas ŝerco. Estas nia lasta memorajo el la fantasta semajnfino – la Sudorienta Regiona Esperanto-Kongreseto kiu okazis dum la lastaj tagoj de marto en Helen, Georgio. Ni vidis ke Esperanto povas funkcii kiel ilo, ne nur kiel interesa hobbio. Ni renkontis la karan prezidenton (ne prezidenton, vi devas scii) de ELNA, Filipon Dorcas. Ni ankaŭ vidis ke Esperantujo estas insulo kie bonkoraj homoj kunvenas.

Ni surpriziĝis pri la varieco de aĝoj, de 16-jara ĝis 80-jara. Ni surpriziĝis pri la varieco de intereso kaj vivhistorioj. Ni surpriziĝis ke germanstila vilaĝo ekzistas en norda Georgio. Kaj ni feliĉe surpriziĝis pri tio, kiom da homoj trovis tempon veni por semajnfino de lernado kaj amikeco –



(de maldekstre): Linzeo kaj Ĝeremio Aldrich; Frans kaj Dorothy Jahger

First Congress Memories

Jeremy and Lindsey Aldrich

It sounds like a joke – a Finn, a Mexican, and an American couple walk into a restaurant. But this was no joke. It was our last memory from a wonderful weekend - the Southeast Regional Esperanto Convention held in late March in Helen, Georgia. We saw how Esperanto can function as a useful tool, not just an interesting hobby. We met the dear president of ELNA, Phil Dorcas. We also saw how Esperantoland is a kind of island where good-hearted people come together.

We were surprised by the range of ages present, from 16 to 80. We were surprised by the variety of interests and backgrounds. We were surprised that a German-style village exists in north Georgia. And we were most pleasantly surprised by how

La Vizago de Aŭtuno en Printempo, aŭ: Unu Momento de TKEK*



Dediĉita al laboranto en ĝinzo, Henry Studer

Keneĉjo Goldbergo

Ŝi ludis kun Panjo sur la tablo. Kontente, trankvilvoĉe parolis panjo ŝia al dekoj da samlingvanoj tre, tre atentaj.

Ŝia panjo jen demande ludis, jen eksplikis, tiel klare, pri la rilato inter la du, dum ili la lunon metis sur ĝian bildon, la sunon same.

Ekde naskiĝo Aŭtuno estas varmigata per la vortoj intimaj de sia panjo, Amanda, vortoj nur de lingvo nia.

Trijaraĝa Aŭtuno tute facile komprenas la lingvaĵon de Amanda. Kompreneble, aŭdante karesajn vortojn parencajn, parolas tiel juna Aŭtuno la vortojn simplajn ankaŭ angle.

Post iom da tempo la aŭdantaro ekaplaŭdis la

mirindajn sukcesojn de ludanta Aŭtuno.

Turniĝis ŝi al sia aŭdantaro kaj esprimis sian subite sentitan ĝojon per radia rideto. Tiu vizago, en tiu komforta momento, ja estos memorata por ĉiam de ĉiu en la malgranda ĉambro.

Tie, en Daviso, la lastan semajnfino de marto 2006, ĉi tiu tiel komforta ĉambro ja estis grava parto de Esperantujo. En ĝi, okaze de TKEK, estis parolata, kantata, aŭdata, de kvindek du homoj, nur unu lingvo, kiun ĉiu el ni komprenis, inkluzive de la filino de siaj gepatroj: Aŭtuno.

* Tut-Kalifornia Esperanto-aŭdantaro ekaplaŭdis la Konferenco

Korespondi deziras

Plibonigita Ret-Paĝo Por Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo

Dank' al la granda laboro de Enrike Ellemberg, la ret-paĝo por Infanoj ĉirkaŭ la Mondo ĉe www.icxlm.org nun estas multe pli alloga kaj utila ol antaŭe. Oni nun povas atingi ĝin ankaŭ per ligo en la ret-paĝo de ELNA ĉe www.esperanto-usa.org.

Ron Glossop, Direktoro de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, invitas ĉiujn (kaj aparte tiujn kiuj instruas Esperanton al infanoj) rigardi nian plibonigitan ret-paĝon. Vi povas vidi la tekstojn de multaj el la libretoj kiujn Charlotte Kohrs verkis, inkluzive la kantojn (vortojn kaj muzikon) en *Kantu Esperante kun Janico kaj Johano*. Vi povas vidi ankaŭ aliajn materialojn por infanoj kaj komencantoj plus informon pri la historio de la organizaĵo Infanoj ĉirkaŭ la Mondo. Tie vi trovos ankaŭ ligojn al aliaj ret-paĝoj kiuj estas utilaj por infanoj kiuj lernas Esperanton.

Mia nomo estas Sebuhero Shumba Honore, edzo, patro de du gefiloj. Mi estas gvidanto de la Virunga Esperanto-Klubo en nia distrikto Rutshuru. Mi ankaŭ estas prezidanto de Kristana Esperanto-Klubo kiun mi ĵus fondis. Mi estas verkisto kaj profesoro. Tiucele, mi volas ekrikti kun vi por ke ni povu interŝanĝi niajn ideojn kaj helpi min korekti miajn erarojn. Mi uzas la poŝtadreson de najbara lando Ugando: Egl. CEBCE REMERA P.O. BOX 08 BN-KISORO – UGANDA. Mi ŝatas ĝin ĉar ĝi funkcias pli bone ol tiu en nia lando Demokratia Respubliko Kongo. Mi ege ŝatas Esperanton ĉar ĝi estas senlima lingvo. Ĉu – eblas ke vi povas helpi min koncerne instruadon pri Esperanto? Ĉu ni povas interŝanĝi niajn fotojn? Mi deziras al vi bonan esperon, prosperon, sanon, feliĉon!

My name is Janenci Salas. I am Cuban, a new Esperanto student, but I want to make contact with new friends. Janenci Salas, edificio 30a, apto 9, rpto Bahia, Habana del Este, Ciudad de la Habana, Cuba.

Mi estas Monshet Nhy Wa Dana, 52-

jaraĝa, prezidanto de nia loka klubo "Stelaro" (lulilo de Esperanto en Demokratia Respubliko Kongo, unu el la plej aktivaj en mia lando). Unue, mi celas plibonigi, perfektigi kaj plifirmigi mian scion kaj konon pri Esperanto – lingvo. Due, mi tre, tre bezonas korespondi kun dikaj personoj, esperantistaj aŭ ne (mi parolas la anglan lingvon). Aĝo, koloro, alteco ne gravas. Retadreso: monshethnywadana@yahoo.fr

Mi estas Mateo el Kongo. Mi havas 29 jarojn. Mi estas nova esperantisto kaj deziras korespondi kun vi por perfektigi mian Esperanton. Vi povas vidi kelkajn fotojn ĉe www.mateokd.eur.st/. Dankon pro via respondo. mateokd@yahoo.fr

Mi estas Zita Lelevičiute el Litovio, malgranda urbeto Birŝtonas. Mi lernas Esperanton nur 2 jarojn. Mi volas konatiĝi kun amikoj el la tuta mondo, ankaŭ el Usono. Ne gravas aĝo, lando, sekso kaj aliaj detaloj, mi nur volas bone posedi Esperanton! Mi dankas vin kaj atendas vian leteron. zitukas.l@mail.lt

Remembering Some of Our Pioneers

William R. Harmon

Many of the pioneer Esperantists involved in the history of the Esperanto League for North America led interesting and unusual lives. Their accomplishments and activities enliven the following “obituaries” of 15 selected pioneers. All information is taken from the book *A History of the Esperanto League for North America, Inc.* (which is available from the ELNA Book Service). These are listed chronologically by year of death.

Joseph R. Scherer of Los Angeles, California, passed away July 20, 1967. Scherer was a senior executive in the Boy Scouts of America and did much to introduce Esperanto to Scouting. The Merit Badge for Esperanto learning had already been established and Scherer fostered it in the United States at every opportunity. He was by profession an insurance company executive, born a Swiss, naturalized after his immigration to the U.S.A. Scherer was known for his vast travels around the world. Scherer was the author of two published works: “Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo” and “Tra Usono kun ruliĝanta hejmo” and innumerable newspaper and magazine articles.

Ivy Kellerman Reed passed away February 7, 1968 in La Jolla CA at 91 years of age, at least 60 of those years having been dedicated to Esperanto. She was the translator of the famous Esperanto edition of Winnie-the-Pooh. An accomplished linguist with four academic degrees for work ranging from Latin, Greek, Sanskrit, and Persian to half a dozen modern languages, Mrs. Reed was an ardent Esperantist. Her *Practical Grammar of the International Language*, first published in 1915, ran to several editions. She translated Shakespeare’s “As You Like It”, the first performance of which was given at the sixth World Esperanto Congress in Washington DC in 1910.


Charles Chomette of Los Angeles, California, died April 13, 1969. Born in France, he came to the USA in 1919, and met his Belgian-born wife Germaine at the UK in

Antwerp in 1928. They had “denaskaj” daughters Lilio and Dianto, and the family spoke Esperanto regularly at home – even to their dog, “Amiko”. “Paĉjo” Chomette was one of the central pillars of the active Esperanto-Klubo de Los Angeles until his death. Chomette translated the original script of “Inkubo” (“Incubus”), a “film noir” epic produced by Anthony Taylor and written and directed by Leslie Stevens in 1965 with a cast including William Shatner, later of Star Trek fame. Showings

of this film always produce great hilarity among Esperantists, due to the strange pronunciation and accent of the actors. Although Chomette offered to personally coach the actors in the correct pronunciation of the Esperanto script, the producer declined, stating that “Esperanto is phonetic and we don’t need to waste the time.” It now enjoys some fame in its genre world-wide.

Germaine Chomette passed away January 22, 1982. Born Germaine van der Veken in Belgium in the early 1900s, she was an active Esperantist from 1925 on. Germaine was a member of the Esperanto Club of Los Angeles from its founding in the 1930s, a member of ELNA from 1953, and a member of UEA from 1936. After the death of her husband Charles in 1969, Germaine became the UEA Delegate in Los Angeles and remained in that post until her death. As was Germaine, her daughters Dianto and Lilio are both life members of ELNA. And the author of this article is delighted to add that he has fairly recently visited both Lilio (who lives in Portland OR) and Dianto (who lives in Reedley, California) and found them and their Esperanto still brilliant.

Donald Evans Parrish passed away June 6, 1969 in his 80th year. Parrish was tragically shot by a demented neighbor



ELNA's leaders in 1954: Gilbert Nickel; Louis Dormont; Howard G. Borden, Edward W. Pharo, Jr.; John L. Lewine; Conrad Fisher

who objected to his mowing the lawn near her open window. Parrish was born in Milford, Iowa December 20, 1889. He taught himself Esperanto in 1907 and used it extensively on speaking tours in Europe, Asia and Africa for the Los Angeles (California) Chamber of Commerce in 1911-12. He helped to organize the 1915 Universala Kongreso in San Francisco. He met his future wife Paula in Copenhagen, who had worked with Dr. Ludovic Zamenhof and his wife in translating Esperanto books into Braille. Through her, Parrish came to know the Zamenhof family well. Paula passed away in January of 1976.

Donald Stephens of Arden, Delaware, passed away in January, 1971 at the age of 84. Stephens learned Esperanto in 1907 and was a friend of Upton Sinclair and Eleanor Roosevelt. He and Upton Sinclair were among the first “conscientious objectors” during the first World War, refusing to be inducted into the Army. He remained an active pacifist throughout his life.

Ralph Bonesper passed away in April of 1971. Born in 1897, Ralph learned Esperanto in his native Hungary in 1921 at the Debrecen College. By profession a merchant mariner, he actively used Esperanto in travels to many world parts. Ralph organized many classes in the New York area. During World War II he was an indefatigable worker in the SAT Solidara Helpservo, providing food to starving European Esperantists and war victims. Bonesper left inheritances in his will mainly to Esperanto including \$2000 to UEA, \$500 to the New York Esperanto



Ferd Carlson: founder, editor (1956-1960)



Paula and Donald Parrish. Donald was Chief Delegate of UEA in the USA from 1932 to 1969)

Society, and the balance of his estate, \$15,526, to ELNA's general fund.

Arthur Brooks Baker passed away May 22, 1973. Born August 17, 1877 in Salem, Kansas, Baker learned Esperanto in 1906, and founded *Amerika Esperantisto*, the first Esperanto periodical in the USA. He also authored a number of Esperanto textbooks and translations, one of which, *Elements of Esperanto*, was published in 1907 with a press run of 100,000 copies.

Glenn P. Turner passed away July 10, 1975 at the age of 86 in Middleton WI. Born in 1889, Glenn became an Esperantist in 1907. Glenn was a member of the "Reorganization Committee" in 1952 which was instrumental in founding ELNA. He was a local attorney and broadcast a radio show on station WIBU on a Sunday program "World of Plenty." Glenn organized the Esperanto Foundation of Madison, and operated a small book service providing Esperanto materials for many years.

Dr. Lehmann Wendell passed away in May, 1977, at the age of 99 years. He was voted an Honorary Member of ELNA at the 1977 congress, and it was noted at the time that he was the oldest living Esperantist in the United States. By profession a dentist, Dr. Wendell first learned Esperanto in 1908 at the behest of his brother. He had taught a number of courses in the Minnesota area, including one at the University of Minnesota.

John Lewine passed away April 27, 1982. He became an Esperantist in 1920 at the age of 12 years, having by chance found the Rhodes English-Esperanto dictionary and other books on Esperanto in his local public library in New York City. Lewine looked up "Esperanto" in the New York telephone book and found an

Esperanto Trading Corporation at 42nd Street and Fifth Avenue. He hurried there and asked the owner whether he spoke Esperanto. The owner (whose name John could not remember) received him affably and took him to a meeting of the New York Esperanto Society at the Hotel Endicott on Columbus Avenue and 81st Street. Lewine met Edmond Privat and other eminent Esperantists at the 1925 Universala Kongreso de Esperanto in Geneva. He became president of the Yale Esperanto Society (which he founded). John took postgraduate studies in Paris at the Sorbonne, where he was active in the Esperanto movements in France, Belgium, England and Italy. As an officer with SHAEF (Supreme Headquarters, Allied Expeditionary Forces) in London and Paris during WW II, he once took the stump in Hyde Park in London to extol Esperanto. While in Paris on military service he had the pleasure of attending the first meeting of the Esperanto Club of Paris after liberation from the Nazis. Upon his return to New York, John was instrumental in combining the former two Esperanto associations there (Manhattan and Brooklyn) into the Esperanto Society of Greater New York.

Mark Starr, Honorary Member of ELNA, long-time union activist and leader (once Vice-president of the American Federation of Teachers, AFL-CIO), author, and Esperantist for many years, passed away on April 24, 1985 at the age of 90. Mark was the author of numerous books on the U. S. labor movement, and was a member of the delegation that set up UNESCO in 1945.

William West Glenny, longtime Esperanto activist from Beverly Hills, California, passed away March 16, 1989. Glenny was a Colonel in the U.S. Army's American Military Government, Occupied Territory during and just after WWII, and professionally was a patent attorney. Glenny was instrumental in recruiting Steve Allen to star in the "talking heads" production "The World of Esperanto", produced by ELNA in 1983.

Elwyn C. Pollock of Morongo Valley, California passed away June 20, 1989 at age 88. "Elkopo", as he was known to his many friends, was by profession a trombone player. He learned Esperanto in 1936, studying it together with his wife. An avid reader of Esperanto literature, Elkopo translated *The Edinburgh Lectures on Mental Science* by Thomas Troward into Esperanto and published it himself in 1986. He was active in ELNA, carrying on an extensive correspondence with ELNA

officials on many subjects. He also wrote a series of five articles for *The North American Esperanto Review* in 1954 on music and musicians.

Roan Orloff Stone, one of the earliest Board members of ELNA, passed away January 1, 1993, at the age of 86. She was born in Vienna, Austria July 30, 1906, of Russian Jewish parents, moving to the U.S.A. at the age of one year. Roan read about Esperanto in a Yiddish journal at the age of 15. She was one of the nine Bah'a'is who founded the Bah'a'i Esperanto League and translated the famous *La Profeto* of Kahlil Gibran.

The year 1999 brought a great loss to Esperanto and Esperantists in the United States with the death of **Catherine Schulze**. Cathy was born Catherine Gigliotti on November 4, 1913 in Connecticut, became an Esperantist in 1939 through a Cseh-method course given by Doris Tappan. With her husband **William ("Bill") Schulze** (who died in 1993), Cathy began a postal Esperanto course in 1970 which is still functioning today, although largely replaced now by a similar course offered by e-mail. She presided over the first ELNA Book Service in her home until the first central office of ELNA was created by her and Bill in Burlingame CA. Obituaries honoring Cathy took up almost the entire issue of *Esperanto USA* in April, 1999. Especially heartwarming was the obituary written by Dr. James E. Lieberman, which can be found as Appendix D in the *ELNA History*.

Armin Doneis, an early supporter and officer of ELNA, passed away in October of 2000 in Wisconsin. Armin was President of ELNA from 1957 to 1959, Chairman of the Board from 1960 to 1962, and a member of the Board of Directors for a total of nine years. Armin was a dedicated opponent of war and the expenditure of U.S. income taxes for military purposes. A deeply religious man, he had the courage of his convictions and was often in defiance of what he considered immoral laws. In 1969 Armin replaced Donald Parrish as Chief Delegate of UEA for USA. He remained Chief Delegate until his death in 2000. Much more could be said about each of these pioneers and about many others, who had a number of things in common, primarily a love of Esperanto and a belief in its potential role for peace in the world.. We should all be grateful to them for their dedication to a small, struggling organization that grew into today's Esperanto League for North America, Inc.

Terglobaj Voĉoj

Steven Brewer

Dum la printempo de 2005, mi trovis novan blogon* kies nomo estas “Global Voices” (GV): <http://www.globalvoicesonline.org/> Ĝi estis la kreaĵo de Ethan Zuckerman kaj Rebecca McKinnon ĉe la Centro Berkman por Leĝo kaj Socio ĉe Universitato Harvard. Ili okazigis konferencon en decembro 2004 por internaciaj blogistoj kaj ĵurnalistoj por diskuti la eblecon ke blogoj povas doni fenestron inter kulturoj. La blogo kiun ili starigis serĉis tion kion ili nomis “pontblogoj” kiuj diskutas lokajn aferojn (politikon, novaĵojn, ktp) en pli larĝa komunumo: ĝi klarigas aferojn kiuj por loka legataro jam klaras. La blogo rapide fariĝis sufiĉe konata kaj legata trans la reto.

Ili ankaŭ starigis vikion por subteni sian laboron: http://www.globalvoicesonline.org/wiki/article/Main_Page. Ili dividis la mondon laŭ landoj – rezulte estas paĝo por ĉiu lando (bonvolu kompreni ke ili decidis tiel fari nur post longa diskutado pri la meritoj kaj problemoj de tiu [kaj iu alia] solvo kaj elektis tion sciante ke ĝi malplaĉos al multaj). Ĉiu landa paĝo havu ligojn al diversaj novaĵfontoj tra la mondo por ekkompreni tiun landon kaj, precipe, pontblogoj. Ankaŭ ĉe la vikio oni havis manifeston kiun oni tradukas en multajn lingvojn. Mia unua ago estis traduki la manifeston en Esperanton:

Ni kredas je libera parolo: protekti la rajton paroli — kaj la rajton aŭskulti. Ni kredas je universala aliro al la iloj de parolo.

Laŭ tiu celo, ni volas ebligi ke ĉiu kiu volas paroli ekhavi la kapablon paroli — kaj ke ĉiu kiu volas aŭskulti tiun parolon ekhavi la kapablon tion aŭdi.

Dank’ al novaj iloj, parolo ne plu devas esti regata nur de tiuj kiuj kapablas eldoni kaj distribui. Nun, ĉiu povas utiligi la povon de la presilo. Ĉiu povas rakonti siajn rakontojn al la mondo.

Ni volas konstrui pontojn trans la kulturaj kaj lingvaj golfoj kiuj dividas la popolojn, por ke ni komprenu unu la alian pli bone. Ni volas kunlabori pli efike, kaj agi pli potence.

Ni kredas je la potenco de senpera komunikado. La ligoj inter individuoj de malsamaj mondoj estas personaj, politikaj, kaj potencaj. Ni kredas ke konversacioj trans limoj estas esencaj al estonteco libera, justa, prospera, kaj subtenbla — por ĉiuj civitanoj de tiu ĉi planedo.

Dum ni daŭre laboras kaj parolas kiel individuoj, ni ankaŭ volas identigi kaj promocii niajn komunajn interesojn kaj celojn. Ni promesas respekti, helpi, instrui, lerni de, kaj aŭskulti unu la alian.

Ni estas Terglobaj Voĉoj.

Laŭ mia scio, ili neniam estis priprezinta Esperanton kiel rimedon aŭ solvon en sia laboro.

Mi komencis aktivi iomete ĉe GV. Mi laboris pri la vikio, forpreninte spamaĵojn, ĝustigante paĝojn, ktp. Mi ankaŭ, en ties paĝo pri novaj ideoj, verkis mallongan eseon por sugesti ke ili konsideru Esperanton. Mi partoprenis la semajnajn diskutojn kiujn ili okazigis pere de reta babilprogramo kaj, finfine, starigis paĝon kiu enhavas Esperant-lingvajn blogojn.

Terglobaj Voĉoj havas paĝon kiu listas paĝojn laŭ landoj. Pro tio ne estis loko por paĝo pri Esperanto. Mi tiel kreis paĝon por Esperantio kaj sub tiu paĝo indikis paĝon por Esperanto. Por konstrui la liston de blogoj, mi uzis la strukturon kiun Terglobaj Voĉoj uzas kaj komencis

The screenshot shows the Global Voices website interface. At the top, there is a logo with the text "Global Voices" and the tagline "The world is talking. Are you listening?". Below the logo is a navigation menu with links: HOME, ABOUT, FAQ, FOR BLOGGERS, FOR MEDIA, CONTACT, RESOURCES, SUBSCRIBE, and RSS FEEDS. A sidebar on the left lists various countries and regions, including Afghanistan, Albania, Algeria, Angola, Anguilla, Antigua and Barbuda, Aruba, Australia, Azerbaijan, Bahamas, Bahrain, Bangladesh, Barbados, Belarus, Belize, Benin, and Bermuda. The main content area displays a grid of country names, with "China" highlighted in blue. To the right of the grid, there are several small portrait photos of people.

per la listo de blogoj kiun kompilis Luis Guillermo Restrepo Rivas ĉe sia blogo Skribitaj Pensoj: <http://skribitaj-pensoj.blogspot.com/> Al tiu mi aldonis multajn blogojn kiujn mi trovis per multaj zorgaj esploroj pere de Google, Technorati, kaj aliaj serĉpaĝoj.

Mi ankaŭ interŝanĝis kelkajn retroŝtojn kun la fondintoj. Unu el ili, profesia ĵurnalista, malmulte interesiĝis pri Esperanto. Alia, teknikisto, pretas pripensi kiel Esperanto povas havi voĉon kaj partopreni. Je tiu momento, oni forviŝis la paĝon pri Esperantio. Mi lasis mesaĝon ke, ĝis oni decidis kian rolon Esperanto povas ludi, kie ĝi troviĝas inter la Terglobaj Voĉoj, mi ne plu partoprenos aŭ helpos subteni la paĝojn. Post ioma tempo, oni decidis ke la Esperanto-paĝo daŭre ekzistu, sed ke la indiko al la paĝo ekzistu je ĉiu landa paĝo por kiu troviĝas taŭga pontblogoj en Esperanto.

En decembro, okazis monda konferenco por la projekto “Terglobaj Voĉoj” en Londono. Mi ne povis pagi la vojaĝkostojn al Londono, sed mi supozis ke samideano en Londono eble povus partopreni por reprezenti la esperantistojn. Mi kontaktis Edmund Grimley-Evans kiu proponis Tim Morley kiel la plej taŭgan homon por la celo. Ni parolis Skajpe** kaj interŝanĝis kelkajn retroŝtojn dum mi klarigis al li miajn

celojn je partopreno: Jen homoj kiuj havas la samajn celojn kiel esperantistoj kiuj neniam vere aŭdis pri Esperanto. Unu grava celo de la konferenco estis diskuti kiel trakti la lingvajn problemojn de la projekto. Oni registris kion diri s-ano Morley:

“Mi estas aktiva en la Esperanto-movado dum la pasintaj kvar jaroj. Kiam mi trovis Terglobajn Voĉojn kaj ties manifeston, ligojn, konversaciojn trans limoj, duono de mia menso pensis ke tion mi kutimas vidi, ĉiuj akordis, sed tiam mi rekonis, ho ne! Tio ne estas Esperanto-organizaĵo. Ĝi ŝajnas al mi kiel Esperanto-organizaĵo kiu ĝis nun ne malkovris Esperanton. Sed en la vikio, jen estas jam longa listo de blogoj kie homoj verkas Esperante. Mi ne estas unu el ili, sed mi legas kelkajn el ili. Se oni pensas pri la estonteco, se ni celas partoprenon de ordi-

naraj homoj kiuj starigas por si mem blogojn, se ni deziras ke ili estu atingeblaj por vera tergloba komunikado, ni tute ne atendu ke ĝi okazu en la angla. Des pli da blogoj, ju pli da tradukistoj necesas. Tio havas sian lokon, sed estas pli grave ke estu loko por mem skribi. Esperanto estas multe pli facila ol iu alia lingvo kiun vi iam ekstudis: mi promesas al vi de mia sperto de lernado kaj instruado. Oni dividis la ŝarĝon tiel; oni ne devas atendi ke oni blogu en mia lingvo por ke mi legu ĝin: ili kontribuas iom da laboro por skribi kaj mi kontribuas iom por legi kaj ni renkontiĝas en la mezo. En la vikipedio, ĝi troviĝas en la 16-a loko laŭ nombro da artikoloj — por lingvo pri kiu duono de la partoprenantoj neniam aŭdis, tio estas grava atingo.”

Por tiu kiu volas partopreni en Terglobaj Voĉoj estas multe da farinda laboro. Mi invitas aliajn Esperanto-parolantojn kontribui ĉe ili kaj tiel ni montros la valoron de Esperanto al grava kaj interesa aro da homoj kiuj havas gravan influon je internacia komunikado en la angla.

* blogo: ne-PIVa vorto kun signifo simila al *retotaglibro*. Ĝi devenas de la samsignifa angla vorto *blog*, kiu estiĝis el mallongigo de la vorto *weblog*, t.e. “retprotokolo” (laŭ Vikipedio)

** Skajp (*Skype*): interreta telefono

Kiel organizi kongreson

Parto IV. Plani la horaron

Tio ĉi estas la kvara parto de serio da artikoloj pri organizado de Esperanto-kongresoj, specife de landaj kongresoj de ELNA, sed ankaŭ de regionaj kongresoj. Ĝi baziĝas sur la kongresa manlibro de ELNA (la originalan gvidilon verkis Frank Helmuth, Cathy Schulze kaj Bill Harmon; Ellen Eddy reviziis ĝin. Jim Henry plu reviziis kaj multon aldonis), kiu troviĝas ĉe www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm.

La LKK frue elektu inter si unu homo kiu respondecos pri la programo kaj horaro. En la plej fruaj anoncoj pri la kongreso, oni petu ke homoj volontaj prezenti ion aŭ gvidi parol-rondon kontaktu tiun homon kun siaj proponoj kaj bezonoj (ezk. blanktabulo kun skribiloj, aŭdvidaj ekipaĵoj, ktp.). En la aliĝilo*, estu spaco por proponanto de programero indiki tion kion li proponas. La LKK ankaŭ kontaktu aktivulojn kaj spertulojn por peti ilin prelegi aŭ gvidi parol-rondon. Ekzemple, verkistoj povas aŭ prelegi aŭ voĉlegi el siaj verkoj. Komisiitoj de ELNA aŭ UEA povas paroli iom pri siaj movadaj faroj. Diversaj profesiuloj kaj fakuloj povas paroli pri sia fakoj.

La horaristo petu jenajn informojn de ĉiu prezentonto (se ties unua mesaĝo ne estis sufiĉe kompleta):

- mallonga vivhistorio por la programlibro
- teknikaj bezonoj por la prezentaĵo
- kiam ili ĉeestos la kongreson (kelkaj venas malfrue aŭ foriras frue)
- ilia kutima dormtempo (oni ne enhorariĝu preleganton je 9:00, se tiu kutime dormas ĝis tagmezo!)
- ĉu ili volas partopreni la ekskurson, kaj ĉu ili pretas prezenti ion dum la ekskurso al la neekskursemluj
- daŭro de ilia prezentaĵo – Kutime duonhoro aŭ unu horo; esceptokaze du horoj.

La horaristo ankaŭ devas zorgi pri ekvilibro de la programo: ne estu tro da programeroj pri unu

temo kaj maltro pri aliaj. El la unuaj proponoj de diversaj prezentantoj, kontrolu, ĉu multaj el ĉi tiuj temoj estas reprezentitaj:

- Informado pri Esperanto
- Agado per Esperanto
- Instruado de Esperanto
- Esperanta kulturo
- Aliaj lingvoj kaj kulturoj
- Scienco kaj tekniko
- Religio
- Politiko
- Ludoj

Ankaŭ kontrolu, ĉu estas kelkaj parolrondoj kaj ludoj kun gvidantoj, kaj ne nur aro de prelegoj. Se la ĝisnuna programo ŝajnas malekvilibra, petu specifajn homojn prelegi aŭ gvidi rondon pri certaj ĝis nun neglektitaj temoj.

Oni mencienu mallongan liston de programeroj en postaj informoj*, kaj en la retejo*, eĉ antaŭ ol fari la precizan horaron. Kiam haveblas listo de prezentaĵoj, la horaristo povas ekfari la horaron. Verŝajne vi revizios ĝin plurfoje antaŭ la kongreso.

Kutime ni havas du paralelajn seriojn de programeroj dum la tago, en du kunvenĉambroj; foje tri samtempaj programeroj, se haveblas ĉambroj kaj prezentontoj. En la vespero estas kutime unu granda programero kiel ekz. bankedo, ekskurso aŭ distra vespero. Elektu unu aŭ du prezentontoj kiuj ne volas ekskursi por prezenti ion dum la ekskurso(j) al la aliaj neekskursemluj.

Prefere estu spaco de 10 aŭ 15 minutoj inter aferoj – ekzemple programeroj komenciĝu je 9:00, 10:15, 11:30 kaj post tagmanĝo je 14:00, 15:15, 16:30. Kun tia horaro ni havis en Atlanto en 2000 multe malpli da malfruiĝo ol en aliaj jaroj, kiam la horaro estis 9:00, 10:00, 11:00... En la dua modelo la programeroj teorie daŭru 50 aŭ 55 minutoj, sed ili emas daŭri plenan horon, se LKK-ano aŭ alia volontulo ne haltigas ilin je la ĝusta tempo per ĝentile forta memorigo. La unua modelo, kun unuhoraj programeroj kaj pli longa tempo inter ili, preferindas se malsufiĉas volontuloj por fari tiajn anoncojn. Tamen, tio ebligas malpli da programeroj – je unu programero malpli en ĉiu ĉambro tage (aŭ postulas pli da ĉambroj kaj pli da kon-



Dum Solena Malfermo, Aŭstino 2005

flikto inter programeroj).

La horaristo devas zorgi pri tio kiuj programeroj estu en kiuj ĉambroj, kaj kiuj estu samtempaj. Kompreneble la interkona vespero, solenaj malfermo kaj fermo kaj la distra vespero estu en sufiĉe granda ĉambro por ĉiuj kongresanoj (ĝis 100). La bankedo havas apartajn bezonojn; verŝajne la hotelo diktos al vi la lokon por ĝi. La ceteraj programeroj povas esti en iuj ĉambroj por 20-50 homoj.

Oni povas aranĝi programero-seriojn laŭ temo, seĝ-aranĝo, aŭ populareco. Ekzemple, povas esti bone se programeroj kun simila temo (scienco, Esperanto-kulturo, informado, ludoj...) estu serijaj en la sama ĉambro. Eble kelkaj programeroj postulos rondan seĝ-aranĝon, aliaj prelegecan. Klasoj pri Esperanto bezonos seĝojn kun tabloj. La programeroj estu aranĝitaj tiel ke ni ne devu re-aranĝi la seĝojn kaj tablojn tro ofte. Fine, se la kongresejo disponigas al ni kunvenĉambrojn de malsama grandeco, metu la verŝajne pli popularajn programerojn en la pli grandaj ĉambroj.

Prefere la samtempaj programeroj estu kiel eble plej malsamaj. Se eblas, ne metu samtempe en du ĉambroj du similajn programerojn kiuj verŝajne allogus la samajn homojn.

La horaro ankaŭ indiku la horojn kiam malfermiĝos la registra tablo kaj la libroservo. Petu tiun lastan informon de la direktoro de la C.O. Foje eblas ke tiu informo ne haveblas ĝis dum la kongreso mem; tiam la horojn oni afiŝu sur la anonc-tabulo*, kaj eventuale ekster la pordo de la libroservo.

Kiam vi estos farinta la malnetan horaron, sendu ĝin al ĉiuj prezentontoj (inkluzive la libroserviston en la C.O.) por ekscii

pri konfliktoj (eble vi metis du aferojn samtempe kies prezentantoj volas aŭskulti unu la alian). Eblas jam fari horaron kun multaj malplenaj spacoj, kiam vi havos nur kelkajn proponojn por programeroj, kaj meti tion frue en la retpaĝo; kiam pliaj prezentontoj anoncos sin, aldonu iliajn prezentaĵojn unu post alia al la reteja horaro.

Estu du versioj de la horaro. Longa versio, kun priskribo de la programero kaj vivhistorio de la prezentonto, estu en la kongresa libreto. Mallonga versio, tabelo kun nur titolo, nomo de prezentonto, tempo, daŭro kaj loko por ĉiu programero, estu sur aparta folio, facile portebla. De tio oni faru pli da kopioj kaj disdonu ilin malavare dum la kongreso, ĉar homoj ofte perdos tion.

Eble ankaŭ faru afiŝojn, unu po kunvenĉambro po tago, montranta kio okazos en ĝi je kioma horo. Aŭ estus pli simple simple meti fotokopion de la tuta horaro ekster ĉiu kunvenĉambro, kun la tiuĉambraj programeroj markitaj per flava markilo. Tiu afiŝa horaro estu pli grandformata ol la disdonita versio, aŭ eventuale reformatita, kun malpli da informo en ĉiu paĝo, en pli granda tiparo [almenaŭ 16-point type].

Nepraj programeroj:

- Estrar-kunsido de ELNA (tutaga)
- Interkona vespero
- Solena malfermo
- Afer-kunsido de ELNA (du unu-horaj kunsidoj)
- Eventuale afer-kunsidoj de AAIE*, USEJ, ISAB/ISFGW*, se iuj el ili kunkongresas kun ELNA. AAIE preskaŭ ĉiam havas afer-kunsidon dum ELNA-kongreso, kutime je la lasta tago de la kon-

greso; kontakto ties prezidanto por detaloj.

- Ekskurso
- Bankedo
- Distra Vespero (kun eventuale koncerto aŭ alia amuzaĵo, eble gvidataj ludoj...)
- Akcepto por UEA-delegitoj (La Ĉefdelegito por Usono, nun Bill Harmon, prizorgas detalojn. Kutime tio okazas tuj antaŭ la bankedo.)
- Ekzamenoj de AAIE (kutime gvidas Doroteo Holland)
- Parolado de iu el la venontjara LKK, se jam estas propono
- Solena fermo

Ideoj por Programeroj

- Diservo(j) dimanĉo, laŭ la haveblo de gvidanto(j)
- Ekumene Kristana

- Homaranisma
- Bahaa
- English Q&A session for visitors and journalists (tradicie nomata “Publika sesio”)
- Klasoj pri Esperanto (komentantaj kaj meznivelaj; la unuajn ni nepre reklamu en la lokaj ĵurnaloj)
- Naĝ-festo ĉe hotela naĝejo
- Kuna tagmanĝo por vegetaranoj – piedekurso al proksima vegetara restoracio
- Dancado iun vesperon (aŭ ĉiuvespere, kiel en Bostono 2003) post la bankedo kaj/aŭ distra vespero. Plej bone estas havi vivan muzikon, sed eventuale ni povus aranĝi dancadon per sondiskludilo kun sufiĉe da danciga Esperanta muziko kaj sufiĉe bona sonsistemo.
- Aŭkcio de donacitaj aĵoj (por

la ĝenerala kaso de ELNA); kutime post la bankedo

- Kuna tagmanĝo de la ĵusa kaj onta LKK-oj por diskuti spertojn kaj konsilojn
 - Kuna vespermanĝo de la estraro, LKK, kaj eventuale aliaj fruenantoj, la vesperon antaŭ la estrar-kunsido (Se vi planas tion, nepre menciui ĝin en la lasta bulteno*.)
 - Montri filmojn en Esperanto
 - Oratora konkurso – partoprenantoj prenas slipon hazarde el skatolo, kaj devas en malmulta tempo pretigi 5-minutan paroladon pri la temo priskribita sur la slipo.
 - Poemdeklama konkurso (angle “poetry slam”*)
- Ni havu kelkajn parol-rondojn pri certaj temoj, kun gvidanto. Kelkaj el ili estu aparte por

paroligi komencantojn. Eblaj temoj:

- Kiel organizi kaj vigligi lokan grupon
- Kiel mi esperantistiĝis (komence de la plej lastaj)
- Kiel organizi regionan aŭ landan Esperantan renkontiĝon (lundmatene, por ke la LKK havu plej multe por konsili al la venontjara LKK)
- Plej ŝatataj Esperantaj libroj
- Voĉlegi aŭ parkere deklami poezion
- Amuzaj spertoj de informo pri Esperanto
- Kaj aliaj ne pri la lingvo aŭ Movado ... politiko, religio, kaj aliaj amuzaj temoj. Ekz. la interkreda dialogo, kiun gvidis Haruo Ros en Austin en 2005.

Slavic Folk-rock? Yes!

JoMo slavumas. JoMo and others. CD with 24 titles (70 min.). Donneville: Vinilkosmo, 2006.

Yevgeniya (Zhenya) Amis

For seasoned Esperantists JoMo certainly needs no introduction. Nevertheless, just a few words about JoMo: French singer, professional musician, composer, translator, world citizen, anarchist*, polyglot (for being able to sing in over 22 languages he was listed in the Guinness Book of Records in 2000, although now he sings in over 30!)... and just a very nice, modest and friendly person. The name “JoMo” (or “jOmO”) is derived from the first letters of his name: Jean Marc Leclercq.

JoMo is the former leader of the band *Rosemary's Babies* which “recorded two CDs at the French record company Boucherie et Willins Production, and whose popularity was demonstrated in hot concerts throughout Europe, in addition to the more than 200 in France alone” (from <http://www.musicexpress.com.br>). His concerts are wildly popular in the Esperanto community (he can get everyone dancing!), and the CDs “JoMo kaj Liberecanoj” and “JoMo friponas” enjoyed great success – and just recently they released a third CD from JoMo (and Liberecanoj): “JoMo slavumas”.

JoMo knows Slavic music well due to his many trips to Eastern Europe: he has visited

Ukraine alone several times in recent years and is planning another visit this June! He speaks several slavic languages, has published a guidebook about Ukraine in the Gascon language, and is writing a book about the famous Ukrainian anarchist Nestor Makhno.

Just like the title says, the songs on this CD were inspired by Slavic (or Eastern European) music. The result of this mix is a unique, almost two hour long (!) rock cocktail of Russian, Ukrainian, Yiddish, Polish and Gypsy folk music. Yes, that’s right, *rock*. In a sense, this album breaks down the stereotypes of Slavic folk music – but isn’t that one of the aims of Esperanto i.e. to break down stereotypes? Many songs on the album, however, are songs in Slavic style composed by JoMo himself. Besides that, JoMo also translated the majority of the songs into Esperanto – a really amazing accomplishment! In addition to JoMo and Liberecanoj, the Russian folk music ensemble Solnishko participated in the creation of the disk.

The songs are varied, danceable and upbeat (but also thought-provoking!) for the most part, but there are also a few somewhat sad melodies here and there. There’s also a humorous song “Pola”, inspired by the famous song “Sola” (especially popular among Esperantist youth), about falling in love during last year’s “Polish” IJK (International [Esperanto] Youth Congress). I was also impressed by the lovely colorful cover and the handy song booklet that comes with it.



Although the scrupulous linguist may find the style and sentence structure a bit unconventional (with word forms such as “ŝunkli”, “stas”—which are not in *Plena Ilustrita Vortaro*), you can certainly forgive a true anarchist for that! In a word, I enjoyed this CD from the beginning to the end and I heartily recommend it to everyone who likes JoMo’s previous CDs, is curious about Slavic music or just wants to enjoy good rock music!

The CD is available from ELNA, UEA, the publisher <http://www.vinilkosmo.com> and from other large Esperanto book services.

* The word *liberecano* is often used in Esperanto. *Liberecano* has no direct translation in English, but its meaning is closer to the original/international meaning of *anarchist* (as opposed to the negative connotations often associated with the word in English) rather than *libertarian*.

New from the Book Service

ARBO DE LA SCIADO, LA. Pío BAROJA. Trans. Fernando de Diego. The best-known novel by the greatest Spanish author of the 20th century, a novel that typifies "the generation of '98" (the year in which Spain finally lost her last overseas possessions to the upstart United States). Stafeto series "Belliteratura Serio" #31. 1973. 232p. 220x160. Paper. Spain.
ARB002 \$5.80

ARIZONA SONETARO. Edwin GROBE. A collection of 100 sonnets, in the French style but about the U.S. state Arizona, its wealth of prehistoric, historic and modern-day cultural attractions, both native and Euro-American. 2006. 46p. 280x215. Paper. USA.
ARI001 \$8.70

BELA SUBTERA MONDO, LA. Leander TELL. An introduction to the history, science and practice of speleology. Includes many black-and-white photographs. 1959. 95p. 240x160. Paper. Spain.
BEL007 \$5.80

ĈERIZFLOROJ, Vol. 1. KONISI Gaku (ed.). A collection of 46 popular Japanese songs as translated by various well-known Japanese Esperanto speakers and authors. Each song includes both melody and lyrics. At the end of the book, Konisi describes the history of song translation in Japan and gives some information about the translators represented here. 2005. 56p. 260x180. Paper. Japan.
CER003 \$10.10

DAJZINJO MILERO. Henry JAMES. Trans. Edwin Grobe. *Daisy Miller*, a classic late 19th century tale of young Americans in Europe and their relationships, improper and otherwise, with Europeans and with each other. 2005. 37p. 280x215. Paper. USA.
DAJ001 \$8.70

EL TERO KAJ ETERO. Julia PIÓRO. Eight easy but interesting short stories by a mid-century Esperantist authoress from Poland. This volume includes "Ekzilo", "Brulruĝo", "Ruĝa truto", "Pasaĝero de Raketo N-ro 3", "La vojo", "La nevenkebla urbo", "Severa Leĝo" and "Ekscelenco". Stafeto series "Beletraj Kajeroj" #23. 1964. 115p. 190x120. Paper. Spain.
ELT002 \$3.00

EL VERVA VIVO ĴURNALISTA. Stefan MAUL. An autobiography of long-time Esperantist journalist and writer Stefan Maul, creator and for many years editor of the popular monthly news magazine *Monato*. Follow his odyssey as he becomes an Esperantist and journalist, fight-

ing against all kinds of injustice, from a childhood as a wartime child to the 25-year anniversary of *Monato*. 2005. 271p. 205x140. Paper. Belgium. ISBN 9077066187.
ELV004 \$31.20

ESPERANTO IN 24 PAGES. A quick and easy introduction to Esperanto. 2006. 24p. 150x105. Paper. France.
ESP053 \$0.70

ETIMOLOGIA VORTARO DE LA PROPRAJ NOMOJ. André CHERPILLOD. A list of approximately 4500 proper names assimilated into Esperanto in various publications, from the *Plena Ilustrita Vortaro* to the *Koran*, along with explanations of their ultimate origins and derivation. Includes several interesting sidebars, e.g. Chinese tones, Greek alphabet. 2005. X+227p. 210x145. Paper. The Netherlands. ISBN 9290170891.
ETI007 \$28.80

FLOROJ DE L' KREPUSKO, LA. Sergio ELGO. A novel about terrorism and murder, political and otherwise, in modern Europe. The third Inspector Kramer mystery. 1995. 168 p. 200x145. Paper. Switzerland. ISBN 3-906595-08-0.
FLO004 \$23.70

FRAKSENO IGDRASILO, LA. Aif HENRIKSON & Edward LINDAHL. Trans. Bertil Nilsson. An outstanding "history" of the lives of the Aesir, Alfar, Giants and Humans in the great world-spanning ash tree Yggdrasil before the creation of the solar system. Tells of the Norns, how Odin created mankind, Loki and his two monstrous offspring the wolf Fenris and the Midgard Serpent, and ultimately the Fimbulwinter, Ragnarok, and the fall of the tree. Many black-and-white illustrations by Lindahl. 2005. 138p. 230x200. Paper. Sweden. ISBN 9185288330.
FRA003 \$35.00

GEFIANĈOJ, LA. Alessandro MANZONI. Trans. Battista CADEI. Italian classic novel from the early 19th century about two lovers whose stars are crossed by political and religious upheaval. Series "Oriento-Okcidento" #41. 2006. 496p. 200x140. Paper. Italy. ISBN 8889177233.
GEF001 \$49.00

HEROO DE AMO. Karel KRAFT. Biography of Czech pedagogue and Esperantist Premysl Pitter, as he lived and carried on through fascist and communist rule in Czechoslovakia. 2006. 194 p. 200x140. Paper. Czech Republic. ISBN 80-85853-81-7.

HER002 \$19.20

KOLEKTITAJ POEMOJ. L. N. M. NEWELL. A complete collection of the original poems of an extraordinary Esperanto poet, the man who did the second Esperanto translation of Shakespeare's *Hamlet*. Also includes a prolog and biography by Edwin De Kock and a selection of Newell's English-language poetry. 1987. 80p. 210x145. Paper. United Kingdom. ISBN 0950532363.

KOL003 \$3.00

LEGENDO PRI GALAKSA KORO. Povilas Antanas KAUNAS. Trans. Laimias STRAZNIKAS. Short tale of a comatose boy who is taken on a psychic, though scientific, tour of the solar system and galaxy. Book includes both Lithuanian original and Esperanto translation. 2005. 80p. 205x140. Paper. Lithuania. ISBN 9955646020.
LEG006 \$9.30

LEKSIKAJ EKSKURSOJ VOL 3. Christiane DE VLEMINCK & Emile VAN DAMME. A new collection of puzzles, games, stories, poems, etc. all aimed at helping the reader improve his/her vocabulary. Includes sections on: war and peace; truth and falsehood; good and evil; beauty and the arts; freedom and slavery; happiness and unhappiness; love and hatred. 200x140. Paper. Belgium. 2005. 190p. ISBN 9077066063.
LEK005 \$23.40

LITOVIO: EDITAL-FOLIO, 90A UNIVERSALA KONGRESO. Folding card from Lithuanian postal service, shows painting of Kaunas home of Zamenhof's father-in-law Zilbernik (now HQ of Lithuanian Esperanto Association) on front, explanations about world congress in Lithuanian, Esperanto and English on inside left page, two 1 litas postage stamps commemorating the congress on inside right page, the lower one of which has been stamped with the first-day postmark. Stamps are under protecting transparent plastic. Card comes protected in congress envelope with picture of Zamenhof monument at lower left. 2005. 155x110. Paper. Lithuania.
LIT008 \$8.30

LITOVIO: 90A UNIVERSALA KONGRESO. Lithuanian 1 litas postage stamp in honor of the 90th World Esperanto Congress; portrait of Zamenhof, emblem of the Congress, and text in Lithuanian. 2005. 35x30. Paper. Lithuania.
LIT006 \$1.10

LITOVIO: UNUATAGA KOVERTO, 90A UNIVERSALA KONGRESO. Envelope

Lost in Translation

with picture of Zamenhof monument in lower left, 1 litas stamp commemorating 90th World Esperanto Congress in upper right, with postmark from congress dated 2005 07 23 (first day of the congress). 2005. 160x110. Paper. Lithuania. **LIT007** **\$3.90**

LUMO, MALLUMO KAJ KELKAJ MEMOROJ. *Marjorie BOULTON.* Text of speech about the famous poetess's reminiscences of her life in the Esperanto movement, given at the UEA open house of November 27, 2004, when Boulton was awarded the Duguči Prize. 2005. 16p. 210x150. Paper. The Netherlands. ISBN 9290170905. **LUM004** **\$2.70**

NOKTO DE LA EZOKO, LA. *Sergo ELGO.* In a lost village in provincial France, a man soon to be middle-aged studies a terrible secret that has gnawed at his spirit since he was a teen-ager: was his father guilty of betrayal of a partisan detachment exterminated during the German occupation? The second Inspector Kramer mystery. 1992. 171 p. 195x135. Paper. Switzerland. ISBN 3-906595-05-6. **NOK004** **\$26.00**

PASPORTA SERVO 2006. Catalog of international hosting service for Esperanto speakers, this year contains 1320 sites in a record 92 countries. Given that hotel prices

run \$100/night and up these days, if you plan to travel abroad this year, you can see how valuable this book may be for you. 2006. 186 p. 155x110. Paper. The Netherlands. ISBN 83-923382-0-0. **PAS008** **\$22.20**

SOIFO. *Lajos TARKONY.* A collection of the poetry of a well-known and popular poet of the "Budapeŝta Skolo", but one who continued his production of poetry well past mid-century. Stafeto series "Belliteratura Serio" #23. 1964. 231p. 220x160. Paper. Spain. **SOI001** **\$5.80**

SUB STELO RIGIDA. ŜORSTEINN frá Hamri. Trans. and prologue by Baldur Ragnarsson. 59 poems selected from two of the works by one of Iceland's most popular poets of the mid-20th century. Stafeto series "Beletraj Kajeroj" #21. Illustrated by Ásta Sigurðardóttir. 1963. 131p. 190x120. Paper. Spain. **SUB005** **\$3.00**

VETERO KAJ KLIMATO DE LA MONDO. *Denis RILEY & Lewis SPOLTON.* Trans. Kris Long. A basic but very complete introduction to the sciences of meteorology and climatology. Many diagrams. 1987. 131p. 250x175. Paper. The Netherlands. ISBN 9290170352. **VET002** **\$5.80**

(translated literally from the original Russian into Esperanto)
 Caesar was killed by the member of his bodyguard – Cezaro estis mortigita per la membro de sia korpogardisto
 criminals are perverse people – krimuloj estas obstinaj homoj
 notorious murderer – notaria murdisto
 a watch-dog body – kadavro de gard-hundo
 settlement before the trial – enloĝiĝo antaŭ la kortumo
 Indian chiefs – indianaj administrantoj
 a scapegoat – kosma kapro
 intelligence officers – inteligentaj oficioj
 rabid dog – fanatika hundo
 a juror should keep an open mind during the hearing – ĵurianoj devas malfermi la buŝon kaj aŭskulti
 electoral vote – elektra voĉo
 in the end of the trial the judge discharges the jury – fine de la proceso la juĝisto malkonektas la ĵurianojn
 homicide – homa flanko
 Prepared by Yevgeniya "Zhenya" Amis, based on Russian Esperanto Forum e-novosti, www.e-novosti.info

Esperanto making news



St. Louis, Missouri
 On May 31st local newspaper *Northeast County Journal* (St. Louis County, Missouri) published a very positive article about an Esperanto course at Jennings High School taught by Ronald Glossop. The article is titled "Nine students tackle unusual language lessons. Esperanto prepares students to communicate worldwide". Apart from the general information about Esperanto, the author included a few quotes from Ronald Glossop and his young students and even gave some basic phrases in Esperanto. Also, the article was published on the parent site STL Today <[day.com>, a popular website with 32 million page views per month among nearly 500,000 unique visitors. Here is an excerpt from the article:
 "Glossop is professor emeritus at Southern Illinois University at Edwardsville. He travels around the world, speaking at Esperanto congresses. Glossop will travel to Florence, Italy, for another congress in the summer.
 The professor wants his students to have that international experience.
 'I'm hoping to take \(the Jennings students on\) a world trip in June of 2008,' he said. 'There are Esperanto speakers in almost every country in the world.'](http://www.stlto-</p>
</div>
<div data-bbox=)


"Fluency in the language will help the students learn about different cultures during the trip", he said. Using Esperanto, for example, Jennings' students can communicate with a French citizen without having to speak French."
 reported by: Ronald Glossop

Boise, Idaho

The publication *Boise Weekly* from May 10-16 listed "learn

Esperanto" as one of "7 Top Things To Do Before I Die". Here's the whole list: 1. Invent something. 2. Name someone else's kid. 3. Publish something under an obvious pseudonym. 4. Hitchhike. 5. Eat an entire pizza in one sitting. 6. Learn Esperanto. 7. Get contacts.
 reported by: Connie Mumm

Did Esperanto make news in your region? Write about it to Esperanto USA!



Vojaĝu Esperante en 2006

37-a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

3-21 julio, Brattleboro, Vermonto

La plej bonaj kursoj en la mondo!
Eddyellen@aol.com

(tuj poste) **54-a ELNA-Kongreso**
21-23 julio, Fashion Institute of Technology

Novjorko, Novjorkio

(tuj poste) **39-a konferenco de ILEI**
25-29 julio, Parmo, Italio, por E-instruistoj

Antaŭ la UK, UEA proponas antaŭkongresajn programojn:

25-28 julio, Toskanio

26-28 julio, Romo

25-28 julio, Venecio kaj Norda Sicilio

91-a Universala Kongreso de Esperanto

29 julio – 5 aŭgusto, Florenco, Italio

Florenco, ĉefurbo de Toskanio, konservas la etoson de la neripetbla granda epoko de kultura, arta kaj scienca evoluoj, nomata la Renesanco. Ĝuste ĉi tie naskiĝis la moderna itala lingvo. Nia kongresa temo estas: “Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj”.

(tuj poste) *UEA proponas postkongresajn ekskursojn, kaj Esperanto Vojaĝ-Servo proponas:*

Mirinda Malto

6-13 aŭgusto

Megaliths, medieval dungeons and Calypso's Cave – Malta is positively mythic! The narrow cobblestone streets are crowded with Norman cathedrals and baroque palaces. The countryside is littered with the oldest known structures in the world – older than Stonehenge or the Egyptian pyramids. Strategically located between Sicily and North Africa, Malta was a prize whose importance far exceeded its size. It has been visited or invaded by every major civilization in the region. The Phoenicians, Carthaginians, Romans, Arabs, Normans, French and English have all left evidence of their stays. Brochures have been mailed to all who have expressed an interest. If you didn't get one and would like to, please write or call immediately.

22-a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo

30 aŭgusto – 9 septembro

Krozado al Alasko (de Seatlo). “Vojage of the Glaciers” – de Vankuvero, Kanado al Anchorage, Alasko – spe-



Valetto, la ĉefurbo de Malto

ciala grup-prezo kaj la eblo vojaĝi kun eksterlandaj esperantistoj.

ESPERANTO VOJAĜ-SERVO
(E.V.S.)

Berkeley's Northside Travel

1824 Euclid Ave.

Berkeley, CA 94709

(510) 531-8393

LusiHarmon@aol.com

E.V.S. volonte provizos vin per aliĝilo, detaloj kaj helpo aranĝi viajn vojaĝojn.

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040

Esperanto U S

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ★ 2006/3-4
Dumonata bulteno eldonata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ★ 2006/3-4

En la Numero | Esperanto parolata...

★ Esperanto parolata... sur la trotuaroj de Novjorko!	3-5
★ ELNA-kongreso 2007	5
★ Raporto el la Granda Pomo	6
★ EKS – 10-jara!	7
★ Nova ELNA-direktoro serĉata	8
★ Pasporto al la Tuta Mondo en la Televido	8
★ Recenze: <i>Historical Fantasy... About Volapük.</i>	9
★ Esperanto ĉe Seatla Foiro	10
★ Esperanto-kurso en Atlanto	10
★ Kiel organizi kongreson	11
★ New from the Book Service	12
★ Originala Poezio	13
★ Schön Schreiben	14-15
★ La Elefantido	16-18
★ Pacaj Hajkoj	19
★ Universala Vivokodo	19
★ Rozkruca Kontribuo al Paco	19
★ Deklaracio Pri Homaj Devoj	20-21
★ La Tagiĝo de la Dioj	22
★ Venu Ĉi Tien de la Kampoj, Patro	23
★ Forpasis William Auld	24

Ĵenja Amis

"Rigardu, oni ĉi tie piediras pli rapide ol en Atlanto!" Tio estis nia unua malkovro pri Novjorko. En Atlanto oni ne rapidas: oni ŝatas saluti kaj babili kun nekonatoj sur stratoj kaj en transporto, kaj se oni vidas ke vi venis de alia lando, oni tuj demandas vin mil kaj unu demandojn. Atlanto estas ĉarmo, kaj Novjorko estas ritmo. Ĝi kaptas vin en sian fluon, portas laŭ la rektaj stratoj kaj longaj avenuoj, igas vian koron bati en la sama rapida ritmo de la urbega vivo. (Interesa malkovro: fine de la intensega kongresa semajno mi konstatis ke ankaŭ mi komencis paroli pli rapide kaj pli ofte rigardi al la horloĝo.) Ĉi tie oni ne parolas al nekonatoj, tamen, se vi perdiĝis aŭ ne scias la vojon, oni afable helpas. En Novjorko neniu surpriziĝas aŭdante Esperanton surstrate: ja en tiu ĉi urbo oni parolas dekojn da lingvoj: fakte, 48% de la loĝantoj parolas hejme ne en la angla. La urbo de enmigrantoj ankaŭ nun ĉiam renoviĝas kaj refreŝiĝas dank' al novalvenintoj.

sur la trotuaroj de Novjorko!



(Daŭrigo sur p. 3)

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

☎ 510/653-0998; 2510/653-1468

✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Philip G. Dorcas
Vice President/Vicprezidanto: Steven D. Brewer

Secretary/Sekretario: Anna Bennett
Treasurer/Kasisto: William B. Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Joel Amis, D. Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi Harmon, Trevor Andrews, Orlando E. Raola, Robert L. Read, Julie Spickler

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Don Harlow

Esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 43, No. 3-4

ISSN 1056-0297

Editors/Redaktoroj: Joel Amis kaj Ĵenja Amis

Layout/kompostado: Ĵenja Amis

✉ yevgeniya_amis@yahoo.com

Materials for **Esperanto USA** should be sent to/Materialojn por **Esperanto USA** oni sendu al:

Esperanto USA (Joel & Ĵenja Amis)

2025 Peachtree Rd. NE, #927,
Atlanta, GA 30309, USA/USONO

or by e-mail/aŭ retpoŝte al:

e-usa@esperanto-usa.org

joelamis@yahoo.com

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprimataj en tiu ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la publikigita materialo al ELNA.

Saluton karaj gesamideanoj!

...kaj bonvenon al la duobla kongresa kaj literatura numero de **Esperanto USA**! Ĉi tiu numero verŝajne havas ion por ĉiu gusto. La unua duono enhavas oficialaĵojn el la ĵusa ELNA-kongreso kaj aliajn movadaĵojn, plus vojaĝ-rakonton pri la novjorka kongres-sperto de la kunredaktoro. La dua duono enhavas literaturon de diversaj ĝenroj – tradukitan kaj originalan, fikcian kaj nefikian, poezion kaj prozon, k.s. Sed malgraŭ la bunteco de la literatura enhavo de tiu ĉi numero, ĝi enhavas ne ĉiujn literaturajn kontribuojn kiujn ni ricevis. Pro la surprize granda kvanto de literaturaj kontribuoj (dankegon al ĉiu kiu kontribuis!) ni decidis starigi literaturan sektion kiel konstantan rubrikon de **Esperanto USA**. La ceteraj literaturaj kontribuoj aperos en la literatura parto de la sekvaj numeroj – do vi povas daŭre sendi viajn literaturajn kontribuojn! Kompreneble, ni daŭre atendas ankaŭ Movadajn kontribuojn. Ĉu vi partoprenis ĉi-somere diversajn E-aranĝojn? Dividu viajn spertojn kun aliaj ELNA-anoj!

La redakcio kaj, certe, ĉiuj ELNA-anoj, kore gratulas Tim Westover, la komisiiton pri eldonado, kiu ricevis la duan premion en la proza kategorio en la Belartaj Konkursoj de UEA; kaj Anna-n Bennett, ELNA-sekretarion, kiu ricevis honoran mencion en la kategorio "Eseoj".

Grava kaj malgaja anonco atendas vin sur p. 8 – la direktoro de la CO, Don Harlow, emeritiĝos fine de la jaro pro malsano. ELNA do nun serĉas novan direktoron.

Krome, en tiu ĉi numero atendas vin nova rubriko: "In other words..." Temas pri tradukoj de interesaj tekstoj el la angla en Esperanton kaj el Esperanto en la anglan.

Agrablan legadon!

Joel kaj Ĵenja

Saluton dear samideanoj (fellow Esperantists)!

...and welcome to the double convention and literary issue of **Esperanto USA**! This issue most likely has something to suit every taste. The first half contains official news from the recent ELNA convention and other news from the Esperanto movement, plus a travel diary about the New York convention experience by the co-editor of **Esperanto USA**. The second half contains literature of various genres: translated and original, fiction and non-fiction, poetry and prose, and the like. But in spite of the variety of the literary contents of this issue, it doesn't contain all the literary submissions we received. Due to a surprisingly large quantity of literary submissions (a big thank you to everyone who contributed!) we've decided to start an ongoing literary section in **Esperanto USA**. The rest of the literary submissions will be published in the literary section of upcoming issues – so you can keep sending your literary works and translations! Of course, we always need submissions related to the Esperanto movement. Did you attend various Esperanto events this summer? Share your experiences with other ELNA members!

The editorial team, as well as all ELNA members, would like to warmly congratulate Tim Westover, head of ELNA's publishing committee, on being awarded the second prize in the prose category, and Anna Bennett, ELNA Board Secretary, on receiving an honorable mention in the essay category, of UEA's Belartaj Konkursoj.

An important and sad announcement awaits you on page 8 – the Director of the Central Office, Don Harlow, will retire at the end of this year due to illness. ELNA therefore is now looking for a new director.

Also, in this issue a new section awaits you: "In Other Words..." This section is about translation of interesting texts from English into Esperanto and from Esperanto into English.

Pleasant reading!

Joel and Zhenya



FOTO: JENJA AMIS

Esperanto parolata...

sur la trotuaroj de Novjorko!

(daŭrigo; komenco sur p. 1)

Jenja Amis

Ni veturis al Novjorko el Atlanto per trajno (jes, tiaj stranguloj ni estas) kaj alvenis merkredon posttagmeze; tuj post la enloĝiĝo en la junulargastejo ni iris esplori la urbon. Bonŝance, la kongresejo kaj ankaŭ nia hotelo troviĝis en la centro de la urbo – en Chelsea, Manhattan. Manhattan estas multe pli granda ol mi imagis: mi pensis ke ĉiuj vidindaĵoj tie troviĝas unu ĉe la alia, sed en la realo por atingi, ekzemple, Wall Street de Imperi-Ŝtata Konstruaĵo, oni devas pasigi sufiĉe da tempo en la publika transporto. Sed tio ne estas problemo, ja ĝi funkcias ĝenerale bone, kaj eĉ nokte eblas veturi – kvankam la tuta sistemo post la noktomezo fariĝas tre komplika, kaj lokanoj mem preferas ne veturi malfruege.

Nia unua novjorka vizitindaĵo estis Imperi-Ŝtata Konstruaĵo – kaj tio estis vere neforgebla sperto! Starante je la alteco de 381 metroj (1 250 futoj) oni povas vidi la tutan urbon, kaj eĉ parteton de Nov-Jerzeo. Jen ĉiuj famaj lokoj, kvazaŭ sur via mano: la domturegoj de la urbocentro, famaj centro *Rockefeller*, konstruaĵo de *Chrysler* kaj dekoj da aliaj konataj lokoj – kaj tute sube, sur ĉiuj stratoj, flavaj taksioj, kiuj ŝajnas tiel etaj kaj malrapidaj de tia alto. Kaj en la malproksimo – jen la grizbluo de la rivero Hudson, brakumanta la Atlantikon. Mi verdire estis kvazaŭ sonĝanta: ĉu vere tio estas en la realo?!

Vespere ni promenis laŭ Broadway. Ĝi estas elstara ne nur pro sia famo kiel la plej teatra loko en la mondo – ĝi estas aparta ankaŭ pro sia fizika situo: Broadway elstaras el la rektangula urba plano de stratoj kaj avenuoj. Ĝi iras diagonale tra la insulo, kaj, same kiel montras ĝia nomo, ĝi ja estas multe pli larĝa ol kutimaj stratoj kaj aven-

uoj. La homoj sur Broadway ĉiam multas – sed vespere la “piediranta trafiko” fariĝas aparte densa, kaj oni ĉiam devas sekvi la fluon de la homamaso. Proksime al placo Times eĉ en la nokto estas lume pro la televid-ekranegoj kaj neonaj lumoj de strataj reklamoj – estas tiel lume ke ankaŭ meze de la nokto la strataj artistoj pretas desegni vian portreton!

Vendredon matene ni venis al la kongresejo por la tutaga estrarkunsido. La vetero kvazaŭ kunlaboris: la tutan tagon pluvegis, kaj estis agrabla afero pasigi tutan tagon en la afabla kompanio, parolante pri gravaj aferoj por ELNA. Tre imponis al mi amikeca (kaj ŝercema) etoso en la ELNA-estraro, kaj eĉ fojaj malkonsentoj inter la estraranoj tute ne malhelpis bonan kunlaboron. Oni parolis pri multaj aferoj: buĝeto de ELNA, emeritiĝo de la nuna direktoro, Don Harlow, kaj serĉo de nova direktoro, pri nomŝanĝo de ELNA kaj dekoj da aliaj gravaj aferoj.

La unua kongresa programero “por ĉiuj” estis, kiel ĉiam, interkona vespero, kie ĉiu partoprenanto rakontis iomete pri si mem kaj pri sia Esperanto-vivo. Estis tre plaĉe ke venis ankaŭ eksterlandanoj: estis kelkaj kanadanoj, japanino kaj eĉ nepalano!

Al la solena malfermo, bedaŭrinde, multaj kongresanoj ne povis veni pro iuj problemoj pri metroo: unu el la loĝejoj situis sufiĉe malproksime de la kongresejo. Sed almenaŭ por la prelegoj jam alvenis multaj kongresanoj, kaj je nia aparta ĝojo, multegaj partoprenis nian prezenton pri Rozkrucismo. Sabate estis multaj interesaj programeroj: du prezentoj pri la venontjara UK (fare de sino Hirai Isako, el Osako, kaj fare de Lusi Harmon), pri uzado de ELNA-retpaĝaro, pri Projekto Gutenberg kaj kreiva komunumo, pri TEJO, pri komputila lingvistiko, pri la videokurso *Pasporto al la Tuta Mondo*, pri

lokaj grupoj en Usono kaj pri Vikipedio. Aparte plaĉis al mi prelego-metiejo pri *hurosiki*-arto: estas vere nekredinde kion oni povas fari el nur unu peco de ŝtofo: ĉapelo, poŝo, dorsosako, bela volvaĵo por vino aŭ simple pakajo por donaco – la kvanto de eblaj uzoj estas senlima!

Kvankam Novjorko estas unu el la plej multekostaj urboj laŭ la loĝkostoj, la kosto de manĝaĵoj en rapidmanĝejoj ne multe diferencas de Atlanto. Kaj restoracioj, kafejoj, rapidmanĝejoj kaj picejoj abundegas! Pro rapida ritmo de la urbo, novjorkanoj ne havas lukson longe manĝi: kaj ĝuste pro tiu fakto oni evoluigis (aŭ eble eĉ elpensis!) la arton de rapidmanĝejoj. Se vi tro longe pensas, tro detale demandas kio estas tio aŭ jeno, aŭ ne tro rapide pagas, la aliaj en la vico rigardos vin iritite. Pro tio, eĉ se estas sufiĉe granda vico, ĝi iras tre rapide. Novjorka pico, laŭdire, estas pli maldika ol

kutima pico – eble pro tio ke oni ne havas tempon atendi ĝis kiam kuirigis kutima speco. Novjorkanoj estas tre kreemaj pri picejoj kaj foje metas sur picon aĵojn, kiujn mi neniam antaŭe vidis sur pico. Kaj eĉ se italoj taksus novjorkan picon profanaĵo, ĝi tamen ege plaĉis al mi, kaj post densa kongresa programo, ni kun aliaj kongresanoj kun plezuro iris al apuda picejo.

La vespera programo finiĝis tre

Esperantistoj ĉe UN

FOTO: JENJA AMIS

malfrue: kaj ĝi estis vere densa! Kvankam la vespero estis malferma ankaŭ al ekstera publiko, mi ne vidis neesperantistojn. Dum la distra vespero okazis koncerto kaj komuna kantado (kiu, cetere, tre rememorigis al mi ukrainajn kaj rusajn E-renkontiĝojn), prezentado de DVD kaj poezia konkurso – “slamo” (interesa, sed, laŭ mi, iom tro longa, ĉar unu persono rajtis prezenti multfoje kaj en ĉiuj kategorioj). Interesa afero: unu homo partoprenis en slamo neĉeeste – per rete senditaj prezentaĵoj. La lasta vespera programero estis humura teatraĵo, verkita de la ĉeforganizanto de la kongreso, Tomaso Eccardt (li, cetere, tradukis en Esperanton ankaŭ multajn kantojn kiujn oni kantis pli frue en la vespero). La teatraĵo estis amuzega kaj tre subtila, kun multaj vortludoj kaj aludoj – la sola bedaŭrinda afero estas ke ĝi komenciĝis tro malfrue, kiam multaj kongresanoj jam foriris. Sed tiuj kiuj restis, ridegis kaj sincere ĝuis ĝin. Estus bone se dum la venonta kongreso ĝi estus la unua programero de la distra vespero por ke ĉiuj kongresanoj povu spekti ĝin.

Dimanĉon matene ni iris al la preĝejo de Sankta Johano la Teologo (la tria plej granda kristana preĝejo en la mondo, konstruita tute el ŝtono, kaj la plej granda en Usono!) kaj do maltrafis kelkajn matenajn programerojn: ekumenan diservon kaj prelegon pri EANA kaj ELNA. Sed ni kaptis almenaŭ duonon de la prelego de Tomaso Eccardt pri la historio de Esperanto en Novjorko, pri kiu li tre interesiĝas kaj scias multon (samtempe okazis prelego de Nijl Blonstein pri Brazilo kaj ĝia E-Movado). Estis ege plaĉe ke speciale por la kongreso oni printis grandformate fotojn pri lokoj rilataj al E-historio en Novjorko. La sekvaj du programeroj estis prelego pri tio, kial multajn el ni teruras ciferoj kaj matematiko (Pam Lieber), kaj prezento “Libro por tiuj, kiuj ankoraŭ ne

malkovris la valoron de Esperanto” (Enrique Ellemberg).

Ankaŭ posttagmeze, pro vizito al la Novjorka Rozkruca Loĝio, ni maltrafis grandan parton de la kongresa programo – kiu ja estis bona kaj riĉa. Temis pri kongresa organizado, pri Alice Morris kaj IALA (*International Auxiliary*

Language Association), tervarmiĝo, pri la sep plej malgrandaj landoj de Eŭropo (pri kiu Tomaso Eccardt verkis libron en la angla), pri Zamenhofa reform-projekto de 1894, pri angla kaj Esperanto en la persona vivo (A. Karkovsky), pri enmigrado en Usono – leĝa kaj kontraŭleĝa, kaj ĝiaj sekvoj por la socio kaj por Esperanto. Krome, okazis prezento de azerbajĝana popolmuziko kaj prelego pri gejoj en Esperantujo. Fine de la tago okazis tradicia akcepto de UEA-delegitoj por Usono, fare de Vilĉjo Harmon (mi tre fieris pri la fakto ke Atlanto havas la plej multajn delegitojn el ĉiuj usonaj urboj!).

La abunda bankedo kaj postbankedaj amuzoj bone kronis la plenplenan tagon. Fine de la bankedo okazis tradicia aŭkcio, kiun bonege gvidis Filipino Dorcas: oni vendis ĉefe librojn kaj diskojn, sed estis venditaj kontraŭ bona prezo ankaŭ du numeroj de *Kontakto*, kun intervjuoj de du lokaj famuloj: Tomaso Eccardt kaj Filipino Dorcas. La lasta programero de la vespero



Nova “aktoro” eniras la spektaklon!

FOTO: JENJA AMIS

estis trompludo, kiun gvidis mi. En tiu ludo oni devas elpensi kvazaŭ-PIV-ajn difinojn por malfacilaj vortoj, kaj “kontraŭuloj” devas elekti el kelkaj proponitaj variantoj la ĝustan.

La lasta kongresa tago, kiel ĉiam, estis malgaja: ja estas malfacile ĝisrevidi geamikojn kaj atendi la tutan jaron (aŭ eĉ pli) por revidi ĉiujn dum la sekva kongreso. Matene ni iris al UN – la ekskurson gvidis Rochelle Grossman, reprezentanto de UEA ĉe UN kaj volontulino de la novjorka oficejo de UEA; Rochelle, cetere, laboris ankaŭ en UN. Mi ege ĝuis la ekskurson – estis tiel interesa sperto vidi la halon de la Ĝenerala Asembleo kaj ĉiujn aliajn gravajn lokojn, kiujn mi vidis tiom multe en la televido.

Post la ekskurso al UN ni vizitis ankaŭ la novjorkan oficejon de UEA. Same kiel mi atendis, ĝi estas tre eta, fakte, ĝi dividas ejon kun alia organizo. Sed estis granda fiero vidi ke tuj trans la strato de UN troviĝas oficejeto de UEA! Dum ni estis en la ekskurso, en la kongresejo okazis AAIE-kunsido kaj ekzamenoj, ISAB-aferkunsido kaj prelego pri Toki Pona. Nur malmultaj homoj restis ĝis la oficiala fermo de la kongreso, ja multaj forveturis hejmen (aŭ daŭre al la kongresoj!) pli frue.

La lasta duonoficiala programero estis ekskurso al kafejo Esperanto. En Novjorko estas kafejo kaj restoracio kun la nomo “Esperanto”, kiuj tamen havas neniun rilaton al nia lingvo (tamen, la kelneroj de la kafejo sciis almenaŭ ke Esperanto estas “iu lingvo”). Ĉar la restoracio estas iom multekosta kaj tre laŭta, la organizantoj proponis ekskurseton al la kafejo. Mi multe ĝuis postkongresan babiladon (kaj kantadon – jes!) en iom hipieca etoso de la kafejo kaj portis hejmen kelkajn vizitkartojn de la kafejo por fanfaroni al la geamikoj.



Dum distra vespero oni ĝuis la kantadon

Post la kongreso ni havis 1,5 tagojn por turismumi – kaj ili estis plenplenegaj! Liberec-insulo kaj insulo Ellis kun ĝia interesege muzeo pri enmigrado; Wall Street – la financa centro de la lando – kaj eble de la mondo (tre surprizis min ke la strato mem estas tre malgranda, kaj mallonga, mi ial atendis strategon); Bruklin-ponto (mi apenaŭ povis kredi ke tiu belega kaj impona ponto estis konstruita en 1875!); multkoloraj Ĉin-Urbeto kaj Eta Italio, kiuj portis la etoson de siaj hejmlandoj... Komprenoble, ni vizitis ankaŭ *Ground Zero*

– cikatro sur la vizaĝo de la urbo, memoroj pri kiu ĉiam vivos en la koroj de la homoj de la tuta mondo... En la lasta duontago ni havis tempon por vidi nur kelkajn kolektojn de la Metropola Art-Muzeo (la kolekto de egiptajoj tie estas vere elstara!), sed eĉ malpli ol du horoj indus la viziton! Mi nur deziras ke ni povus havi pli da libertempo por ĉio – kaj esperas iam baldaŭ reveni al la Granda Pomo denove.

Ni kore dankas ĉiujn organizantojn de la kongreso, kiuj faris nekredblan laboron, – ĉar la kongreso estis vere bonega!



Dum prelego pri *hurosiki* oni povis fari sian propran ĉapon!

Bonvenon al ELNA-kongreso 2007!

Jim Henry

Dum la landa kongreso de ELNA en Novjorko, la estraro decidis akcepti la inviton de la Esperanto-Grupo de San-Diego okazigi la landan kongreson 2007 en San-Diego, Kalifornio kaj Tijuana, Meksiko. Verŝajne, antaŭkongreso okazos en San Diego 25-27-an de julio, kaj la ĉefa parto de la kongreso (kaj estrar-kunsido) okazos en Tijuana 28-30-an de julio, kun postkongresaj ekskursoj en Tijuana kaj Ensenada 30-31-an de julio.

Estis invito ankaŭ de la loka kongresa komitato por la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Kalgario, Kanado, ke ELNA kunigu sian kongreson kun TAKE 20-26-an de majo 2007. Sed pro pluraj kialoj la estraro de ELNA decidis akcepti la inviton kongresi en San-Diego kaj Tijuana.

Unue, julia dato pli taŭgas por niaj multaj instruistaj kaj studentaj membroj, ol la maja dato de TAKE.

Due, la estraro ne volis malkuraĝigi la multlaboran lokan grupon en San-Diego, kiu jam estis petita unufoje prokrasti siajn planojn pri landa kongreso.

Trie, ni ĵus kongresis en Kanado en 2004, kaj ne kongresis kun la meksikanoj ekde 1990.

Kvare, la kongreso de 2004 estis iom malprofita por ELNA pro la efiko de doganaj kostoj je la libroservo. Provizora esploro sugestas ke ni povas okazigi la libroservon en Tijuana sen tiel altaj doganaj kostoj, pro tio ke multaj kaliforniuj esperantistoj ŝoforos al Tijuana kaj povos transporti iom el la libroj laŭ sia unuopa permesata kvanto de portajtoj.

Kvine, ni volas montri al la meksikaj kaj aliaj latinamerikaj esperantistoj nian solidarecon kun ili nun, kiam la monda situacio emas disigi niajn najbarajn landojn eĉ pli.

ELNA tamen volas instigi siajn membrojn partopreni ankaŭ la Tut-Amerikan Kongreson se ili povas.

Welcome to ELNA Convention 2007!

Jim Henry

During ELNA's national convention in New York, the board of directors voted to accept the invitation of the Esperanto Group of San Diego to hold our next convention in San Diego, California and Tijuana, Mexico in July 2007.

Most likely a pre-convention will be in San Diego July 25-27, and the main part of the convention (with the board of directors' meeting) will be in Tijuana on July 28-30. There will be post-convention excursions in Tijuana and Ensenada July 30-31.

More information will follow when we finish negotiating contracts with hotels in San Diego and Tijuana.

There was also an invitation from the local convention committee for the Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (Pan-American Esperanto Convention) in Calgary, Alberta, for ELNA to combine our national convention with TAKE May 20-26, 2007. But for several reasons the board decided to accept the San Diego group's invitation:

1. A July date suits better for our many teacher and student members than the May date of TAKE.

2. The board did not want to discourage the San Diego group (and other local groups that might volunteer to host the convention in the future); they have already been asked to postpone their plans by one year, when both the New York and San Diego groups volunteered to host the 2006 convention.

3. We just had a joint Usonian/Canadian convention in 2004, but haven't had a joint convention with the Mexican Esperantists since 1990.

4. The 2004 convention in Sidney, BC was a small financial loss for ELNA due to the customs duties on the books for the book service. Preliminary research suggests we

can avoid most of this cost in Tijuana since many California Esperantists will probably be driving to the convention, and can each take a box of books as part of their personal duty-free allowance.

5. We want to show solidarity with the Mexican and other Latin-American Esperantists during this time when the world situation is tending to push our countries farther apart.

ELNA nevertheless strongly encourages its members to participate in the Pan-American Convention in Calgary as well.

Daŭra Kongresa Komitato Havas Novajn Membrojn

Jim Henry

Al la Daŭra Kongresa Komitato lastatempe aliĝis Ron Glossop, Anjo Harlow kaj Robert Read. Ron kaj Anjo ĉefe respondecos pri serĉado de lokaj kongresaj komitatoj kiuj organizos nian Landan Kongreson en 2008, 2009 kaj sekve.

Robert Read proponas sian teĥnikan helpon al lokaj kongresaj komitatoj, ekzemple pri kreo de reta aliĝilo. Jim Henry, la ĉefo de la komitato, daŭre respondecos pri helpo al la nuna loka kongresa komitato pri la venonta Landa Kongreso, kaj eventuale ankaŭ al la organizantoj de regionaj kongresoj.

Se vi pensas ke eble *via* loka grupo pretas organizi Landan Kongreson en estonta jaro, bonvolu kontakti Anjon aŭ Ron: <anjo@donh.best.vwh.net>, <rglossop@mindspring.com>.

La kongresa manlibro troviĝas ĉe: <http://www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm>



Phil "Filipo" Dorcas, prezidanto de ELNA

En Novjorko, la granda urbo kie "loĝas" la Unuiĝintaj Nacioj, la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko kongresis kun granda kunlaboro, granda ĝojo, granda amikeco kaj granda espero. Okdek ok homoj partoprenis la 54-an landan kongreson de ELNA, kiu okazis la 21-23-an de julio 2006.

La Estraro kaj la ĝenerala membraro tie aprobis unuanime la buĝeton kaj laborplanon de ELNA. Tiu laborplano estis la unua laborplano por ELNA dum la pasintaj kelkaj jaroj, kaj ĝi donas klaran vizion por farendaj taskoj. En tiu laborplano ni esprimas ke ni havas grandajn celojn por akiri novajn membrojn, ĉefe per pli aktivaj lokaj grupoj. Ni nun laboras por helpi la lokajn grupojn kiuj estas la veraj motoroj de la Movado. Ni jam vidas pli multajn lokajn grupojn, kaj kelkaj raportas novajn membrojn. Ni atendas pli da membroj en ELNA kaj UEA en la venontaj jaroj.

Rilate al tiu kreskado, la laborplano ligas la kvanton de membroj kun la kvanto de paĝoj en nia bulteno *Esperanto USA*. Ekzemple, kiam ni atingos 800 membrojn, nia bulteno havos 16 paĝojn anstataŭ la nunaj 12.

Unu el la gravaj ŝanĝoj estas ke ni aprobis monon por reklamado sub la reĝo de la Komitato pri Informado. La ĉi-jara buĝeto

Raporto el la Granda Pomo

montras du mil dolaran negativan saldon kiu signifas ke ni devas puŝi forte por akiri novajn membrojn. Ĝenerale ni estas en sufiĉe bona stato kaj havas nenian kialon por ne kreski.

Ni nomis komitaton por trovi novan direktoron de la Centra Oficejo. Don Harlow, la direktoro de la CO, anoncis ke li ne plu povos labori pro malsano. Laŭplane, ni havos la novan dungiton en la oficejo komence de novembro. La nova dungito kaj Don laboros kune dum kvar monatoj por fari la ŝanĝon glate. Se vi havas proponon pri nova direktoro, bonvolu informi al Anjo Harlow (anjo@donh.best.vwh.net), la komitatestrino (bv. vidi la detalojn sur p. 8). Vilĉjo Harmon anoncis ke la Centra Oficejo restos en la nuna konstruaĵo eble dum la venontaj kvin jaroj. Tio estis bona novaĵo ke ni ne devos trovi alian lokon por la CO.

Elektitaj al la estraro estis Lusi Harmon (ree), Joel Amis (ree), kaj Trevor Andrews (nova estrarano!). Ankaŭ Vilĉjo Harris estas la kasisto denove. Ni havas bonan estraron por ELNA, sed memoru ke la ĉefa laboro restas ĉe la lokaj grupoj. Tie la membroj agas aktive kaj daŭre.

Ni unuanime aprobis la proponon kongresi en Tijuana, Meksiko, la 27-an ĝis la 30-a de julio, 2007. Tio estos la 55-a landa kongreso de ELNA. Planu ĉeesti jam nun! Certe tio estos ege bona kongreso, kaj eble la plej granda.

Ni aprobis, ankaŭ unuanime, la proponon rekomendi kiel eble plej forte partoprenadon en la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE), kiu okazos en Kalgario, Kanado, la 20-an ĝis la 26-a de majo, 2007. Notu tiun daton sur via kalendaro kaj faru planojn ĉeesti.

Ni ĝuis ne nur la kunsidojn (plenkunsidon de ELNA, aferkunsidon de AAIE, fakajn ktp.), sed ankaŭ la bankedon kun bongusta manĝaĵo. Dum la bankedo ni aŭkciis donacitajn aĵojn por akiri monon por ELNA. Multajn dankojn al la loka kongresa komitato (LKK), kaj aparte al

Tomaso Eccardt kaj Jim Henry, kiuj faris bonegan laboron por plani, organizi kaj realigi la kongreson. Vidu fotojn ĉe <http://esperantofre.com/elna06/> (Dankon Enrike!)

La "Retslamo", internacia poezia konkurso, okazis dum la distra vespero. Por originala poezio, la unuan lokon gajnis Leonido Ŝindeleviĉ, rusdevena kanada poeto. Por neoriginala deklamado venkis Ĝerardo Tobias (Pollando/Usono). Okazis ankaŭ aliaj ludoj. Ĵenja kaj Joel Amis gastigis amuzegan vort-ludon pri PIV-aj (kaj ne-PIV-aj) difinoj.

La du Vilĉoj, Harmon kaj Harris, verkis en la rezolucia komitato proponojn por danki al la LKK kaj FIT, la "Fashion Institute of Technology", kiu gastigis la kongreson.



Anjo kaj Don Harlow

Kelkaj partoprenantoj tranoktis en la dormejo ĉe la "Nova Lernejo." Multaj ĉeestantoj ekskursis en la urbo, ekz. al la supro de la Imperi-Ŝtata Konstruaĵo, al la Statuo de Libereco, al la Unuiĝintaj Nacioj kaj al kafejo Esperanto. La kulturo en Novjorko, miksaĵo de multaj naciaj kulturoj, estas ĉie, en muzeoj, en la metroo, en la busoj, surstrate, kaj certe en la multaj interesaj restoracioj.

Unu el la plej gravaj eventoj estis ke ni unuanime donis honoran membrecon al Don Harlow, kiu sindone laboris multe, ne nur en la Centra Oficejo de ELNA, ne nur kiel iama prezidanto de ELNA, ne nur por tiu fama retpaĝaro pri literaturo, sed multflanke por la Movado en Usono kaj tutmonde. Ni dankas, dankegas al Don pro la bona laboro. Nia impona listo de honoraj membroj en ELNA havas 19 nomojn, kiel tiujn de Cathy Schultze, Vilĉjo Harmon, Doroteo Holland kaj William Auld. Al tiu listo de gravaj pioniroj ni aldonis la nomon de Don Harlow.

Ĉi tia raporto ne vere ĝustas, ĉar mankas la vortoj por priskribi la riĉan etoson kaj feliĉan amikecon kiujn la samideanoj spertis en Novjorko, la "granda pomo."



Dum la estrarkunsido

Esperanto Koresponda Servo 10-jara!

Ĉi-jare la *Esperanto Koresponda Servo* festas sian 10-jaran jubileon. Ni kore gratulas ĝian gvidanton – Enrique “Enrike” Elleberg – pro tiu ĉi bonega kaj utiliga laboro kiu helpis al pluraj esperantistoj tutmonde trovi korespondamikojn. Ĝuste pro tiu ĉi okazo la Radio Ĉina Internacia intervjuis Enrike-n, kaj ni volonte reaperigas la tekston de la intervjuo.

Lina (Radio Ĉina Internacia): Ĉu vi scias ke troviĝas profesia retejo nomata *Esperanto Koresponda Servo*? La servo celas faciligi korespondadon inter diverslandaj esperantistoj. Dek kvin jaroj pasis post ĝia establiĝo. Nun ĝi estas vaste konata retejo pri Esperanto-korespondado. Kaj ene vi povas trovi multajn kontaktojn kun diverslandaj esperantistoj.

Lina: Kiam establiĝis *Esperanto Koresponda Servo*?

Enrike: Ĉu vi kredus min se mi respondas ke mi ne scias? Sinjoro Duncan C. Thomson de Glasgovo, Skotlando, Britio, komencis ĝin antaŭ proksimume 15 jaroj. Tio okazis antaŭ la disvastiĝo de la komputila reto. Mi ankoraŭ ne estis konektita al la reto. Sinjoro Thomson je la komenco de ĉiu monato metis anoncon pri sia servo en la novaĵgrupo “soc.culture.esperanto”, por kolekti mesaĝojn de korespondantoj. La duan vendredon de ĉiu monato li publikigis liston de tiuj kiuj mesaĝis al li. Finonte la jaron 1995, sinjoro Duncan afiŝis kelkajn mesaĝojn, dirante ke post kvin jaroj da publikigado, li ne plu povas zorgi pri la koresponda servo. Li petis volontulon por daŭrigi la servon... kaj mi estis tiu voluntulo. Mi daŭrigis la publikigadon de tiu listo ekde marto 1996. Samtempe mi komencis konatiĝi kun la reto.

Mi pensis ke estus bone meti la liston en retpaĝon, kaj la 18-an

de julio 1996 mi komencis tiun paĝon... nun alvenas la 10-jara jubileo. Dum tiuj 10 jaroj mi aktualigis tiun retpaĝon du-tri fojojn ĉiumonate.

Lina: Kial vi volas esti voluntulo de la servo? Ĉu troviĝas speciala motivo?

Enrike: Mi komencis mian Esperantan vivon antaŭ 47 jaroj. Tuj de la komenco mi havis kelkajn korespondantojn de diversaj landoj. Mi kredas ke tio multe helpis mian lernadon kaj mian deziron daŭrigi la uzadon de Esperanto. Pro tio nun mi volas ke ankaŭ aliaj novuloj povu havi korespondantojn.

Lina: Ni scias ke kiel koresponda servo, la retejo certe bezonas kontaktojn de diverslandaj korespondantoj. Do, kiel vi akiris ilin? Ĉu tio estas facila aŭ ne?

Enrike: En la komenco, antaŭ la disvastiĝo de retejoj, tiu novaĵgrupo estis preskaŭ la nura maniero rete kontakti esperantistojn. Pro tio multaj homoj legis ĉiujn mesaĝojn kaj tiel ili lernis pri la ekzisto de la koresponda servo. Poste, mi pensas ke multaj uzantoj de mia servo sciigis siajn amikojn pri mia servo. Multaj homoj kiuj komencis proprajn retejojn aldonis ligilojn ankaŭ al mia paĝo. Mi surpriziĝas kiam mi serĉas en la reto kaj trovas mian nomon aŭ adresojn de miaj paĝoj... en lingvoj kiujn mi eĉ ne povas identigi. Sufiĉas meti en serĉilon la vorton “Esperanto” kaj “Enrique” aŭ “Enrike” por trovi multajn el miaj paĝoj (sed mi ne estas la sola “Enrique” kiu parolas Esperanton).

Lina: Ĉu multaj homoj en ĝi partoprenas?

Enrike: La nombro de partoprenantoj ŝanĝiĝas. De la komenco, tiu nombro daŭre altiĝis ĝis 2002, kiam ĝi atingis 200 korespondpetojn en unu jaro. Poste ĝi komencis malaltiĝi. Nun estas malpli ol 100. Estas kelkaj kialoj por tiu malaltiĝo: kelkaj homoj kaj organizoj kopiis mian servon. Sed mi



kredas ke la pli grava kialo estas la hodiaŭa facileco renkonti aliajn homojn per bablejoj, kiuj lastatempe komencis permesi voĉbabiladon, komence per *Paltalk* kaj poste *Skajpo*, kaj ĉiuj aliaj mondaj bablejoj, kiel *msn*, *yahoo*, *google*, *icq*... Ankaŭ estas grupoj kiel *Orkut*, *MySpace*, kiuj kunigas la homojn, ne nur pri Esperanto, kaj miloj da dissendolistoj aŭ forumoj, blogoj, ĵurnaloj kaj tiel plu.

Lina: Ĉu la retejo bone funkcias kaj liveras multe da ebloj pri korespondado kun diverslandaj esperantistoj?

Enrike: Mi scias ke la servo bone funkcias, sed malofte mi ricevas komentojn de uzantoj kiuj dankas min pro amikoj kiujn ili nun havas danke al mia servo. Eĉ vi mem ekkonis kelkajn homojn de aliaj landoj per mia servo.

Lina: Koran dankon, Enrique Elleberg. Fakte mi ekkonis vin antaŭ du jaroj kaj scias ke vi estas aktiva esperantisto kiu volas fari ion por Esperanto. Ekzemple, vi verkas libron por konigi Esperanton al tiuj kiuj ankoraŭ ne scias pri la ekzisto de Esperanto aŭ valoron de Esperanto. Je la fino de la programero, ĉu vi volas ion diri al niaj aŭskultantoj?

Enrike: Mi kolektas rakontojn de esperantistoj pri iliaj esperantaj vivoj, precipe tiuj belaj momentoj kiujn ĉiuj esperantistoj memoras, kiuj neniam okazos

sen la kono de Esperanto. Ĉiu el la legantoj povas sendi rakonton al mi. Mia adreso estas Enrike@aol.com.

Lina: Koran dankon! Kaj mi esperas ke via libro gajnos plenan sukceson!

La teksto de la intervjuo troviĝas ĉe la retpaĝo de Ĉina Radio Internacia <http://es.chinabroadcast.cn/1/2006/07/14/1@41857.htm>

La *Esperanto Koresponda Servo* troviĝas ĉe <http://www.esperantofre.com/eks>

Lost in Translation

(translated literally from the original Russian into Esperanto)

At the site of residence of Scottish Kings in the 18th century – sur la retpaĝo de la rezidejo de skotaj reĝoj en la 18-a jarcento

Independence Hall – Libera Halo

forefathers – por patroj

Massachussetts – Masahaseco

fraud and drug squad – roto de trompisto kaj droguloj

one of the signers of Declaration of Independence – unu el la kantistoj de Deklaracio de Sendependeco

perfumed ink – bonodora korporario

Prepared by Yevgeniya “Zhenya” Amis, based on Russian Esperanto Forum e-novosti, www.e-novosti.info

New Director for ELNA's Central Office Sought

Anjo Harlow

Our current Director Donald J. Harlow is resigning due to illness. The new Director will start work by November 1st, 2006 and must make a commitment to stay for at least two years.

The ELNA Office is located in Emeryville, CA. in the San Francisco East Bay region.

The new Director will be working for the advancement of Esperanto in the USA, handling all the membership developments and benefits, bookkeeping, maintaining information data bases and all other correspondence, e-mail, phone and internet activity, maintaining the Book Service (selling and ordering books, receiving orders and mailing books and merchandise) and maintaining a dependable day-to-day office routine. Office hours are 9 am to 6 pm, Monday to

Friday, with some holidays off.

Requirements:

Computer skills including word processing and database management; internet experience and bookkeeping knowledge will be helpful. Fluent knowledge of both Esperanto and English is necessary. Owning a car would be very helpful.

As soon as possible, please send your resume, your Esperanto history and general educational background to ELNA. ALL CORRESPONDENCE WILL BE KEPT CONFIDENTIAL.

Please address your application to:

Anjo Harlow
c/o ELNA
5712 Hollis Street
Emeryville, CA 94608
510-913-1567

Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo: Is this doable where you live?



Miko Sloper, (the "father"), Lusi Harmon (producer) and Steve Wagenseller (the "detective")

Immerse yourself in the fascinating world of Esperanto, the international language spoken by millions across the globe, with this 16-part series – a peralta.TV exclusive.

Directed by Bay Area filmmaker Judith Montell, an Academy Award nominee and Laney College alumna, this playful new series follows the Bonvolo family – the father is a Greek philosopher and the mother a dancer – through a whimsical set of adventures. In *Pasporto al la Tuta Mondo* you'll meet a host of diverse characters – all of whom speak Esperanto – and you'll find yourself learning this wonderful language, your doorway to cultural understanding and making new friends throughout the world.

Produced here in the Bay Area by the Esperanto League for North America, *Pasporto al la Tuta Mondo* is a lighthearted comedy-drama that brings Esperanto alive. It includes English subtitles for easy comprehension and engaging dialog that will allow you to learn the international language in no time.

As entertaining as it is instructive, you will enjoy watching *Pasporto al la Tuta Mondo* and learning Esperanto week after week on peralta.TV

For information about *Pasporto al la Tuta Mondo* and to learn more about Esperanto, you can visit the Esperanto League for North America's Web site, www.esperanto-usa.org, or call them at (510) 653-0998.

Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo: Sundays at 10:00 a.m., beginning September 3, 2006, with repeats Wednesdays at 10:30 p.m., Thursdays at 8:00 a.m. and 6:30 p.m., on peralta.TV, Comcast cable 27 and 28 in Alameda, Berkeley, Emeryville, Oakland and Piedmont and streaming live at www.peralta.TV.

Saluton! Mi iomete scipovas Esperanton kaj volas korespondi kun amikoj de la tuta mondo! Mia nomo estas Rumjana, mi estas 37-jaraĝa flegistino el Bulgario. Skribu al: Romyana Dekova, rucci69@abv.bg

Saluton, kara amiko,
Ni estas Tangshan-a Esperanto-Asocio (TEA). En la jaro 2006 okazas 20-jara jubileo de la fondiĝo de TEA. La 15-an de decembro ni aranĝos kongreson kaj ekspozicion. En la ekspozicio ni planas ekspozici monerojn kaj uzitajn kovertojn de diversaj landoj. Sed, tre bedaŭrinde, ni ankoraŭ ne havas monerojn kaj uzitajn kovertojn de via lando. Ĉu vi povas sendi al ni unu serion de moneroj kaj kelkajn uzitajn kovertojn kun poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj de via lando? Se vi bezonas ion de nia lando, ni povas sendi al vi. Ni tre atendas vian respondon. Nia poŝta adreso estas: TEA, P.O. Box 3, Tangshan Hebei, 063000, Ĉinio. La retadreso estas: weijh168@sina.com. Antaŭdankon! Sincere via, TEA.

Estimataj gesinjoroj,
Mi estas Toure Sekou Domain, 22-jaraĝa studento de hispana fako en Eburbordo. Mi skribas tiun ĉi leteron por interŝanĝi kun via klubo informojn pri pluraj temoj, kiel sporto, muziko, kulturo, turismo, historio, la lingvo. Fine, mi deziras korespondi kun gesamideanoj en via klubo kiuj volus amikiĝi kun afrikano. Skribu al: tsd_tcheick@yahoo.fr

Letervespero en Antikva Samarkando

Aŭguste kaj septembre 2006 samarkandaj esperantistoj okazigos la internaciajn letervesperojn, dediĉitajn al la 15-jariĝo de sendependeco de la Respubliko Uzbekio kaj al 2750-jariĝo de Samarkando, listigita en la registro de Mondaj Heredaĵoj de UNESKO. Ni atendas viajn gratulmesaĝojn, kaj, se eble, ĉiajn (kaj ĉiulingvajn!) materialojn (leterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri Uzbekio kaj Samarkando. Fakte, ĉio ajn pri la temoj, inkluzive fotojn de stratoj, vendejoj, restoracioj, hoteloj, komunumoj, kompanioj, varoj ktp estos tre bonvena. La plej interesajn materialojn ni publikigos en la nialanda gazararo. Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala ekspozicio. Anticipan dankon por viaj kontribuoj.

Salutleterojn kaj alispacajn materialojn bonvolu adresi jam nun al: Anatoli Ionesov, Direktoro. Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro. P.O. Box 76, UZ – 140100 Samarkando, Respubliko Uzbekio. Telefono/fakso: +998 (66) 233 17 53. Interreto: <http://peacetur.freenet.us> Retadreso: imps86@yahoo.com

Historical Fantasy... About Volapük

A Hand-book Of Volapük and an Elementary Manual of its Grammar and Vocabulary, prepared from the Gathered Papers of Gemmell Hunter Ibidem Justice; together with an Account of Events Relating to the Annual General Meeting of 1891 of the Edinburgh Society for the Propagation of a Universal Language.

by Andrew Drummond. Edinburgh: Polygon, 2006. ISBN 1 904598 67 6.

Jim Henry

In 1891 Volapük was twelve years old; there had already been three international conventions, the third of which used Volapük exclusively. It seemed to have a huge head start over any other constructed international language that might come along, with its thousands of speakers and hundreds of books and periodicals. But Esperanto, just four years after Zamenhof's first publication, was acquiring new speakers at a surprising rate, many of them former proponents of Volapük. Solresol, the musical language, still had a few adherents here and there, and dozens of other short-lived proposals for a universal or international language were being published and promoted for a short time. Which, if any, of these languages would prevail?


Andrew Drummond's second novel is set during this suspenseful and exciting time for the international language movement, and focuses on the Edinburgh Society for the Propagation of a Universal Language: more particularly on two of its most influential members, Gemmell Hunter Ibidem Justice, traveling church-organ repairman and Volapük teacher, and his former comrade, now bitter enemy, Dr. Henry Bosman, physician and Esperantist. The rank and file of the Society have many of their own preferences – for Solresol or Nal Bino, for Leibniz's system of prime numbers, for a revival of Latin, Greek or Hebrew, or the simple promotion of English; but the real contest is between Mr. Justice and Dr. Bosman, as to whether the Society at its next annual meeting will definitively endorse Volapük or Esperanto.

The story is told primarily (except for a preface by a Dr. Charles Cordiner, phrenologist, who explains how he found the following papers and arranged for their publication) from the hilariously biased and unreliable viewpoint of Mr. Justice. We first meet him

as he is traveling through the northeast of Scotland, repairing church organs. One night as he leaves a church in Cromarty after a long day's repair work, he meets a mysterious old man in the church graveyard; a man who, though he has never heard of Volapük, is no stranger to universal languages. Mr. Justice and Sir Thomas agree to travel together and assist one another, on terms which Mr. Justice is not inclined to explain to the reader. Sir Thomas proves a persuasive and powerful teacher's assistant as Mr. Justice endeavors to teach the rudiments of Volapük to the Self-Betterment League of Peterhead, the Didactic Society of Newburgh Linoleum Workers, the Workers Improvement Association in Dysart, and other such local societies. But in spite of his enthusiasm and talent for Volapük, Sir Thomas has invented a universal language of his own, and steadily maintains its superiority.

Who or what is Sir Thomas? What was he doing in the Cromarty graveyard? Can we credit his claim to be an old schoolfellow of George Dalgarno? All these questions are eventually answered for the reader who hasn't figured out the answers on his own. But what about the cloak, scimitar and helmet that Sir Thomas loans to Mr. Justice for use in inducing difficult pupils to apply themselves more assiduously to the study of Volapük, or persuade wavering members of the Society to support Volapük rather than Esperanto? Each time Mr. Justice dons the helmet, it affects his view of the world more strangely than before. Can Mr. Justice trust Sir Thomas? Can the reader trust Mr. Justice? (Apparently not, although he lets slip some clues to things he is unwilling to speak about directly.)

The title may lead some booksellers to shelve the book as a language textbook rather than a historical fantasy novel; in fact this would not be entirely wrong, as the novel contains nineteen lessons in Volapük, mainly adapted from Charles E. Sprague's 1888 primer (also titled *Hand-book of Volapük*; see <http://personal.southern.edu/~caviness/Volapuk/HBoV/hbv.htm>). The lessons (most if not all of them) are integrated smoothly into the narrative, as Mr. Justice teaches his pupils and traveling companions about the language; many of the example sentences and exercises for translation are adapted to be relevant to the situation in the novel at a given point, and are generally as funny as the rest of the story; which is to



say, very funny indeed. Drummond is not quite on a level with P.G. Wodehouse or Terry Pratchett in his ability to keep you laughing, but he comes pretty close at times.

The novel touches on other issues of language politics – sexism in language, for instance, in an amusing three-way debate between Mr. Justice, Dr. Bosman, and their landlady's daughter; or nationalistic suppression of minority languages like Gaelic, and whether a common language would make this even worse; i.e., whether a universal language, or an international language, is what is really wanted. Besides all this, there is a contest to train two parrots in Esperanto and Volapük, the Decennial Census and a number of fraudulent census forms, a dirigible, and a mechanical translation engine. What more could you ask for?

Everything between the covers except the copyright page adds to the historical verisimilitude; there are nifty pages of advertising for real and fake 19th-century books and other products and services at the back of the book, for instance.

A Hand-book Of Volapük may not be available in bookstores outside of the UK, but it's available from various independent book dealers through Amazon.com, and I shouldn't be surprised if ELNA's book service may decide to stock it if the Central Office gets some inquiries about it.

Esperanto ĉe Seatla Foiro

Haruo Ross

Unu el la plej grandaj kvartalaĵ festivaloj en Seatlo estas The Fremont Fair, kiun vizitas ĉiujare pli ol cent mil homoj dum du tagoj (nome, la semajnfino plej proksima al la somera solstico). Ĝi estas fame konata pro sia parado kun taĉmento de nudaj biciklantoj.

Ĉi-jare la unuan fojon Seatla Esperanto-Societo havis budon ĉe la foiro, kie ni reklamis pri Esperanto al la preterpasanta publiko. Multaj homoj haltis por paroli kun ni. Ni disdonis centojn da flugfolioj (Handy-Dandy Starter Kit, folio pri SES ktp.) kaj dekojn da "Esperanto: It's in your Pocket" kaj la KD-ROM "Esperanto: Lingua Incognita".

Ni opinias la monon (\$205, kiun subvenciis la Fonduso Culbert) trafte elspezita, kaj ni intencas reprovii la eksperimenton en 2007.

Partoprenis entute 11 SES-

anoj: mi (Ros' Haruo), Les kaj Arlyn Kerr, Jim Parks, Mel kaj Jody Hurd, Shahin kaj Shawheen MacKinnie, kaj Alazel, Frances kaj Ĉravixtha Acheson.

Ni uzis plurajn buntajn afiŝojn kaj ankaŭ plurajn nigra-blankajn por allogi la okulojn de la homoj sur la strato: ŝajne efikis la "SMASH DESTROY CRUSH" folio, la bela afiŝego pri la Vilna UK, kaj la bunta afiŝo "Language Cousins".

Pluraj homoj donis al ni siajn retadresojn kaj petis informiĝi pri okazontaj SES-eventoj. Kaj unu junulo alvenis kaj ekparolis al ni Esperante, dirante ke li jam lernas la lingvon aŭtodidakte de kelkaj monatoj, kaj deziras babilu. Ŝajnas ke li estis unu el la studentoj ĉeestintaj la Tagon de Lingvoj de la Mondo ĉe la Universitato de Vaŝingtonio pasint-marte, ĉar li jam posedis "Esperanto: Lingua Incognita". Estis ĝojige konstati ke ankaŭ tiu programo nia naskas fruktojn.



Esperanto-kurso en Atlanto

Jenja Amis

De aprilo ĝis julio 2006 en Atlanto okazis 13-leciona Esperanto-kurso por komentantoj kaj progresantoj/progresintoj. Mi instruis la komencantan kurson, kaj Joel Amis instruis la progresantan. Kvankam la kvanto de la lernantoj komence kaj fine de la kurso ne estis por mi aparte kontentiga (ni perdis kvin studentojn en la tuja komenco), ĝenerale en la kurso studis naŭ personoj.

Instrui Esperanton al komentantoj estis por mi tre interesa kaj lerniga sperto – aparte pro la

fakto ke tio ĉi estis mia unua sperto kiam mi instruis sola kaj al komencantoj. Antaŭ ol plani la kurson mi havis la ĉefan demandon – ĉu instrui rekt-metode aŭ tamen uzi la anglan. Unue mi pli inklinitis al rekt-metoda kurso, ĉar inter interesiĝintoj estis kelkaj brazilanoj. Sed finfine la decido estis rezigni pri la rekt-metodo pro kelkaj kialoj. Unue – manko de tempo: klarigado de gramatikajoj per nacia lingvo postulas multe malpli da tempo kaj estas pli facile komprenebla (tamen, mi strebis uzi la anglan nur kiam tio estis vere necesa). Alia kialo uzi la anglan por gramatikaj klarigoj estis ke inter la

lernantoj estis nur unu ne anglaparolanto, sed kiu tamen komprenis la anglan.

La ĉefa lernilo por la komentanta grupo estis "La Pasporto al la Tuta Mondo", sed aldone, por hejma studo, ni uzis la libreton "Esperanto Teacher" eldonitan de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Tiu kombinaĵo de lerniloj funkciis bone: oni povis memstare legi klarigojn pri gramatikajoj, kaj en la lecionoj koncentriĝi pli pri spektado/komprenado kaj parolado. La studentoj ŝatis la vidbendan kurson kaj diris ke ĝi estas distra, amuza, ne tro malfacila, sed ankaŭ ne facila, do ĉiam estas defio.

Ankaŭ al mi plaĉis instrui per la videokurso: unue, ĉar la kurso mem estas amuza kaj plaĉas al studentoj, due, ĉar ĝi permesas enkonduki multajn vortojn jam de la unuaj lecionoj. Ankaŭ klarigoj pri gramatiko por instruistoj helpis multe. Tamen, estas ankaŭ kelkaj plibonigendaĵoj pri la kurso. Bedaŭrinde, ankoraŭ mankas subtitoloj en la ĉefaj par-

toj de la kurso (ili aperas nur en la enkondukaj kaj konkludaj partoj de la lecionoj): la unuan fojon estus preferinde spekti la lecionon kun subtitoloj, ĉar la elparolo de la aktoroj ne ĉiam estas klara.

Estus bone ankaŭ revizii la tajpitajn materialojn por la kurso: en la teksto kaj ekzercoj nemaloftas mistajpoj. Krome, la teksto kaj ekzercoj mem estas tre "pezaj", kaj se iu ne ĉeestis la lecionon, apenaŭ eblas sendi al ili la materialojn retroŝte por hejma studado. Estus bone, se kelkaj volontuloj helpu al la direktoro de la kurso, Lusi Harmon, pli rapide plibonigi tiujn kelkajn aferojn en ĝenerale bonega kurso.

La ĉefa instruilo en la progresanta kurso estis la famega libro de Boris Kolker "Vojaĝo en Esperanto-Lando". Aldone, Joel uzis ankaŭ aliajn materialojn, ekzemple, "Rakontoj Prapatraj pri Nia Lando Antaŭ Multaj Jarcentoj Kiam okazemis Aferoj Mirindaj" de David Jordan.

Kiel organizi kongreson

Parto V.

Tio ĉi estas la kvina parto de serio da artikoloj pri organizado de Esperanto-kongresoj, specife de landaj kongresoj de ELNA, sed ankaŭ de regionaj kongresoj. Ĝi baziĝas sur la kongresa manlibro de ELNA (la originalan gvidilon verkis Frank Helmuth, Cathy Schulze kaj Bill Harmon; Ellen Eddy reviziis ĝin. Jim Henry plu reviziis kaj multon aldonis), kiu troviĝas ĉe www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm.

Kunigo de samĉambranoj

Multaj kongresanoj volos helpoj trovi samĉambranon. Rilate al tio, povas esti demando(j) en la aliĝilo, aŭ eble aparta formularo*. Tiam iu en la Loka Kongresa Komitato devas kolekti la liston de samĉambran-dezirantoj, kaj dissendi la liston al ĉiu en ĝi. (Aŭ du listoj, de viroj kaj de virinoj.) Nepre klare diru ke la kongresanoj mem devas mendi siajn ĉambrojn kaj prenas al si la riskon se ilia samĉambrano fakte ne venas. (Iam okazis ke homoj plendis al ELNA kaj postulis ke ELNA pagu la duonon de la kosto kiun pagintus la neĉeestanta samĉambrano; ni evitu tion.) Arlyn Kerr rimarkis ke en 2004 ŝi havis multan kromlaboron rilate al ĉi tiu tasko; ekz. kelkaj homoj petis ŝian helpoj trovi loĝejon kiam la kongresa hotelo jam plenplenis.

Alia ebleco estas starigi listgrupon ĉe Yahoo Groups aŭ alia taŭga servo por kongresanoj kiuj volas interkonsenti pri ĉambrodivido kaj aliaj aferoj. En la unua informfolio kaj aliĝilo oni diru klare kiel aboni tiun listgrupon. Oni diru ankaŭ ke, se iu ne havas reĉeŝt-aliron, tiu povas poŝti aŭ telefoni al certa membro de la LKK kaj peti liston de homoj volantaj samĉambranon; ties kontakt-informon la samĉambran-listestro mesaĝos al la listgrupo.

Libroservo ĉe la Kongreso

La libroservo de ELNA estas unu el la plej bonaj el la multaj landaj asocioj. Kiam eblas, ELNA okazigu libroservon dum la Kongreso. Kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso, la Centra Oficejo devas sendi al iu el la LKK skatolojn da libroj por la kongreso. (Oni ne volas fidi la hotelistojn pri tio.) Tiu libro-ricevanto tiam ŝofore portu la librojn al la kongresejo en la unua tago kiam la libroservo-ĉambro haveblas (kutime la tagon antaŭ la estrar-kunsido). Do, oni frue diru al la CO, al kies adreso ili sendu la librojn, kaj kiam tiu estas hejme por ricevi ilin de la UPS-liveristo. Donu vian laborejan adreson al la CO se vi ne estas hejme dum la tago.

La ĉambro por la libroservo prefere estu havebla ekde la tago antaŭ la estrar-kunsido.

La direktoro de la CO devas malpaki la skatolojn kaj aranĝi la librojn antaŭ ol malfermi la libroservon, kaj li devas ĉeesti la kunsidon, do estas plej bone se li povas pretigi la libroservon la antaŭan tagon. (Ankaŭ eble estus bone se iu LKK-ano aŭ alia volontulo povus helpi al li pri tio; sed verŝajne aliulo ne povas tute anstataŭi lin en tiu devo.) La ĉambro estu havebla ankaŭ la ceteron de la fina tago, post la Solena Fermo, por ke la direktoro havu tempon por repaki la librojn sen troa hasto – kaj denove estus bone se volontuloj povus helpi al li.

Se en via ŝtato estas vend-impoto, iu en la LKK devas frue esplori pri tio kiel oni registras sin kiel unufoja vendanto ĉe la ŝtata ministerio pri vendimpoto, kaj informi al la CO pri tio. Aŭ LKK-ano aŭ la Direktoro de la CO povas registri ELNA-n kiel unufojan vendanton, tiel ke ELNA povu kolekti la vendimposton kaj pagi tion al la ŝtato post la kongreso.

Kiam la kongreso okazas en Meksiko aŭ Kanado, la libroservo ofte havas malprofiton pro la alta transport-impoto. Ĉu taŭgas havi la libroservon ĉe la kongreso en tiuj jaroj? La estraro kaj la CO decidu.

Distraĵoj

La LKK prizorgas distraĵojn por la diversaj vesperoj, kun la helpo de la Komisiito de Kongresoj. Lokaj esperantistoj ofte povas provizi teatraĵetojn kaj muzikon. Kunkantado estas plezurdonna por la kongresanoj. Oni foje havas profesiajn muzikistojn por koncerti, ĉu ordinara kongresanoj kiel Jon Liechty en 2000 aŭ Thomas Alexander en 2005, aŭ honorgastoj (kies vojaĝado kaj loĝado estis pagitaj el la kongresa buĝeto) kiel Kimo kaj JoMo en 2003.

Faru aranĝojn por la kunkantado de la himno “La Espero” dum la solena fermo de la kongreso. Plej bone havigu la tekston kun muzik-indikoj, presitan por ĉiuj po unu kopio, kaj antaŭvarbu iun por gitarludi, pianludi aŭ alimaniere muziki. Tiu folio eble estu en la kongresa sako kun la horaro kaj kongreslibreto; ĝi povas esti parto de la kongreslibreto mem, aŭ disdonu ĝin aparte tuj antaŭ la Solena Fermo.

Estas bone havi babilejon (angle “consuite”) dum la kongreso. Tio estu ĉambro kun sofoj kaj foteloj, kie oni povas iam ajn manĝeti kaj babilu sen programita temo. Ĝi povas esti ankaŭ loko por ludoj en Esperanto, ĉu lingvorilataj, kiel Esperanto-skrablo, ĉu ne (ŝako, goo ktp.). La LKK kontrolu ĉu tia ĉambro haveblas kontraŭ ne troa kromkosto, kaj ĉu ili rajtas provizi manĝetojn aŭ ĉu necesas aĉeti ilin de la kongresejo. Estas plej bone

se la babilejo proksimas al aliaj kunven-ĉambroj kaj la libroservo, sed tipe tia ĉambro estas en alia parto de la hotelo, kun la aliaj loĝejoj.

Ekskurso(j)

Kutime estas almenaŭ unu duontaga ekskurso dum la kongreso mem – matene aŭ posttagmeze laŭ loka vetero. Se la kongresejo estas en la urbocentro, aŭ se haveblas bona publika transporto, povas esti piedekskurso al historiaj lokoj en la urbo (kiel en Atlanto 2000, Bostono 2003). Alie, oni eble devos lui plurajn aŭtobusetojn por transporti la kongresanojn al la ĉela loko. (En Sankta Luiso 1999, la lokanoj havis sufiĉajn aŭtomobilojn por ŝofori ĉiujn kiuj volis iri al la Pordega Arko. En Austino 2005, la LKK luis unu aŭtobuseton dum tri tagoj kontraŭ \$300 por tri ekskursoj; ili devis fari du aŭ tri vojaĝojn ambaŭdirekte por transporti ĉiujn kongresanojn de la kongresejo al la ekskursoceloj.)

Komence de ekskursoj, memorigu al la kongresanoj ke ni estas ambasadoroj – ne estu malĝentila en publikaj lokoj. Ni volas doni bonan impreson pri Esperanto kaj esperantistoj. Dum la ekskurso homoj aŭdas nin paroli strangan lingvon kaj kelkaj scivolemiĝas. Estus bone porti informilojn por disdoni al iu ajn kiu demandas “What language is that?”

Kutime estas plia ekskurso en la posttagmezo de la lasta tago de la kongreso, post la solena fermo, por tiuj kiuj ne forflugos ĝis la posta tago. Ofte tion oni ne detale aranĝas ĝis lastminute; estus pli bone plani kaj anonci ankaŭ tion sufiĉe frue, antaŭ ol homoj mendas siajn flugbiletojn. Se oni ial devas prokrasti la planadon de la ekskurso, tamen preferindas anonci la planojn dum la kongreso, kaj ne provi lastminute aranĝi ion taŭgan por ĉiuj ekskursemluloj. Russ Williams konsilas: “Diru ‘Jen la plano – se ne taŭgas por vi, bv. ne partopreni! Ne petu specialajn esceptojn por vi.’”

Foje estas plurtaga ekskurso antaŭ aŭ (pli ofte) post la kongreso. Por tio oni devas pagi aparte; ĝi ne estas inkluzivita en la kongreskotizo. Esploru pri la turistaj eblecoj en via regiono kaj proponu ion al Lusi Harmon de Esperanto Vojaĝ-Servo; ŝi helpis al ni en 2000 organizi ekskurson al Savano, Georgio post la Atlanta kongreso*.

* Ligiloj al ĉiuj paĝoj, ekzemplaj leteroj ktp. indikitaj per steleto (*) troviĝas ĉe la originala paĝo <http://www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm>

New from the Book Service

ANGLA-ESPERANTA-HUNGARA ETVORTARO PRI HOMA VIVO KAJ LOĜADO. *Ilna KOUTNY.* A third useful and attractive pocket-sized book in this series of small thesaurus-like dictionaries. Words are organized by meaning within categories (main categories: Human life and Lodging) rather than by alphabetical order, which means that although the first language is English, you can use any of the three languages as a key into any of the others. 2005. 156p. 170x115. Paper. Poland. ISBN 83-89887-19-3.

ANG008 \$15.40

AVENTUROJ DE JONATANO GULLIBLE, LA. *Ken SCHOLLAND.* Trans. Ĵenja Amis. Inspired by Jonathan Swift's *Gulliver's Travels*, a Libertarian excursion into a very familiar economic dystopia. Many illustrations by Randall Lavarias. 2006. 143p. 215x145. Paper. Russia. ISBN 5716101577.

AVE007 \$21.20

BORIS GODUNOV. *Aleksandr PUŠKIN.* Trans. Vladimir Edelstejn. Puskin's famous play about the famous successor to Ivan the Terrible and his struggle against a pretender to the throne of Russia. 2005. 112p. 170x120. Paper. Russia. ISBN 5716101461.

BOR002 \$8.10

CONVERSATIONAL ESPERANTO. *Don LORD.* Eighty-six columns from the *Brita Esperantisto* giving everyday, conversational vocabulary in Esperanto. The columns are here separated into eleven categories: Economy and Labour, Environment, Family and Home, Food and Drink, Health, Holidays and Leisure, House and Garden, Law and Order, Science and Technology, Shopping, and Society. Includes English-Esperanto and Esperanto-English vocabularies of terms introduced. 2006. 200p. 210x145. Paper. United Kingdom. ISBN 0902756222.

CON001 \$21.70

DE NENIE KUN AMO.... *Iosif BRODSKIJ.* Translations of the poetry and prose of one of Russia's most famous dissident poets. 2001. 159p. 200x130. Paper. Russia. ISBN 5-7161-0087-2.

DEN002 \$10.70

DU LINGVOJ. *Mikaelo BRONŠTEJN.* Recent collection of poetry by the Russian Esperanto Bard, collected in nine separate "Zumoj". 2001. 192p. 200x130. Paper. Russia. ISBN 5-7161-0093-7.

DUL001 \$7.30

ELEKTITAJ POEMOJ KAJ AFORISMOJ. *Christian MORGENSTERN.* Trans. Willy Nüesch. A very complete collection of the poetry and aphorisms of a great German poet and philosopher from the beginning of

the 20th century. 2006. 205p. 210x150. Paper. Switzerland.

ELE007 \$31.10

EPITOMO DE ESPERANTOLOGIO. *Nikolao GUDSKOV.* A detailed overview of the history and current state of the Esperanto movement. Valuable material for anybody who is involved with promoting Esperanto. 2002. 151p. 200x130. Paper. Russia. ISBN 5716100945.

EPI002 \$12.10

GRAVECO DE LA FIDELIĜO, LA. *Oscar WILDE.* Trans. William Auld. DVD of the July 4, 1987, presentation of the play by an amateur cast at the Bloomsbury Theatre in London. *NOTE: DVD uses PAL standard, so in the United States is probably best viewed on your computer's DVD player.* 2006. 145 minutes. United Kingdom.

GRA010 \$24.10

HISTORIOJ ... RAKONTU! *Herman NYECK LIPORT & Chamberline NGUEFACK ZEDONG.* An attractive collection of 15 African tales intended not only to amuse but also to teach morality. Many illustrations. 2006. 123p. 200x145. Paper. Cameroon.

HIS009 \$27.70

JOMO SLAVUMAS. Excellent new disk by jOmO, contains 24 pieces with an exotic Eastern European flavor, ranging from traditional to rock. Pieces range from "La Golemo" through "Tumbalalajka" and "La reveno de Taras Bulba" to "Apudmoskvaj vesperoj". "You'll find inside, i.a., a Kiev nightingale, a Gypsy prince, a Belarussian virtuosa, bass players of Romanian and Indian origin, motorized cossacks and an unforgettable fiddler on the roof." CD + lyrics booklet: 69'51". France.

JOM003 \$29.00

LANDO DE LA BLINDULOJ, LA. *H. G. WELLS.* Reprint of the E. W. Amos translation of H. G. Wells's classic utopian novella. "In the country of the blind, the one-eyed man is king." Series "Utopia" #3. 2006. 26p. 210x145. Paper. The Netherlands.

LAN004 \$4.30

LEGENDOJ PRI SEJM. *Mikaelo BRONŠTEJN.* Annals and anecdotes from the history of the unofficial Esperanto youth movement in the USSR during the last thirty years of the Soviet Union. Newly expanded third edition. 2005. 231p. 200x130. Paper. Russia. ISBN 5-7161-0152-6.

LEG007 \$24.50

MIO, MIA FILO. *Astrid Lindgren.* Trans. Leif Nordenstorm. Charming children's story about a young boy who is carried away from humdrum Stockholm to a distant kingdom where he turns out to be a prince and

is expected to fight and defeat a great evil that threatens the land. 2006. 143p. 200x130. Paper. Sweden. ISBN 9185288349.

MIO002 \$23.90

MONATOJ TRA LA MONDO. *HORI Yasuo.* A collection of views of the meanings of the various months of the year as seen from Finland, France, Japan, Vietnam, Togoland, Romania, the United States, Nepal, the Netherlands, Argentina and Serbia. N.d. (prob. 2006). 96p. 255x180. Paper. Japan. ISBN 4939088054.

MON008 \$11.00

NE NUR LEGENDOJ, NE NUR PRI SEJM. *Vladimir SAMODAJ.* Recounting the life and times of an active and enthusiastic Esperantist in Russia, and elsewhere, under the USSR. 1999. 174p. 215x140. Paper. Russia. ISBN 5716100619.

NEN004 \$15.50

PRI LA KRISTANA AMO. *Benedikto XVI.* Trans. Reinhard Haupenthal *et al.* The first encyclical from Pope Benedict XVI, written in the summer of 2005. 2006. 43p. 210x145. Paper. Germany.

PRI004 \$12.60

PRINTEMPO BLUĴINSA. *Mikaelo BRONŠTEJN.* Sixteen songs by the Russian Esperanto bard, including the six from the "Puškin-jubileo". CD + lyrics booklet: 54'28". Russia.

PRI006 \$16.40

RAPORTOJ EL JAPANIO 9. *HORI Jasuo.* A new collection of essays by the author about life, culture and politics in Japan in 2005. 2006. 184p. 210x150. Paper. Japan. ISBN 4947728299.

RAP011 \$19.40

SEKRETO DE LA PATRINO. *Valerij SIPOVIĈ.* Original novel about a woman's life in post-revolutionary Russia. 2006. 110p. 200x130. Paper. Russia. ISBN 5716101542.

SEK001 \$18.90

TRILINGVA LANDLIM'. *Peter BROWNE.* A recent collection of the poetry of an American Esperanto poet. Each poem appears in three languages: Esperanto, Spanish, English. N.d. (prob. 2006). 32p. 150x210. Paper. France. ISSN 03985822.

TRIO21 \$7.50

VINTRA FABELO, LA. *William SHAKESPEARE.* One of Shakespeare's four great romances, written near the end of his career, in a translation by Humphrey Tonkin. Includes the famous if non-existent "coast of Bohemia". 2006. 154p. 210x150. Paper. The Netherlands.

VIN006 \$22.00

Saluton, samideanoj!

Ĉu vi partoprenis la landan kongreson en 2005 en Teksaso? Ĉu vi memoras la temon de tiu kongreso? La temo estis "Literaturo". Ni elektis tiun temon pro multaj kialoj. Tio estis bona temo por niaj kunsidoj kie ni konatiĝis kun multaj verkistoj.

Literaturo ankaŭ spegulas kulturon.

Ĉu vi legis la faman libron de Julio Baghy, "La Verda Koro", en kiu knabo difinis kulturon kiel "homan komprenon"? Tio estis grava punkto por mi, kiam mi unue legis tiujn vortojn. Ĉu kulturo vere estas homa kompreno? Mi opiniis ke ne. Tamen, nia tuta afero en la Movado rilatas al kulturo. Ni celas pli bonan interkomprenon inter la homoj de diversaj landoj, kulturoj kaj klasoj.

Ni celebru nian literaturon! Per tio ni celebras ankaŭ niajn agadojn (spiriton, novan senton) per kiuj ni povas krei amikojn en iu ajn lando sur la tero. Literaturo difinas tiujn kiuj ni estas, kaj ni estas Esperantistoj. Ni estas esperantoj.

Amike,
Phil "Filipo" Dorcas
prezidanto de ELNA

Matthew J. Weitendorf

Radiaj ondoj
Leviĝis al ĉielo –
Pluvas manao

Dum la vespero
La oceanorkestro
Ekdormigis nin

La sunhorloĝo
Per lum' kaj ombro
Sumigas vivon

Muzika disko
Sur la fonograf' kreis
Flosantan mondon

Keneĉjo Goldbergo

Por Anjo Ĉelao

"Mi timas," mi pensis en la atenda ĉambro de la kantona malsanulejo.
"Kie ŝi estas?"
"Mi lacas. Ĉu sola mi estos?"
"Kio okazis?"
"Duonscias mi."
"Mi sentas min sola."
"Ĉu mi telefonu al nevo mia?"
"La mezo de la nokto estas."
"Kia mi sentus sola?"

Kia mi sentus
sen vi?

dimanĉon la 5-an de decembro 2004

Oceano

Por Anjo

Mi ne

estas tiel
kiel river',
rekta, rapida

Mi ja

meandras, jes,
sed ne riverece

Oceano, preter la
komforto de antaŭdiro
parolas, vere senfin'
ondas,
ekscitas la imagon, tiel

kiel ekscitas mian vi.

fruajn monatojn, 2005

Por Anjo, kunloĝantino de la fratino

Brunajn, brunajn, brunajn, brunajn
okulojn viajn

neniam
plu vidi,

Rondaĵojn de vi
ne plu
tuŝi

En orelo mia flustras

ne plu
ne plu
ne plu

Sabaton, la 24-an de septembro, 2005

Perlo el papero

Por Anjo Ĉelao

Anjo, kara
kun voĉo velura
Kunvivantino mia

kun manoj belaj

Karulino mia

kun profunde brunaj okuloj

Kial ni tiel ofte interkonsentas?

Tiel profunde komprenas ni unu la alian?

Anjo, kara

ekde junio 1976

ĝis junio 2006

Mi kredas, ke ni ĉiuj

Mi kredas, ke ni ĉiuj parolas sam-lingve.

La cetero estas konfuzo korsenta

Libroj niaj

Por Robert Goldberg, filo de
samideano Leah Singer Goldberg

Mi kredas, ke ni vivas
ĝis ni mankas al la mondo.

Plaĝo

Tie, kie la suno subiras,
dolĉe ruĝiĝas.

Ion

Ion, kion vi vere volas fari,
vi ja faros.



Ivan Franko

En la vasta dua klaso de la normala lernejo de pastroj-bazilanoj en Drohobiĉ** tiel kvietas, ke oni papavon povas semi. Proksimiĝas horo de la “bela skribo”, timiga por ĉiuj ne pro la objekto mem, sed pli verŝajne pro la instruata persono. En la bazilana lernejo instruistoj de ĉiuj objektoj estas pastroj, nur por kaligrafio oni dungis civilulon, iun eksan bienestron aŭ mentoron, sinjoron Valko. Al sinjoro Valko eĉ nun ŝajnas, ke li estas bienestro: kvankam iri kun vipo ne konvenas, sed li tamen ne malatentas vergon kaj neniam ignoras la okazon utiligi ĝin. Evidente, ke infanoj, subigitaj almenaŭ por unu horo je la povo de tiu instruisto, anticipas ekstreman, kaj kaligrafio estas por ili la plej granda turmento.

Nur eta Mirono sidas sur benko trankvile, preskaŭ gaje. Li miras, kial en la klasĉambro subite ekkvietiĝis, kiam unu kuraĝulo, sendita koridoren por esplorado, enkuris en la ejon kaj ekkriis: “Valko venis!” En la sama momente en la klaso ekregis kvieto. La eta Mirono ankoraŭ ne konas sinjoron Valko. Li nur nun venis el vilaĝa lernejo, la patro enlistigis lin por la dua studjaro ĉe pastroj-bazilanoj, kaj jen estas la unua horo de kaligrafio. Kaj malgraŭ tio ke en vilaĝo li ne estis sukcesa en skribado, li scipovis nek plumon korekte teni en la mano, nek glate kaj rekte elskribi unu strekon, – li ja

Schön Schreiben*

estas infano kaj ne malĝojas pri ankoraŭ nekonata afero. Li miris pri la subita sereneco, sed li ne kuraĝis demandi siajn najbarojn – li ja konis nenium el ili. Kaj, finfine, tio ĉi ne tre interesis lin. En la kvieto, tiel timiga kaj maltrankvila por aliuloj, li plene sin fordonis al la plej ŝatata okupo – rememoroj pri la gepatra vilaĝo. Oni ne povas diri, ke li sopiris je ĝi: li scias, ke ĉiulunde li ekvidos kaj patron, kaj patrinon. Li nur pensis, kiel iam, somere, estos bone veturi hejmen, li denove povos libere kuradi tra paŝtejoj, sidi apud rivero aŭ vadi en ĝi kaptante karasojn; tiuj pensoj estis pli gajaj, brilaj kaj klaraj, ol enuaj, malgajaj. La eta Mirono lukse dronis en la naturbelec, kiu disfloris en lia imago inter la grizaj, malvarmaj muroj de bazilana lernejo, li tute ne pensis pri la minaco, proksimiĝanta al la klaso.

– Hej, kial vi ne adaptas vian kajeron por skribado? – mallaŭte demandis Mironon unu el najbaroj, frapetante lian talion.

– Kion? – respondis Mirono, malkarese vekita de sia ora sonĝo.

– Adaptu kajeron por skribado! – ripetis la kamarado kaj montris al Mirono, kiel meti kajeron, kiel inkujon kaj plumon laŭ la instrukcioj de sinjoro Valko.

– Li jam iras, jam iras! – la flustro vastiĝis tra la klasĉambro kvazaŭ dum proksimiĝo de iu terura caro. En la koridoro eksonis paŝoj de la instruisto. Poste rapide malfermiĝis la klaspordo, kaj Valko eniris. Mirono ekrigardetis lin. La instruisto stature tute ne similis al iu caro. Li estis mezalta viro, kun mallonge tonditaj haroj sur ronda virŝafeca kapo, kun flavruĝaj mallongaj lipharoj kaj flavruĝa hispana barbeto. Lia larĝa vizaĝo kaj larĝaj, forte reliefigantaj vangostoj kune kun grandaj, flanke elstarantaj oreloj donis al li aspekton de stulta obstineco kaj viandmanĝeco. Malgrandaj bufaj okuloj sidis profunde en la kavoj kaj palpebrumis de tie iel kolere kaj malagrabla.

– Nu! – ekkriis li timige, ferminte malantaŭ si la pordon kaj svingante per kana fleksebla vergo. Kaj de tiu krio, kvazaŭ de vento dum nebula somera tago kune kliniĝas sekal-spikoj, tiel same kliniĝis kapoj de okdek kvin lernantoj super

blue-kaj-ruĝe liniigitaj skribkajeroj. En la mano de ĉiu lernejo tremis plumo. Nur unusola eta Mirono, kiu ankoraŭ ne konis la naturon de Valko, sidis, turninte la vizaĝon al la klaso, kaj fiksigardis la novan instruiston.

– Kaj vi? – brute ekkriis Valko kaj direktis la paŝojn al la knabo.

La eta Mirono rigidiĝis de la subita timo. Li iel senkonscie turniĝis kaj kunmetis sian korpon en tiun pozicion, en kiu jam dum la minuto tremis liaj kamaradoj.

Valko prenis kreton, proksimiĝis al la tabulo, levis la manon kaj ekskribis. Dekomence li skribis nur literojn, majusklojn kaj minusklojn, vokalojn kaj konsonantojn, sen iu, tamen, senco. Sed poste li transiris al vortoj, kaj finfine – al tutaj frazoj, kiel, ekzemple: “Dio kreis la mondon”, “Homo havas du brakojn”, “Tero estas nia patrino”. Elĉerpinte tiamaniere sian saĝecon, montrante entute sian konon de kaligrafio per multnombraj kurbaĵoj kaj longaj, kiel mondo, kaj rektaj, kiel kolbasoj, finaĵoj, Valko metis la kreton, paŝetis malantaŭen, ankoraŭfoje rigardetis kun plaĉo plenskribitan tabulon kaj post tio, turniĝinte al la tremanta klaso, terure ekkriis:

– Skribu!

En tiu momento feliĉe finiĝis lia sciencia agado – nun komenciĝas lia bienestra agado. Por montri tion ilustre, li plenforte ekskuis la fingrojn por disblovi de ili sciencan kretan polvon, kaj anstataŭ la kreto li prenis en manon sian vergon. Kaj kvazaŭ aglo desupre sekvas la predon, samtiel ankaŭ li, observante la klason, deiris de la podio kaj komencis sian ĉirkaŭiradon.

La unua, al kiu kondukis lin lia malĝoja fortuna, estis iu malgranda, malforta kaj tre timigita lernanto. Li, kliniĝinte super la kajero, ŝvitante laboris tutforte por teni la plumon en la tremantaj fingroj, kaj ĉiun momente li rigardis la tabulon, penante surpaperigi la samajn hoketojn, kolbasojn kaj kurbaĵojn, kiujn surtabuligis la sperta mano de la bienestro. Sed ve, lia mano tremis, hoketoj, kolbasoj kaj kurbaĵoj rezultis rompigitaj, nerektaj – eĉ la malobeema plumo ĉiusekunde turniĝis en la fingroj, knaris, ŝprucis, kvazaŭ ĝi koleris kontraŭ io kaj deziris plej rapide liberiĝi.

Valko staris super li, kvazaŭ ekzekutisto, kaj, kolere ridetante, dirinte nek unu vorton, fiksrigardis lian skribon. La povra knabo eksentis malfeliĉon kaj finperdis regopovon super sia mano kaj super la malobeema plumo.

– Vi do tiel skribas? – malrapide siblis Valko, sed lia vergo rapide fajfis en la aero kaj serpente ĉirkaŭis la ŝultrojn de la povrulo.

– Oj-oj-oj! – ekkriegis li, sed li tuj eksilentis, renkontinte minacan kanajlan rigardon de la instruisto.

– Ĉu vi ne povas skribi pli bone? – demandis Valko.

– Povas, povas! – balbutis la knabo, ne sciante mem, kion li balbutas.

La instruisto-bienestro, eble, efektive kredis, ke la knabo scipovas skribi pli bone kaj nur malboncele penas skribi malbone, aŭ, eble, pro granda amo al lia vergo.

– Nu, estu singarda! – kaj Valko pluiris, ne konvinkiĝinte, kiujn savantajn fruktojn donis lia detala instruado. Kvankam li estis indiferenta al tiuj fruktoj – li jam estis nur bienestro, kaj ne pli. Liaj okuloj jam turniĝis aliflanken, kaj en alia klasangulo ili ekvidis alian viktimon. Tie sidis judeto, kiu laŭ la antikva kutimo de sia gento skribis kontraŭe, peninte ellabori valkajn kaligrafiaĵojn de dekstra mano al maldekstra, de la fino de la linio ĝis la komenco. Unuan linion li jam finskribis tiamaniere kaj nome ekkomencis la duan de la vortoj “iskre oid nodnom”. Skribita, jam preta linio aspektis pli-malpli normale, sed la nova, ankoraŭ ne finita, komencita de l’fino, pikis okulojn de Valko.

– Kiel vi skribas, Moseo? – ekkriis li, alsaltinte al la knabo.

Valko ĉiujn judojn de la klaso nomis “Moseo”, se ili ne estis filoj de riĉaj urbaj “asoj”, kiujn li alte respektis. La judeto, kiu nomiĝas Jonas Turteltaub, aŭdinte tiun krion kaj ekvidinte atakantan malamikon, konfuziĝis kaj kunpremiĝis, kiel heliko en sia dometaĉo, kaj ĉesis skribon.

– Ha, ha, ha! – ridegis Valko, trarigardante la skribaĵon.

– Sinjoro profesoro... – ekbalbutis la knabo.

– Iru tien ĉi!

Kaj, ne atendante, kiam Jonas ekstaros de la benko, li kaptis lin je la orelo kaj trenis ĉambromezen.

Pro la aspekto de la povra Jonĉjo, kunpremita, tremanta kaj salivanta pro timo, la tuta klaso laŭte ekridegis, kvankam ĉiu mem tremis kaj ŝrumpis. Sed tia estas la forto de tirana premo: sufiĉas por tirano ekrideti, kaj ĉiuj, starantaj sub la tirana jugo, ekridegos, malgraŭ ke ili ridegas pri sia propra malfeliĉo.

– Iru al la tabulo! Skribu, ek! – Valko forviŝis per la mano parton de sia skribaĵo kaj enpremis kreton en la knaban manon. Judeto ekskribis laŭ sia kutimo, de la fino. La klaso denove ekridegis, Valko ekrideitis, sed li tuj kuntiris la brovojn, turnis sin al la lasta benko, kie sidis la plej grandaj kaj fortaj knaboj, kaj ordonis:

– Hej, donu al li!

La knabeto ektemis per la tuta korpo kaj ion ekbalbutis, sed du kamaradoj-kunlaborantoj rapide alkuris kaj kondukis lin sur la podion. La klaso eksilentis. Anstataŭ rido, paleco aperis sur ĉies vizaĝo, – nur doloriga kvikado de Jonĉjo sonis inter la ŝtonaj muroj de la bazilana monaĥejo.

– Sufiĉas por li! – diris Valko, kaj Jonĉjo ploretante iris al sia loko. Plenuminte tiun alt-pedagogian aferon, Valko denove ekiris tra la klaso kaj denove ŝutiĝis frapoj de lia vergo sur la ŝultrojn kaj manojn de la povraj knaboj.

Malfacile priskribi per vortoj, kiel impresis Mironon tiu instruado. Li tremis, kvazaŭ pro la febro; en liaj oreloj bruis, kaj ĉio turniĝis en liaj okuloj, kiel dum uragano. Ŝajnis al li, ke la uragano trafos ankaŭ lin, ke ĉiu bato de la terura instruisto estos falanta sur li. Skribitaj vortoj kaj linioj saltis antaŭ liaj okuloj, pufiĝis kaj intermiksiĝis, ili aspektis eĉ pli malbone, ol ili efektive estis. Li mem ne sciis, kiam li ĉesis skribon, – griza vualo staris antaŭ liaj okuloj.

– Ĉu vi tiel skribas? – ekkriis Valko super lia kapo.

Mirono ektemis, ekkaptis la plumon, enigis ĝin en la inkujon kaj tiris tra la papero, kvazaŭ virbovon per kornoj.

– Ĉu vi ne scias, kiel oni devas teni plumon?

– Ne scias! – ekflustris Mirono.

– Kion? – ekmuĝis Valko. – Ĉu mi ne montris al vi jam dekfoje, ne unufoje?

Per mirigitaj okuloj Mirono fiksrigardis la kolerigitan vizaĝon de Valko. Sed anstataŭ respondo Valko per kunpremita pugno frapis la knabon kontraŭ la vizaĝo.

La eta Mirono, kvazaŭ falĉita, falis sur la benkon, kaj de la benko – planken. La sango aspergis lian vizaĝon.

– Levu lin! – ekkriis Valko. De la malantaŭa benko alsaltis duopo, la sama, kiu antaŭ kelkaj minutoj “instruis” Jonĉjon, kaj levis senkonscian Mironon. Lia kapo ne fiksiĝis vertikale kaj kliniĝis malsupren, kiel tiu de mortinto.

– Alportu akvon! – pluordonis Valko kaj ankoraŭfoje rigardis Mironon.

– Kiu estas tiu knabo? – demandis li.

– Mirono, – respondis la “cenzuristo”, la plej aĝa kaj la plej forta ulo en la klaso, al kiu la pastroj komisiis kontroli la kamaradojn.

– Kio li estas? – plu demandis Valko.

– Filo de iu kamparulo el N...

– Kamparula filo! Fi, pro kia diablo tiuj kamparuloj enŝoviĝas tien ĉi! – pepis Valko. Li elspiris libere. Li iomete ektimis pro sia ago, sed “kamparula filo” signifas, ke oni rajtas bati kaj ofendi, neniuj protektas “kamparulan filon”.

Valko ne miskalkulis. Neniu defendis la kamparulan filon. Nehoma ago de la instruisto-bienestro pasis por li glate, same kiel aliaj liaj brutaj agoj. Nur en la koro de la kamparula filo ĝi ne pasis glate, sed fariĝis la unua semo de indigno, males-timo kaj eterna malamikeco kontraŭ ĉiuspeca subpremo kaj tiranio.

* schön Schreiben – kaligrafio (de la germana)

** Drohobich – urbo en Okcidenta Ukrainio

Tradukis Viktor Pajuk (Ukrainio/Usono)

Ivan Franko [frankó] (27-a de aŭgusto 1856 – 28-a de majo 1916) estas elstara ukraina verkisto, poeto, sciencisto, ĵurnalisto, tradukisto kaj politika aktivulo. Ĉi-jare oni festas 150-jariĝon de lia naskiĝo. Tiu ĉi rakonto estis verkita en 1884.

La Elefantido



Rudyard Kipling

MALPROKSIMTEMPE la Elefanto, ho mia Plej Amata, ne havis rostron. Li havis nur nigretan ŝvelaĉan nazon, tiel grandan kiel boto, kiun li povis tordi flanken; sed li ne povis levi aĵojn per ĝi. Sed estis unu Elefanto – nova Elefanto – Elefantido, – kiu estis plena de nesatigebla sciv'lemo, kaj ĉi tio signifas, ke li faris multege da demandoj. Kaj li loĝis en Afriko, kaj li plenigis Afrikon per sia 'satigebla sciv'lemo. Li demandis al sia alta onklino, la Struto, kial ŝiaj vostplumoj kreskas tiele, kaj lia alta onklino la Struto pugfrapis lin per sia dura, dura ungego. Li demandis al sia alta onklo, la Ĝirafano, kio faras lian haŭton makulita, kaj lia alta onklo, la Ĝirafano, pugfrapis lin per sia dura, dura hufo. Kaj tamen li estis plena de 'satigebla sciv'lemo! Li demandis al sia larĝa onklino, la Hipopotamo, kial ŝiaj okuloj estas ruĝaj, kaj lia larĝa onklino, la Hipopotamo, pugfrapis lin per sia larĝa, larĝa hufo; kaj li demandis al sia vila onklo, la Paviano, kial melonoj odoras tiele, kaj lia vila onklo pugfrapis lin per sia vila, vila mano. Kaj tamen li estis plena de 'satigebla sciv'lemo! Li faris demandojn pri ĉio, kion li vidis, aŭ aŭdis, aŭ sentis, aŭ flaris, aŭ palpis, kaj ĉiuj liaj geonkloj pugfrapis lin. Kaj tamen li estis plena de 'satigebla sciv'lemo!

Unu belan matenon, meze de la Precesio de la Ekvinoj, ĉi tiu 'satigebla Elefantido faris novan belan demandon, kiun li ankoraŭ neniam faris. Li deman-

dis, “Kion manĝas la Krokodilo?” Tiam diris ĉiuj, “Ĉi!” laŭte kaj terurvoĉe, kaj ili lin tuj kaj senpere pugfrapis, longe sen halti.

Post nelonge, post kiam tio finiĝis, li trafis Kolokolobirdon sidantan meze de zizifo, kaj li diris, “Mia patro pugfrapis min kaj mia patrino pugfrapis min; ĉiuj miaj geonkloj pugfrapis min pro mia 'satigebla sciv'lemo; kaj tamen mi volas scii, kion manĝas la Krokodilo!”

Tiam diris Kolokolobirdo ĝemante, “Iru al la bordoj de la grandega grizverda grasa Rivero Limpopo, tute ĉirkaŭita de eŭkaliptoj, kaj sciigu.”

Frumatene, kiam nenio restis de la Ekvinoksoj, ĉar la Precesio procedis laŭprecedente, ĉi tiu 'satigebla Elefantido prenis cent funtojn da bananoj (de la speco malgranda, mallonga kaj ruĝa), kaj cent funtojn da sukerkano (de la speco longa kaj purpura), kaj dek sep melonojn (de la speco verdeta-kraketa), kaj diris al ĉiuj siaj karaj familioj, “Adiaŭ. Mi iras al la grandega grizverda grasa Rivero Limpopo, tute ĉirkaŭita de eŭkaliptoj, por sciigi, kion la Krokodilo manĝas.” Kaj ili ĉiuj ankoraŭfoje pugfrapis lin por bonŝanco, kvankam li petis ilin, tre ĝentile, ke ili ĉesu.

Tiam li ekiris, varmeta sed tute ne surprizita, manĝante melonojn, kaj diŝetante la ŝelon, ĉar li ne povis kolekti ĝin.

Li iris de Graham's Town al Kimberley, kaj de Kimberley al la Lando de Khama, kaj de la Lando de Khama li iris orienten kaj norden, daŭre manĝante melonojn, ĝis li finfine venis al la bordoj de la grandega grizverda grasa Rivero Limpopo, tute ĉirkaŭita de eŭkaliptoj, ĝuste kiel diris Kolokolobirdo.

Nu vi devas kompreni, ho mia Plej Amata, ke ĝis ĉi tiu sama semajno, kaj tago, kaj horo, kaj minuto, ĉi tiu 'satigebla Elefantido neniam vidis Krokodilon, kaj li ne sciis, kia estas li. Estas entute lia 'satigebla sciv'lemo.

La unuan aĵon, kiun li eltrovis,

estis Dukolora-Rokloĝanta-Pitono, volvita ĉirkaŭ roko.

“Pardonu min,” diris ĝentilege la Elefantido, “sed ĉu vi vidis tiaĵon, kia Krokodilo ĉi-proksime?”

“Ĉu mi vidis Krokodilon?” diris la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono, terure malestime. “Kion vi demandos al mi poste?”

“Pardonu min,” diris la Elefantido, “Ĉu vi povas bonvole diri al mi, kion li manĝas?”

Tiam la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono rapide malvolvis sin de la roko, kaj pugfrapis la Elefantidon per sia skvama, vipa vosto.

“Jen strangajo,” diris la Elefantido, “ĉar mia patro kaj mia patrino, kaj mia onklo kaj mia onklino, sen menci mian alian onklinon, la Hipopotamon, kaj mian alian onklinon, la Pavianon, ĉiuj min pugfrapis pro mia 'satigebla sciv'lemo, kaj mi supozas, ke ĉi tio estas la samo.

Do li ĝentilege diris adiaŭ al la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono kaj helpis lin denove volvi sin sur la roko, kaj ekiris, varmeta sed tute ne surprizita, manĝante melonojn, kaj diŝetante la ŝelon, ĉar li ne povis kolekti ĝin, ĝis li surtretis tion, kion li pensis esti

ŝtupo, ĝuste ĉe la bordo de la grandega grizverda grasa Rivero Limpopo, tute ĉirkaŭita de eŭkaliptoj.

Sed ĝi vere estis la Krokodilo, ho mia Plej Amata, kaj la Krokodilo palpebrumis per unu okulo – tiele!


“Pardonu min,” diris ĝentilege la Elefantido, “ĉu vi eble vidis Krokodilon ĉi-proksime?”

Tiam la Krokodilo palpebrumis per la alia okulo, kaj levis duonon de sia vosto el la koto, kaj la Elefantido ĝentilege paŝis malantaŭen, ĉar li ne volis, ke oni lin pugfrapu denove.

“Venu ĉi tien, Etulo,” diris la Krokodilo. “Kial vi demandas tiaĵojn?”

“Pardonu min,” diris ĝentilege la Elefantido, “sed mia patro min pugfrapis, mia patrino min pugfrapis, sen menci mian altan onklinon, la Struton, kaj mian altan onklon, la Ĝirafon, kiu povas hufbati tre forte, ankaŭ mian larĝan onklinon, la Hipopotamon, kaj mian vilan onklon, la Pavianon, kaj inkluzo la Dukoloran-Rokloĝantan-Pitono, kun la skvama, vipa vosto, proksime en la bordo, kiu pugfrapas pli forte ol ĉiuj aliaj; kaj do, se al vi estas egale, mi ne volas, ke oni min pugfrapu plu.”

“Venu ĉi tien, Etulo,” diris la Krokodilo, “ĉar mi estas la Krokodilo,” kaj li ploris krokodi-



lajn larmojn por montri, ke tio estas vero.

Tiam la Elefantido senspiriĝis, kaj anhelis, kaj genuis sur la bordon kaj diris, “Vi estas la persono mem, kiun mi serĉas dum ĉi tiuj longaj tagoj. Bonvolu diri al mi, kion vi manĝas.”

“Venu ĉi tien, Etulo,” diris la Krokodilo, “kaj mi flustros.”

Tiam la Elefantido klinis sian kapon apud la moska, dentegplena buŝo de la Krokodilo, kaj la Krokodilo kaptis lian nazon, kiu ĝis ĉi tiu semajno, tago, horo, kaj minuto mem, ne estis pli granda ol boto, kvankam multe pli utila.

“Mi pensas,” diris la Krokodilo – kaj li diris ĝin inter siaj dentoj, tiele – “Mi pensas, ke hodiaŭ mi komencos per Elefantido!”

Je tio, ho mia Plej Amata, la Elefantido estis multe ĝenata, kaj li diris, parolante tra la nazo, tiele, “Lasu bin! Vi bin dolorigas!”

Tiam la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono glitis de la bordo kaj diris, “Mia juna amiko, se vi nun, tuj kaj tuje, ne tiros tiel forte kiel vi povas, miaopinie via konato, vestita per la granda brilleda palto” (kaj per tio, li celis la Krokodilon) “vin ektiros en tiun foran klaran rivereton en okula ekmovi.”

Tiel ĉiam parolas Dukoloraj-Rokloĝantaj-Pitonoj.

Tiam la Elefantido kaŭriĝis, kaj tiris, kaj tiris, kaj tiris, kaj lia nazo komencis streĉiĝi. Kaj la Krokodilo baraktis en la akvo, farante ĝin kremeca per svingegoj de la vosto, kaj li tiris, kaj tiris, kaj tiris.

Kaj la nazo de la Elefantido daŭre streĉiĝis; kaj la Elefantido etendis siajn kvar kruretojn kaj tiris, kaj tiris, kaj tiris, kaj lia nazo daŭre streĉiĝis; kaj la Krokodilo draŝis sian voston kiel remilon, kaj li tiris, kaj tiris, kaj tiris, kaj je ĉiu tiro la nazo de la Elefantido longiĝis kaj longiĝis – kaj tio doloriĝis lin terure!

Tiam la Elefantido sentis, ke liaj kruroj ekglitas, kaj li diris tra sia nazo, kiu jam estis proksimume kvin futojn longa, “Tio ja estas tro por bi!”

Tiam la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono alvenis de la bordo, kaj volvis sin en boatistan nodon

ĉirkaŭ la malantaŭaj kruroj de la Elefantido, kaj diris, “Malprudenta kaj nesperta vojaĝanto, ni nun serioze dediĉos nin al iom da forta tensio, ĉar se ni ne faros tion, mi havas la impreson, ke tiu fora sinpelanta militŝipo kun kirasa supra ferdeko” (kaj per tio, ho mia Plej Amata, li celis la Krokodilon), “definitive difektos vian venontan karieron.”

Tiel ĉiam parolas ĉiuj Dukoloraj-Rokloĝantaj-Pitonoj.

Do li tiris, kaj la Elefantido tiris, kaj la Krokodilo tiris; sed la Elefantido kaj la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono tiris pli forte; kaj fine la Krokodilo lasis la nazon de la Elefantido kun plaŭ, kiun oni povis aŭdi laŭlonge de Limpopo.

Tiam la Elefantido forte kaj subite sidigis; sed unue li atente diris “Dankon” al la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono; kaj poste li dorlotis sian kompatindan tiritan nazon, kaj li volvis ĝin en malvarmetaj bananofolioj, kaj tremis ĝin en la grandega grizverda grasa Limpopo, por ke ĝi malvarmiĝu.

“Kial vi faras tion?” diris la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono.

“Pardonu min,” diris la Elefantido, “sed mia nazo estas tre misformita, kaj mi atendas ĝis kiam ĝi ŝrumpo.”

“Do vi devos longan tempon atendi,” diris la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono. “Tuj ne scias, kio estas bona por ili.”

La Elefantido sidis tie dum tri tagoj, atendante, ke lia nazo mallongiĝos. Sed ĝi neniam mallongiĝis, kaj, plue, ĝi igis lin strabi. Ĉar, ho mia Plej Amata, vi vidis kaj komprenis, ke la Krokodilo tiris ĝin ĝis vera rostro, sama kiel ĉiuj Elefantoj havas hodiaŭ.

Fine de la tria tago, muŝo venis kaj pikis lin sur la ŝultro, kaj antaŭ ol li sciis, kion li faras, li levis sian rostron kaj mortfrapis tiun muŝon per ĝia pinto.

“Vantaĝo numero unu!” diris la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono. “Vi ne povus fari tion per nura nazo. Nun provu manĝi ion.”

Antaŭ ol li pensis, kion li faras, la Elefantido elŝovis la rostron kaj plukis faskegon da herboj, batis ĝin kontraŭ siaj antaŭaj kruroj, kaj ŝovis ĝin en sian pro-



pran buŝon.

“Vantaĝo numero du!” diris la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono. “Vi ne povus fari ĉi tion per nura nazo. Ĉu vi ne opinias, ke la suno estas tre varma ĉi tie?”

“Jes ja,” diris la Elefantido, kaj antaŭ ol pensi, kion li faras, li ŝovelis plensovelon da koto de la bordoj de la grandega grizverda grasa Limpopo, kaj li ŝmiris ĝin sur la kapo, kie ĝi faris malvarmetan, ŝliman kotĉapon tute fluetan malantaŭ liaj oreloj.

“Vantaĝo numero tri!” diris la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono. “Vi ne povus fari tion per nura nazo. Nu kion vi opinias pri denove esti pugfrapita?”

“Pardonu min,” diris la Elefantido, “sed tio tute ne plaĉus al mi.”

“Ĉu al vi plaĉus pugfrapi iun?” diris la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono.

“Tio vere plaĉus al mi,” diris la Elefantido.

“Nu,” diris la Dukolora-Rokloĝanta-Pitono, “vi eltrovos,

ke via nova nazo estos tre utila por pugfrapi aliajn.”

“Dankon,” diris la Elefantido, “mi memoros tion; kaj nun mi pensas, ke mi iros hejmen al ĉiuj miaj karaj familioj kaj mi tion provos.”

Do la Elefantido iris hejmen trans Afrikon, balancante kaj kirlante sian rostron. Kiam li volis manĝi frukton, li tiris frukton el arbo, anstataŭ esperi, ke ĝi falu, kiel li antaŭe faris. Kiam li volis herbon, li plukis herbon el la tero, anstataŭ genuiĝi, kiel li antaŭe faris. Kiam lin mordis muŝoj, li derompis branĉon de arbo por uzi ĝin kiel muŝfrapilon; kaj li faris al si novan, malvarman, ŝliman kotĉapon kiam ajn la suno estis varma. Kiam li sentis sin soleca, piedirante trans Afrikon, li kantis al si per sia rostro, kaj la bruo estis pli laŭta ol pluraj blovorkestroj.

Li intence devojiĝis por trovi larĝan Hipopotamon (ŝi ne estis parenco lia), kaj li tre forte pugfrapis ŝin, por certigi, ke la

Dukolora-Rokloĝanta-Pitono vere parolis pri lia nova rostro. La ceteron de la tempo li kolektis la melonŝelojn, kiujn li lasis fali survoje al Limpopo – ĉar li estis Ordema Pakidermo.

Vespere li revenis al ĉiuj siaj karaj familioj, kaj li volvis sian rostron kaj diris, “Kiel vi fartas?” Ili ekĝojis en sia koro, kiam ili vidis lin, kaj tuj diris, “Venu ĉi tien, por ke ni pugfrapu vin pro via ŝatigebla sciv’lemo.”

“Ba,” diris la Elefantido. “Mi opinias, ke vi ĉiuj ne scias ion ajn pri pugfrapado; sed mi ja scias, kaj mi montras al vi.” Tiam li malvolvis sian rostron kaj tute renversis du el siaj karaj fratoj.

“Ho Bananoj!” diris ili, “kie vi lernis tiun artifikon, kaj kion vi faris al via nazo?”

“Mi ricevis novan de la

Krokodilo ĉe la bordoj de la grandega grizverda grasa Rivero Limpopo,” diris la Elefantido. “Mi demandis al li, kion li manĝas, kaj li donacis al mi ĉi tion.”

“Laŭ mi, ĝi ŝajnas malbela,” diris lia vila onklo, la Paviano.

“Vere,” diris la Elefantido. “Sed ĝi estas tre utila,” kaj li levis sian vilan onklon, la Pavianon, per lia vila kruro, kaj kroĉis lin ĉe krabrujo.

Tiam tiu malbona Elefantido longtempe pugfrapis ĉiujn siajn karajn familiojn, ĝis kiam ili estis tre varmaj kaj tre surprizitaj. Li eltiris la vostplumojn el sia alta onklino Struto; kaj li kaptis sian altan onklon, la Ĝirafon, per la malantaŭa kruro, kaj trenis lin tra akacio; kaj li kriis al sia larĝa onklino, la Hipopotamo, kaj li blovis bobelojn en ŝian

orelon kiam ŝi dormis en la akvo post manĝado; sed li neniam permesis, ke iu ajn tuŝu Kolokolobirdon.

Finfine ĉio tiel ekscitiĝis, ke liaj karaj familioj rapide unuope foriris al la bordoj de la grandega grizverda grasa Rivero Limpopo, tute ĉirkaŭita de eŭkaliptoj, por pruntepreni novan nazon de la Krokodilo. Kiam ili revenis neniun plu pugfrapis iun; kaj ekde tiu tempo, ho mia Plej Amata, ĉiuj la Elefantoj, kiujn vi vidis, krom tiuj, kiujn vi ne vidis, havas rostrojn egalajn al la rostro de la ŝatigebla Elefantido.

Trad. Geoff Yeowell
Desegnaĵoj de R. Kipling

In Other Words...

Dum lastaj dek jaroj kiam William Auld redaktis la revuon *La Brita Esperantisto* tie aperis rubriko "Traduku". En tiu rubriko oni aperigis tekstojn en la angla (el revuoj, gazetoj, literaturaj verkoj) kaj proponis traduki ilin en Esperanton. La legantoj sendis siajn variantojn de traduko, kaj fine en la revuo aperis la plej bonaj tradukoj, kun la komentoj de la redaktoro. Tiu ĉi rubriko fariĝis unu el la plej popularaj rubrikoj de la revuo, kaj ni senhonte ŝtelis la ideon (dank' al nia prezidanto, Filipo Dorcas). Sed ni plivastigos tiun ĉi ideon, kaj proponos al la tradukado ne nur anglajn tekstojn, sed ankaŭ Esperantajn tekstojn, ja foje estas eĉ pli malfacile traduki tekstojn el Esperanto en naciajn lingvojn. Sed ni komencu per angla teksto – temas pri la elĉerpaĵo de la rakonto "How I Edited an Agricultural Paper Once" de Mark Twain. Ni planas aperigi la tradukojn en ĉiu sekva numero, do, sendu viajn variantojn de traduko ĝis la unua de novembro, 2006.

"Tell you, you cornstalk, you cabbage, you son of a cauli-

flower! It's the first time I ever heard such an unfeeling remark. I tell you I have been in the editorial business going on fourteen years, and it is the first time I ever heard of a man's having to know anything in order to edit a newspaper. You turnip! Who write the dramatic critiques for the second-rate papers? Why, a parcel of promoted shoemakers and apprentice apothecaries, who know just as much about good acting as I do about good farming and no more. Who review the books? People who never wrote one. Who do up the heavy leaders on finance? Parties who have had the largest opportunities for knowing nothing about it. Who criticise the Indian campaigns? Gentlemen who do not know a war-whoop from a wigwam, and who never have had to run a foot-race with a tomahawk or pluck arrows out of the several members of their families to build the evening camp-fire with. Who write the temperance appeals and clamor about the flowing bowl? Folks who will never draw another sober breath till they do it in the grave. Who edit the agricultural papers, you -- yam? Men, as a

general thing, who fail in the poetry line, yellow covered novel line, sensation-drama line, city-editor line, and finally fall back on agriculture as a temporary reprieve from the poor-house. You try to tell me anything about the newspaper business! Sir, I have been through it from Alpha to Omaha, and I tell you that the less a man knows the bigger noise he makes and the higher the salary he commands. Heaven knows if I had but been ignorant instead of cultivated, and impudent instead of diffident, I could have made a name for myself in this cold, selfish world. I take my leave, sir. Since I have been treated as you have treated me, I am perfectly willing to go. But I have done my duty. I have fulfilled my contract, as far as I was permitted to do it. I said I could make your paper of interest to all classes, and I have. I said I could run your circulation up to twenty thousand copies, and if I had had two more weeks I'd have done it. And I'd have given you the best class of readers that ever an agricultural paper had -- not a farmer in it, nor a solitary individual who could tell a watermelon from a peach-vine to save his life. You are the loser by this rupture, not me, Pie-plant. Adios." I then left.

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2006

POEZIO: 1-a premio: Francisco Javier Moleón (Hispanio) pro "Sed tiam" kaj Christian Rivière (Francio) pro "Kvankam silenti"; 2-a premio: Neide Barros Rego (Brazilo) pro "Mistero"; 3-a premio: Helena Melnikova (Rusio) pro "Mia lando". Partoprenis 33 verkoj de 18 aŭtoroj el 12 landoj.

PROZO: 1-a premio: Paul Gubbins (Britio) pro "Nia paradizo bonvenigas"; 2-a premio: Tim Westover (Usono) pro "Meduzet"; 3-a premio: Sten Johansson (Svedio) pro "Tomatoj el Nederlando" kaj Lena Karpunina (Germanio) pro "Trove kaj perdi". Partoprenis 17 verkoj de 11 aŭtoroj el 9 landoj.

ESEO: Premio "Luigi Minnaja": Aleksandr Melnikov (Rusio) pro "Ekparolu por ke mi vin vidu — aŭ ĉu esperantisto rekoneblas laŭ paroloj"; 2-a premio: Christian Rivière (Francio) pro "Tamen kompreni" kaj Jan Werner (Ĉeĥio) pro "Pri bono, malbono kaj multkulturismo"; 3-a premio: ne aljuĝita; honora mencio: Anna Bennett (Usono) pro "Neperforta komunikado". Partoprenis 9 verkoj de 9 aŭtoroj el 8 landoj.

TEATRAĴO: 1-a kaj 2-a premioj: ne aljuĝitaj; 3-a premio: Marko Nikolić (Serbio) pro "Nia diligenta kolegaro"; honora premio Li Shijun (Laŭlum; Ĉinio) pro "Cignoĵ". Partoprenis 4 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

KANTO: 1-a premio: ne aljuĝita; 2-a premio: Anja Karkiainen (Finlando; teksto) kaj Tarcisio José de Lima (Brazilo; muziko) pro "Multe pli ol simpati" kaj pro "Oraj horoj"; 3-a premio: ne aljuĝita. Partoprenis 12 kantoj de 10 aŭtoroj el 5 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO 2005: "Arne, la ĉefido" de Leif Nordenstorm (Svedio), eldonita de Kava-Pech (Ĉeĥio). Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

FILMO: 1-a kaj 2-a premioj: ne aljuĝitaj; 3-a premio: Joe Bazilio Costa (Brazilo) pro "Tiel estas la vivo"; honora mencio: Kim Henriksen (Danlando) pro "Tri muzikvideoj". Partoprenis 2 konkursaĵoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

Gazetaraj komunikoj de UEA



Anna Bennett ricevas la diplomon

A Universal Code of Ethics

Maurice Wittenberg

The world sorely needs an ethics that can be universally accepted. Here is one, written in English and Esperanto.

Ethics can be based on environmental considerations, with the general rule *Do not pollute the environment for others*. Everyone on earth wants to live in a good environment, and therefore the rule can be universally accepted and serve as an *interethics*. Here are new Ten Commandments, based on this rule:

1. Do not pollute the air, water, or soil; do not waste fossil fuels; do not destroy trees or other greenery; do not generate excessive garbage.
 2. Do not pollute your community with noise, graffiti, or litter.
 3. Do not have too many children, adding to the already too high world population and its accompanying pollution and drain on the earth's resources.
 4. Do not neglect the education of your children or educate them wrong.
 5. Do not be careless in doing things that affect others, such as your work, driving, or maintenance of your health.
 6. Do not sell or use narcotics or other addictive substances.
 7. Do not assault or murder.
 8. Do not molest or rape.
 9. Do not kidnap or unlawfully imprison.
 10. Do not appropriate, damage, or destroy the property of others.
- (In commandments one through five people are *polluters*. In six through ten they are themselves the *pollutants*.)

Some pollution (1–5) is unavoidable in life but to be minimized; being an actual pollutant (6–10) is inexcusable, and such human pollutants should be eliminated from the environment.

Universala Etikokodo

Maurice Wittenberg

La mondo forte bezonas etikon kiu povas esti universale akceptita. Jen unu, verkita en la angla kaj Esperanto.

Oni povas bazi la etikon sur vivmediaj konsideroj, kun la ĝenerala regulo *Ne poluu al la aliaj homoj la vivmedion*. Ĉiu sur la Tero volas vivi en bona vivmedio, kaj tial la regulo povas esti universale akceptita kaj servi por *interetiko*. Jen novaj Dek Ordonoj, bazitaj sur ĉi tiu regulo:

1. Ne poluu la aeron, akvon aŭ grundon; ne malŝparu fosiliajn fuelojn; ne detruu arbojn aŭ alian verdaĵon; ne produktu tro da forĵetaĵoj.
 2. Ne poluu vian komunumon per bruo, murskribaĉoj aŭ rubaĵo.
 3. Ne nask(ig)u tro da infanoj, aldonante al la jam tro granda mondloĝateco kaj ĝiaj akompanantoj: poluado kaj forkonsumado de la provizoj de la tero.
 4. Ne malatentu la edukadon de viaj infanoj nek eduku ilin malĝuste.
 5. Ne estu malzorgema en la farado de aferoj kiuj tuŝas aliajn, kiel via laboro, via ŝoforado aŭ la bontenado de via sano.
 6. Ne vendu nek uzu narkotaĵojn aŭ aliajn maniigaĵojn.
 7. Ne ataku aŭ murdu.
 8. Ne molestu aŭ seksatencu.
 9. Ne homŝtelu aŭ neleĝe malliberigu.
 10. Ne alproprigu, difektu aŭ detruu havaĵojn de la aliaj.
- (En ordonoj unu ĝis kvin la homoj estas *poluanto*. En ses ĝis dek ili estas mem la *poluaĵoj*.)

Iom da poluado (1–5) estas neevitebla en la vivo sed minimumigenda; esti poluaĵo mem (6–10) estas nepardoneble, kaj tiaj homaj poluantoj devus esti forigitaj el la vivmedio.

Kontraŭmilitaj kaj Pacaj Hajkoj

Steve Brewer

Ĉi tiujn hajkojn mi verkis tuj antaŭ kaj tuj post la komenco de la milito en Irako. Mi volis kapti mian koleron kontraŭ la usona registaro kiu forlasis ĉian racion por sekvi unudirektan kaj sensencan vojon al detrua milito. Tuj poste, dum mi vidis kio okazas al la infanoj en Irako, mi rigardis miajn filojn kaj klopodis kapti kiom mi kredas ke oni ŝirmu ĉiujn infanojn de la teroro de milito.

sur la glacion
viro ĉasadas lupon
neaŭskultinte

malhelaj nuboj
knab' surpaŝontas formikojn
sur montetopint'

sovaĝa besto
ulo multfoje batas
liberigas ĝin

malbona viro
mang'igas vian filon
al sovaĝa best'

malhela ĉambro
kuŝe fil' ade spiras
ankoraŭ vivas

miaj infanoj
ridetas, saltas, ludas
tutplenaj je viv'

mi kaptas filon
kaj tenas lin proksime
ĉevala sango!

Rozkruca Kontribuo al Paco

Mi kontribuas al Paco kiam mi strebas esprimi la plej bonan de mi en miaj kontaktoj kun aliaj.

Mi kontribuas al Paco kiam mi uzas mian inteligentecon kaj kapablojn por servi Bonon.

Mi kontribuas al Paco kiam mi sentas kompaton al ĉiuj suferantoj.

Mi kontribuas al Paco kiam mi rigardas ĉiujn kiel miajn fratojn kaj fratinojn senkonsidere rason, kulturon aŭ religion.

Mi kontribuas al Paco kiam mi ĝojas pri la feliĉo de aliaj kaj preĝas por ilia bonfarto.

Mi kontribuas al Paco kiam mi tolereme aŭskultas opiniojn kiuj malsamas de la miaj aŭ eĉ kontraŭas ilin.

Mi kontribuas al Paco kiam mi turnas min al dialogo anstataŭ forto por solvi konfliktojn.

Mi kontribuas al Paco kiam mi respektas la Naturon kaj konservas ĝin por la estontaj generacioj.

Mi kontribuas al Paco kiam mi ne penas trudi mian koncepton pri Dio al aliaj.

Mi kontribuas al Paco kiam mi faras Pacon la fundamento de miaj idealoj kaj filozofio.

Trad. Joel Amis

ROSICRUCIAN DECLARATION OF HUMAN DUTIES

PROLOGUE

As soon as humans became aware of the need to live in organized societies, they created diverse forms of government in order to assure the administration of these societies. To date, it appears that the interests and aspirations of individuals – and more generally nations – are best expressed through democracy. In fact, even though democracy is not perfect and includes many weaknesses, democratic societies are currently those that best protect Human Rights such as they are defined in the Universal Declaration.

Respect for the rights of all is certainly the basis of any democracy. However, any democracy that does not encourage respect for the corresponding duties bears in itself the seeds of decadence and fosters the emergence of a dictatorship. As history has shown, a society's good governance depends on the proper balance between every individual's rights and duties. When that balance is lost, whether at the level of the citizens or of those who govern them, the most extreme totalitarianism takes advantage of the situation and plunges those nations into chaos and barbarism.

At the dawn of the 21st century, we note that in many countries that have enjoyed democracy for a long time, the rights of the citizens are emphasized over the duties that are incumbent on them as human beings, and thus the balance between the former and the latter is, if not lost, at least quite threatened. Being concerned that this imbalance could increase and lead to a deterioration of the human condition in those countries, we submit this Declaration of Human Duties to all those who share our concerns:

DECLARATION

Article 1: It is each individual's duty to respect without reservation Human Rights such as they are defined in the Universal Declaration.

Article 2: It is each individual's duty to respect him- or herself and not to debase his or her body or conscience through behaviors or practices that jeopardize his or her dignity or integrity.

Article 3: It is each individual's duty to respect others, irrespective of race, gender, religion, social status, community, or any other apparently distinctive element.

Article 4: It is each individual's duty to respect the laws of the countries in which he or she lives, being understood that such laws should be based on the respect for the most legitimate rights of individuals.

Article 5: It is each individual's duty to respect the religious and political beliefs of others, as long as they do not harm human beings or society.

Article 6: It is each individual's duty to be benevolent in thoughts, words, and deeds, in order to be an agent of peace in society and an example to others.

Article 7: It is the duty of each individual who is of legal age, and in a fit condition to work, to do so, whether it be to support his or her needs or his or her family's needs, to be useful to society, to grow personally, or simply not to sink into idleness.

Article 8: It is the duty of each individual who is responsible for raising or educating a child to instill the child with courage, tolerance, non-violence, generosity, and more generally, the virtues that will make the child a respectable and responsible adult.

Article 9: It is each individual's duty to assist anyone in danger, whether by direct action, or by doing everything necessary so that qualified or authorized people can act.

Article 10: It is each individual's duty to consider the whole of humanity as his or her family and to behave in all circumstances and everywhere as a citizen of the world. This means making humanism the basis of his or her behavior and philosophy.

Article 11: It is each individual's duty to respect others' goods, whether private or public, individual or collective.

Article 12: It is each individual's duty to respect human life and to consider it the most precious good existing in this world.

Article 13: It is each individual's duty to respect and preserve Nature, so that present and future generations can benefit from it on all planes and consider Nature a universal heritage.

Article 14: It is each individual's duty to respect animals and to truly see them as beings that are not only alive; they are also conscious and feeling.

EPILOGUE

If all humans carried out these fundamental duties, there would be few rights left to demand because everyone would benefit from the respect due to him or her and could live happily in society. This is why any democracy should not confine itself to promoting a "State of Rights," otherwise the balance mentioned in the Prologue cannot be maintained. It is also imperative to advocate for a "State of Duties," so that every citizen expresses what is best in humans in his or her behavior. Only by resting on these two pillars can civilization fully take on the status of humanity.

September 21, 2005

R+C year 3358

www.rosicrucian.org

ROZKRUCA DEKLARACIO PRI HOMAJ DEVOJ

ANTAŬPAROLO

Kiam homoj konsciiĝis pri la bezono vivi en organizitaj socioj, ili kreis diversajn specojn de regado por certigi la administradon de tiuj ĉi socioj. Ĝis nun, ŝajnas ke la interesoj kaj aspiroj de individuoj – kaj pli ĝenerale nacioj – plej bone esprimiĝas per demokratio. Efektive, kvankam demokratio ne estas perfekta kaj enhavas multajn malfortaĵojn, demokratiaj socioj nuntempe estas tiuj kiuj plej bone protektas Homajn Rajtojn kiel ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio.

Respekto por la rajtoj de ĉiu certe estas la bazo de iu ajn demokratio. Tamen, iu ajn demokratio kiu ne antaŭenigas respekton por la respondaj devoj portas en si la semojn de dekadenco kaj nutras la aperon de diktatoreco. Kiel historio montris, la bona regado de socio dependas de ĝusta ekvilibro inter la rajtoj kaj devoj de ĉiu individuo. Kiam tiu ekvilibro perdiĝas, ĉu je la nivelo de la civitanoj aŭ de tiuj kiuj ilin regas, la plej ekstrema totalismo profitas la situacion kaj plonĝigas tiujn landojn en ĥaoson kaj barbarecon.

Je la aŭroro de la 21-a jarcento, ni rimarkas ke en multaj landoj kiuj estas ĝuintaj demokration jam longan tempon, oni pli emfazas la rajtojn de la civitanoj super iliaj naturaj homaj devoj, kaj tiel la ekvilibro inter rajtoj kaj devoj estas, se ne perdita, almenaŭ minacata. Zorgante ke tiu ĉi malekvilibro povus pliiĝi kaj gvidi al degenerado de la homa kondiĉo en tiuj landoj, ni submetas tiun ĉi Deklaracion pri Homaj Devoj al ĉiuj kiuj dividas niajn zorgojn:

DEKLARACIO

Artikolo 1: Estas la devo de ĉiu individuo senrezerve respekti Homajn Rajtojn kiel ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio.

Artikolo 2: Estas la devo de ĉiu individuo respekti sin kaj ne malnobligi sian korpon aŭ konsciencon per kondutoj aŭ praktikoj kiuj endanĝerigas lian/ŝian dignon aŭ honestecon.

Artikolo 3: Estas la devo de ĉiu individuo respekti aliajn homojn, senkonsidere rason, sekson, religion, socian statuson, komunumon, aŭ iun ajn alian ŝajne distingantan elementon.

Artikolo 4: Estas la devo de ĉiu individuo respekti la leĝojn de la landoj en kiuj li/ŝi loĝas, sub la kompreno ke tiuj leĝoj estu bazitaj sur la respekto por la plej pravaj rajtoj de individuoj.

Artikolo 5: Estas la devo de ĉiu individuo respekti la religiajn kaj politikajn kredojn de aliaj homoj, kondiĉe ke ili ne damaĝas homojn aŭ la socion.

Artikolo 6: Estas la devo de ĉiu individuo esti bonkora en pensoj, vortoj kaj faroj, por esti agento de paco en la socio kaj ekzemplo por aliaj.

Artikolo 7: Estas la devo de ĉiu individuo kiu estas en laŭleĝa aĝo, kaj en taŭga kondiĉo por tio, labori, ĉu por subteni siajn bezonojn aŭ la bezonojn de sia familio, por utili al la socio, por kreski persone, kaj por simple ne fali en nenifradon.

Artikolo 8: Estas la devo de ĉiu individuo kiu respondecas pri edukado de infano inspiri en la infano kuraĝon, toleremon, neperfortemon, malavarecon, kaj pli ĝenerale, la virtojn kiuj faros la infanon respektinda kaj respondeca plenkreskulo.

Artikolo 9: Estas la devo de ĉiu individuo helpi endanĝerigiton, ĉu per rekta agado, ĉu per farado de ĉio ebla por ke kvalifikitaj aŭ rajtigataj homoj povu agi.

Artikolo 10: Estas la devo de ĉiu individuo konsideri la tutan homaron sia familio kaj konduti en ĉiuj cirkonstancoj kaj ĉie kiel mond-civitano. Tio signifas ke oni faru humanismon la bazo de sia konduto kaj filozofio.

Artikolo 11: Estas la devo de ĉiu individuo respekti la havaĵon de aliaj, ĉu privata aŭ publika, individua aŭ kolektiva.

Artikolo 12: Estas la devo de ĉiu individuo respekti homan vivon kaj konsideri ĝin la plej valora bono ekzistanta en tiu ĉi mondo.

Artikolo 13: Estas la devo de ĉiu individuo respekti kaj konservi la Naturon, por ke nunaj kaj estontaj generacioj povu ĝui ĝin je ĉiuj niveloj kaj konsideru la Naturon universala heredaĵo.

Artikolo 14: Estas la devo de ĉiu individuo respekti bestojn kaj vere vidi ilin kiel estaĵojn ne nur vivajn; ili estas ankaŭ konsciaj kaj sentantaj.

POSTPAROLO

Se ĉiuj homoj plenumus ĉi tiujn fundamentajn devojn, restus malmultaj rajtoj postulendaj ĉar ĉiu profitus de la respekto ŝuldata al li/ŝi kaj povus vivi feliĉe en la socio. Tial iu ajn demokratio devus ne limigi sin al antaŭenigado de “Ŝtato de Rajtoj”, alie la ekvilibro menciita en la Antaŭparolo ne povas esti konservata. Necesas antaŭenigi ankaŭ “Ŝtaton de Devoj”, tiel ke ĉiu civitano esprimas tion kio plej bonas en homoj per lia/ŝia konduto. Nur apogante sin sur tiuj ĉi du kolonoj povas civilizacio plene preni sur sin la statuson de homaro.

La 21-an de septembro, 2005

Rozkruca Jaro 3358

www.amorc.org

Trad. Joel Amis

La Tagiĝo de la Dioj

La Taina Mito pri Kreado

Carlos Ortiz (traduko kaj enkonduko)

En la lingvo de la tainoj, la vorto “taino” signifis “la bonularo”. La tainoj estis la unua indiana popolo kiun Kristoforo Kolumbo renkontis. Tiam la tainoj loĝis jam delonge en la Kariba Maro, precize en la Grandaj Antiloj kaj Bahamoj. Kiam Kolumbo renkontis la tainojn, li verŝajne tuj pensis ke la indianoj entuziasme forlasos sian religion kaj baldaŭ fariĝos katolikoj. Tiam opinio kaj deziron esprimas ankaŭ lia taglibra enskribo, vendredon la 12-an de oktobro 1492.

Historio preskaŭ tuj malkonfirmis tiujn ĉi vortojn. Lia filo Hernando rakontis ke, kiam la tainoj suspektis ke kristanoj alvenas al vilaĝoj, ili tuj forkaŝis la cemojn (2) de la lokanoj konvertitaj al kristanismo. Verdire, okazis ne ama kaj propravola kredŝanĝo, sed lingva kaj popola detruo. Ne tiom longe poste, jam februare 1512, kaciko (3) Hatueio (4) staris brulonta sub

rigardo de sacerdoto. La sacerdoto instigis Hatueion al kredŝanĝo por ke li iru al la ĉielo. “Ĉu estas tiaj kiel vi en la ĉielo?” demandis Hatueio. La sacerdoto diris ke jes, multaj. Hatueio diris ke li do preferus ne iri tien ĉar ja plej bonus ne vivi akompanata de adorantoj de tiom kruela dio (5). Li preferis ilian naturan dion, Ĝukahuo. Pri tiuj tainaj dioj rakontas al ni portorika aŭtoro Sadí Orsini Luiggi (1938-) en sia hispanlingva libro “Kanto al Cemio”, de kiu mi adaptis kelkajn paĝojn por tiu ĉi teksto (6). Jen la komenco de la rakonto pri kreado laŭ tainoj de la insulo Borinkeno (nuna Porto-Riko).

Tiel ĉi komenciĝas la tainaj mitoj kaj legendoj, la taina religio de la borinkena insularo. Jen parto de ilia kulturo. Tio ĉi estas la rakonto pri tio kiel naskiĝis iliaj dioj.

Ĉio dezerta estis. Regis malpleneco. Sensesence, tede, turnadis la sferoj. Dormanta estis la ĉielo; ĉio dormis. Neniu kuraĝis ĝin vekti el ĝia profunda letargio

pratempe. La tero senhoma estis, same kiel la aliaj astroj. Ne estis Suno nek Luno. Silenta mallumo envolvis la astran movadon. Ne estis nokto nek tago. Ne estis fiŝoj, kokioj (7), birdoj, lampiroj, arboj, konuroj, nek akvo; sed firmamento estis.

En la firmamento ekzistis nur Atabeio. Ŝi kreis ĉielon, sed ne zorgis pri tio kiel enloĝigi ĝin. Multaj jarcentoj pasis antaŭ ol Atabeio konstatis ke io mankas en tiu malluma kosmo.

Sekve, de Atabeio naskiĝis Ĝukahuo kaj lia frato Guakaro. Ŝi formis ilin el la magiaj nevideblaj elementoj de la kosmo. Atabeio jam havis iun al kiu ŝi povis konfidi la kreadon. Ŝia filo Ĝukahuo formus tion kio mankas. Atabeio estis kontentega. Nun ŝia preferata filo estus la plej supera arkitekto de la universo, vivonta en la bela bluejo.

Moŝte rigardante tra la ĉielo, Ĝukahuo meditis. Poste, tero estis kreata: “Tero”, li diris, kaj tero vekigis de sia dormo.

Kaj rigardante la belecon de la tero kaj grandan kavernon kiu formiĝis en ĝi, Ĝukahuo diris: “Eliru el vi Boinaelo kaj Maroĝa por ke vi disradiu lumon sur la teron tage kaj nokte.” Brilante eliris Boinaelo en tiu grandioza momento, dispersante siajn radiojn sur la montojn. Arbe kaj plante, verdaj fariĝis la montoj.

Je noktiĝo, eliris Maroĝa kovrita per sia arĝenta vesto kaj longa hararo brila. Kaj luno disigis mallumon. Por ĉiam malgrandigis ŝi mallumon. Kaj luno ridetadis longe ĉar ŝi projekciis ombrojn kaj briligis la teron. Ekde tiam, Boinaelo kaj Maroĝa dormadas en la kaverno por ripozi de siaj faroj. Do Ĝukahuo kontentiĝis pro la kreado de suno kaj luno.

Tamen, vidante lian vastan faradon, la frato de Ĝukahuo, Guakaro, foriris uragane el kaŝa loko de la firmamento al ankoraŭ nekonata loko kie, verŝajne, li fariĝis Uragano, por ke neniu rekonu lin.

Kreinte Boinaelon por lumigi la tagon kaj Maroĝan por ke ŝi estu diino de la nokto, Ĝukahuo iris trans la ĉielo kiu estis malplena, pensante pri estontaj faroj. Vidante kvar gemojn sur la

tero, li lokis ilin en la bluejon por ke, pere de la ĉiela povo, ankaŭ ili gardu la teron. Poste ili en la ĉielo multoblis ĉiufanken tra la universo, iĝante gvidiloj por la dioj.

Poste, Ĝukahuo finis formi bestaron kaj birdaron kaj iliajn loĝejojn en arboj kaj en kavernoj. Li vidis tiam kiel kreaĵaro manifestiĝas plurforme. “Vi loĝos en arboj kaj faros nestojn”, diris Ĝukahuo. Kaj birdoj flugadis kontentaj. Poste Ĝukahuo pensis pri tio, ke iu kiu ne estas besta nek dia loĝu sur la tero. Li meditis profunde kiel neniam antaŭe faris li. Li volis formi ion subliman.

Tiam formiĝis la unua homo kaj la unua animo. El trueto en la ĉielo, el eta malfermaĵo kiun Ĝukahuo malfermis; de tie prenis li lin. Lokuo li nomiĝis. Lokuo, bona kaj sentimentala, ebria de tiom da beleco, trukuradis montojn kaj valojn ekde aŭroro ĝis krepusko, kaj poste ripozadis.

Jam ĉio havis celon en la vivo. La tero estis donita al la homaro por ke la homo ĝuu ĝin. Li surgeniĝis kaj man-etende dankis ĉielen sian dion, ĝis kiam atingis Ĝukahuo liaj vortoj “Ĝukahuo, Ĝukahuo, grandioza vi estas kaj bona.” Kaj Ĝukahuo kontentiĝis pri tio ke lian faradon homo ŝatas. Kaj okazis ke Lokuo, vidante ke faradoj estas belaj kaj kolorplena, ĉerpis farbon el la plantoj kaj floroj por desegni formojn sur sia bronza haŭto brila. Nun la mondo sekvis vojon pli harmonian.

Sed iun tagon Ĝukahuo rimarkis, ke io malbona agas tra la tero: ke ventoj fojfoje estas tro fortaj, ke dum li harmoniigas, io ie detruadas. Li ekkonsciis pri tio, ke eble anoncas sin lia frato ribela kiu ankaŭ havas di-povojn. Li penis enketi sed neniam sukcesis ĉar lia frato Uragano kaŝis sin, por ke oni ne rekonu lin.

Nun Lokuo estis submetita al nekonata malbona dio kiu aperis neatendite, detruante lian hejmon, detruante ĉion. Kompatinda Lokuo! Nun maltrankvilo plenigis lian vivon, kaj ankaŭ timoj kiujn li ne povis venki krom konsultante la plej superan Ĝukahuo. Li jam ne

povis tiom ĝui la belecon. Nun li devis vivi sub timo, ke Uragano atakos lin, la pova detruanto gvatanta. Oni devis fari cemion por Uragano, teruran ŝtondion.

(1) citata de "Taínos y Caribes" ("Tainoj kaj Kariboj"), p. 3, de Sebastiàn Robiou Lamarcha; San-Juano 2005.

(2) cemio (originale *cemí*, ne N.PIV-a) – dia statueto, triangula, plejparte ŝtona. Pere de ill, la tainoj penis kontroli la krudajn fortojn de la naturo; ekzemple, uraganojn.

(3) kaciko – indiana tribestro aŭ vilaĝestro (N.PIV).

(4) en la hispana lingvo, la tainaj nomoj sufiĉe ofte estas literu-

mataj malsame. La hispanan diftongon "ey" mi preferis esperantigi per "ei" por eviti konfuzon kun "ej".

(5) rakontata el "Fundamenta Historio de Kubo" (*Historia elemental de Cuba*) de D-ro Ramiro Guerra.

(6) *Canto al Cemí* p. 13–18; Sadí Orsini Luiggi; Instituto de

Cultura Puertorriqueño (Portorika Kultur-Instituto); San-Juano 1974.

(7) familia nomo de malgrandega indiĝena hilo (*Eleutherodactylus Coqui*, besto parenca al bufo) de Porto-Riko. "Kokio" estas onomatopea vorto: ĝi kvakas ĉiunokte: "koki, koki". Hispane: "coquí".

Venu Ĉi Tien de la Kampoj, Patro

Walt Whitman

Venu ĉi tien de la kampoj, patro, jen letero de nia Peĉjo,
Kaj venu al la antaŭa pordo, patrino, jen letero de cia kara filo,
Jen, estas aŭtuno,
Jen, kie la arboj, pli malhele verdaj, pli flavaj kaj pli ruĝaj,
Friskigas kaj dolĉigas la vilaĝojn de Ohio per folioj, flirtantaj en la modera vento,
Kie pomoj, maturaj en la fruktarbaroj, pendas kaj vinberoj sur la pergolitaj vitoj,
(Ĉu vi flaras la odoron de la vinberoj sur la vitoj?
Ĉu vi flaras la fagopiron, kie la abeloj laste zumadis?)

Super ĉio, jen, la ĉielo tiel trankvila, tiel travidebla post la pluvo, kaj kun mirindaj nuboj,
Malsupre ankaŭ, ĉio trankvila, ĉio vigla kaj bela, kaj la bieno bone prosperas.

Tie en la kampoj ĉio bone prosperas,
Sed nun de la kampoj venu, patro, venu je la voko de la filino,
Kaj venu al la eniro, patrino, al la antaŭa pordo venu tuj.

Rapide kiel ŝi povas, ŝi hastas, io misaŭgura, ŝiaj paŝoj tremante,
Ŝi ne lantas por glatigi la harojn nek ĝustigi la ĉapon.

Malfermu la koverton rapide,
Ho tio ne estas la skribado de nia filo, tamen lia nomo estas subskribita,
Ho fremda mano skribas por nia kara filo, ho la trafita animo de la patrino!
Ĉio turniĝas antaŭ ŝiaj okuloj, flagras per nigro, ŝi trafas la ĉefajn vortojn sole,
Frazojn rompitaĵn, *pafovundo en la brusto, kavaleria ekbatalo, alportita al la hospitalo,*
Nun malsanega, sed baldaŭ plisaniĝos.

Ha nun la unuopa figuro por mi,
Meze de la multloĝata kaj riĉa Ohio kun ĉiuj ĝiaj urboj kaj bienoj,
Malsane blanka je la vizaĝo kaj malvigla je la kapo, tre malforta,
Ĉe la kadroflanko de pordo kliniĝas.

Ne tiel funebru, kara patrino (la ĵus plenkreskinta filino diras tra siaj plorsingultoĵoj),
La malgrandaj fratinoj kunpremiĝas apude, senparolaj kaj konsternitaj),
Vidu, plej kara patrino, la letero diras, Peĉjo baldaŭ plisaniĝos.

Ho ve la kompatinda knabo, li neniam plisaniĝos
(nek eble bezonas plisaniĝi, tiu
kuraĝa kaj simpla animo),
Dum ili staras hejme ĉe la pordo, li estas jam morta,
La sola filo estas morta.

Sed la patrino bezonas plisaniĝi,
Ŝi kun maldika formo nun vestita en nigro,
Tage ŝiaj manĝoj netuŝitaj, tiam nokte sporade dormanta, ofte maldormanta,
Meznokte maldormanta, ploranta, sopiranta per unu profunda sopiro,
Ho ke ŝi povu retiriĝi nerimarkite, silente de la vivo eskapi kaj retiriĝi,
Sekvi, serĉi, esti kun sia kara morta filo.


Trad. Maurice Wittenberg



BIBLIOTEKO DE LA KONGRESO

INTERRETO

Esperanto Perdus Sian Plej Grandan Verkiston



William Auld, la plej elstara Esperanto-verkisto, forpasis la 11-an de septembro 2006. Li naskiĝis la 6-an de novembro 1924, eklernis Esperanton en 1937 kaj aktiviĝis en la Esperanto-movado en 1947, kiam li ankaŭ komencis serioze verki en Esperanto. En la Jubilea Jaro 1987 William Auld estis elektita kiel Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio. Profesie li estis vicestro de liceo en la skota urbeto Dolaro.

Auld estis unu el la plej konataj kaj fekundaj kontribuantoj al la Esperanta kulturo, kiu aŭtoris, tradukis aŭ redaktis plurajn dekojn da libroj. Li estas unu el la plej ofte premiitaj partoprenintoj de la Belartaj Konkursoj de UEA. Lia

ĉefverko estas la poeziaĵo “La infana raso” (1956), kiu estas ĝenerale konsiderata la pinta atingo de la Esperanta literaturo kaj kiu pro sia humanisma kaj porpaca mondrigardo fariĝis kvazaŭ “nacia epopeo” esperantista. Aliaj poemaroj de Auld estas “Spiro de l’pasio” en la kolekto “Kvaropo” (1952), “Unufingraj melodioj” (1960), “Humoroj” (1969), “Rimleteroĵ” (kun Marjorie Boulton, 1976) kaj “El unu verda vivo” (1978). Liaj kolektitaj poemoj aperis en la volumo “En barko senpilota” (1987). Auld redaktis du eldonojn de “Esperanta antologio” (1958 kaj 1984), la panoraman antologion de Esperanto-tekstoj “Nova Esperanta krestomatio” (1991) kaj kelkajn aliajn antologiojn. Li verkis amason da eseoj, artikoloj kaj prelegoj por multaj gazetoj kaj Esperanto-aranĝoj, kaj ili aperis ankaŭ libroforme en “Facetoj de Esperanto” (1976), “Pri lingvo kaj aliaj artoj” (1978), “Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto” (1979), “Vereco, distro, stilo: Romanoj en Esperanto” (1981), “Kulturo kaj internacia lingvo” (1986) kaj “Pajleroj kaj stoploj” (1986). En 1988 aperis lia enkonduko al la Esperantaj lingvo kaj movado “La fenomeno Esperanto”.

Abunda estas ankaŭ la rikolto de tradukoj fare de Auld. Inter ili elstaras “Kantoj, poemoj kaj satiroj” de R. Burns (1977), “Epifanio” (1977) kaj “La sonetoj” (1981) de Shakespeare, “Aniaro” de

H. Martinson (kun B. Nilsson, 1979), “La robairoj” de Omar Kajam (1980), “La graveco de la fideleco” de O. Wilde (1987) kaj la trivoluma “La mastro de l’ringoj” de J.R.R. Tolkien (1995-1997), kiun li mem konsideris sia traduka ĉefverko, dum plej kara al li estis “Jurgen” de J. Branch Cabell (2001).

Auld redaktis plurajn revuojn, i.a. “Esperanto en Skotlando” (1949-1955), “Esperanto” (1955-1958, 1961-1962), “Monda Kulturo” (1962-1963), “Norda Prismo” (1968-1972), “La Brita Esperantisto” (1973-1999) kaj “Fonto” (1980-1987), kaj kunlaboris kun aliaj gazetoj. Li verkis sennombrajn recenzojn kaj kelkajn lernolibrojn, i.a. “Esperanto: a new approach” (1965) kaj “Paŝoj al plena posedo” (1968). Auld estis vicprezidanto de UEA (1977-1980), membro de la Akademio de Esperanto (1964-1983) kaj ĝia prezidanto (1979-1983). En 1995 Auld ricevis la Premion Deguchi, en 1998 li fariĝis la unua Esperantisto de la Jaro en la voĉdonado de “La Ondo de Esperanto”, kaj en 2000 li gajnis la FAME-kulturpremion. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Esperanta PEN-Centro. Ekde 1999 William Auld estis unuafoje kandidategita por la literatura Nobel-premio.

William Auld estis honora membro de ELNA.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040

Esperanto U S

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ★ 2006/5-6
Dumonata bulteno eldonata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ★ 2006/5-6

En la Numero

★ Kio novas en la Centra Oficejo?	1, 3
★ Universitato de Kalifornio Starigas Oficialajn Kursojn pri Esperanto	3
★ Nekrologo: Joyce Boschen.	3
★ Local Groups in a Nutshell	4
★ Aligilo por la ELNA-kongreso 2007	5-6
★ Ĉu Vi Volas Plibonigi Vian Esperanto-Kapablon? (aligilo por la perkoresponda kurso de ELNA).	7
★ Piratado kaj Sabotado de Esperanto-Muziko	8-9
★ Recenze: Unua Profesia Muzikvideo en Esperanto!	9
★ Eklaboru!	10
★ In Other Words...	11
★ Kiel organizi kongreson	12-13
★ Libroservo	14-15
<i>Literatura sekcio</i>	
★ "My view is that Volapük, though cunning in its architecture, was simply far too complex for its own good" (intervjuo kun Andrew Drummond)	16-18
★ La Historio de la Centjarulo	18-20
★ Pardonpetante al la betono	21
★ Historio de Sinjorino Ivha	22-23
★ La Majfloro-Interkonsento	23
★ Vojaĝe	24

Kio novas en la Centra Oficejo?

Baldaŭaj ŝanĝoj...

Pro malbona sanstato, la aktuala Direktoro (mi, Don Harlow) devos emeritiĝi el la Centra Oficejo. Bonŝance, ni trovis novan kandidaton, tre kompetentan (Bill Harris, la aktuala kasisto de ELNA), kiu plenumos la postenojn almenaŭ dum pluraj monatoj, ĝis kiam ni trovos konstantan direktoron. Mi volas rememorigi al ĉiuj, kiujn interesas la posteno, ke ili kontaktu la serĉkomitaton pere de la C.O. (5712 Hollis St., Emeryville CA 94608, retadreso: elna@esperanto-usa.org).

Bonvenon al Tiĥuano! Vd. la aligilon por la ELNA-kongreso 2007 sur p. 5-6



(Daŭrigo sur p. 3)

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

☎ 510/653-0998; 2510/653-1468

✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Philip G. Dorcas
Vice President/Vicprezidanto: Steven D. Brewer

Secretary/Sekretario: Anna Bennett
Treasurer/Kasisto: William B. Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Joel Amis, D. Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi Harmon, Trevor Andrews, Orlando E. Raola, Robert L. Read, Julie Spickler

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Don Harlow

Esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 43, No. 3-4

ISSN 1056-0297

Editors/Redaktoroj: Joel Amis kaj Ĵenja Amis

Layout/kompostado: Ĵenja Amis

✉ yevgeniya_amis@yahoo.com

Materials for **Esperanto USA** should be sent to/Materialojn por **Esperanto USA** oni sendu al:

Esperanto USA (Joel & Ĵenja Amis)
2025 Peachtree Rd. NE, #927,
Atlanta, GA 30309, USA/USONO
or by e-mail/aŭ retpoŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org
joelamis@yahoo.com

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprimataj en tiu ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la publikigita materialo al ELNA.

Saluton karaj gesamideanoj!

Kvankam en la lasta numero de **Esperanto USA** mi bedaŭrinde devis sciigi al vi la malĝojan novaĵon pri la emeritiĝo de nia CO-direktoro Don Harlow, mi en tiu ĉi numero povas kun plezuro transdoni al vi la feliĉan novaĵon ke ni trovis novan direktoron! Temas pri Vilĉjo Harris, kiun vi jam konas kiel la kasiston de ELNA. Bonvenon al vi, Vilĉjo,

kaj koran dankon pro via preteco plentempe labori por nia Movado!

Samtempe ni deziras esprimi nian plej profundan dankegon al Don – kaj pro lia laboro en la CO kaj pro lia ampleksa volontula laboro sur diversaj kampoj (aparte sur la literatura kampo) en Esperantujo. Dankegon, kaj ĉion plej bonan al vi kaj Anjo!

Kiel ni promesis en la pasinta numero, en tiu ĉi numero vi trovos la duan parton de la literatura numero. Grandan dankon al ĉiu kiu kontribuis! Kaj ja ne tro fruas jam plani viajn kontribuojn por la sekva literatura numero...

Vi trovos en ĉi tiu numero ankaŭ la aliĝilon por la venonta ELNA-kongreso, kiu okazos en Tihuano, Meksiko. Ekfaru viajn vojaĝplanojn jam nun (inkluzive akiron de pasporto, se vi ankoraŭ ne havas) por ne maltrafi tiun ĉi unikan eblon kongresi kun niaj sudaj najbaroj.

Se vi ankoraŭ ne re-aliĝis al ELNA por la jaro 2007, bv. ne proskrasti plu – via membreco ege gravas por la bonfarto de Esperanto en Usono!

Agrablan legadon!

Joel kaj Ĵenja

Hello dear samideanoj (fellow Esperantists)!

Although in the last issue of **Esperanto USA** I unfortunately had to give you the sad news of the retirement of our Central Office Director Don Harlow, in this issue I have the pleasure to convey to you the good news that we've found a new director! It's Bill Harris, whom you already know as ELNA's treasurer. Welcome, Bill, and thank you for your willingness to work full time for our movement!

At the same time we wish to express our deepest gratitude toward Don – both for his work in the CO, as well as his extensive volunteer work in many areas in Esperantujo (especially in regards to literature). Thank you so much, and all the best to you and Anjo!

As we promised in the last issue, in this issue you will find the second part of the literary issue. A big thanks to everyone who contributed! And it certainly isn't too early to be planning your submissions for the next literary issue...

You will also find in this issue the registration form for the upcoming ELNA convention, which will be held in Tijuana, Mexico. Start making plans now (including getting a passport, if you don't already have one) so you don't miss this unique opportunity to meet with our southern neighbors.

If you haven't already renewed your ELNA membership for 2007, please don't put it off any longer – your membership is of utmost importance for the well-being of Esperanto in the USA!

Pleasant reading!

Joel and Zhenya



Kio novas en la Centra Oficejo?

Pasintaj ŝanĝoj ...

Ĉefe rilatas al la libroservo. Dum mia deĵoro ni aldonis plurajn novajn titolojn; kaj mi estas tute feliĉa pri la kreskado de vendoj dum la lastaj jaroj. Bedaŭrinde, unu el niaj ĉefaj titoloj – *Teach Yourself Esperanto* – ne plu estas havebla. Bonŝance, en la lasta jaro aldoniĝis la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, kiun mi rekomendas al ĉiu sincera amanto de la lingvo; sed, kompreneble, ĝi ne povas anstataŭi TYE, kiu estas libro por komencantoj – PMEG celas homojn jam relative kompetentajn en la lingvo.

Por novaj titoloj, mi rekomendas ke oni ne malofte vizitu la retpaĝon de nia libroservo (<https://esperantousa.hypermart.net/butiko/butiko.cgi>) kaj klaketu sur la ligilo al la novaj titoloj. Cetere, se vi havas la paperan katalogon ĉemane, estas bone kontroli la prezojn kontraŭ tiuj en la reto, ĉar tiuj en la papera katalogo ofte eksvalidiĝas; kiam ni ricevas novan stokon de libroj el Eŭropo aŭ Azio, ni devas rekalkuli prezojn pro la fluktuo de la dolara kurzo kontraŭ la eŭro kaj aliaj valutoj. Se vi preferas la paperan katalogon, ni unu fojon monate kreas novan PDF version, kiun vi povas atingi pere de la TTT-paĝo de ELNA (<http://www.esperanto->

[usa.org/](http://www.esperanto-usa.org/)) kaj klaketu sur “Bookstore”. Ankaŭ ĝi estas almenaŭ pli aktuala ol la papera versio eldonita pasintprintempe.

Kelkaj ŝanĝoj pri informpetantoj ...

Informpetantoj nun iras en nian datumbazon. Pli ol tio, kiam ni ricevas nomon/adreson de informpetanto, ni serĉas, ĉu troviĝas grupo aŭ kontaktpersono por Esperanto en ties regiono, kaj, se jes, sendas retleteron al tiu kun la adreso kaj (se havebla) retadreso de la informpetanto, por eventuala kontakto kaj varbo. Se ne troviĝas tia grupo aŭ persono en via regiono, kaj vi volas aliĝi al nia listo de kontaktpersonoj (aŭ grupoj, se ĉe vi troviĝas grupo, pri kiu ni ne scias), bonvolu informi nin en la Centra Oficejo. Laŭ mi, tiaj kontaktabletoj estas tre gravaj! Por aktuala listo de tiaj grupoj aŭ



(de maldekstre): Anjo Harlow, Don Harlow kaj Viljo Harris

homoj jam en via regiono (se ekzistas), vi povos viziti la ELNA-TTT-paĝon kaj klaketi sur la etikedo “Local”.

Ĉi tiu versajne...

...estos mia fina kontribuo al “El la Centra Oficejo”. Mi esperas poste revidi vin ĉiujn en diversaj partoj de Esperantlando. Ĝis tiam!

Amike salutas vin,

Don Harlow

Universitato de Kalifornio Starigas Oficialajn Kursojn pri Esperanto

La Universitato de Kalifornio en San Diego anoncas la starigon de oficiale aprobitaj kursoj pri Esperanto. Tiuj kursoj okazos somere kaj estos malfermitaj al la tutmonda esperantistaro.

La Universitato de Kalifornio en San Diego, ankaŭ konata laŭ la anglalingva siglo UCSD (www.ucsd.edu), estas unu el la plej konataj kaj prestiĝaj universitatoj en Usono, kaj inter ĝiaj profesoroj troviĝas ok Nobel-premiitoj. Ĝi situas apud la pacifika marbordo en suda Kalifornio, proksime de la landlimo inter Usono kaj Meksiko.

La kursaro daŭrigos la tradicion de la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), okazinta dum 30 jaroj en San Francisco kaj dum la lastaj jaroj en Vermonto. Honore al tiu tradicio, la nova kursaro en San Diego ĉi-somere pritraktos interalie la verkaron de la lastatempe forpasinta aŭtoro William Auld, la unua instruisto en NASK en San

Francisco. La instruista teamo en somero 2007 konsistis el Paul Gubbins, kiu gvidos la superan kurson, kaj Lee Miller, kiu gvidos kurson por progresantoj. Grant Goodall, profesoro en la universitato kaj direktoro de ties lingva fakto, estos la kursaron.

La kursaro okazos ĉi-jare inter la 9-a kaj la 27-a de julio. La universitato bonvenigas ĉiujn interesiĝantojn al siaj someraj kursoj, sendepende de antaŭa universitata studo.

Por intervjuoj kaj pli ampleksaj informoj pri la oficialigo kaj starigo de la kursoj: Grant Goodall goodall@ling.ucsd.edu

Por informoj pri registriĝo, stipendioj, ktp: Ellen Eddy eddyellen@aol.com

Nekrologo – Joyce Boschen

Joyce Boschen, la amata edzino de Allan Boschen de Windsor, Massachusetts, forpasis je 6 atm sabaton, la 14-an de oktobro 2006. Ŝi suferis infarkton je la fino de aŭgusto, submetiĝis al kor-operacio, sed ne rekonsciiĝis de la operacio.

Joyce estis lerta artisto kaj ĝuis multe vojaĝojn kun Allan al multaj mondpartoj, la ĝojo pliiĝita pro la uzo de la internacia lingvo, per kiu Joyce kaj Allan akiris multajn amikojn tra la mondo. Ŝi estis enterigita en Windsor en malgranda tombejo proksime al ŝia hejmo. Memora Di-servo okazis la 18-an de novembro en la Unitarian-Universalista Preĝejo de Pittsfield.

La kondolencoj de la multaj amikoj de Joyce kaj Allan iras al la familio.

(Vidu la foton de Joyce apud ŝia edzo Allan en la “Vojaĝu kun Esperanto”-paĝo.)

Local Groups in a Nutshell



Steve Brewer doing a presentation on local groups (New York, 2006)

Filipo Dorcas

Size – You are in a local Esperanto group – period. Regardless of your language capabilities and regardless of the size of your group, you are in a local group, even if that local group is only you.

Visibility – If you are not listed on the local groups page of our website, let us know what contact information we can use. Locally, find out if your newspaper, school, university, library, cable TV channel, or other public forum will do free announcements for public service organizations. Find out how other clubs do announcements.

Meetings and Programs – Meet at least monthly, but weekly if possible. Have planned programs that get people involved. Give every meeting something that is international in scope, so that it is obvious that Esperanto is a bridge between countries and cultures.

Informing the Public – Try to get involved with civic events, fairs, etc. If you

can do a presentation, offer your services to speak to groups in churches, schools, and service organizations.

Information on Paper – Have something to give to people that will give them contact information, such as a flyer, business card, or bookmark. Non-Esperanto speakers need something in their hand to remind them that they

have just made an Esperanto connection.

Calendar Planning and Goals – Plan in advance. Plan announcements at meetings ahead of time. Get with other club members and find out what you want to do. Find out what other clubs do and make plans. Plan who needs to do what, when, and what they will need.

Event Follow-up and Reporting – After the event, discuss what worked and what didn't. Report on what happened to your club members and to other clubs. And let us know!

Member Care – What do your members need? Which members are studying in a course? Which members have taken AAIE or ILEI/UEA tests? Which members have traveled or used Esperanto in an unusual situation? Which members have pen pals? Give them opportunities to speak at club meetings or report on their experiences. Support everybody in their use of Esperanto. Keep an up-to-date member list. Most importantly, find out what each member has as a goal or vision, and talk

about the future.

Visitor Care – Follow up with visitors more than once. Find out why they visited, and what they expected. Invite them back, and keep them informed for future meetings and events. Don't lose track of them. Report back to the club on how visitors were contacted after their visit. Make them feel like they belong. Reach out with a radically strong and warm welcome.

Communications/Information – Keep people posted. Many management advisors say that communication is 90% of the job. Use the telephone, newsletters, email, email list-groups, in-person chats, or whatever works.

Club Organization – Formal or informal, somebody should take on the responsibilities of making the club function. What are the basic needs of your group and who will provide those? Some clubs will need a host of officers and committee leaders, while other small groups will handle things informally.

Connecting outside the Group – Connect with other groups, with ELNA board members and committee members, and the *E-USA* editor. Establish helpful friendships that can help your group grow. You are not alone, even if your local group has only you as its member.

Using Esperanto – Use the language everyday personally, in email, reading, etc, but try to use it at least weekly interacting with an Esperanto friend.

Having fun – Esperanto is fun, so enjoy the blessings that come from this wonderful language that Zamenhof gave to the world.

Nekrologo – William Auld

Honora Membro de ELNA kaj UEA William Auld mortis la 11-an de septembro en Dollar, Skotlando. Internacie fama pro siaj multaj verkoj, tradukoj, poemoj kaj recenzoj, li estis eble pli bone konata al ni usonaj esperantistoj kiel la unua instruisto de la Nord-Amerika Somera Kursaro ĉe San Francisco Ŝtata Universitato en 1970. Auld instruis la komencan nivelon posttagmeze kaj la altnivelan vespere. Li revenis ĉiun jaron dum kelkaj jaroj dum la prestiĝo de la kursaro etendiĝis pli kaj pli, allogante eĉ grupojn de Japanaj studentoj. Kiel

unu el la kursolibroj Auld uzis sian ĵusverkitan tekston *Paŝoj al plena posedo*.

La enterigan ceremonion apud Dollar ĉeestis la prezidanto de UEA, Renato Corsetti; Paul Gubbins kaj John Wells, ambaŭ estintaj profesoroj en la SFSU klasoj; Brian Moon kaj aliaj altrangaj oficistoj de UEA. Paul Gubbins raportis, ke Bill Auld malsanis dum iom da tempo kaj loĝis finfine en flegejo kie tamen li bone amuzis la stabanojn. Paul plu raportis, ke li surpriziĝis ke la enterigo okazis ĉe preĝejo, konante la sintenon

de Bill kiel agnostikulon, sed la pastrino tre senteme pritraktis la nekredon de Bill dirante ke, se li pravas, ke ne ekzistas postvivo, almenaŭ li trovis pacon kaj liberigon; sed se tamen li malpravas kaj ja estas postvivo, li pozitive brakumus ĝin kaj agnoskos sian eraron. Tre diplomatie farite, laŭ Paul kaj aliaj ĉeestantoj.

Havinte la plezuron koni Bill Auld kiel intima amiko dum multaj jaroj, mi almetu ke lia forpaso lasas grandan truon en la vivoj de Lusi kaj mi. Liaj spriteco kaj genieco restos en niaj memoroj ĉiam.

William R. Harmon



55th ANNUAL ELNA CONVENTION
27-30 July, 2007 - Tijuana Meksiko, Hotel Pueblo Amigo

INTERNATIONAL COOPERATION is our theme, and for this reason we have chosen to have most of our convention just over the border from San Diego and hope to have representatives from Mexico and other Latin American countries participating with us along with the usual visiting samideanoj from other countries.

Tijuana is renowned as "the world's most visited border city." It is interesting in its own right and well worth visiting even if our convention were not being held here. For more details about the city visit: www.tijuanaonline.org and www.sctijuana.com.

Welcome All Levels! There will be activities for beginners as well as movadanoj,- including:

- ★ Friday night "interkonatiĝa" ice breaker
- ★ Saturday night banquet
- ★ Sunday night "local" talent night
- ★ Lectures and demonstrations in Esperanto
- ★ Post-convention excursion to the beautiful beach towns of Playas de Tijuana, Rosarito, and Ensenada. See aliĝilo.
- ★ FULL BOOK SERVICE with opportunity to browse a room full of Esperanto books, videos, DVDs and CDs for sale
- ★ Esperanto classes
- ★ Walking and public transportation tours of Tijuana area
- ★ Films with Esperanto subtitles
- ★ Poetry readings

CONVENTION VENUE

The Pueblo Amigo Hotel is located at the Plaza Pueblo Amigo, part of the exclusive "Zona Rio", the most important commercial and financial area in the city, close to strategic points such as the International Border Crossing Line of San Ysidro, and cultural and commercial areas. All rooms are equipped with telephone, TV, and air conditioning. It also offers shuttle service from the Tijuana Greyhound Bus Station - with reservation and under previously arranged schedules, and free parking for those who drive.



Our special group rates compare very favorably to much lesser hotels, and if you share your room the price is a bargain. Single rooms and 2 queen-bedded rooms - US\$85. Extra adults cost only US\$10 - children are free. Junion suites have 2 queen beds and a sofa - US\$95 - and can easily hold a family of 5.

Breakfast is not included, but a 10% discount in food service from the restaurant is. There is 24 hour security and a high level of privacy. All of our convention meetings and programs will be held in the hotel.

LA ESTRARA KUNVENO DE ELNA WILL BE HELD 26-27 JULY IN SANTEE - a suburb of San Diego

The annual meeting of the estraro is open to all members; and for others who wish to "turistumi" in the area, reservations are available for the nights of 25 and 26 July at the Santee Inn, 10135 Mission Gorge Rd, Santee CA 92071-3813. Vidu la reklamojn: www.thesanteeinn.com.

Special group prices: Queen bed - \$65; King bed - \$70; 2 double beds \$75.(plus 8% tax) No extra charge for more than two in the room. Reservations for the Santee Inn must be made through the Commissioner for Travel, Lusi Harmon (Lusiharmon@aol.com or 510-531-8393). You may reserve for only one night (the 26th) - or for both nights if you want to sight-see in the area.

RESERVATIONS MUST BE MADE NO LATER THAN JUNE 25

Roberto Burgess will help us arrange for local sight-seeing by public transportation - and arrange for those of us who want to see the big animals - at the San Diego Zoo Wild Life Park, the best place in the world to see large animals in nature outside of African wildlife parks. (see:www.sandiegozoo.org). And there are lots of less tiring sights in this great tourist city.

HOW TO GET TO TIJUANA FROM SAN DIEGO



Passports for U.S. citizens are NOT REQUIRED for non-air border crossings UNTIL 2008. However, you do need proof of citizenship: voter's registration or official birth certificate with picture ID - such as a driver's license for your return. If you are planning to drive across the border, you need to buy special insurance - US insurance will not cover you in case of accident (see: <http://www.tijuana.com/info.html>).

The easiest way to travel to Tijuana is to go to the Greyhound Bus Station in downtown San Diego and catch one of the buses that go almost every hour across the border (\$12). From the station in downtown Tijuana, you can catch a cab for the short ride to the hotel - or make arrangements ahead of time for the shuttle from the hotel.

If you are flying into San Diego, it's a short cab ride to the Greyhound Bus station, or arrange to meet others in the elegant waiting room at the downtown old Santa Fe (Amtrak) Train Station. From the Amtrak station you can also catch the San Diego Trolley (MTS) to the end of the green line at the Santee Town Center which is one block from where the estraro will be staying at the Santee Inn. If you are registered there, we can arrange to have you go with members of the estraro on Friday afternoon to our hotel in Tijuana.

REGISTRATION FORM

2007 ELNA Convention – Tijuana, México – July 27-30, 2007

Name(s) _____ (Please print clearly)
 Name for name tag _____ Address _____
 City _____ State _____ Zip _____ Country _____
 Email _____ Telephone _____

Categories	Before March 1, 2007	Before May 1, 2007	May 1 or later	Indicate choice:
Limited income, youth, foreign	US\$30	US\$50	US\$70	
ELNA member (non-youth)	US\$60	US\$80	US\$100	
Non-ELNA member US	US\$80	US\$100	US\$120	
Moral supporter (not attending)	US\$30	US\$30	US\$30	
Business supporter	US\$100	US\$100	US\$100	

LODGING: Single and Double Room Rate: US\$85 + 12% tax. Jr. Suite US\$95 + 12% tax. Extra person: US\$10
 (Mention ELNA or ESPERANTO when reserving your room to get the discounted rate.)

Room reservations must be made **at least** 30 days in advance. Visa, MasterCard, and cash will be valid methods of payment.
 Room cancellations must be made **at least** 72 hours before the scheduled check-in date.

"No-shows" will be charged for the first night.

HOTEL PUEBLO AMIGO: Via Oriente 9211, Zona del Río-CP-22320 Tijuana, BC, MEXICO

MEX: 01-800-026-6386 and (664) 624-2704 USA: 1-800-386-6985, 1-800-785-4647 or 011-52-624-2721

You may also reserve at: www.hotelpuebloamigo.com select English, click on "Reservations" and fill out the form.

Would you like to share a room? _____ Do you have (a) preferred roommate(s)? _____

Banquet: (US\$20) _____ Vegetarian _____ Other special dietary needs _____

Do you have any other special considerations or needs? _____

Convention Souvenir: Polo shirt (US\$21): _____ T-shirt (US\$14): _____ Size(s): S _____ M _____ L _____ XL _____ XXL _____

(Taxes included) Ball cap (US\$12) Black _____ White _____ Red _____

Total cost: (Membership + Banquet + Shirt(s) + Ball cap(s)) \$ _____ Check made out to ELNA, or:

Credit card # _____ Exp date (MM/YY) ____/____

Cardholder name _____

Card billing address (if different from above) _____

City _____ State _____ Zip _____ Country _____

For pre-congress *estrara kunsido* and excursions in San Diego area. See reverse side.

Post-congress Excursion to Playas, Rosarito, Foxploration Studios, and Ensenada: The shared cost of the charter bus depends on the number of people going on this trip. The range is between \$25 and \$40, no meals included.

Payment can be made at later date. Each bus has 40 seats. Are you interested in participating? [] Yes, please send details

Other items:

For travel information into Tijuana, please see reverse side.

Would you like to include your telephone # in the program book? _____ Street address? _____ Email address? _____

Would you like your badge to show that you are a beginner? _____

Would you like to be a "buddy and helper" to a beginner? _____

Would you like to take an AAIE exam? _____ If yes, what level? [] Basic [] Intermediate [] Advanced

Would you like to read, script in hand, a short skit for children? _____ for adults? _____

Would you like to be a speaker, teacher, performer, or activity guide? If so, please describe your idea, any special equipment or schedule requirements, etc. and send to Mar Kardenas: Mar@GrupoAmikema.org

Mail your enrollment form to: **ELNA, PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530** or Fax to: **(510) 653-1468** if you are paying by credit card.

Official retpa aro: www.esperanto-usa.org Questions? Email ELNA's central office at: Elna@esperanto-usa.org or Mar@GrupoAmikema.org.

If you would like help with flight arrangements in order to arrive in time for the group transfer to Tijuana, or if you are planning to go to the U.K. directly after the ELNA convention - write to Lusi Harmon c/o ELNA, or send an electronic message to LusiHarmon@aol.com.

Ĉu Vi Volas Plibonigi Vian Esperanto-Kapablon?

- Have you started learning Esperanto but never felt you completely mastered it?
- Are you one of those rare people who aren't comfortable surfing the web but prefer pencil and paper?
- Would you like an opportunity to improve your Esperanto at your own pace, with a private tutor?

If you answer "Yes" to these questions, we invite you to consider enrolling in ELNA's Home Study Program. There is no time limit. Each level is self-contained, so all you need is some spare time and a tape-recorder. In addition, your course will be guided by a qualified instructor of Esperanto who will give you the personal attention you need. It is available in four stages (you decide which one is best for you):

Levels One and Two emphasize development of everyday conversational skills.

LEVEL ONE – Using the textbook and cassette tape for the popular *Jen Nia Mondo 1* radio course, this twelve-lesson course will guide you to mastery of basic Esperanto.

Course Materials: Workbook (32 pages), *Jen Nia Mondo 1* book (66 pages), *Jen Nia Mondo 1* audio cassette.

Course Fee: \$48.00 (plus \$2.22 sales tax for Californians)

NOTE: If you already have a *Jen Nia Mondo 1* set, you may deduct \$24.60 (plus \$1.91 for Californians) from the price of the course.

LEVEL TWO – This thirteen-lesson course focuses on a more detailed analysis of Esperanto as a language in its own right, and is recommended for the serious student as a follow-up to Level One.

Course Materials: Workbook (53 pages), *Jen Nia Mondo 2* book (89 pages), *Jen Nia Mondo 2* audio cassette.

Course Fee: \$50.00 (plus \$1.88 sales tax for Californians)

NOTE: If you already have a *Jen Nia Mondo 2* set, you may deduct \$18.20 (plus \$1.41 sales tax for Californians) from the price of the course.

LEVELS THREE AND FOUR – both completely in Esperanto, use Boris Kolker's *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, which is not only an advanced textbook, but also a guide to Esperanto culture. Each chapter contains several short readings from Esperanto literature, footnotes, illustrations, and questions. Students who wish to improve their speaking and listening skills are encouraged to exchange tapes or phone conversations with their instructor.

Level Three Course Fee: \$53.50 (plus \$1.10 for Californians)

NOTE: If you already have *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, you may deduct \$33 (plus applicable sales tax for Californians) from the price of the course.

Level Four Course Fee: \$53.50 (plus \$1.10 for Californians)

NOTE: If you already have *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, you may deduct \$33 (plus applicable sales tax for Californians) from the price of the course.

ELNA CORRESPONDENCE COURSE REGISTRATION FORM

Return this form to ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530

Date: _____

Name: _____

Address: _____

City _____ State _____ Zip Code _____

Telephone/Fax: _____

E-mail _____

Please enroll me in the correspondence course indicated below. I am enclosing \$ _____

LEVEL ONE LEVEL TWO LEVEL THREE LEVEL FOUR

Piratado kaj Sabotado de Esperanto-Muziko



De pli-malpli tri jaroj muziko suferas sufiĉe akran krizon en la mondo pro la diverseco de novaj teknologioj kiuj evoluas fulmrapide (interreto, MP3, Podkasto ktp.), kaj al tio aldoniĝas senbrida KD-kopio helpo de la pli kaj pli granda disvastigado de personaj komputiloj. La disko-industrio nur povas konstati drastan disfalon de siaj vendoj, KD-fabrikejoj fermiĝas kaj maldungas sian personaron. La krizo estas grava. Kelkaj eldonejoj provas trovi alternativajn vendante unuopajn muzikaĵojn interrete, aŭ eĉ bandoj provas aperigi siajn albumojn ne plu sur KD-oj sed sur USB-ŝlosiloj – sed vere neniu scias kion fari kaj kio okazos al muziko en la venontaj jaroj.

Esperantaj muzikeldonejoj havas tute similajn problemojn kiel malgrandaj muzikeldonejoj ĝenerale, sed la konsekvencoj por ni estas tamen multe pli gravaj: por Esperanto-muziko la problemoj estas dekobligitaj kompare al la la muziko en aliaj lingvoj. Konatas ke Esperantaj muzikeldonejoj malmultas. Unu el la ĉefaj, Vinilkosmo, jam delonge lanĉis atentigon pri la rapida evoluo de la aktualaj teknikoj kaj pri la danĝero de kopio de diskoj kaj de elŝutado de muziko el la interreto.

La tuj sentebla konsekvenco estas la falo de la diskovendoj kaj samtempe la kresko de muzikelŝutado senpage el la interreto: la artistoj kaj muzikeldonejoj (Vinilkosmo, MusicExpress ktp.) disponigas libere du-tri muzikaĵojn de ĉiu albumo varbcele en la interreto. Kulpas pri tiu fenomeno ankaŭ la popularigo de hejmaj komputiloj kiuj ebligas facilan elŝutadon kaj kopiadon de KD-oj.

Eldoni muzikon ne estas simple preni la

muzikon de disko kaj meti ĝin enreten... Eldoni muzikon estas grandega laboro unue inter la artistoj kiuj elpensas ĝin, verkas, komponas kaj poste ludas, kantas kaj registras la muzikon... Por kelkaj artistoj tio postulas jarojn da senĉesaj streboj kaj sinoferoj. Poste la eldonejo kunlaboras kun la artisto por produkti, eldoni kaj distribui la artajn verkojn... kaj zorgi pri la “komerca” flanko de la muziko.

Tiu komerca flanko estas la produktado kaj eldonado de muzikoj de artistoj, kaj ĝi kostegas. Nur dank’ al la vendado de la eldonitaj diskoj eblas daŭrigi la produktadon kaj eldonadon de novaj diskoj. Tiel mono investita en muzikon povas esti reinvestita por novaj produktaĵoj.

Por havi la ideon kiom kostas produkti kaj eldoni diskon jen kiel estas dispartigitaj la produkto- kaj eldonkostoj por, ekzemple, unu el la lastaj eldonejoj de Vinilkosmo. Temas pri eldono de 1000 ekzempleroj, kaj la tuta produktokosto estas 9880 EUR:

Suma prezo por unu KD:	15,05
EUR sen impostoj (vendoprezo al la publiko)	
Surbendigaj kostoj:	4,65 EUR
Mastrumado:	1,07 EUR
Grafika laboro:	1,01 EUR
Aŭtoraj rajtoj:	1,06 EUR
Presado:	1,57 EUR
Varbado:	1,63 EUR
Tantiemoj:	0,92 EUR
Administrado/Stokado:	2,00 EUR
Profito:	1,15 EUR
Suma prezo por unu KD: 12,40 EUR sen impostoj (vendoprezo al la libroservoj kaj revendistoj)	
Surbendigaj kostoj:	4,65 EUR
Mastrumado:	1,07 EUR
Grafika laboro:	1,01 EUR
Aŭtoraj rajtoj:	1,06 EUR
Presado:	1,57 EUR
Varbado:	1,63 EUR
Tantiemoj:	0,92 EUR
Administrado/Stokado:	0,49 EUR
Profito:	0,00 EUR

Plej malbona la situacio estas en la disvolviĝantaj landoj, kiel landoj de Sud-Ameriko kaj Azio (kaj ankaŭ Afriko kaj Orienta Eŭropo – Red.), por kiuj Esperanta muziko ne estas alirebla pro la altaj prezoj

de la Eŭrope eldonitaj Esperanto-disko.

Por provi ŝanĝi tion, Vinilkosmo provis trovi solvojn kreante partneran eldonadon kun BEL (Brazila Esperanto-Ligo) por disponigi la Vinilkosmajn eldonaĵojn en Sud-Ameriko, sed, bedaŭrinde, ĝis nun sensukcese. Nun estas nova projekto starigi partneran eldonadon kun la nova strukturo, Kosmuzik en Brazilo. Sed organizi tion postulas iom da tempo kaj ĉefe mono. Dume la situacio malpliboniĝas...

Vinilkosmo ekspertis novan fenomenon: piratado de ĝiaj eldonejoj fare de retpaĝoj, ekzemple blogoj. Unua kiu tiel agis estis bazita en Argentino kaj tute kontraŭleĝe disponigis por libera elŝutado ses albumojn eldonitajn de Vinilkosmo kaj unu eldonitan de BEL. Tio estas tutsimple senskrupula ŝtela misago kaj ĝi sabotadas la laboron por Esperanto-muziko kiun la artistoj kaj la eldonejoj strebas fari.

Artistoj kaj muzikeldonejoj estas intime ligitaj kaj funkcias kune, ĉar ili helpas unu la alian kaj ili bezonas unu la alian. La muziko de eldonitaj diskoj apartenas al la artistoj, kaj neniu rajtas uzi ilin por publika disvastigo krom se estas interkonsento kun la artisto/eldonejo. Estas klare ke ne eblas fari kion ajn pere de muziko kiu apartenas al artistoj, kaj certe ne eblas disponigi ĝin senpage al la publiko, sen peti la permeson de la artistoj – kaj des pli kiam la diskoj estas vendataj.

Kiel vi vidis, produkti diskojn kostegas al la artistoj kaj al la eldonejo amason da horoj da laboro kaj grandajn investojn de tempo, sindonemo, pasio kaj mono.

Esperanto-muziko estas unu el la plej vivantaj partoj de Esperanto-kulturo. La eldonejoj strebas teni ekvilibron por daŭre alporti al la Esperanto-Movado kaj al Esperanto-kulturo konstantan fluon de novaj eldonaĵoj, de novaj artistoj ktp. Piratado (ŝtelado de muziko) frakasas tiun laboron kaj povas en tre malmulte da tempo dronigi la eldonejon... Ĝi rompas la ekvilibron de la eldonejoj kaj endanĝerigas tiom la eldonejojn kiom la artistojn kaj eĉ la muzikan kulturon mem... Tial pro piratado post kelkaj jaroj eĉ la Esperanta kulturo povos rapide suferi, malriĉiĝi kaj kadukiĝi.

Feliĉe, ĉi-foje la artistoj, Vinilkosmo kaj ĝiaj kunlaborantoj sukcesis argumenti kaj konvinki la piratan blogiston ĉesi tiun sab-

otadon. Sed en alia kazo la eldonejo estus devigata interrompi sian aktivadon kaj prokrasti aŭ forlasi siajn projektojn kaj produktaĵojn en preparo por eviti bankrotecon...

Neniu eldonisto prenas senkonsiderajn riskojn eldonante diskojn sen esti certa ke eblas disvendi ilin. Neniu Esperanta eldonejo havas la financajn rimedojn por riski fiaskon pro mallojala konkurenco fare de piratoj.

Kiam la eldonejoj ĉesos produkti novan muzikon kaj ne plu reldonos elĉerpitajn diskojn, la piratoj malaperos ĉar ili nenion plu povos pirati, sed certe tiam jam tro malfruos. Iel dubindas ke piratoj ekproduktos Esperanto-muzikon por disdoni ĝin senpage interrete.

Esperable, la situacio evoluos rapide, kaj la piratoj ĉesos aktivi kontraŭ profesie eldonita Esperanto-muziko antaŭ ol estos tro malfrue, kaj Esperanto-muziko fariĝos dezerto... Sed estu ankaŭ ege klare ke esperantisto kiu elŝutas piratitan muzikon fariĝas komplico kaj respondecas pri la mortigo de Esperanto-kulturo kaj kon-

tribuas al ĝia entombigo.

Nura subteno ebla estas per akiro de la originalaj diskoj eldonitaj kaj disponigitaj en la libroservoj aŭ rekte ĉe la eldonejoj. Varbcele estas libere disponebla muziko de ĉiuj albumoj kaj informojn pri la artistoj ĉe <http://www.musicexpress.com.br/novaĵoj.asp> kaj muzikvideoj ĉe <http://farbskatol.net/>.

Ĝeneralaj informoj pri Esperanto-muziko haveblas en la TTT-ejo de EUROKKA <http://artista.ikso.net/eurokka/> kaj pri la artistoj <http://artista.ikso.net/>.

Fine, Vinilkosmo havas sian propran retejon kie eblas rekte aĉeti diskojn enrete. Vizitu ĝin ĉe www.vinilkosmo.com.

Kompilita de Flo! (Floréal Martorell) laŭ argumentoj okaze de la diskuto inter artistoj kaj aktivuloj de EUROKKA/Vinilkosmo. Kontribuis: Emilio Cid, Bertilo Wennergren, Martin Wiese, Ferriol Macip, Rogener Pavinski, David-Emil Wickstroem, Gunnar Fischer, Jean-Marc Leclercq, Jenja Amis, Amir Hadziahmetovic, Flavio Fonseca kaj Floreal Martorell.

Jubilea Internacia Ekspozicio "Samarkando en Ĉiuj Kontinentoj": Viaj Kontribuoj Atendataj


En aŭgusto 2007 la urbo Samarkando oficiale kaj solene festos sian 2750-jariĝon subaŭspicio de UNESKO. Por celebri la gloran jubileon de la mondfama urbo, la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro kaj loka E-klubo kolektas diversspecajn kaj ĉiulingvajn materialojn (gratulleterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, citaĵojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp.) pri Samarkando kaj samarkandanoj.

La projekto estas realigata kunlabore kun la Samarkandaj Ŝtataj Muzeoj. La plej interesajn materialojn ni publikigos en nialanda gazetar. Ĉiuj ricevitaj kontribuoj estos agnoskitaj kaj eksponataj en la internacia ekspozicio en la Samarkanda Ŝtata Muzeo pri Historio de Kulturo kaj Artoj de Uzbekio. Anticipajn dankojn por via kunlaboro kaj afabla subteno.

Bonvolu adresi viajn kontribuojn laŭeble baldaŭ al:

Anatoli Ionesov, Direktoro
Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro
P.O. Box 76, UZ – 140100 Samarkand
Uzbekio
Telefono/ fakso: +998 (66) 233 17 53.
<http://peace.museum.com>
Retadreso: imps86@yahoo.com

Unua Profesia Muzikvideo en Esperanto!



Jane Mitchell

Supernova. Vinilkosmo. Donneville, 2006. Aĉetebblas de UEA, vinilkosmo kaj aliaj libroservoj.

La nova disko de Vinilkosmo – “Supernova” – estas produkto de longdaŭra kunlaboro inter tri brazilaj esperantistoj – Roger BORGES (DĴ Roger), Rogener PAVINSKI kaj Ale MANCINI (la bando el tiuj tri personoj havas la saman nomon kiel la albumo mem: Supernova).

DĴ Roger estas jam konata al multaj esperantistoj pro la jam aperintaj tri diskoj “Muziko Elektronika”, “Elektronika Kompilo” (eldonita de Vinilkosmo) kaj la “Sendependa”. “DĴ Roger, jam kontribuanta en la “Elektronika kompilo”, estis je origino de tiu ĉi projekto en 2004. Kiam li ankoraŭ prilaboris sonojn malpli pure elektronikajn, li decidis kunlabori kun muzikistoj realaj kaj ne virtualaj”, – skribis Floréal MARTORELL en novaĵletero de Vinilkosmo. La disko estis registrita dum 2004, 2005 kaj 2006 en diversaj studioj de Brazilo kaj Hispanio, sed la fina produkto estis eldonita en Vinilkosmo, Francio.

La apero de la disko “Supernova” certe estas granda evento en la Esperantomondo pro kelkaj kialoj. Unue, la sonkvalito de la disko estas vere elstara kaj tre profesia. Due, unufoje en Esperantujo, krom la muziko mem, la disko enhavas profesian videon por la unua kanto de la disko, “Pasio en katen”, realigitan de la brazila produktejo Kosmuzik. (La video spektoblas ĉe la retpaĝo de Farbskatol? <http://farbskatol.net/dotclear/index.php?2006/10/19/47-supernova-pasio-en-katen.>)

Kvankam la retpaĝo de Vinilkosmo lokas tiun diskon en la kategorio *pop-rok*, laŭ mia

vidpunkto, eble estus pli ĝuste loki ĝin en la kategorion de peza roko. La muziko baziĝas sur la klasika pez-roka triopo – drumoj, basoj kaj elektrogitaro, kaj ĝi metas malpli grandan akcenton sur voĉan harmonion aŭ “rememoreblan” melodion. La temoj de la kantoj estas tre Esperantaj: amo, mondsolidareco, libero, monda povreco, paco kaj kontraŭo al la milito... En la disko estis uzitaj multaj aldonaj muzikaj kaj voĉaj efektoj: enplektiĝo de krioj, konversacioj (kaj ne nur en E, sed ekz. en la rusa), eĉ pafoj, hunda bojado ktp.

Sed ĉu vere ĉio bonas pri la disko? Kvankam kelkaj kantoj ja ege plaĉis al mi (antaŭ ĉio la “Pasio en katen”), la plejparto de la kantoj estas iom similaj unu al la alia laŭmelodie, kaj pro tio, verdire, iomete tedaj kaj ne vere memoreblaj. La voĉo de la ĉefkantisto (ja foje ankaŭ enplektiĝis la dua voĉo), kvankam nemalbona, ne estas vere elstara...

Sed malgraŭ tiuj kelkaj malbonaĵoj, la disko nemalhaveblas por ĉiuj ŝatantoj de roka muziko, aparte por ŝatantoj de peza roko.

EKLABORU!



KOMPLEZE DE J. M.

Judith Meyer, Germanio

La tempo neniam estis pli bona por Esperanto. Dank' al la tutmondiĝo, la mondo kuniĝas, homoj el diversaj landoj sentas sin pli proksimaj ol antaŭe, ili lernas multe pli da fremdaj lingvoj kaj ekinteresiĝas pri aliaj kulturoj. Malgraŭ la pasinteco, nun tiu movado estas subtenata de la plej granda konata potenco: la mono.

En la pasinteco, riĉaj homoj ofte subtenis malpacon por la realigo de siaj intereso. Nuntempe ili deziras pacon, internacian komprenon kaj la forigon de limoj inter nacioj, ĉar ili ja deziras agadi en diversaj landoj. Hodiaŭ eblas fabriki kelkajn produktopartojn en Orienta Eŭropo, aĉeti la aliajn el Azio, kunmunti la tuton en Usono kaj vendi la produkton ĉie en la mondo. Dank' al interreto, firmaoj eĉ

Cetere: Jam Almenaŭ Unu Sukcesa Dungo!

Post nur du semajnoj, Michel Basso decidis dungi tri rumanojn per Eklaboru! Li ĝojas ke nun estas nova servo por helpi lin trovi laborantojn en Esperanto. Ni tre ĝojus aŭdi ankaŭ pri viaj spertoj trovi laboron aŭ laboranton, skribu al ni ĉe teamo@eklaboru.com.

povas dungi laboranton el tre malproksima lando kaj ricevi iliajn labor-produktojn sen ĉeesti tie. Tio speciale bonvenas, kiam oni serĉas parolantojn de fremda lingvo. Ekzemple, eble en Brisbano troviĝas nur unu sufiĉe sperta sveda tradukisto – sed per la interreto oni ja povas dungi kiun ajn tradukiston el la tuta Svedio!

La interreto estas grandega helpo por Esperanto. Tie Esperanto havas egalajn kondiĉojn, kiel aliaj lingvoj: per la interreto facile eblas lerni Esperanton, trovi aliajn esperantistojn kaj amikiĝi kun ili, disvastigi la Esperantan kulturon kaj la novaĵojn de la Movado.

Esperanto perdis sian preskaŭmonopolon ebligi internacian komunikadon inter simplaj homoj, sed kompare al aliaj lingvoj ĝi ankoraŭ havas lastan atuton en la mano: sian facilecon. Jes, multegaj homoj provas lerni la anglan nun, sed eĉ post kelkaj jaroj da studado nur malmultaj el ili sukcesas paroli ĝin. Nemultaj homoj lernas Esperanton, sed la plejparto sukcesas esprimi sin bone post nur malmulte da tempo. La kondiĉoj neniam estis tiel favoraj, nun Esperanto devas pruvi sin! Aŭ pruvi sin aŭ esti enterigita, ĉar nia tempo estas tro malpacienca pri eksmodaj kaj malsukcesaj ideoj.

Kion fari? Kiel pruvi, ke Esperanto estas serioza, moderna mondlingvo – kaj sukcesigi la ideon? Unue, ne indas, ke Esperanto simple estu celo per si mem. Oni agu *per* Esperanto, ne nur *por* Esperanto. Oni renkontu kaj parolu kaj skribu en Esperanto por komikiĝi pri temo, ne nur por uzi la lingvon. En aliaj lingvoj oni ne parolas kun homoj nur ĉar ili parolas la saman lingvon, oni parolas kun ili ĉar oni interesiĝas pri tio, kion ili povas komuniki. En aliaj lingvoj oni ankaŭ ne korektas sian paroladpartneron tiom ofte, ĉar la enhavo de la parolo pli gravas ol ĝia aspekto.

Due, oni kreu pli da aplik-ebloj de la lingvo, kiuj jam estas naturegaj por aliaj lingvoj. La kreado de Pasporta Servo, la esperantlingva Vikipedio, Ĝangalo, Farbskatol' kaj la Internacia Televido estis grandaj progresoj, sed oni ne rajtas endormiĝi nun. En la interreto Esperanto havas egalajn kondiĉojn kiel aliaj lingvoj, do oni ne permesu, ke eblas fari ion rete en la hinda aŭ la hispana, kion oni ne povas fari en Esperanto. Se Esperanto povas esti pioniro en tiu kampo, des pli bone, ĉar retuzan-

toj informos unu la alian pri novaj servoj.

Trie, pli da esperantistoj devas konsciiĝi, ke nuntempe mono estas unu el la plej gravaj instigoj. Homoj pretas investi multe da mono kaj tempo por lerni la anglan nur ĉar ili kredas, ke ili tiel povos ricevi pli altan salajron. Kompare, multaj homoj ne pretas lerni Esperanton eĉ senpage, ĉar tio, laŭ ili, havas nur amuz-valoron. Certe oni ne povas tuj fari el Esperanto gravan karrierilon – sed oni povas provi montri, ke Esperanto povas esti pli ol nur amuzaĵo. Chuck Smith, Melissa Robertson kaj mi faris paŝon en tiu direkto kreante www.Eklaboru.com, retejon por serĉi laboron aŭ laboranton en Esperanto. Ni kredas, ke ekzistas esperantistoj, kiuj preferu dungus esperantistojn, se ili agadas same profesie kiel aliaj kandidatoj. Ni kredas, ke eĉ ekzistas postulo specife pri Esperanto-parolantoj, ekzemple por tradukado aŭ instruado, kaj ke homoj simple ne sciis, kie trovi bonajn kandidatojn. Kaj ni kredas, ke kaj Esperanto kaj la esperantistoj multe gajnos, se ni disvastigos Esperanton kiel lingvon por ĉia aspekto de la homa vivo, eĉ komerco.

Anonce

OSIEK-Premio 2006

En 2006 la OSIEK-anoj proponis 20 verkojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de La Gazeto. La 21-an de julio 2006, dum la IEK en Timisoara, Rumanio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al André Cherpillod pro Konkiza etimologia vortaro. Gratulojn! La premio, 600 EUR, rekomencas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.

Germana esperantisto, filatelisto, kolektas uzitajn kaj afrankitajn kovertojn, poŝt- kaj bildkartojn ktp. senditajn de Germanio ien ajn. Min aparte interesas temoj kiel Esperanto, mineraloj, orkideoj, Eŭropo. Eblas interŝanĝo aŭ aĉeto. Plue, mi povas proponi laŭleĝan laboron en Germanio por junaj homoj kiel infanvartistinoj. Skribu kaj petu detalajn informojn de M. Kirsch, Brandstr. 21, D-04626 Schmoelln, Germanio. Tel.: 0049 34491 23400 aŭ retpoŝte: mafrajoklaksi@freenet.de.

Oazo de Esperanto klaso, nur 2.5 km sude de Disneyland, kunvenas ĉiusabate de la 11:00 ĝis 13:00 horoj (krom julio kaj aŭgusto) ĉe 11241 Chapman Ave, Garden Grove, Kalifornio, 92840-4005. Interesiĝantoj, bv. telefoni al s-ro Tilman Williams (714) 534-3552. Viaj lito kaj ĉambro estas pretaj.

In Other Words...

En la pasinta numero de *Esperanto USA* ni lanĉis novan rubrikon: “In Other Words”. Ni “ŝtelis” tiun ideon de *La Brita Esperantisto*, kie antaŭ multaj jaroj ĝin gvidis la fama William Auld. En kelkaj vortoj: la revuo aperigis tekstojn en la angla kaj proponis traduki ilin en Esperanton. La legantoj sendis siajn variantojn de traduko, kaj fine en la revuo aperis la plej bonaj tradukoj, kun la komento de la redaktoro. Ni plivastigos tiun ĉi ideon kaj proponos al la tradukado ne nur anglajn tekstojn, sed ankaŭ Esperantajn tekstojn, ja foje estas eĉ pli malfacile traduki tekstojn el Esperanto en naciajn lingvojn. Ni komencis tiun ĉi rubrikon per angla teksto – elĉerpaĵo de la rakonto “How I Edited an Agricultural Paper Once” de Mark Twain, kaj jam venis la unua varianto de la traduko. Sube ni aperigas la originalan tekston en la angla kaj ĝian Esperantan version.

“How I Edited an Agricultural Paper Once” (excerpt)
Mark Twain


“Tell you, you cornstalk, you cabbage, you son of a cauliflower! It’s the first time I ever heard such an unfeeling remark. I tell you I have been in the editorial business going on fourteen years, and it is the first time I ever heard of a man’s having to know anything in order to edit a newspaper. You turnip! Who write the dramatic critiques for the second-rate papers? Why, a parcel of promoted shoemakers and apprentice apothecaries, who know just as much about good acting as I do about good farming and no more. Who review the books? People who never wrote one. Who do up the heavy leaders on finance? Parties who have had the largest opportunities for knowing nothing about it. Who criticise the Indian campaigns? Gentlemen who do not know a war-whoop from a wigwam, and who never have had to run a foot-race with a tomahawk or pluck arrows out of the several members of their families to build the evening camp-fire with. Who write the temperance appeals and clamor about the flowing bowl? Folks who will never draw another sober breath till they do it in the grave. Who edit the agricultural papers, you — yam? Men, as a general thing, who fail in the poetry line, yellow covered novel line, sensation-drama line, city-editor line, and finally fall back on agriculture as a temporary reprieve from the poor-house. You try to tell me anything about the newspaper business! Sir, I have been through it from Alpha to Omaha, and I tell you that

the less a man knows the bigger noise he makes and the higher the salary he commands. Heaven knows if I had but been ignorant instead of cultivated, and impudent instead of diffident, I could have made a name for myself in this cold, selfish world. I take my leave, sir. Since I have been treated as you have treated me, I am perfectly willing to go. But I have done my duty. I have fulfilled my contract, as far as I was permitted to do it. I said I could make your paper of interest to all classes, and I have. I said I could run your circulation up to twenty thousand copies, and if I had had two more weeks I’d have done it. And I’d have given you the best class of readers that ever an agricultural paper had — not a farmer in it, nor a solitary individual who could tell a watermelon from a peach-vine to save his life. You are the loser by this rupture, not me, Pie-plant. Adios.” I then left.

“Kiel Mi Foje Redaktis Agrikulturan Ĵurnalon” (elĉerpaĵo)

Mark Twain (traduko de partoprenanto)

“Mi diru al vi, vi eta maizotrunko, vi brasiko, vi ido de florbrasiko! Neniam antaŭe mi audis tian kormankan rimarkon. Mi diru al vi, pri redakcio mi okupadis (1) preskaŭ dekkvar jarojn kaj neniam aŭdis, ke oni sciis ion, por redakcii (2) ĵurnalon. Vi napo! Kiuj verkas la dramajn kritikojn por la duarangaj ĵurnaloj? Nu, aĉaro (3) da ŝuistoj promociitaj kaj metilernantaj apotekistoj, kiuj scias pri la bona aktorado same kiel mi pri la bona terkultivado, ne plu. Kiuj recenzas librojn? Homoj kiuj verkis ne eĉ (4) unu. Kiuj pritraktis la gravajn fincestrojn? Iuj, kiuj spertis la plej grandajn okazojn, por scii nenion pri ĝi. Kiuj kritikis la Indianajn kampanjojn? Sinjoroj kiuj ne povas distingi inter militkrio kaj tipio (5), kaj kiuj neniam devis kuri konkurse kun tomahoko aŭ pluki sagojn el kelkaj siaj familianoj, por fari vesperan kampofajron. Kiuj verkas la vokojn al abstino kaj kriadas pri la fluanta kuvo? Homoj kiuj ne plu spiro malebrian spiron ĝis kiam ili faros tion en la tombo. Kiuj redaktas la agrikulturajn ĵurnalojn, vi—ignamo? Homoj, ĝenerale, kiuj malsukcesas en la poeziado, la flav-kovrita romano, melodramo, aŭ kiel urba redaktoro, kaj finfine retrofalas en la agrikulturon kiel prokrasto al plena senhavo. He! Nur penu montri al mi ion ajn pri la ĵurnala fako (6)! Sinjoro, ĝin mi trais de alfa al Omaha, kaj mi diru, ke ju malpli oni scias,



des pli la bruo kiun li faras, kaj des pli la salajron li gajnas. Ho! Ĉielo scias, se mi estus malklera anstataŭ kultura, kaj aroganta anstataŭ senmemfida, mi bele sukcesus en ĉi tiu malvarmega, nesindona mondo. Mi lasas la aferon, sinjoro. Ĉar mi estis traktata, kiel vi traktis min, mi volonte foriros. Tamen mi faris mian devon. La kontrakton mi plenumis, kiom oni permesis al mi. Mi diris, ke mi povis fari vian ĵurnalon interesa al ĉiuj klasoj; mi tion ja faris. Mi diris, ke mi kreskigus la cirkuladon ĝis dudek mil ekzempleroj; se vi donus du semajnojn plu, ankaŭ tion mi farus. Krome mi donus al vi la plej bonan klason de legantoj, kiun agrikultura ĵurnalo iam havis—nek unu kultiviston, nek unusolan individuon kiu povas distingi akvomelonon disde persiko-vito, por savi la vivon. Vi, rabarbo, estas la perdinto pro ĉi rompiĝo, ne mi. Ĝis.” Kaj mi iris.

(1) okupadis – en tiu ĉi kazo mi preferus “okupadas” ĉar la “have been”-strukturo implicas ke la ago kaj okazis en la pasinteco kaj daŭras ĝis nun. La is-finaĵo en Esperanto indikas ke la ago jam finiĝis.

(2) redakcii – oni uzu simple “redakti”. “Redakcii” povas soni kvazaŭ “esti aŭ agi kiel redakcio”.

(3) aĉaro – tio ne estas eraro, sed la vorto “parcel” en la originalo ne havas nepre negativan sencin. Mi emus uzi simple “aro”, tamen “aĉaro” ja kongruas kun la ĝenerala tono de la teksto.

(4) ne eĉ – kiam “ne” estas tuj sekvata de “eĉ”, la preferinda formo estas “eĉ ne”.

(5) tipio – pro tio ke en la originalo estas “wigwam”, mi preferus la PIV-an vorton “vigvamo”.

(6) ĵurnala fako – la vorto “fako” ĉi tie sonas al mi tro akademia kaj ne sufiĉe komerca. Aliflanke, mi ne certas pri bona alternativa formo por traduki “business” en tiu ĉi kunteksto. “Komerco” ne vere taŭgas. Eble “industrio” estus la plej trafa traduko?

Komentis Joel Amis

Kiel organizi kongreson



Parto VI.

Tio ĉi estas la sesa parto de serio da artikoloj pri organizado de Esperanto-kongresoj, specife de landaj kongresoj de ELNA, sed ankaŭ de regionaj kongresoj. Ĝi baziĝas sur la kongresa manlibro de ELNA (la originalan gvidilon verkis Frank Helmuth, Cathy Schulze kaj Bill Harmon; Ellen Eddy reviziis ĝin. Jim Henry plu reviziis kaj multon aldonis), kiu troviĝas ĉe www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm.

Publikigado

La LKK varbu la helpon de la loka turismoficejo kaj la kongresa hotelo aŭ universitato. Nigraj/blankaj fotoj, preferinde grandaj, estu sendataj al la redaktoro de *Esperanto USA* kiel eble plej baldaŭ post la invito de la Kongreso. Inter septembro de la antaŭa jaro ĝis aprilo de la kongresa jaro estas dezirinde ke la LKK provizu informon kaj fotojn de la kongresejo kaj lokaj allogaĵoj por instigi la membrojn partopreni la Kongreson. Formala invito de la urbestro aŭ alia gravulo de la urbo estas tre dezirinda. Ankaŭ anoncojn oni sendu de tempo al tempo (sed ne tro ofte) al la retoŝtaj listgrupoj AktivUsono kaj elna-anoncoj (ĉe Yahoo Groups), kaj al la Usenet novaĵgrupo soc.culture.esperanto.

Publikigado al Lokaj Ne-Esperantistoj

La LKK kontaktu publikajn kaj universitatajn bibliotekojn en la kongresa regiono por ekspozicioj de Esperanto-libroj kaj

materialoj, kune kun anoncoj pri la Publika Kunveno. Ankaŭ provizo de informfolioj estu apud la materialoj.

Estas grave oferti klasojn pri Esperanto dum la kongreso, verŝajne je sabato. La komencantaj klasoj estu senpagaj kaj vaste reklamataj en la urbo.

Oni povas dissendi anoncojn pri la kongreso al lokaj kaj regionaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Estas aparte bona informad-eblo, se oni ankaŭ organizas kurson antaŭ la kongreso. Tiel bone informis la LKK de la Sankta-Luisa kongreso en 1999; iu radio-

elsendejo faris novaĵ-programeron pri la kurso kaj kongreso, kaj tiel allogis kelkajn vizitantojn al la kongreso.

Donu senpagan unutagan bileton (sen bankedo) al ĵurnalistoj kaj vendu malmultekostan unutagan bileton al iu ajn.

Publikigado Eksterlande

Informilon (prefere kun fotoj de la kongresa urbo) oni sendu al: UEA, Kanada Esperanto-Asocio, Meksika Esperanto-Federacio kaj aliaj amerikaj landaj asocioj, *Eventoj*, *Monato* kaj ceteraj gazetoj, tuj kiam sufiĉaj detaloj estas certaj, por allogi eventualajn eksterlandajn vizitantojn. Necesas pli da tempo por plani kaj aranĝi eksterlandan vojaĝon ol enlandan, do frua publikigado tre gravas. Se la kongreso havas apartan temon, oni sendu anoncojn ankaŭ al gazetoj kun tia temo, ekzemple priliteraturan kongreson oni anonci ankaŭ en *Fonto* kaj *Literatura Foiro*.

Invitoj al alilandanoj

[Tiu ĉi paragrafon aprobu iu leĝ-spertulo antaŭ ol ni inkluzivu ĝin en la oficiala manlibro.]

Kelkaj kiuj deziras alveni la kongreson eventuale devos havi ian invit-leteron por akiri vizon. Iu skribu leteron (nome de ELNA) pri tiu homo al iu registara instanco (ambasadejo?). Sed tio ne ĉiam helpas. Joel Brozovsky diris, ke dum lia tempo kiel Direktoro de la CO, li skribis multajn invit-leterojn por diversaj alilandanoj; sed nur unu el ili ricevis vizon, kaj li tro malfrue

por veni al la ELNA-Kongreso. (Li ja venis al NASK, do ne estis tute malŝparita tempo.) Kun nur unu stabano en la CO, tiu ne plu povas fari tiujn leterojn. Do, antaŭ ol diri en eksterlandaj informoj ke ni pretas skribi invit-leterojn por homoj, ni certu ke iu pretas fari la laboron. Povus esti la Sekretario de ELNA, aŭ iu en la estraro, aŭ eble la Komisiito pri Kongresoj. Eble iu en la LKK povus skribi la leterojn, sed verŝajne iu oficisto devus subskribi ilin.

Se ni ja povas proponi tiun servon, alilandajn vizitantojn ni avertu tre frue sendi personan informon pri ilia Esperanto-agado kaj eventuala prezentotaĵo ĉe la kongreso, eble menciindan en invit-letero, kaj adreson aŭ faks-numeron kien oni sendu la inviton. Noto en kongresa informo sendata al alilandaj asocioj, gazetoj ktp: "Ni ŝatus gastigi plej multajn alilandajn esperantistojn, sed ne povas garantii invit-leteron por viz-akiro se peto kun ĉiuj necesaj informoj ne venos antaŭ [certa limdato]. Petojn por invit-leteroj oni sendu al [nomo, adreso] kaj ne al la CO de ELNA."

Se eblas, la invit-leterojn oni eble sendu fakte, ĉar la interlanda poŝto (aparte al Afriko) povas esti tre malrapida. En 2005 pluraj invit-leteroj, senditaj je ŝajne sufiĉe frua dato, ne alvenis al la petintoj (en Niĝerio) ĝis post la limdato. Jen alia kialo por komenci la kongres-planadon tre frue, por anonci la daton tre frue.

Rilatoj kun alilandanaj kongresanoj

Pluraj personoj, inkluzive de eksterlandaj esperantistoj, partoprenas la Kongreson sole. En la vesperoj ili estu akompanataj de LKK-anoj kaj helpataj rilate al transportado kaj lokaj kondiĉoj. Estas bone havigi ankaŭ al komencantoj kaj vizitantoj (ekzemple ĵurnalistoj) kunulojn kiuj helpas al ili kompreni kaj ĝui la kongreson.

Se la kongresaj elspezoj estas sub la buĝetita nivelo (pro kostoj malpli altaj ol atendite, aŭ pli multe da registriĝintoj ol atendite), bona uzo de la ekstra mono estas aĉeti donacetojn por la alilandanoj ĉeestontaj la kongreson. Bonvolu noti ke manĝaĵoj aŭ spicaĵoj eble ne estas bonaj donacoj ĉar povas esti kontraŭleĝe transporti ilin trans landlimoj.

Se alvenas alilandaj gastoj kiuj ne regas la anglan, estus tre bone renkonti ilin en la flughaveno kaj konduki ilin al la kongresejo, se iel ajn eblas.

Kongresa TTT-ejo

Estas grave havi kongresan hejmpaĝon. Se neniu el la LKK scias kiel fari retejon, vi povas peti helpon de la retejestro de ELNA (nun Steve Brewer) aŭ ĉe la reteja helpa listgrupo (Yahoo Group: elna-ret-paĝo). Lastatempe niaj landaj kongresoj havis retejojn sub rubriko de esperanto.org. La hejmpaĝo enhavu interalie:

- HTML-formulara aliĝilo kaj elŝutebla PDF-aliĝilo
- Malneto de horaro (unue programer-listo sen temparanĝo)
- Mencio de allogaĵoj en la urbo kaj regiono, eventuale kun ligiloj
- Artikoleto pri la historio de la regiono kaj urbo (aŭ eventuale ligilo al Vikimedia artikolo)
- ligiloj al anglalingva informo pri la ŝtato, urbo, kaj kongresejo
- Vojklarigoj al la kongresejo.

Kongresaj bultenoj

Kutime estas almenaŭ du bultenoj (verkitaĵoj de la LKK, dissendataj de la CO); foje tri, se haveblas mono por poŝtokostoj. La unua aperu kiel eble plej frue: eble 2-3 semajnojn post kiam vi havos subskribitan kontrakton kun la kongresejo. Tiu enhavu dirojn pri la kongresa urbo, la skizajn planojn por la kongreso mem, kaj la aliĝilo. Por la kongreso de 2005, la CO dissendis la unuan bultenon al ĉiuj membroj kaj informpetintoj de la lastaj du jaroj.

Duan bultenon oni dissendu, se la unua dissendiĝis tre frue kaj se haveblas mono por dua memorigo. Tiu dua bulteno enhavu denove la aliĝilon, plus plia informo pri la programo, gastoj parolontaj, ktp. Se mankas mono por dissendi al ĉiuj, tiun bultenon oni eble sendu nur al ELNA-membroj ne jam registriĝintaj, kaj al novaj informpetintoj en la kongresa regiono.

La lasta bulteno (sendota nur al aliĝintoj, almenaŭ unu semajnon antaŭ la estrarkunsido) povas esti retroŝta, sed zorgu ke vi ne forgesu iujn kongresanojn kiuj ne havas retroŝton. Por tiuj, presu kaj poŝtu ĝin aparte. Tiu lasta bulteno enhavu jenajn informojn:

- Malneta horaro (aŭ TTT-ligo al ĝi)
- Antaŭdiro pri vetero (aŭ TTT-ligo)
- Sugesta paklisto (aĵoj kiujn kongresanoj alportu)
- Informo pri tio kiel la alvenantoj povas renkontiĝi en la flughaveno por kune taksii al la kongresejo — aparte se ne estas bona vojo per publika transporto

- Vojklarigoj al la kongresejo (ŝofore per la interŝtataj ŝoseoj; per publika transporto de la flughaveno, stacidomoj de Amtrak kaj Greyhound)

- Informo pri kiam kaj kie la registra tablo malfermiĝos, kiam kaj kie la estraro kunsidos.

Kongreslibro

La programo estu en Esperanto, kun iom da anglalingvaj tradukoj por komencantoj. Ne forgesu ke pli kaj pli da eksterlandaj esperantistoj partoprenas niajn landajn kongresojn. La plej taŭga formato estas 8 1/2" x 11"-aj folioj, duflanka, kvarpaĝa formato. Kopio povas esti fotografpretigita fare de la CO de ELNA. por presado de la LKK.

Povos esti ke diversaj homoj verkos partojn de la kongresa libreto. Unu homo servu kiel redaktoro de la libreto; prefere tiu estu iu kiu bone regas kompostan programon (ekz. LaTeX, PageMaker, Quark Express, aŭ simila) por belaspektigi la formaton de la libreto. La unuaj malnetoj de la diversaj partoj, kiujn aliaj homoj kontribuos, estu en iu simpla, malferma formato kiel ASCII-teskto aŭ (ne-Microsoft-a) HTML. [Foje okazis formato-fuŝoj, kiam du homoj verkis parton de la manlibro en malsamaj programoj kaj poste provis kunigi ilin.]

Eventuala enhavo de la kongreslibro:

- oficiala invito de gravulo de la urbo aŭ universitato
- horaro de la kongreso, aparte tempoj kaj datoj de ekskurso(j) kun priskribo pri tio, kion oni faros kaj vidos
- etaj vivhistorioj pri la homoj prezentantaj ion dum la kongreso
- informoj pri ekspozicioj de Esperanto kaj jam planitaj intervjuoj pere de ĵurnaloj, radio, televido, k.c.
- detaloj pri la bankedo inkluzive lokon kaj menuon, kaj kiajn vestaĵojn oni portu
- nomoj, adresoj, kaj funkciado de la membroj de la LKK; eventuale poŝtelefonnumeroj
- nomlisto, kun kontaktinformo laŭ permeso, de la partoprenantoj de la kongreso
- informo pri la historio de la kongresa urbo kaj ŝtato
- diroj pri la hotel-reguloj — almenaŭ surprizaĵoj aŭ nekutimaĵoj — la limtempo por eliri sian ĉambron je la lasta tago, ekz., kaj



Kongresa mapo de Novjork-urbo

(en universitata dormejo) kiel kaj kie oni malregistru sin kaj redonu la ĉambrosilosilon; ĉu fumado aŭ alkoholaĵoj permesigas, kaj kie; ktp.

- Listo (kun mapo) de proksimaj restoracioj kaj aliaj servoj (nutraĵvendejoj, aŭtoriparo, aŭto-luo, biciklo-luo, fotokopiado, ktp). Prefere listigu ankaŭ la specon, malfermhorojn kaj gamon de prezoj ĉe la restoracioj

- Telefonnumeroj por taksi-firmaoj kaj flughavena aŭtobuseta servo (“airport shuttle”)

- Informo pri publika transporto

- Mapo de la hotelo montranta gravajn lokojn — kunven-ĉambrojn kaj necesejojn, fajr-elirejojn

- Poŝtelefonnumeroj de iuj LKK-anoj

- Subtenaj reklamoj de proksimaj restoracioj, turistaj lokoj, eldonejoj de Esperantolibroj

- Teksto kaj muziko de “La Espero”

Kelkaj el tiuj aferoj — ekzemple la listo de partoprenantoj, la kvartala gvidilo — povas eventuale esti apartaj folioj kaj ne en la kongresa libreto mem.

Se vi volas havi enspezon de reklamoj en la kongresa libreto, skribu leteron kiu iom klarigas pri Esperanto, la ELNA kongreso, la “tipa” Esperanto-parolanto aŭ kongresano, ktp., kaj proponas pri reklamo-specoj kaj prezoj. Tion sendu al kaj restoracioj kaj parkoj, muzeoj, ktp. (Ni en Atlanto diskutis tion, sed fine ne faris. Unu el ni ekvolontulis fari ĝin, sed poste malaktiviĝis.) Tian leteron oni eventuale povos disdoni al restoracioj en la kvartalo, dum vi piedekskurse esploras pri iliaj horoj, prezoj, distanco ktp. por la kvartala gvidlibro.

New from the Book Service

AFIŜO JOKOHAMO. For wall mount: beautiful poster advertising 92nd World Esperanto Congress in Yokohama, Japan. Shows skyline of Yokohama. 2006. 590x410 (approx). Japan.

AFI006 \$4.70

AFRIKA MEDICINO, MIRIGE EFIKA, LA. Yvette PARÈS. Trans. Jacques Roux. A study of the effectiveness of traditional African medicine. "Is it not already time to recognize and accept the huge cultural and medical wealth of the southern countries?" (Dr. Jean-Pierre Willem, in the preface). 2006. 199p 200x140. Paper. Czech Republic. ISBN 80-85853-89-2.

AFR001 \$24.10

BEATLES MUZIK IN ESPERANTO, THE. "Solo". Limited edition collection of 25 "Beatles" songs in Esperanto. Titles can be found in our on-line listing. 2006. CD. 74'03". Great Britain.

BEA001 \$29.20

BIBLIO. A totally new edition of this staple of Esperanto (and world) literature. In the main, the book is identical with previous editions; however, the so-called 'Deuterocanonical Books', translated by Gerrit Berveling, have now been placed in their proper positions in the Old Testament. An unnumbered publication in the series "Oriento-Okcidento". 2006. 1375 p. 210x130. Bound. Czech Republic. ISBN 8085853906.

BIB003 \$31.80

BILDOJ PRI NORDA LANDO KAJ ALIAJ RAKONTOJ. Sen RODIN. 32 short stories about life in Scandinavia as seen by an Italian author, followed by 19 somewhat longer tales of a more general nature. Series "Stafeto" #30. 2006. 360p. 205x130. Paper. Belgium. ISBN 9077066225.

BIL005 \$37.20

12 MONATOJ – 12 MONTOPINTOJ. Ján VAJS. A description of how Esperanto groups in Slovakia combined forces to bag twelve popular summits in twelve successive months. Beautifully illustrated. 2006. 28p. 210x145. Paper. Slovakia. ISBN 8096904280.

DEK010 \$4.80

DEK DU SEĜOJ. Ilja ILF & Evgenij PETROV. Trans. by A. Kerbel. One of the main works of early Soviet humor. The main character Ostap Bender – whose name became a synonym for "con man" in Russian of the Soviet period – seeks a diamond treasure hidden in one of twelve chairs during the Russian revolution. 2006. 250p. 210x150. Paper. Israel.

DEK011 \$17.30

DOKTORO BRAUN VIVAS EN NI! Julian MODEST. A drama about a journalist's dilemma: what to do when a cancer cure developed by an unknown doctor ... works. Also includes the comedy "Kripto", about a Byzantine crypt discovered beneath an ordinary home. 1987. 74p. 195x140. Paper. Hungary. ISBN 9635712057.

DOK004 \$10.80

DON KARLOS. Friedrich SCHILLER. Trans. Willi Nüesch. In 16th century Spain the heir to the throne of Spain attempts to use his closest childhood friend to set up an assignation with his young stepmother the queen, not realizing that his friend wants to involve him in rebellion against the throne. 2006. 251p 210x150. Paper. Switzerland.

DON001 \$29.70

ELECTRONIC ESPERANTO. DVD-ROM containing much information about, courses of and materials in Esperanto. DVD-ROM requires browser with support for XHTML 1.0. 2006. DVD-ROM. Multinational. Contents: Music; Games in Esperanto; Film about Esperanto, concert clips, Esperanto course on video; Esperanto courses – in many languages and at many levels; Information sheets about Esperanto; Teaching materials for Esperanto; Esperanto event photos; Magazines in Esperanto; Articles about Esperanto (from Wikipedia); Articles in Esperanto (from Wikipedia); Books in Esperanto; The "Passport Service" project; Interesting links; Specialist literature about Esperanto; Specialist literature in Esperanto; Dictionaries.

ESPO54 \$4.50

EN LA SERĈADO DE LA MONDOLINGVO. Aleksandr DULICENKO. An introduction to the history of interlinguistics, from the story of the Tower of Babel to the present day, with separate chapters devoted to Solresol, Volapük, Esperanto and the post-Esperanto projects. 2006. 160p. 200x145. Paper. Russia.

ENL004 \$21.10

ESPERANTO – UNA LENGUA PARA TODOS. F. ZARAGOZA RUIZ. A short but complete Esperanto course for Spanish speakers in 21 two-page lessons. 1987. 48p. 240x170. Paper. Spain.

ESP002 \$3.50

FAJRO! FAJRO! R. MackKAY. A series of nine short sketches primarily aimed at elementary school pupils. 1970. 24p. 170x110. Paper. Great Britain.

FAJ003 \$2.00

FJODOR DOSTOJEVSKIJ EN ESPERANTO. Aleksander KORĴENKOV. A discussion of the works of this great 19th century Russian

author and their various translations into Esperanto, with examples of Dostojevskij's prose in our language. Also includes the short story "Kampulo Marej". Series "Sed ne el katedro" #2. 2005. 19p. 210x150. Paper. Russia.

FJO001 \$4.70

GERDA MALAPERIS! Claude PIRON et al. A film version of Claude Piron's popular didactic novella *Gerda malaperis!* Mystery ... danger ... amusement ... love ... and laughable moments are there for you to enjoy in this adventure. 2006. DVD.

GER007 \$27.60

GLUMARKOJ JOKOHAMO. Sheet of 12 stickers commemorating the 2007 World Esperanto Congress in Yokohama. Use them on letters to remind your friends of Esperanto's existence and utility.

GLU003 \$1.90

HANDBOOK OF VOLAPÜK. Andrew DRUMMOND. An amusing pastiche/parody of the struggle between proponents of Volapük and Esperanto in Scotland at the beginning of the 1890s. Enjoyable novel, in English. Includes some Volapük lessons for the interested. 2006. 320 p. 215x140. Paper. Great Britain. ISBN 1904598676.

HAN001 \$19.90

HISTORIO. Herodoto. Trans. Spiros Sarafian. The complete works of the Father of History. The history, geography and prodigies of the world of the Classic Greeks, in nine books. Long considered one of the great books of the Western world. Includes 33-page index of names, in assimilated form. 2006. 623p. 210x150. Paper. Greece. ISBN 9605320118.

HIS010 \$63.40

HODLER EN MOSTAR. Spomenka ŠTIMEC. An original historical novel about two paintings, which have disappeared, painted by Ferdinand Hodler, the father of Hector Hodler, the founder of the Universala Esperanto-Asocio. 2006. 105p. 210x150. Paper. Italy. ISBN 9788870360738.

HOD001 \$24.20

IKU – INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO. Amri WANDEL (ed.) Large-format collection of papers presented at the Florence World Esperanto Congress in 2006. Topics included can be found in the on-line listing. N.d. (2006). 154p. 300x210. Paper. The Netherlands.

IKU004 \$19.70

INTERPOPOLA KONDUTO. Edmond PRIVAT. An original, clear-sighted attempt to analyze the genesis of hatred, violence and war between peoples Privat's goal is to describe

the problems of national pride, vanity and egotism, and to explain the errors of patriotism, nationalism and messianism, the consequences of imperialist and the contradictions of national moralities in conflict with others. 2006 (new edition). 142p. 205x145. Paper. Poland. ISBN 8392028937.

INT013 **\$19.50**

INVENTO DE L' JARCENTO. Julian MODEST. Three dramas ("Pluvvespero", "Enstelig en la koron", "Stela melodio") and two comedies ("Invento de l' jarcento" and "Eŭropa firmao") by a Bulgarian master, from the 1980s and 1990s, of the short prose work in Esperanto. 1993. 79p. 195x145. Paper. Bulgaria.

INV002 **\$5.40**

KAJ LA CETER' - NUR LITERATURO. Gaston WARINGHIEN. The fifth and final collection of Waringhien's essays, about the Esperanto literary world and literary translations into Esperanto. Contains many illustrative excerpts and translations. 1983. 350p. 210x145. Paper. Belgium. ISBN 9063360312.

KAJ006 **\$33.10**

LINGVO KAJ POPOLO. Humphrey TONKIN. An inventory and critical examination of experiences gained by the author during more than half a century of activity having to do with Esperanto. Its purpose is to question received wisdom about Esperanto, with the goal of a deeper interrogation of the Esperanto movement and Esperanto culture. 2006. 159 p. 210x150. Paper. The Netherlands. ISBN 929017093X.

LIN021 **\$22.90**

MI ESTAS HOMO. L. L. ZAMENHOF. Ed. Aleksander Korĵenkov. A collection of Zamenhof's letters and articles, most in Esperanto but some translated from Russian, relating to his views on religion, specifically *homaranismo*. 2006. 288p. 200x145. Paper. Russia.

MIE003 **\$33.80**

MORTO EN VENECIO, LA. Thomas MANN. Trans. Petro Buijnsters. Gustav Aschenbach, a neurotic author, during a vacation in Venice falls in love with a Polish teenager, Tadzio. His obsessive secret love slowly ruins him spiritually, and at the same time he is struck down by a cholera epidemic. 2006. 87p. 210x135. Paper. Belgium. ISBN 9077066217.

MOR007 **\$7.70**

NI VIVOS! Julian MODEST. A nine-act documentary drama about the last years in the life of Lidia Zamenhof, and about the terrors that the fascist invasion visited upon Europe. 1987. 53p. 200x140. Paper. Hungary. ISBN 9635711913.

NIV001 **\$4.80**

ORA BOVIDO. Ilja ILF & Evgenij PETROV. Trans. by A. Kerbel. In this sequel to *Dek du seĝoj*, Ostap Bender, the antihero of the earlier work, follows a Soviet underground multi-millionaire, hoping to amass a fortune, but loses the money as he flees the country. 2006. 265p. 210x150. Paper. Israel.

ORA006 **\$17.30**

ORDENO DE VERDA PLUMO. Josip PLEADIN. Encyclopedic collection of information about individuals who have played important roles in the development of Esperanto literature. Published in collaboration with the Esperantolingo Verkista Asocio. 2006. 272p. 245x175. Bound. Croatia. ISBN 953-96975-5-7.

ORD001 **\$54.90**

POŜAMIKO. Beatrice ALLÉE & Katalin KOVÁTS. A handy pocket-sized collection of well-illustrated exercises showing how Esperanto is used in everyday situations. 2006. 40p. 140x105. Paper. The Netherlands. ISBN (978)9078519010.

POS015 **\$10.50**

REVULA SEZONO. Mikaelo POVORIN. 20 new songs by a relatively newly-discovered Russian musician. Sung by Povorin and Natasa Gerlah, guitar accompaniment by Povorin. Contents can be found in our on-line listing. 2006. CD: 56'27". Russia.

REV004 **\$25.10**

SAMIDEANOJ. Aleksander KORĴENKOV. A collection of 27 humorous and satirical short stories about Esperanto and Esperanto speakers, aimed primarily at those who have taken a basic course in Esperanto and want to start reading but don't yet have the courage to face a novel. Series "Legu kaj lernu" #2. 2006. 80p. 200x140. Paper. Russia.

SAM002 **\$8.80**

SENLEGENDA BIOGRAFIO DE L. L. ZAMENHOF. "Iudovikito". A biography of the creator of Esperanto based on the documents collected by "Iudovikito" for his "iam kompletigota plena verkaro de l. l. zamenhof", of which this is Kromkajero 1. 1982. 304p. 215x160. Paper. Japan.

SEN011 **\$36.10**

SUPERNOVA. Supernova. First collection of rock music by a new Latin group. By Rogener Pavinski (voice and bass guitar), Ale Mancini (electric guitar), Roger Borges (drums and synthesizer). Titles are included in our on-line listing. 2006. CD: 54'20". France.

SUP002 **\$24.80**

T-SHIRT "DAFT HATS". Attractive gray T-shirt, heavy cotton, with large-size picture on front of Esperanto's "special" (supersigned) characters and, below, the words "DAFT HATS". Below that, in small print, "Oficiala T-chemizo de Helmut von Druhler" (for the identity of Helmut von Druhler, listen to

Radio Verda at
<http://www.radioverda.com/>).

SHI092 (Medium) **\$13.40**

SHI093 (Large) **\$13.40**

SHI094 (Extra large) **\$13.40**

TEMPO-MAŜINO, LA. H. G. WELLS. Trans. E. W. Amos. Wells' famous dystopian novel about the time-traveler who discovers the end result, a hundred thousand years in the future, of the 19th century struggle between capital and labor, in the persons of the butterfly-like Eloi and the cannibalistic Morlocks. Series "Utopia" #4. 2006. 82 p. 210x145. Paper. The Netherlands.

TEM004 **\$12.60**

TERMINARO POR BIBLIAJ STUDOJ. G. RUST & D. BROADRIBB. An introduction to the study of the Bible, aimed particularly at specialists. 1973. 79p. 240x170. Paper. Italy.

TER007 **\$6.30**

VERDA RANARO PREZENTAS, LA ... Paul GUBBINS. Two one-act plays which were presented at the World Esperanto Congress in Florence, Italy (2006). The play "Pacaj batalantoj" requires three players (two women, one man) and the play "Mikael kaj la monstro" has four (two men, one woman, one voice). 2006. 40p. 210x145. Paper. Great Britain. ISBN 0902756257.

VER008 **\$10.10**

VERULA SEZONO. Mikaelo POVORIN. 20 new songs by a relatively newly-discovered Russian musician. Sung by Povorin and Nataša Gerlañ, guitar accompaniment by Povorin. Contents can be found in our on-line listing. 2006. CD: 59'38". Russia.

VER014 **\$25.10**

All books listed can be ordered: by mail from ELNA, 5712 Hollis St., Emeryville CA 94608; by telephone at (510) 653-0998; or through our website at <https://esperantousa.hypermart.net/butiko/butiko.cgi> (credit-card only). For some titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website. If a title is out of stock at the time of ordering, you will be back-ordered and later charged at the time the title is shipped. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar versus other currencies, all prices are subject to change without notice.



Andrew Drummond is the author of two novels, *An Abridged History* (2004) and *A Hand-book of Volapük* (2006). His website is at <http://www.andydrummond.net>. I interviewed him by email in fall 2006.

- Who were your favorite authors as a child? Who are your favorite authors now? Which authors do you think have most influenced you as a writer?

- As a child, it was the staples of a British child's reading in the 1950/60s — Enid Blyton, Richmal Crompton, C.S. Lewis, the odd dip into the recognised "Classics", Hergé's Tintin, later — and inevitably — Tolkien. Nowadays, it's more likely to be Dickens, Jose Saramago, James Hogg, Laurence Sterne, Mervyn Peake, Michael Innes, Marquez, W.G. Sebald, Le Carre, R.L. Stevenson, Zola, Dumas, Thomas Mann. As a writer, I'd have to say the first four of these have had the most influence on me — but I've read quite widely over the years, and I can see that various medieval/post-medieval French and German authors have also influenced both my subject-matter and my style.

- Do you mean the first four of the list of your current favorites, or the first four in the list as a whole?

- Yes — when I say the "first four", I mean Dickens—Sterne.

- You studied Modern Languages at the university, and you've published several translations from German. What other natural languages besides German have you studied? Do you consider yourself fluent in any others? Do you consider

“My view is that Volapük, though cunning in its architecture, was simply far too complex for its own good”

yourself fluent in any other constructed languages besides Volapük?

- I studied both French and German at university, and can hold reasonable conversations in, and read easily, both of these. My parents were both linguists — my father in particular had a great enthusiasm for languages: in his time, he studied German, French, Italian, Spanish, Norwegian, Greek, Hungarian, Turkish — even sitting a basic exam in Rumanian, self-taught, at the age of 67! But I don't consider myself fluent in Volapük at all — that would imply a reasonable level of practice: I struggle with it — it's a language that requires considerable thought. From what little I know of it, Esperanto seems a far more fluid language (but that's not an endorsement!)

- Do you use the word “linguist” in the older sense of “polyglot” or the newer sense of “philologist” or “language scientist”?

From Volapük, there was an obvious trajectory into looking at all the other “Universal Languages” which proliferated in the 19th century: some were manifestly bizarre, some were wonderfully naïve — I collect “oddities”.

- “Linguist” simply as “a student of language”, certainly in the older sense. I love to find the hidden commonality of vocabulary of languages of the same family. But I am far from being a scientist of language — just a gourmet.

- How did you first get interested in the international language movement and Volapük, Esperanto and Solresol in particular?

- To be honest, I can't hit on a defining moment. I came across Volapük when researching into something else related to my first novel, *An Abridged History*; and tucked the reference away for future consideration. The more I found out about its early history, the more fascinated I became with this rather obscure alley-way of linguistics. From Volapük, there was an obvi-

ous trajectory into looking at all the other “Universal Languages” which proliferated in the 19th century: some were manifestly bizarre, some were wonderfully naïve — I collect “oddities”.

I have to confess to being a bit astounded by the interest which my “Handbook” has stirred up in the few weeks since publication — my first inkling of it was when I saw Rick Harrison's splendid review on Amazon. And then, last week when I was doing a reading at the Edinburgh International Book Festival, I was quite un-nerved to be approached by a member of the audience and spoken to in Volapük.

I have to say that the interest in my book has not just been from linguists of various shades, but equally from the general reading public.

Anyway, it will not have escaped your notice, I suspect, that my take on International Languages is slightly divergent from that of the I.L. movement itself.

- How did you do your research on the early history of Volapük and Esperanto? What books besides Charles Sprague's *Hand-book of Volapük* did you find most useful? Did you make contact with current Volapük or Esperanto speakers?

- Some will no doubt criticise me for it, but my linguistic research more or less stopped with a down-loaded copy of Sprague's *Hand-book* (thanks to <http://personal.southern.edu/~caviness>). I think, when you're creating fiction, there is a point at which fact must be left behind and imagination must take over. So, although my intention was to create a language manual with a difference, it was also to write an entertaining story: sometimes too much fact just gets in the way. Interestingly, the publication of the book has brought a number of UK-based Volapük-ists to my attention, as well as those in the USA.

- Are you familiar with Schleyer's 1895 article “Über die Pfuscher-Sprache des Pseudo-Esperanto”? Did it influence your presentation of the conflict between Mr. Justice & Dr. Bosman?

- Not at all, I fear (but if you have a copy, I'd be interested to see it — its very title sounds like fun!). The antagonism between

Justice and Bosman is simply a reflection of my own experience in similar “agitating” groups as a student, when factional intrigue became far more important — and possibly far more fascinating — than the stated objectives of the groups.

- The main characters in your book speak about a “universal language”; nowadays proponents of Esperanto, Interlingua and so forth use the term “international language”, and the transition seems to have happened not long after the period when A Hand-book of Volapük is set. To what extent do you think this change in terminology reflects a real change in philosophy or goals?

- I fear I cannot give any sensible response to that. My suspicion is that the term “universal” was indeed replaced somewhere close to the First World War, by the peace-movements which arose beside or from the social-democracy movements of the time — “internationalism” became a more widely-recognised concept. But I may be quite wrong on that...

- In a couple of places I noticed Mr. Justice making prophecies about the future of Volapük which arguably turned out to be true, except that they were true about Esperanto. To what extent was this deliberate?

- It was deliberate to the extent that the early Volapük-ists doubtless considered their language to be the language of the future — only for them to see the advantage slip away from them towards Esperanto. I enjoy seeing history from the “wrong end” — my first novel, *An Abridged History*, has as one of its themes the imagined technical wonders of the 20th century, as envisaged by the late Victorians.

- Did Volapük deserve its fate? Would the world be a better place if Schleyer and the Academy had resolved their quarrel, or do you reckon would the movement have fallen apart sooner or later for other reasons?

- My view is that Volapük, though cunning in its architecture, was simply far too complex for its own good. Even if the various factions had not fallen out, I doubt it could have held back Esperanto. However, I think there are also broader issues here: two of the questions I raise in my book — and I do not claim to know the answer to either — are these: firstly, the “universal languages” are in themselves very Eurocentric — that is, their vocabulary and grammar is based almost exclusively around the Romance or Germanic language-groups — what should Africans, Asians, Chinese people make of them? Secondly, can a “universal language” ever

Volapük, for example, tried to cover every possible nuance of grammar, but fell down badly on the vocabulary; in trying to be all things to all men, it rapidly became nothing to anybody.

be anything more than a common means for facilitating communication between different nations — that is, could and should it ever aspire to be the ONLY language which all people use all the time? Volapük, for example, tried to cover every possible nuance of grammar, but fell down badly on the vocabulary; in trying to be all things to all men, it rapidly became nothing to anybody. My own personal belief — anathema perhaps to international languages — is that variety in all things can only be healthy.

- How did you decide to write about the census? Had you, for instance, picked the period when the story would take place and looked for major events of that period that could be tied in, or were you already interested in the census procedures and so forth beforehand?

- The Census was just another interest arising from previous work. Clearly, when you’re writing about the late Victorian period, and want some solid, real background, the Population Census is an unbeatable source; it then occurred to me that a great starting-place for a novel would be all the stories which could be revealed to the Census Officer as he collected the data. When I then got down to writing the Volapük novel, the Census story was a very convenient mechanism for moving along some of the plot. It’s also interesting that the Census forms in those days did ask whether English or Gaelic was a person’s “native” tongue — something that indicates the state of language in Scotland at that time.

- How did you first get interested in Sir Thomas Urquhart? — through the Scottish history or literature connection, or the constructed language connection, or in some other way?

- Urquhart came at me from three directions really: firstly, a mention in a novel by Robertson Davies, *The Rebel Angels*, where a rather unpleasant character descended from Sir Thomas is central; then, when researching further into the history of Universal Languages — he’s a hard man to miss; and finally, I chanced upon his absolutely wonderful translations of Rabelais’ Gargantua/Pantagrue works, where his use of the English language — and more! — is quite superb.

- How much of Sir Thomas’s work have

you read? How much of it would you recommend? Are there some of his works now out of print that deserve rediscovery?

- I’ve read “The Jewel” several times over, but would be hard pushed to recommend it to others, except as a reference to his use of language: it’s fascinating, but decidedly an acquired taste. Obviously, his translations of Rabelais are highly readable. I’ve also had a look at some of his early “Epigrams”, which are entertainingly rude.

- I can see where most of the aspects of Sir Thomas’s character and the things he does and says are well supported by his surviving works. I’m curious about the helmet, cloak and scimitar, however — is it something from Sir Thomas’s life or works, or from another historical source, or something you made up?

- I’m not entirely sure myself where these items came from! Not from Sir Thomas’ works, certainly. If the equipment is symbolic of anything (and I’m not sure it is) then it would be of the potentially, and usually ephemeral, dictatorial power of the teacher over the pupils.

- Several aspects of your story — the treatment of the dirigible, the mechanical translating engine, and so forth — seem reminiscent of the California Steampunk authors — James Blaylock, Tim Powers, K.W. Jeter. Are you familiar with their work?

- Short answer: no, none of them are authors I’ve heard of. One of the many wonderful things about the Victorians was their ability to dream up fascinating devices. For part of the research into my novel, I did also look into the works relating to Lunatic Asylums and in several of these I found case-studies of men who had “invented” all manner of wonderful “engines” — some of these just seemed too good to ignore!

- What are your writing habits like? Do you have a set time of day for writing, a daily word count goal? Are you generally revising one piece while writing another, or do you keep those phases separate?

- Since I have a full-time job, Monday to Friday, I tend to limit myself to writing eight or so hours at weekends, and maybe four hours during the week. If things are going well, I can take a couple of days off work and storm at it! I generally try to write a ‘chapter’ in two or three consecutive sittings, with a goal of x-thousand words per chapter — 2500 words per day is my best rate. And I can usually only manage to work on one piece at a time.

- *What tools do you use for writing? Do you write first drafts directly on a word processor or text editor, for instance, or draft with pen or pencil and rewrite on the word processor?*

- I do almost everything on computer these days, apart from maybe a few brief notes to myself on scraps of paper. It is so much easier to juggle ideas that way.

- *Do you outline a novel before starting to write it? If so, in how much detail? How much did your first couple of novels deviate from their outlines in the course of writing?*

- I usually have a master-plan, but frequently find myself deviating from it, especially when the plot, of itself, begins to grow arms and legs. The first draft of my first novel, *An Abridged History*, was

about twice the length of the final version, and there was considerable re-working of the plot; the *Volapük* novel was far easier to write and keep to the plan.

- *How long had you been writing fiction before you sold *An Abridged History*?*

- I've been writing fiction — mostly short-stories — since I was a student, back in the 1970s. But most of it was just for my own enjoyment. Various attempts to get published simply failed, until an extract from *An Abridged History* won a short-story prize in 2002, and things then — eventually — took off.

- *On your website you describe your current novel in progress as “A novel set in 1740, which deals with the Scottish noblewoman, Lady Grange, who was kidnapped in 1732 by associates of her*

husband, and kept prisoner on a succession of lonely and remote Scottish islands — including St Kilda — until her death in 1745.” Can you say anything more about it at this point?

- Not much more to say at the moment — the novel is finished, as far as I'm concerned, and my publisher is currently considering it. However, there are certain features of the novel which my publisher may find hard to swallow — most notably the language and the spelling — so I await his response with some trepidation. However, I am formulating ideas for the next novel...

Interviewed by Jim Henry

La Historio de la Centjarulo

Walt Whitman

(Volontulo de 1861-2, ĉe Parko Vaŝingtona, Bruklino, helpanta la Centjarulon.)

Donu al mi la manon, maljuna Revoluciulo,
La deklivosupro estas proksime, nur kelkajn paŝojn (faru lokon, sinjoroj),
Supren laŭ la pado vi bone sekvis min, malgraŭ viaj cent jaroj kaj pli,
Vi povas ja marŝi, maljunulo, kvankam viaj okuloj estas preskaŭ finitaj,
Viaj kapabloj servas vin, kaj baldaŭ mi devas igi ilin servi min.


Ripozu, dum mi al vi diros, kion signifas la amaso ĉirkaŭ ni,
Sur la ebenaĵo malsupre varbitoj trejniĝas kaj ekzerciĝas,
Tie estas la barakejo, unu regimento foriros morgaŭ,
Ĉu vi aŭdas la oficiojn doni siajn ordonojn?
Ĉu vi aŭdas la tintegon de la muskedoj?

Nu, kio ekestas al vi nun, maljunulo?
Kial vi tremas kaj kroĉas mian manon tiel konvulsie?
La trupoj nur trejniĝas, ili estas ankoraŭ ĉirkaŭitaj de ridetoj,
Ĉirkaŭ ili apude la bone vestitaj amikoj kaj la virinoj,
Dum belega kaj varma la posttagmeza suno brilas malsupren,
Verda la somermeza verdaĵo kaj freŝa blovas la ludanta venteto,
Tra la fieraj kaj pacemaj urboj kaj la markolo intere,
Sed trejnado kaj parado estas finitaj, ili remarŝas al la barako,
Nur aŭdu tiun aprobon de manoj! aŭdu, kia aplaŭdado!

Forirante, la amasoj nun apartiĝas kaj disiĝas—sed ni, maljunulo,
Ne por nenio mi kondukis vin ĉi tien—ni devas resti,
Vi por paroli vivice, kaj mi por aŭskulti kaj diri.

La Centjarulo.

Kiam mi kroĉis vian manon, ĝi ne estis kun teruro,
Sed subite verŝiĝante ĉirkaŭ mi ĉiuflanke,
Kaj malsupre tie, kie la knaboj trejniĝadis, kaj supren laŭ la deklivoj ili kuris,
Kaj, kie la tendoj estas starigitaj, kaj kie ajn vi vidas suden kaj sud-eosten, kaj sud-uesten,
Trans altaĵojn, trans malaltaĵojn, kaj el la randoj de arbaroj,
Kaj laŭ la bordo, en marĉo (nun supre plenigita) venis denove kaj subite furiozis,



Walt Whitman

Kiel antaŭ okdek kvin jaroj nenia nura parado, ricevita kun aplaŭdo de amikoj,
Sed batalo, en kiu mi mem partoprenis—jes, kvankam antaŭ longa tempo, mi en ĝi partoprenis,
Marŝante tiam ĉi tiun altaĵon, ĉi tiun saman grundon.

Jes, ĉi tio estas la grundo,
Miaj blindaj okuloj, ĝuste dum mi parolas, ĝin vidas rehomigita el la tomboj,
La jaroj retroiras, pavimoj kaj dignaj domoj malaperas,
La krudaj fortikaĵoj reaperas, la malnovaj ringeg-pafiloj estas muntitaj,
Mi la vicajn vidas da levita grundo, sin etendantaj de la rivero al la golfo,
Rimarkas mi la vidon de la akvoj, rimarkas la altejojn kaj deklivojn,
Ĉi tie ni bivakadis, tio estis ĉi tiun tempon en somero ankaŭ.

Dum mi parolas mi ĉion rememoras, rememoras la Deklaracion,
Ĝi estis legata ĉi tie, la tuta armeo paradis, ĝi estis al ni legata ĉi tie,
De sia stabo ĉirkaŭite, la Generalo en la mezo, li suprentenis sian elingitan glavon,
Ĝi scintilis en la suno en la plena vido de l' armeo.

Ĝi estis aŭdaca ago tiam—la anglaj militŝipoj ĵus alvenis,
Ni povis rigardi ĝis la ekstera golfo, kie ili staris ankrite,
Kaj la transportajn ŝipojn, svarmantajn per soldatoj.

Kelkajn tagojn plu kaj ili alteriĝis, kaj tiam la batalo.

Dudek mil estis alportitaj kontraŭ nin,
Veterana forto, provizita per bona artilerio.

Mi ne diras nun la tuton de l' batalo,
Sed unu brigado, frue en la antaŭtagmezo ordonita antaŭen ataki la ruĝ-frakulojn,
Pri tiu brigado mi diras, kaj kiel firme ĝi marŝis,
Kaj kiel longe kaj bone ĝi staris, alfrontante morton.

Kiuj, vi pensas, ke estis marŝantaj firme, severe alfrontantaj morton?
Estis la brigado de la plej junaj viroj, forta je dumil,
Edukita en Virginio kaj Marilando, kaj la plejparto el ili konataj persone al la Generalo.

Brave antaŭen ili iris per rapida paŝado al la akvoj de Govanuso,
Ĝis subite, neobservite de defilintoj tra la arbaro, dumnokte penetrita,
La Britoj avancantaj, ĉirkaŭvenante de la eosto, feroce pafante per siaj pafiloj,
Tiu brigado de la plej junaj estis forbarita kaj en la manoj de l' malamiko.

La General' observis ilin de tiu ĉi altaĵo,
Ili faris adajn urĝajn penojn rompi sian medion,
Poste sin dense kuntiris, tre kompaktaĵ, sia flago flirtanta en la mezo,
Sed ho de la altaĵoj kiel la kanonoj malabundigis kaj malabundigis ilin!

Ĝi naŭzas min ankoraŭ, tiu buĉado!
Mi vidis la ŝviton kolektiĝi gute sur la vizaĝo de l' Generalo.
Mi vidis, kiel li tordis la manojn angore.

Dume la Britoj manovris eltiri nin por altrudita batalo,
Sed ni ne kuraĝis fidi la ŝancojn de altrudita batalo.

Ni batalis la batalon en taĉmentoj,
Atak-elirante ni batalis ĉe kelkaj lokoj, sed en ĉiu la ŝanco estis kontraŭ nin,
Nia malamiko, avancante, konstante superante, repuŝis nin al la teraĵoj sur tiu ĉi altaĵo,
Ĝis ni turnis nin, minacante tie ĉi, kaj tiam li forlasis nin.

Tiu estis la eliro de la brigado de la plej junaj viroj, forta je dumil,
Malmultaj revenis, preskaŭ ĉiuj restas en Bruklino.

Tiu kaj tie ĉi la unua batalo de mia Generalo,
Neniaj observantaj virinoj, nek sunbrilo por ĝui, ĝi ne finiĝis kun aplaŭdado,
Neniu aplaŭdis ĉi tie tiam.

Sed en mallumo en nebulo sur la tero sub malvarma pluvo,
Lacaj tiun nokton ni kuŝis frustritaj kaj morozaj,
Dum malestime ridis multaj arogantaj lordoj, bivakantaj kontraŭ ni,
Sufiĉe aŭd-proksimaj, festenantaj, kuntintigantaj vinglasojn je sia venko.

Tiel malvigle kaj malseke kaj alia tago,
Sed la nokton de tiu, nebulo leviĝinta, pluvo ĉesinta,
Silenta kiel fantomo, dum ili pensis, ke ili certe venkos lin, mia Generalo retretis.

Mi vidis lin ĉe la riverflanko,
Malsupre ĉe la pramo, lumigita de torĉoj, hastiganta la enŝipiĝon,
Mia Generalo atendis, ĝis la soldatoj kaj vunditoj estis ĉiuj transpasintaj,
Kaj tiam (estis ĵus antaŭ sunleviĝo), ĉi tiuj okuloj vidis lin por la lasta fojo.

Ĉiu alia ŝajnis plenigita de malgajo,
Multaj sendube pensis pri kapitulaco.

Sed kiam mia Generalo pasis min,
Dum li staris en sia boato kaj rigardis en la direkto de la venanta suno,
Mi vidis ion malsaman ol kapitulacon.

Fino.
Sufiĉe, la historio de la Centjarulo finiĝas,
La du, la pasinteco kaj la nuntempo, interŝanĝiĝis,
Mi mem kiel liganto, kiel kantanto de granda estonteco, nun parolas.

Kaj ĉu ĉi tiu estas la grundo, kiun Vaŝingtono tretis?
Kaj tiuj akvoj, kiujn mi apatie tage transiras, ĉu ĉi tiuj estas la akvoj, kiujn li transiris?
Tiel rezoluta en malvenko, kiel aliaj generaloj en iliaj plej fieraj triumfoj?

Mi devas kopii la historion, kaj sendi ĝin orienten kaj okcidenten,
Mi devas konservi tiun rigardon, kiel ĝi lumis sur vin riverojn de Bruklino.

Vidu—dum la jara rondiro revenas, la fantomoj revenas,
Estas la 27-a de Aŭgusto kaj la Britoj alteriĝis,
La batalo komencas kaj iras kontraŭ nin, vidu tra la fumo la vizaĝon de Vaŝingtono,
La brigado de Virginio kaj Marilando elmarŝis por interkapti la malamikon,
Ili estas forbaritaj, murdema artilerio de la altaĵoj direktiĝas sur ilin,
Vico post vico falas, dum super ili silente velkas la flago,
Baptita tiun tagon en la sangaj vundoj de multaj junaj viroj,
En morto, malvenko, kaj la larmoj de fratinoj kaj patrinoj.

Ha, altaĵoj kaj deklivoj de Bruklino! mi perceptas, ke vi estas pli valoraj, ol viaj posedantoj supozis;
Meze de vi staras bivako tre malnova,
Staras por ĉiam la bivako de tiu morta brigado.

El la angla tradukis Maurice Wittenberg

Pardonpetante al la betono



Jay Lake, tradukis el la angla Russ Williams

Ĉiu havas historion. La drogoknabo kiu provis prirabi la trinkejon nemalproksiman de mia domo. La aŭdaca kliento kiu celis pafi lin. La virino sur la strato ekstere. Eĉ la hazarda kuglo kiu trafis ŝian tempion. Precipe la makulo sur la trotuaro. Mi nur estis piediranta al la poŝtoficejo. Nur al mi mankas historio.

La ĉielo estis klara kaj pala, perfekte glazurita ceramika kovrilo super la mondo. Monto Hood duonvideblis purpurblanke fororiente dum korvoj plendis ĉe tegmentaj pintoj. Ĉirkaŭ la tria posttagmeze, mi ŝlasis la antaŭan pordon de mia maljuniĝanta viktoria domo, trotis malsupren laŭ la ŝtuparo, kaj haltis ĉe la trotuarrando por atendi breĉon en trafiko.

La peza ligna pordo de la trinkejo Ursungego de O'Reilly malfermiĝis per krak'. Mi ĵus ekrigardis tien kiam mi aŭdis knaleton. Mi supozas ke ĉiu alkutimiĝis al la eĥa tondro de filmaj kugloj. En reala vivo, la pafo sonis kiel malgranda petardo. En reala vivo, malalta ordinarulino kun griza hararo falis sur la trotuaron maldekstre de mi nemalproksime.

La makulo sur la trotuaro ne foriris. La Urbo Portlando alsendis skipon kun ĥemiaĵoj kaj altpremaj hosoj. Tiam la trinkejo dungis du ulojn, kiuj sabloŝprucigis kaj blankigis la betonon. Post kiam tio ne sukcesis, mi iris ĉiutage ĉirkaŭ la tria kun baksodo kaj skrapa broso. Oni fojfoje kririproĉis min, sed mi persistis.

Estas etiko en preĝejo kaj estas etiko en la laborejo. Homoj kiuj tenos la pordon por vi dum la vespermanĝa svarmado ĉe Jake's fitraktos vin en trafiko. La sola etiko kiu gravas estas tiu, kiun vi trovas en la momento.

Kaj en tiu momento, mia etiko mankis al mi. Sango kaj osto ŝprucis, flua roza arko ŝvebanta en la sunlumo. Ŝia plasta plumantelo briletis. Ŝia dekstra piedo mis-

paŝis kaj ŝi falis. Iu kriis. Mi pensas, ke ne estis mi. Tiam mi jam ekforkuris.

Mi apertenas al la bonuloj — vivdaŭro da principa opono kontraŭ pafiloj. Konstanta historio de progresema voĉdondado. Virinoj devas regi la proprajn korpojn kaj religio trudu sin nek en lernolibrojn nek en la registaron.

Domaĝe ke mi ne restis fidela al miaj kredoj.

Ne plu S-ro Bonulo.

Semajnon poste mi aĉetis barelon da trikloretileno, vadbotojn, kaj longajn kaŭĉukajn gantojn. La makulo sur la trotuaro restis, kiom ajn longe mi skrapis ĝin. Post iom da tempo la polico imputis al mi naturmedian endanĝerigon.

Mi abonis la *Oregonanon*, nur por sekvi la historion. Iel la klara graseta ĵurnala papero realigis ĝin pli ol povis fari ttt-ejoj. La drogoknabo estis stratulo, dekkvinjara. Li jam malaperis en la porjunulan justican sistemon. Iu adjunkta distrikta prokuroro volis kapti la memvolan heroon pro portado de pafilo sen licenco. La ĵurnaloj brubruis pri memjuĝa justico. La defendo serĉis misteran atestanton, iu viro kiu staris proksime kiam la pafo okazis. Mi iris al la tribunalo, sidis en la galerio. Neniu konis mian nomon.

La makulo sur la trotuaro daŭre akuzis min. Homoj paŝis ĉirkaŭ ĝi kvazaŭ la viktimo ankoraŭ kuŝus tie. Ili sciis tion, kion mi sciis, eĉ se mi estis la sola kiu povis vidi ĝin klare. Mi provis aĉeti eksplodaĵojn, por detrui tiun parton de la trotuaro, sed neniu volis vendi tion al mi sen licenco.

La viktimo finfine havis funebran ceremonion, post preskaŭ monato da tenado en la kadavrejo de la mortenketo de distrikto Multnomah. Mi alportis grandan bukedon de lilioj. Neniu aperis en tombejo Rivervidaĵo krom mi, du homoj de la mortenketa oficejo, kaj la episkopana pastro kiu prezidis la ceremonion. F-ino Muriel Weeks havis neniujn vivantajn parencojn, kaj verŝajne neniujn amikojn.

Anonima donacinto pagis la enterigajn kostojn. Neniu pridemandis min. Survoje hejmen la aŭta radio diris ke oni rezignis la akuzojn kontraŭ la pafinto. Mi supozas ke F-ino Weeks estis ne sufiĉe bela, nek grava, nek riĉa. La distrikta prokuroro diris ke la mistera atestanto eble povintus helpi fortigi la kazon.

Se mi havus tempmaŝinon, mi irus reen al tiu momento, kurus por helpi ŝin. Eble kaptus ŝian brakon kaj demandus kie estas la poŝtoficejo, malplifruigus ŝin kelkajn sekundojn por ke la kuglo trairu malplenan aeron.

Mi devis kontentiĝi kun martelo kaj ĉizilo. La polico venis por paroli kun mi ĉirkaŭ la tria kaj duono iun posttagmezon, kiam mi jam ĉizis "MI PARDONP" en la betonon de la trotuaro. Ili sufiĉe afable arestis min.

Historioj vagas antaŭen. La knabo estas en junulmalliberejo. La pafinto liberas. F-ino Weeks havas ĉiom da paco kaj kvieto, kiom ŝi bezonas. La kuglo estas en saketo kun etikedo ie en pruvobjekta konservejo de distrikto Multnomah. Mi ankoraŭ ne havas historion. Mi nur trinkas vinaĉon sub la orienta abutmento de la ponto al insulo Ross. Ĉiuposttagmeze ĉirkaŭ la tria mi puŝas mian ĉareton al la Ursungego kaj flustras pardonpetojn al la makulo sur la trotuaro ĝis kiam iu forigas min.

Jay Lake loĝas en Portlando, Oregono, kie li verkas diversan fikcion. Li estis kandidato pri diversaj sciencfikciaj premioj inkluzive de la Hugo, kaj en 2004 li gajnis premion John W. Campbell por plej bona nova verkisto. La angla novelo "Apologizing to the Concrete" originale aperis en Nonymous #4. Russ Williams loĝas en Vroclavo, Pollando, post transloĝiĝo de Aŭstino, Teksaso, kie li respondicis pri la ELNA-kongreso en 2005.



Valerian Pidmohilnij

Valerian Pidmohilnij

De kiam en 1905 jaro vilaĝanoj mortigis en bieno ŝian edzon, sinjorino Ivha Narčevska translokiĝis en urbon.

La morto de l'edzo ne tiel hororigis ŝin, kiel surprizis. La vilaĝo fariĝis al ŝi nekomprenebla, kaj la kamparuloj – eĉ pli. Dum tridek jaroj sinjorino Ivha loĝis en la vilaĝo – kaj dum la tuta tempo la vilaĝanoj ŝajnis al ŝi tre afablaj. Almenaŭ tiajn ŝi vidis ilin, venantaj kun iu peto. Kaj subite sovaĝa ekscito, bruligado, ruino kaj neatendita morto de l'edzo.

Sinjorino Ivha lasis la bienon kaj ekloĝis en urbo – luis ĉambreton en kvietata strato, veturis nenien, akceptis neniun, nur iam vespere promenis sole, kaj dum tago ŝi legis librojn. Tagmanĝojn oni portis al ŝi de manĝejo.

Kaj en la bieno restis la filo Andrij. Li similis al la patro – same obstina kaj memfida. Lin la vilaĝo ne surprizis – li alvenis la sekvan tagon post la patra murdo kaj de tiam ne lasis la bienon. Li eksemis betojn, ekbredis porkojn, konstruis sukerfabrikon kaj laktejon – intensa mastrumado, li diris.

Al la patrino li sendis monon, laŭokaze li mem venis.

– Ho, *maman*, via socialisma libraro plivastiĝas, – diris li rigardante librojn sur ŝia tablo.

– Jes, *Andre'*, plivastiĝas, – sopirante respondis sinjorino Ivha.

Kaj forirante, sinjoro Andrij kisis la patrinan manon kaj diris:

– Mi esperas, *maman*, ke vi finfine lasos vian ĉelon kaj translokiĝos al mi. Via

Historio de Sinjorino Ivha

ĉambro estas preta.

Vilaĝanoj, kunportantaj al ŝi de la bieno buteron, legomojn kaj aliajn, same petis ŝin reveni.

– Venu al ni, – ili diris, – eble estos pli facile. Andrij Stepanoviĉ nin tre laborigis. Tiel, vidante, povas esti: kaj estas salajro, sed, ni petas pardonon, maljuste...

Sinjorino Ivha dolore eltenis tion. Iufoje, decidinte, ŝi diris al la filo:

– *Andre'*, oni diras, ke vi ekspluatas la kamparulojn... Mi hontas pro vi. Vi ja estas tiel edukita, saĝa...

Sinjoro Andrij mirige kunigis la brovojn:

– *Maman*, jen estas rezulto de via soleco!

Sed sinjorino Ivha decidis esprimi al li ĉion. Ŝi ekstaris, demetis turkan ŝalon, kiun ŝi neniam lasis, kaj solene ekparolis:

– *Andre'*, vi devas kompreni, ke tiel ne povas esti. Mi ne referencos je sciencaj fundamentoj. Sed ĉu vi ne sentas, ke devas esti krizo? Ĉio estis rompita. Ĉu la patra morto instruis al vi nenion? Ĉu vi ne havas – pardonu je ĉi-frazo – senton de justeco? Aŭskultu, donu teron al la kamparuloj, kaj mem eklaboru honeste. Ne estu ekspluatanto!

Sinjorino Ivha maltrankvilegis. Jam dum la jaro ŝi intencis esprimi tion ĉi al la filo kaj ne unu fojon kompilis en la kapo ĉi tiun parolon. Sinjoro Andrij kviete aŭskultis ŝin, atendis por momento, okaze ke ŝi ne aldonu ion alian, kaj poste diris:

– *Maman?* vi devas serioze konsideri vian nervostaton. Via vivmaniero estas nepre ŝanĝinda. Mi sincere konsilas al vi iri eksterlanden aŭ almenaŭ veturi al Krimeo.

Li foriris, kizante la patrinan manon, kaj sinjorino Ivha sopirante ekflustris:

– *Andre'*, vi ne komprenas min...

Venis milito. Naŭ jaroj, kiujn sinjorino Ivha pasigis en sia soleca ĉambreto, paligis ŝian vizaĝon, brileto de ŝiaj okuloj similis al tiuj de narkotulino. Ŝiaj longaj fingropintoj reliefigis per maldikaj ostetoj, kaj per ili ŝi manpremis al la brusto la turkan ŝalon. Najbaroj malamamis ŝin pro ŝiaj silento kaj solena aspekto. Neniu komprenis ŝian vivon kaj ŝiajn pensojn.

Sinjoro Andrij veturis per aŭto kaj estris la lokan filion de agrikultura asocio. Ĉiu dusemajne li vizitadis patrinon kaj veturigis fruktojn kaj dolĉaĵojn.

Kiam komenciĝis milito, sinjoro Andrij diris al la patrino:

– *Maman*, eble vi eklaboru por unu el miaj malsanulejoj? Tiun laboron oni kon-

sideras nun kiel *bon ton*. Mi kontentus; kaj vi, eble, donus tiamaniere eliron por via komparto al suferantoj.

Sinjorino Ivha kapneis:

– Ho, *Andre'*, ne enmiksu min en militajn aferojn. Mi atendas krizon.

Kiam krizo venis, sinjorino Ivha ektusis, ŝiaj okuloj pli profundigis kaj ŝi des pli kunpremis sian ŝalon. Maljunecaj fortoj ne permesis al ŝi disdividi popolan ĝojon dum kunvenoj, sed kiam manifestacio hazarde preterpasis ŝiajn fenestrojn, ŝiaj lipoj firme kuniĝis kaj la manoj streĉiĝis. Profundanime ŝi flustris:

– Mi benas vin, popolo!

La filo longe ne venis, sed ŝi atendadis lin senpacience. Jen li venis. Sinjorino Ivha kun premita ĝojo demandis:

– *Andre'*, ĉu vi sentas ĝin?

– Mi sentas ĝin, *maman*, vi aspektas malbone. Eble, turnu vin al kuracisto?

– *Andre'*, kiu atentas pri malsano en tiu grandioza momento? Mi pensas pri io alia. *Andre'*, oni dume ne perdis ŝancon; vi ankoraŭ povas penti la maljustecon de via vivo – donu la bienon al kamparuloj kaj mem aliĝu al social-demokratoj. Mi benas vin al tiu laŭdinda ago.

Sinjoro Andrij klinis sin.

– Tre agrable, *maman*, ke vi klopodas pro mi! Sed, pardonu, mi ne konsideras mian vivon kiel maljustecon, mi ne intencas penti kaj ne indas al mi aliĝi al social-demokratoj. Mi, *maman*, batalos.

– Batali! – ekkriis sinjorino Ivha. – Ĉu kontraŭ popola elemento? *Andre'*, rememoru...

– Popola elemento! Ankaŭ vento estas elemento, sed ĝi muelilon turnas. Do, kial mi devas cedi la bienon, eĉ se popolo havas iun rajton? Rajto, *maman*, ne sufiĉas por gajni ion. Endas akiri en batalo.

Post tiu ĉi vizito sinjoro Andrij malaperis – alvenis la bolŝevistoj.

Kaj sinjorino Ivha en tiu tempo spertis multajn aventurojn.

Kiam en la urbo ekegis la bolŝevistoj, najbaroj denunciis sinjorinon Ivha al ĈK* – ili volis, ke oni priserĉu la maljunan burĝinon. Sed la traserĉo ne pravigis la esperojn de la najbaroj. Oni trovis ĉe la maljuna burĝino nenion malpermesitan, kaj ŝiaj libroj fariĝis fundamento de urbestrara studseminario pri rilatoj de laboro kaj kapitalo.

Tamen “doma komitato de malriĉuloj” ekregistris ĉambron de sinjorino Ivha, ĝi estis sigelita, kaj sinjorino Ivha trovis sin surstrate. Ĉiuj estis ĝojigitaj, ĉar la maljuna burĝino estis dolore pikita.

SinJORINO Ivha akceptis mokturmenton kviete kaj irante forpelita tra la urbo ŝi pensis: “Mi devas penti pekojn la miajn kaj tiujn de mia filo antaŭ la popolo. Eĉ se mi mortos pro malsato, tio estos laŭcela”.

Ŝi plenpretiĝis al malsatmorto, sed renkontis surstrate sian eksan ĉambristinon Nastja.

– Ho, aspiduloj, – ekkriis ŝi, kiam sinJORINO Ivha rakontis pri siaj travivaĵoj, – jen rabistoj ne baptitaj! Do, venu al mi – ni iel travivos.

Nastja estis virino ŝparema, ŝi ne kredis la bolŝevistojn kaj tuj ekkomprenis, ke sinJORINO AndriJ bone pagos pro la patrino. Sed sinJORINO Ivha balancis la kapon:

– Se mi pluviĝos, Nastja, kion mi faros en tiu tempo, kiam la nova vivo estas konstruata! Mi ja ne povas sidi senlabore.

Nastja enpenŝiĝis. Malfacile estis trovi por sinJORINO konvenan laboron.

– Se tio ne estos malfacila por vi, – finfine diris ŝi, – instru al mia SeroĴa legi.

La ideo plaĉis al sinJORINO Ivha.

Eduki filon de la popolo! Transdoni al li la scion kaj sperton, akiritaj de ŝi dum la longa vivo, transdoni altigitajn pensojn – kaj per tio pentopagi la pekojn de la familio.

SinJORINO Ivha konsentis.

Nastja loĝigis sinJORINON Ivha en “grandan ĥaton**” – tiel ŝi nomis la malsekan kaj malhelan ĉambreon apud la kuirejo, kie ŝi dormis mem. SinJORINO Ivha malhavis eĉ tolaĵon kaj dormis sur benko kun sternita tapiŝo, kovrante sin per la ŝalo. Ŝi ne foriris de la ĉambro, ĉar jam ekfrostis, kaj tuso ne lasis ŝin.

– Mi kore dankas vin, Nastja, – ekdiris sinJORINO Ivha, – ke vi donis al mi rifuĝon kaj komisiis min eduki vian filon. Mi pravigos vian fidon.

– Feliĉigu vin Dio, – respondis Nastja, – ĉu vi aŭdas, SeroĴa?

Dektrijara SeroĴa, filo de la popolo, estis diboĉa infano de la strato. Li ĉiam forestis de la domo, ie vagis, kaj alkuris hejmen manĝeti panpecon. SinJORINO Ivha tuj disonancis lian vivon: de nun li devas esti hejme kaj lerni. Tiel diris la patrino, kaj por firmigi sian ordonon ŝi batis SeroĴan per zono. SeroĴa kaŝe moknomis sinJORINON Ivha kiel “putino kun kaptuko” kaj ekmalamis ŝin per la tuta forto de sia libervola animo.

Post kelkaj tagoj oni akiris lernolibrojn kaj sinJORINO Ivha, kun profunda devosento antaŭ SeroĴa, ekinstruis. Ŝi diris al li:

– *SerĴ*, vi devas eksenti, ke la nova epoko postulas de ĉiuj al vi similaj – feĉoj de kapitalismo – superan inteligentecon. Alikaze la proletaro venkon ne gajnos... Ni lernu.

Sed SeroĴa ŝajnis sin idioto, eligis la langon kaj hunde muĝegis.

SinJORINO Ivha estis konfuzita. Ŝi pli fervore ekpersvadis lin. Tiam SeroĴa fariĝis serioza kaj demandis ŝin pri signifo de la vortoj, ofte uzataj far de koleraj fiakristoj.

SinJORINA Ivha malespere kunpremisa la manojn kaj ekkriis:

– Kia abismo de malhelo kaj malmoraleco!

Ŝi ĉesigis la lecionon, eksidis en angulo sur sia benko kaj longe meditis kiel plej bone eduki la knabon. Ŝi sciis, ke tio estas

devo de ŝia vivo, kaj bedaŭras pri manko de pedagogia lernolibro.

Vespere revenis Nastja (ĉiutage ŝi laboris kiel lavistino) kaj, demandinte pri rezultoj de la enkonduka leciono, ŝi denove senkomplete batis la filon. SeroĴa eltenis senvorte, sed malbenis sinJORINON Ivha kaj verve decidis venĝi al ŝi.

La morgaŭan tagon, kiam la patrino foriris, li senbrue pendigis super la kuireja pordo lignositelon da glaci-akvo kaj ŝnurligis ĝin al la pordo, por ke ĝi renversigŭ dum la malfermo de la pordo. Poste li afable invitis sinJORINON Ivha en la kuirejon.

Ŝi eliris, kaj akvo de la sitelego elverŝiĝis sur ŝian kapon. SeroĴa saltadis, ridegante, ĝis plafono, kaj sinJORINO Ivha sidis sur sia benko kaj tremis, ŝi ja ne havis ŝanĝvestaĵon. Sed ŝi ne tenis koleron. Ŝi flustris:

– *Andre*, komprenu min! Mi respondencas pri pekoj de ĉiuj niaj prauloj.

Kiam revenis Nastja, ŝi jam kuŝis en febro. Tusego disŝiradis ŝian bruston. Kaj la sekvan matenon la animo de sinJORINO Ivha forlasis ŝian korpon.

1923.

Tradukis Viktor Pajuk

* ĈK – soveta sekreta servo en frua Sovetio; poste fariĝis KGB.

** ĥato – domo (kabano) en la ukraina lingvo

La Majfloro-Interkonsento

En la nomo de Dio, Amen’.

Ni, kies nomoj estas subskribitaj, la lojalaj regatoj de nia impona suverena Moŝto, Reĝo Jakobo, per la graco de Dio, de Grand-britujo, Francujo* kaj Irlando, Reĝo, Defendanto de la Kredo, ktp. entrepreninte por la gloro de Dio, kaj antaŭenigo de la Kristana kredaro, kaj honoro de nia reĝo kaj lando, vojaĝon por starigi la unuan kolonion en la nordaj partoj de Virginio, per ĉi tiu dokumento ja solene kaj reciproke antaŭ Dio, kaj unu antaŭ la alia, interkonsentas kaj kunligas nin en civilan politikan anaron por pli bona sinordigo kaj sinkonservo, kaj la antaŭenigo de la celoj antaŭdiritaj, kaj laŭ rajto de kio dekreti, konstistigi, kaj formuli, tiajn justajn kaj egalajn leĝojn, statutojn, aktojn, konstituciojn, kaj oficojn, de tempo al tempo kiajn oni juĝas plej decaj kaj konvenaj por la ĝenerala bono de la

Kolonio, al kiu ni promesas ĉiujn justajn cedemon kaj obeon.

Ateste pri kio, ni ĉi tie subskribis niajn nomojn ĉe Kabo Moruo** la 11-an de novembro, en la jaro de la reĝado de nia suverena Moŝto, Reĝo Jakobo de Anglujo, Francujo kaj Irlando la dek-oka, kaj de Skotlando la kvindek-kvara.

A.D. 1620

NOTO: La angla nomo James estas Jakobo Esperante.

Chilton, Howland, Tilley, Warren, Rogers estis miaj prapatroj.

Mi estas membro de “Arizonaj Posteuloj



de Majfloro” ekde 1965.

Trad. de la angla Vilĉjo Munsil

* Inter la 14-a jarcento kaj 1801 britaj monarĥoj portis la (nominalan) titolon “reĝ(in)o de Francio”.

** Kabo Moruo: Cape Cod

Vojaĝu Esperante en 2007



Post la 91-a Universala Kongreso en Florenco (29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto, 2006) dudek naŭ esperantistoj vizitis Malton, la plej nova membro de la Eŭropa Unio, kun la plej antikvaj ruinaĵoj en la mondo – pli aĝaj ol la piramidoj aŭ Stonhenĝo.

El la 29 partoprenantoj en la aranĝoj de Esperanto Vojaĝ-Servo nur 11 estis Usonanoj. Kiel kutime, niaj ekskursoj estis tre internaciaj kun aliaj partoprenantoj el Belgio, Francio, Germanio, Israelo, Japanio, kaj Meksiko. Ĝi estis interesege ekskurso en ege malgranda lando, plenplena de antikvaĵoj, religio, kaj renesanca arkitekturo de la tempo de la kruc-kavaliroj.

Aliĝis al la Florenca Universala Kongreso entute 44 usonanoj: Ulrich Becker, Anna kaj Larry Bennett, Myron Bondelid, Allan kaj Joyce Boschen, Corey Brill, Alberta Casey, Cody Casterline, Lanna Cheng kaj Ralph Lewin, Francisco Cruzaley, Edwin DeKock, Uday Dhar, Charles Ezebingaya, Greg Finley, Ronald Glossop, Rochelle Grossman, Sam Green, Bill kaj Lucy Harmon, Vilĉjo Harris, Frans kaj Dorothy Jahger, Boris Kolker, Mary Jane Kwan, Jan Long, Werner Moeller, Todd Phillips, Sam, Dan, Melissa kaj Amy Pittman, David Simpson, Julie Spickler, Bob Swenson, Sandy Thacker kaj Ed Williger, Claudine kaj Roland Thibault, Humphrey Tonkin, Arnold Victor, Steve Wagenseller, kaj Julie Winberg.

Kelkaj el la aliĝintoj ne povis partopreni – inkluzive ambaŭ niajn honorajn membrojn de UEA, Boris Kolker kaj Vilĉjo Harmon.

Venontaj Gravaj Esperantaj Eventoj en 2007

Nord Amerika Somera Kursaro 8-27 julio, University of California, San Diego (UCSD)

NASK revenos al Kalifornio! Detaloj baldaŭ haveblos en la ELNA-retpaĝaro kaj ĉe Ellen Eddy: ed-dyellen@aol.com

54-a ELNA Kongreso 27-30 julio, Tijuana, Meksiko.

Detaloj haveblaj baldaŭ; aliĝilo en la ELNA retpaĝaro kaj jam haveblas en ĉi tiu numero de *Esperanto USA*. Se vi deziras proponi programeron, sendu retmesaĝon al Gregg Wasson ĉe: gwasson@gregwasson.com. Se vi havas ideojn por ekskursoj kiujn vi deziras gvidi aŭ partopreni, vi kontakti

BurgessRobert@hotmail.com. Li bone konas Tijuana kaj San Diego. La ĉefo de la LKK estas: Mar Cardenas – garymar@2000@aol.com. Rezervu la datojn por ege interesa ELNA-kongreso – speciale kun niaj Meksikaj amikoj.

Notu: ŝanĝo! La Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (“TAKE”) ne okazos en 2007. TAKE okazos en julio de 2008 en Montrealo samtempe kun la ELNA-kongreso.

La 92-a Universala Kongreso 4-10 aŭgusto 2007, Jokohamo, Japanio

Partoprenantoj de dekstre maldekstren: Louise Marin, Henri kaj Helena Lafarque, Anna Bennett, Gabi Zeevi, Joyce kaj Allan Boschen, Leonora Torres; (dua vico) Josi Shemer, Helene Bracke, Cvi kaj Vera Solt, Lusi Harmon, Mathilda Landau, Rochelle Grossman, Natalie Sera; (supra parto) Robert Swenson, Mike Bondelid, Jean Marin, Masako Grossmann, Jean Revet, Andre Grossmann, William Harris, kaj Werner Moeller. Mankas en la foto: Larry Bennett (kiu fotis), Malvina Faklieru, Nobuyuki Shoji, Ryuzo Yamasaki, kaj Guadalupe Vega.

Temo: Okcidento en Oriento – Akcepto kaj Rezisto

Jokohamo estas havenurbo kiu malfermis sin al aliaj landoj kiel haveno en 1859, la naskiĝjaro de Zamenhof, kaj la urbo staris ĉe kapo de modernigo de Japanio, kiu estis preskaŭ sinonima al Eŭropiĝo (okcidentiĝo). Japanio restas tre ekzotika lando – modernega, samtempe tre tradicia – ege interesa per si mem, sed la amasoj da spertaj, helpemaj esperantistoj tie helpas nin kompreni kaj pli ĝui la sperton.

Notu: Se vi partoprenos la ELNA-kongreson en Tijuana, de tie estos senhala flugo al Tokio du fojojn semajne. La kosto estas iom malpli ol tradiciaj usonaj kaj japanaj flugkompanioj. Esperanto Vojaĝ-Servo esperas aranĝi specialan tarifon por la flugoj. Por aliĝilo kaj/aŭ pli da informo, kontaktu: Esperanto Travel Service

1824 Euclid Avenue
Berkeley CA 94709
(510) 531-8393
LusiHarmon@aol.com

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040